

Anonimaj Verkistoj

La Romano

de

Renardo.

Verko el la publika fako.

https://fr.wikisource.org/wiki/Le_Roman_de_Renardo

Enhava tabelo.

Enkonduko.....	4
Prologo.....	5
LIBRO UNUA	
01a Aventuro.....	8
02a Aventuro.....	10
03a Aventuro.....	16
04a Aventuro.....	23
05a Aventuro.....	26
06a Aventuro.....	28
07a Aventuro.....	29
08a Aventuro.....	31
09a Aventuro.....	35
10a Aventuro.....	38
11a Aventuro.....	44
12a Aventuro.....	47
13a Aventuro.....	48
14a Aventuro.....	52
15a Aventuro.....	55
16a Aventuro.....	58
17a Aventuro.....	61
18a Aventuro.....	65
19a Aventuro.....	68
20a Aventuro.....	71
21a Aventuro.....	74
22a Aventuro.....	77
23a Aventuro.....	79
24a Aventuro.....	81
25a Aventuro.....	84
26 ^a Aventuro.....	86
27 ^a Aventuro.....	88
28 ^a Aventuro.....	91
29 ^a Aventuro.....	94
30 ^a Aventuro.....	101

LIBRO DUA

31 ^a Aventuro.....	106
32 ^a Aventuro.....	109
33a Aventuro.....	116
34a Aventuro.....	118
35a Aventuro.....	120
36a Aventuro.....	122
37a Aventuro.....	124
38a Aventuro.....	126
39 ^a Aventuro.....	131
40 ^a Aventuro.....	133
41 ^a Aventuro.....	135
42 ^a Aventuro.....	139
43 ^a Aventuro.....	142
44 ^a Aventuro.....	145
45 ^a Aventuro.....	147
46 ^a Aventuro.....	150
47 ^a Aventuro.....	154
48 ^a Aventuro.....	157
49 ^a Aventuro.....	160
50 ^a Aventuro.....	162
51 ^a Aventuro.....	164
52 ^a Aventuro.....	167
53a Aventuro.....	169
54 ^a Aventuro.....	171
55 ^a Aventuro.....	173
56 ^a Aventuro.....	178
57 ^a Aventuro.....	181
58 ^a Aventuro.....	183
59 ^a Aventuro.....	186
60 ^a kaj lasta Aventuro.....	189

Enkonduko.

La Romano de Renardo ne estas romano, sed iu kolekto el romanika lingvo da diverspecaj tekstoj devenintaj de longa tradicio de latinaj bestrakontoj de Ezopo.

Bona diableto aŭ justiganto, seksa obsedato aŭ hipokrita demono, Renardo estas kompleksa kaj plurforma heroo.

Malhonesta aŭ maliceta laŭ la branĉoj de la rakonto, li korpigas la intelligentan ruzon ligata al la parolarto en epizodoj kiuj ricevas la kutiman formon de la bona aŭ malbona artifiko ludata de vulpo. Ĉiu aventuro prezentas novajn peripetiojn kiuj enscenigas bestaron kun aparte homaj karakteroj.

Ĉi tiu satiro prenas diversajn aspektojn : parodio de kantoj de ĝesto kaj de kortezaj romanoj, sed ankaŭ socia kritiko, kontraŭklerikalismo kaj malobservado de tabuoj.

Renardo respektas nenion, nek amikojn nek malamikojn, nek fortulojn nek malfortulojn, nek Dion nek reĝon.

Skribe metita de anonimaj verkistoj inter 1170 kaj 1250, la romano de Renardo prezentas la popularan respondaĵon de la epopea kaj kavalireca literaturo.

Pli malfruaj verkoj prenas la maskon de Renardo por denunci kun akreco la koruptecon kaj la hipokritecon de la socio, kiel Renardo la Kriplulo.

Fine de la XIII^a jarcento, Jakmarto Gieleo reprenas la samajn rolulojn por skribi verkon de morala edifaĵo, Renardo la Freŝbakito, kun la alegoria kaj simbola formo en kiu la vulpo fariĝas la enkorpiĝo de la Malbono, mastro de la mondo.

En tiu fino de la Mezepoko, la rolulo de Renardo estas tiel populara, ke lia nomo, skribita per T, eniras en la francan lingvon por nomi la vulpon.

Prologo.

En kiu oni vidas kiel la Vulpo kaj la Lupo venis en la mondo,
kaj kial la unua nomos Renardoⁿ, la dua Isengrinoⁿ.

Sinjoroj, vi certe ja aŭdis rakonti multajn rakontojn : oni diris al vi pri **Pariso**, kiel li forrabis **Helenoⁿ**, kaj pri **Tristano**, kiel li komponis la **lajon⁽¹⁾** de la Kaprifolio; vi scias la fabelon de la Lino kaj de la Ŝafino, multajn fablojn kaj kantojn de ĝesto : sed vi ne konas la grandan militon kiu neniam ĉesos, de Renardo kaj de lia komplico Isengrino. Se vi volas, mi diros al vi kiel la kverelo komencis, kaj antaŭ ĉio, kiel venis en la mondon la du kunuloj.

Iam, mi malfermis sekretan ŝrankon, kaj mi havis la ŝancon ene trovi libron kiu traktis pri la ĉasado. Longa vermiljona letero haltis miajn okulojn; estis la komenco de la vivo de Renardo. Se mi ne legis ĝin, mi rigardus kiel ebriulon tiun kiu rakontus ĝin al mi; sed oni devas respekti la skribaĵon kaj, vi scias tion, tiu kiu ne fidus librojn, estas en danĝero de malbona fino.

La Libro do diras al ni, ke la bona Dio, post esti puninta niajn unuajn gepatrojn kiel ili meritis, kaj tuj kiam ili estis forpelitaj el la Paradizo, kompatis al ilian sorto. Li metis vergon inter la manoj de Adamo kaj diris al li, ke por akiri tion kio plej bone taŭgus al li, sufiĉis frapi la maron kun ĝi. Adamo ne prokrastis fari la provon : li etendis la vergon sur la grandan salan akvon; subite li vidis el ĝi eliri ŝafinon. "Jen", li diris al si, "kiu estas bone; la ŝafino restos apud ni, de ĝi ni havos lanon, fromaĝon kaj lakton".

Eva, ekvidante la ŝafinon, deziris ion pli bonan. Du ŝafinoj, ŝi pensis, pli bone taŭgos ol unu. Ŝi do petegis sian edzon lasi ŝin frapi siavice. Adamo (ni scias tion por nia malfeliĉo), kapablis nenion rifuzi al sia edzino; Eva ricevis de li la vergon kaj etendis ĝin sur la ondojn; tuj aperis malvirta besto, iu lupo, kiu pafante sin al la ŝafino, kunprenis ĝin al la apuda arbarego. Ĉe la doloraj krioj de Eva, Adamo reprenis la vergon; li frapas; hundo tuj postkuras la lupon, poste

1 Atentu, oni trovas tiun vorton sur la reto, sed ne en PIV.

revenas revenigante la jam sangan ŝafinon.

Granda tiam estis la ĝojo de niaj unuaj gepatroj. Hundo kaj ŝafino, diras la Libro, ne povas vivi sen homa kompanio. Kaj ĉiufoje kiam Adamo kaj Eva utiligis la vergon, novaj bestoj eliris el la maro; sed kun ĉi tiu malsimilo, ke Adamo naskigis la malsovaĝajn bestojn, Eva la sovaĝajn bestojn kiuj ĉiuj, kiel la lupo, ekvojiris al la arbaroj.

Inter la lastaj troviĝis la vulpo, kun rufa haro, kun malbonfara naturo, kun inteligenteco sufiĉe subtila por trompi ĉiujn bestojn de la mondo. La vulpo strange similis al tiu "majstro" spertiĝinta pri ĉiajn friponaĵojn, kiun oni nomis Renardo, kaj kiu ankoraŭ hodiaŭ donas sian nomon al ĉiuj kiuj studas por trompi kaj mensogi. Renardo estas al homoj, tio kion la vulpo estas al la bestoj : ili estas el la sama naturo; samajn inklinojn, samajn kutimojn; ili do povas preni la nomon unu de la alia.

Nu Renardo havis kiel onklon, Siron Isengrinoⁿ, sangavida kaj brutala viro, mastro de ĉiuj kiuj vivas el murdo kaj el rabado. Jen kial, en niaj rakontoj, la nomo de la lupo konfuziĝos kun tiu de Isengrino.

Damo Hersento, digna edzino de la ŝtelisto Isengrino, koro plenplena de perfideco, vizaĝo kruda kaj kuperoza, estos pro tia kialo, la baptopatrino de la lupino. Unu estis nesatigebla tiom kiom la alia estas glutema : samajn emojn, samajn karakterojn; konsekvence filinoj de la sama patrino. Necesas tamen konfesi tion : ne estis vera parenceco inter la lupo kaj la vulpo; nur kiam ili vizitis unu la alian kaj estis inter ili komuneco de intereso kaj de celoj, la lupo ofte traktis la vulpon kiel bo-nevon; la alia nomis lin sian onklon kaj sia partnero. Koncerne al la edzino de Renardo, damo Riŝeta, oni povas diri ke ŝi malice samvaloras la renardinon, kaj ke se unu estas katino, la alia estas tineo. Neniam oni vidis du parojn pli bone adaptitajn; saman inklinton al ruzeco en Renardo kaj en la vulpo; saman rabemecon en la vulpino kaj en Riŝeta.

Kaj nun, sinjoroj, kiam vi konas Isengrino la lupo kaj Renardo la vulpo, ne miru vidi ĉi tie la vulpon kaj la lupon paroli kiel kapablis fari Isengrino kaj Renardo : la bonaj fratoj kiuj loĝas ĉe nia pordo, rakontas ke sama afero antaŭe okazis al la azenino de iu profeto kiun

mi aŭdis nomi Bileamon. La reĝo Baleako promesigis lin malbeni la Izraelidojn; nia Sinjoro kiu ne volis ke li suferu, starigis antaŭ la azenino sian anĝelon armita de brilegan glavon. Bileamo vane frapis la kompatindan beston, la vipo, la kolbrido, la kalkanumoj nenion faris; fine, la azenino, kun la Dipermeso, ekdiris : "Lasu min, Bileamo, ne frapu min; ĉu vi ne vidas Dion, kiu nebligas min antaŭeniri ?" Certege Dio povas, kaj vi ne dubas tion, ankaŭ doni parolon al ĉiuj aliaj bestoj; li eĉ farus ankoraŭ pli : li decidigus uzuriston karitate malfermi sian bursegon. Konsentite, aŭskultu ĉion kion mi scias pri la vivo de Renardo kaj Isengrino.

LIBRO UNUA

01a Aventuro.

Kiel Renardo dumnokte forportis la lardojn de Isengrino.

Renardo, iun matenon, eniris ĉe sia onklo, kun la okuloj konfuzaj, la felo hirta. "Kio estas, bo-nevo ? Vi ŝajnas en malbona stato", diris la mastro de la loĝejo; "Ĉu vi estus malsana ? - Jes; Mi ne malbone fartas. - Ĉu vi ne matenmanĝis ? - Ne, kaj eĉ mi ne emas tion. - Nu do ! Damo Hersento, tuj ellitiĝu, pretigu por ĉi tiu kara nevo stangeton da renaĵoj kaj lienajoj; li ne rifuzos tion".

Hersento forlasas la liton kaj pretiĝas obei. Sed Renardo atendis pli bonan de sia onklo; li vidis tri belajn lardojn pendantajn ĉe la supro de la ĉambro, kaj estas ilia aromo kiu lin allogis. "Jen, li diras, tre riskaj lardaĵoj ! Ĉu vi scias, bo-onklo, ke se iu el viaj najbaroj (iu ajn, ili ĉiuj estas egalaj) ekvidas ilin, li volos sian parton ? En via loko, mi ne perdus momenton por malkroĉi ilin, kaj mi laŭtege dirus ke oni ŝtelis min. - Ba ! eligis Isengrino, mi ne maltrankviliĝas pri tio; kaj tiu povas vidi ilin, kiu neniam scios la guston. - Kiel ! Se oni petis ĝin al vi ? - Ne ekzistas postulo; mi ne donus ĝin al mia nevo, al mia frato, al kiu ajn en la mondo".

Renardo ne insistis; li manĝis siajn renaĵojn kaj adiaŭis. Sed la postmorgaŭon li plennokte revenis antaŭ la domo de Isengrino. Ĉiuj ene dormis. Li supreniras ĉe la firston, fosas kaj aranĝas aperturon, trapasas, alvenas al la lardaĵoj, kunprenas ilin, rehejmeniras, popece tranĉas ilin kaj kaŝas ilin en la pajlon de sia lito.

Tamen la tago alvenas; Isengrino malfermas la okulojn : Kio tio estas ? La tegmento truita, la lardoj, liaj karaj lardoj forigitaj ! "Helpon ! Ŝtel ! Hersento ! Hersento ! Ni estas perditaj !"

Hersento, abrupte ekvekinta, ellitiĝas taŭzita : "Kio estas ? Ho ! Kia aventuro ! Ni, ŝtelitaj de ŝtelistoj ! Al kiu plendi !" Ili kriis kiel plej

bone, sed ili ne scias kiu akuzi; ili perdiĝas en vanaj streboj por diveni la farinton de tia atenco.

Renardo, tamen, alvenas : li estis bone manĝinta, li havis vizaĝon kvieta, kontenta. "He ! Boonklo, kion vi havas ? Vi ŝajnas al mi malbone; ĉu vi estus malsana ? - Mi nur havus tro da kaŭzo; niaj tri belaj lardaĵoj, ĉu vi scias ? Oni prenis ilin al mi ! - Ha ! respondas Renardo ridante, tio estas bona ! Jes, jen kiel necesas diri : oni prenis ilin al vi. Bone, bonege ! Sed onklo, tio ne estas ĉio, necesas kii tion sur la straton, ke viaj najbaroj ne povu dubi tion. - He ! Mi diras al vi la veron; oni ŝtelis miajn lardojn, miajn belajn lardaĵojn. - Nu ! reparolis Renardo, ne estas al mi ke necesas diri tion : tiu plendas, mi scias tion, kiu ne havas la plej malgravan problemon. Viaj lardaĵoj, vi ŝirmis ilin de la irantoj kaj venantoj; vi bone agis, mi tre aprobas vin. - Kiel ! Ŝerculaĉo, ĉu vi ne volas aŭdi min ? Mi diras al vi ke oni ŝtelis miajn lardaĵojn. - Diru, ĉiam diru. - Tio ne estas bona, tiam faris Damo Hersento, ne kredi nin. Se ni havus ilin, estus plezuro por ni dividi ilin, vi bone scias tion. - Mi scias ke vi konas la bonajn lertaĵojn. Tamen ĉi tie, ĉio ne estas profito; jen via domo truita; tio necesis, mi konsentas, sed ĝi postulos grandajn riparojn. Estas tra tie ke la ŝtelistoj eniris, ĉu ne ? Estas tra tie ke ili forkuris ? - Jes, estas la vero. - Vi ne povus diri aliaĵon. - Malbenon, ĉiaokaze, diris Isengrino, ruladante la okulojn, al kiu prenis al mi miajn lardaĵojn, se mi sukcesos malkovri lin !" Renardo ne plu respondis; li faris belan paŭton, kaj malproksimiĝis, kaŝe rikananta. Tia estis la unua aventuro, la knabecoj de Renardo. Pli poste, li pliboniĝis por la malfeliĉo de ĉiuj, kaj ĉefe de lia kara kunulo Isengrino.

02a Aventuro.

*Kiel Renardo eniris en la fermejon de Konstanto Desnŭa;
kiel li forprenis Ŝanteklero" kaj kiel li ne manĝis lin.*

Poste, alian tagon, okazas al Renardo sin prezenti antaŭ vilaĝo meze de la arbaroj, tre abunde popolata de kokoj, kokinoj, viranseroj, anseridoj kaj anasoj. En la ĉirkaŭbaritejo, Moŝto Konstanto Desnŭa, iu kampulo tre komforta, havis sian domon abunde provizita de la plej bonaj proviantoj, de freŝaj kaj salitaj viandoj. Ĉe iu flanko, pomoj kaj piroj; ĉe la alia, bredparko, formita per ĉirkaŭaĵo de palisoj el kverko, kovritaj de densaj kratagoj.

Estas tie kie Konstanto Desnŭa gardis siajn kokinojn ŝirmite de ajna surprizo. Renardo, enirinta en la ĉirkaŭbaritejo, malrapide alproksimiĝas al la barilo. Sed la interplektitaj dornarbustoj ne ebligas lin transiri la palisaron. Li videtas la kokinojn, sekvas iliajn movadojn, sed ne scias kiel kuniĝi ilin. Se li forlasus la lokon kie li estis kaŭranta, kaj se eĉ li aŭdacus provi eksalti trans la barilo, li estus vidata sen ia dubo, kaj dum la kokinoj sin ĵetus en la dornaĵojn, oni persekutus lin, oni forkaptus lin, li ne havus tempon forigi plumon ĉe la plej forta kokido. Li vane provas klopodi kaj, por altiri la kokinojn, mallevi la kolon, svingi la pinton de sia vosto, nenio sukcesas al li.

Fine, en la barilo, li ekrimarkas rompitan palison kiu promesas al li facilan eniradon : li elanas kaj falas en bedon de brasikoj kiun la kampulo aranĝis. Sed la bruo de lia falo vigligis la kortbirdaron; La kokinoj timigitaj forkuras al la konstruaĵoj. Tio ne estis bona por Renardo. Aliflanke, Ŝanteklero, la virkoko revenis de iu esploro en la heĝo; li vidas siajn vasalinojn forkuri, kaj komprenas nenion pri ilia teruro, li kuniĝas al ili kun la plumo mallevita, la kolo etendita. Tiam, per tono de riproĉo kaj malkontento : "Kial ĉi tiu hasto por reveni al la domo ? Ĉu vi estas frenezaj ?" Pindo, la plej bona bruto de la trupo, kiu demetas la plej dikajn ovojn, zorgas pri la respondo : "Estas ke ni tre timis. - Kaj pri kio ? Ĉu almenaŭ estas pri io ? - Jes.

- Nu. - Estas pri besto de arbaroj kiu povis meti nin en malbona situacio. - Nu ! diras la virkoko, Ŝajne estas nenio; restu, mi respondecas pri ĉio. - Ho ! Jen, kriis Pindo, mi denove ĵus ekvidis lin. - Vi ? - Jes; almenaŭ mi vidis la heĝon moviĝi kaj tremi la brasikfolioj sub kiuj li restas kaŝita. - Silentu, stultulino kiun vi estas, fiere diris Ŝanteklero, kiel vulpo, putoro eĉ, kapablus eniri ĉi tien : ĉu la heĝo ne estas tro kompakta ? Dormu trankvile; finfine, mi ĉeestas por defendi vin.

Ŝanteklero parolis, kaj tuj iras skrapi sterkon kiu ŝajnis vigle interesi lin. Tamen la paroloj de Pindo revenis al li, kaj sen scii tion kio ŝvebis super li, li ŝajnigis trankvilecon kiun li ne havis. Li grimpas sur la pinton de iu tegmento, tie, kun iu okulo malfermita kaj la alia fermita, iu piedo kaptema kaj la alia rekta, li observas kaj intermite disrigardas, ĝis kiam, tedita pro vigli kaj pro kanti, li pretervole lasas sin cedi al dormo. Tiam, li estas vizitata de stranga sonĝo; li pensas vidi objekton kiu antaŭeniras de la korto al li, kaj kaŭzas al li mortigan tremon. Ĉi tiu objekto prezentis al li rufan peltaĵon morditan aŭ borderitan de malgrandaj blankaj pintoj; li surmetis la peltaĵon tre mallarĝa ĉe la eniro, kaj tio kion li ne komprenis, li sin vestis ĝin per la kolumo, tiel bone ke, enirante ĝin, li baldaŭ metis la kapon al la komenco de la vosto. Cetere, la peltaĵon havis la pelton ekstere, tio kio estis tute kontraŭ la uzado de la peltaĵoj.

Ŝanteklero terurita ekstrema kaj vekiĝas : "Sankta Spirito ! li diras krucosignante sin, defendu mian korpon de morto kaj malliberejo !" Li saltas malsupren de la tegmento kaj iras kuniĝi kun la kokinoj disigitaj sub la tufarbustoj de la heĝo. Li alvokas Pindon, ŝi alvenas. "Mia kara Pindo, mi konfesas tion al vi, mi estas miavice malkvieta. - "Ŝajne vi volas moki nin, respondas la kokino; vi estas kiel la hundo kiu krias antaŭ ol la ŝtono tuŝas lin. Nu, kio okazis al vi ? - Mi ĵus faris strangan sonĝon, kaj vi tuj diros al mi vian opinion. Mi kredis vidi alveni al mi mi-ne-scias kiun aferon surhavantan rufan peltaĵon, bone tajlitan sen misa tranĉado. Mi estis devigita vestaĉi min per ĝi; la rando havis la blankecon kaj malmolecon de la eburo; la pelto estis ekstere, oni surmetis ĝin al mi kontraŭsence, kaj ĉar mi provis formeti ĝin, mi ekstremitis kaj vekiĝis. Diru al mi, vi kiu estas

saĝa, tion kion necesas pensi pri ĉio ĉi".

"Nu ĉio ĉi, serioze diras Pindo, estas nur sonĝo, kaj ĉiuj sonĝoj, oni diras, estas mensogoj. Tamen, mi kredas konjekti tion kion via povas aŭguri. La objekto portanta rufan peltaĵon ne estas alia ol la vulpo, kiu volos vestaĉi vin per ĝi. En la rando simila al grajnoj el eburo, mi rekonas la blankajn dentojn kies vi sentos la solidecon. La tiel mallarĝa kolumo de la peltaĵo, estas la glutejo de la malvirta besto; tra ĝi vi pasos kaj vi kapablos per via kapo tuŝi la voston kies la pelto estos ekstere. Jen la signifo de via sonĝo; kaj ĉio tio povos okazi al vi antaŭ tagmezo. Ne do atendu, kredu min; ni fuĝu, ĉar, mi ripetas tion al vi, li ĉeestas, tie en ĉi tiu tufarbusto, kaŝrigardante la momenton forkapti vin".

Sed Ŝanteklero, tute vekinta, reakiris sian unuan konfidon. "Pindo, inĵo mia, li diris, jen pri viaj teruroj kaj via ordinara malfirmeco. Kiel vi povas supozi ke mi, mi ja lasas min kapti de besto kaŝita en nia parko ! Vi vere estas freneza, kaj tre malsaĝa, tiu kiu timegiĝas pro sonĝo. - Estos do, diris Pindo, tio kion Dio volos, sed ke mi ne plu ludu la plej malgrandan rolon en via favoro, se la sonĝo kiun vi rakontis al mi, bezonas alian klarigon. - Nu, nu, belulino mia, diris Ŝanteklero brustoŝvelante, sufiĉe da babilado kiel tia". Kaj reirante al la sterkamaso kiun li havis plezuron skrapeti. Iom da tempo poste, la dormemo denove fermis al li la okulojn.

Nu Renardo nenion perdis pri la parolado de Ŝanteklero kaj Pindo. Li vidis kun kontentiĝo la konfidon de la virkoko, kaj kiam li kredis lin taŭge redormanta, li faris movon, kviete metis paŝon antaŭ la alia, poste sin ĵetis por forkapti lin per unu salto. Sed tiel ajn malrapide li antaŭeniris, Ŝanteklero divenis tion, kaj havis nur tempon eksalti kaj eviti la trafon ekflugante al la alia flanko de la sterko. Renardo vidas kun ĉagreno, ke li maltrafis sian celon; kaj nun, la rimedo por reteni la predon kiu eskapas de li ? "Ha ! Dio mia, Ŝanteklero, li diras per sia plej dolĉa voĉo, vi malproksimiĝas kvazaŭ vi timis vian plej bonan amikon. Mi petegas, lasu min diri al vi, kiom mi estas feliĉa vidi vin tiel vigla kaj lerta. Ni estas rektaj kuzoj, vi scias".

Ŝanteklero ne respondis, aŭ ĉar li restis malfidema, aŭ ĉar la plezuro esti aŭdanta sin laŭdi de iu parenco kiun li ignoris, forprenis

de li la parolon. Sed por montri ke li ne timis, li ekkantis brilan soneton. "Jes, estas sufiĉe bone kantita, diras Renardo, sed ĉu vi memoras la bonan Ŝanteklino", kiu naskigis vin ? Ha ! Estis li kiu necesis aŭdi. Neniam iu el sia raso proksimiĝos al li. Li havis, mi memoras tion, la voĉon tiel laŭtan, tiel klaran, ke oni aŭskultis lin je unu leŭgo ĉirkaŭe, kaj por plidaŭrigi la sonojn tute per unu spiro, sufiĉis al li malfermi la buŝon kaj fermi la okulojn. - Kuzo, tiam eligis Ŝanteklero, vi ŝajne volas moki. - Mi moki amikon, tian proksiman parencon ? Ha ! Ŝanteklero, vi ne pensas tion. La vero estas ke mi amas nenion tiom kiom la bonan muzikon, kaj mi konas pri tio. Vi bone kantus, se vi volus; nur iomete palpebrumu la okulon, kaj komencu unu el viaj plej bonaj arioj. Sed unue, diras Ŝanteklero, ĉu mi povas fidi al viaj vortoj ? Iom malproksimiĝu, se vi volas ke mi kantu: vi pli bone juĝos, de malproksime, pri la amplekso de mia falseto. - Bone, diras Renardo, apenaŭ retropaŝante, ni do vidu, kuzo, ĉu vi vere estas filo de mia bona onklo Ŝanteklino".

La virkoko, unu okulon malfermitan la alian fermitan, kaj ankoraŭ iom singardema, tiam komencas grandan arion. "Sincere, diras Renardo, nenio en tio estas vere rimarkinda; sed Ŝanteklino, ha ! estis li : kia diferenco ! Tuj kiam li fermis la okulojn, li plidaŭrigis la trajtojn tiagrade ke oni aŭdis lin tre transe de la ĉirkaŭbaritejo. Sincere, kompatinda amiko mia, vi ne proksimiĝas al tio". Tiuj vortoj sufiĉe pikis Ŝantekleron por forgesigi ĉion al li cele elturni sin en la estimo de lia kuzo : li palpebrumis, li ĵetis noton kiun li senspirige plidaŭrigis, kiam la alia, kredante la taŭgan momenton alvenitan, sin pafas kiel sago, kaptas lin ĉe la kolo, kaj ekforiras kun sia predo. Pindo, kiu sekvis lin per la okuloj, tiam eligas blekon el la plej akutan. "Ha ! Ŝanteklero, mi ja diris tion al vi; kial esti ne kredante min ! Jen Renardo kiu kunprenas vin. Ha ! kompatindan doloron ! Kion mi fariĝos, senigita de mia edzo, de mia sinjoro, de ĉio kio mi amis en la mondo!"

Tamen ĉe la momento kiam Renardo kaptis la kompatindan virkokon, la tago finiĝis, kaj la maljunulino, gardistino de la ĉirkaŭbaritejo, malfermis la pordon de la kokejo. Ŝi alvokas Pindoⁿ, Bizoⁿ, Rufataⁿ; neniuj respondas; ŝi levas la okulojn, vidas Renardoⁿ rapidege

forportanta Ŝanteklero". "Rapidu, rapidu ! ŝi ekkrias, Renardo", ŝtel !" kaj la kampuloj alkurante el ĉiuj flankoj. "Kio estas ? kial ĉi tiu bruego ? - Rapidu !, denove krias la maljunulino, la vulpo kunportas mian virkokon. - He ! Kial, malbona maljunulino, diras Konstanto Desnŭa, vi lasis lin fari ? - Ĉar li ne volis atendi min. - Necesis bati lin. - Kun kio ? - Per via ŝpinbastono. - Li kuradis tro rapide : viaj bretonaj hundoj ne kuniĝintus al li. - Tra kie li iras ? - Tra tiu flanko; nu, ĉu vi vidas lin tien ?"

Renardo tiam transiris la heĝojn; sed la kampuloj aŭdis lin fali ĉe la alia flanko, kaj ĉiuj persekutis lin. Konstanto Desnŭa malretenas Movojzino", sian dikan dogon. Oni trovas la spuraron, oni alproksimiĝas al li, oni estas atingonta lin. La vulpo ! La vulpo ! Renardo nur kuris pli rapide. "Siro Renardo, tiam diras la kompatinda Ŝanteklero per hakata voĉo, ĉu vi lasos tiel tiujn kampulojn grumbli ? Sur via loko mi venĝus min, kaj mi miavice mokus ilin. Kiam Konstanto Desnŭa diros al siaj servistoj, *'Renardo forprenas lin'*; respondu : *'jes, antaŭ via nazo kaj malgraŭ vi'*. Nur tio silentigos ilin".

Oni tre ofte diris tion : "Ne estas saĝulo kiu kelkfoje ne frenezetas". Renardo, universala trompanto, estis ĉi tie mem trompita, kaj kiam li aŭdis la voĉon de Konstanto Desnŭa, li plezuriĝis respondi al li : "*Jes, kampuloj, mi kunprenas vian virkokon, kaj malgraŭ vi*". Sed Ŝanteklero, ekde kiam li ne plu sentas la stringadon de la dentoj, baraktas, eskapas, svingas la flugilojn, kaj jen li sur la altaj branĉoj de apuda pomarbo, dum ĉagrenita kaj surprizita, Renardo retropaŝas kaj komprenas la nereparablan stultaĵon kiun li faris. "Ha ! Bokuzo mia, diras al li la virkoko, jen la momento por pripensi pri la sortoŝanĝoj. - Malbenita estu, diras Renardo, la buŝo kiu aŭdacas paroli kiam ĝi devas silenti ! - Jes, daŭrigas Ŝanteklero, kaj la amaŭrozo krevas la okulon kiu estas fermiĝonta kiam ĝi devis malfermiĝi pli larĝa ol iam. Komprenu, Renardo, estos ĉiam malsaĝa tiu kiu pri nenio kredos vin : For via bokuzeco ! Mi vidis la momenton kiam mi estis ĝin pagonta tre multekoste; sed por vi, mi instigas vin peli viajn piedojn, se vi tamen domaĝas vian pelton".

Renardo ne amuziĝis respondi. Iu densejo ŝirmis lin de la ĉasistoj. Li foriris kun malĝoja animo kaj malplena stomako, dum la virkoko,

longtempe antaŭ la reveno de la kampuloj, ĝoje reiris al la ĉirkaŭbaritejo, kaj retrankviligis per sia ĉeesto tiom da amikinoj kiujn lia malagrablaĵo dolore impresis.

Noto de la eldonisto : Nenio estas pli certa en la mondo ol la implikaĵoj de Renardo kun la Virkoko kaj la Kokinoj. Sed oni ne konsentas pri ĉiuj cirkonstancoj de la kverelo : oni aliopinias pri la loko, pri la nomo de la viktimoj kaj pri pluraj detaloj el ia graveco. Mi ne volas elekti; sed por meti vin en stato distingi ĉe kiu flanko estas la plej granda ekzakteco, mi tuj aldonos al la rakonto de tio kio okazis ĉe Konstanto Desnŭa, la aventuron de la farmejo de Bertono la Urbestro. Estas laŭ mia opinio, la sama afero malsame raportita, kiel tio ĉiam vidiĝas ekde kiam estas du pli aŭ malpli vidintaj historiistoj. Mi esperas, ke la dua raporto, transdonita de Petro de Sankta Klodovaldo, amuzos vin almenaŭ tiom kiom la alian. Aŭskultu.

03a Aventuro.

*Kiel Bertono la Urbestro estis trompita de Renardo,
kaj kiel Renardo estis trompita de Nigreto.*

Petro, kiu venis en la mondon en **Sankta Klodovaldo**, cedante al la deziro de siaj amikoj, longe zorgis por enversigi plurajn ĝojajn lertaĵojn de Renardo, tiu malvirta etulo kies tiom multe da bonaj animoj rajtis plendi. Se oni bonvolas iom silenti, oni povos trovi ĉi tie okazon por pli ol unu bona instruado.

Estis dum la monato de majo, momento kiam kreskas la floro sur la kratago, kiam la arbaroj, la herbejoj reverdiĝas, kiam la birdoj diras, nokte kaj tage, novajn kantojn. Renardo sola ne estis en ĉiuj siaj ĝojoj, eĉ en sia kastelo de Mopertui : li estis ĉe la fino de siaj vivrimedoj; jam lia familio, ne plu havante ion por meti en la buŝon, eligis plendindajn blekojn, kaj lia kara Hermelina, antaŭnelonge resanigita, estis ĉefe elĉerpita pro manko. Li do rezignaciis forlasi ĉi tiun rifuĝejon; foriris, ĵurante per la sanktaj relikvoj, ne reveni sen alporti en la loĝejon abundajn proviantojn.

Li eniras en la arbaron, lasante maldekstre la ireblan vojon; ĉar la vojoj ne estis faritaj por lia uzo. Post mil kaj mil ĉirkaŭiroj, li fine malsupreniras en la herbejon. "Ha ! Sankta Maria ! li tiam diras, kie iam trovi pli agrablajn lokojn ! Estas la tera paradizo aŭ apenaŭ necesus : akvoj, floroj, arbaroj, montetoj kaj herbejoj. Feliĉa tiu kiu povus vivi ĉi tie dum sia tuta vivo, kun ĉasado ĉiam abunda kaj facila ! Sed la plej verdaj kampoj, la plej odoraj floroj ne malhelpas ĉi tiun proverbon esti vera : la bezono trotigas maljunulinojn".

Renardo, eligante longan ĝemadon, revojiris. Malsato kiu pelas la lupon el la arbaro, donis al li forton por paŝi. Li malsupreniras, li supreniras, li spionas ĉiufanken, ĉu hazarde kelka birdo, kelka kuniklo, ne venus atingebla de li. Iu pado kondukis al la apuda farmejo; Renardo sekvas ĝin, decidita plenrespondece viziti la lokojn. Jen li antaŭ la barilo : sed laŭirante la kurbiĝojn de heĝoj kaj de sambukoj, li diras preĝon por ke Dio gardu lin kontraŭ misrenkonto,

kaj sendu al li kion reĝojigi sian edzinon kaj sian tutan familion.

Antaŭ ol daŭrigi, estas bone diri al vi ke la farmejo estis al la plej bonhava kampulo kiun oni povis trovi de ĉi tie ĝis Trojo (mi parolas pri Trojo la malgranda, tiu kie neniam reĝis la reĝo **Priamo**). La domo kuntuŝiĝanta kun la ĉirkaŭbaritejo estis abunde provizita per ĉio kio eblis deziri en la kamparo : bovoj kaj bovinoj, ŝafinoj kaj ŝafoj; kokinoj, kaponoj, ovoj, fromaĝo kaj lakto. Feliĉa Renardo, se li kapablas trovi la rimedon por eniri ĝin !

Sed tio estis malfacilaĵo. La domo, la korto, kaj la ĝardenoj, ĉio estis fermita per longaj, pintaj, solidaj palisoj, mem ŝirmitaj de fosaĵo plenigita de akvo. Mi ne bezonas aldoni ke la ĝardenoj estis ombrataj de arbojn plenplenajn de la plej belaj fruktoj; ne estis tio kiu vekis la atenton de Renardo.

La kampulo havis la nomon de Bertodo aŭ Berton la Urbestro; viro ne tre subtila, tre avara, kaj ĉefe dezirema pliigi sian heredaĵon. Plivole ol manĝi unu el siaj kokinoj, li lasus distranĉi siajn vangharojn, kaj neniam iu el liaj multnombraj kaponoj estis en danĝero eniri en lian marmiton. Sed li ĉiusemajne sendis kelkajn el ili sur la merkato. Koncerne Renardon, li havis tute malsamajn ideojn pri la bona uzo de la kaponoj kaj de la kokinoj; kaj se li eniras en la farmejon, oni povas esti certa ke li volos juĝi per si mem pri la pli malpli delikata gusto de tiuj belaj pensionanoj.

Feliĉe por li, Bertono tiun tagon estis sola en la domo. Lia edzino ĵus foriris por vendi sian fadenon en la urbo, kaj la knaboj disiĝis en la kampoj, ĉiu al sia laboro. Renardo, atingante ĉe la piedo de la heĝoj laŭ mallarĝa pado kiu malkunigis du tritikejojn, antaŭ ĉio ekvidis en plena suno multnombrajn kaponojn kaj tute meze, Nigreto", palpebrumante maldiligente, dum apud li, kokinoj kaj kokidetoj plej bone skrapis la pajlon amasigitan malantaŭ dorna tufarbusto. Kia veka sprono pri la malsato kiu turmentis lin ! Sed ĉi tie, la lerteco kaj la inventkapablo malmulte utilis : li iras, reiras, ĉirkaŭiras kaj reĉirkaŭiras la heĝojn, nenie la plej malgranda breĉo. Fine, tamen, li rimarkas palison malpli firme tenita kaj kiel putrita pro kadukeco, proksime de sulko kiu servis por la elfluo de la akvoj ŝvelataj de la fulmotondraj pluvoj. Li elanas, transiras la rojon, sin

Ŝovas en la heĝon, haltas, kaj jam liaj barbharoj tremetas pro plezuro fare de penso de la bongusta karno de dika kapono kiun li ekvidas. Senmova, platiĝinta sub dorna tigo, li elatendas la momenton, li aŭskultas. Tamen Nigreto, plenĝoje pro konfido, brustoŝvelas en la ĝardeno, alvokas siajn kokinojn, flatas ilin aŭ admonas ilin, kaj proksimiĝante al la loko kie Renardo sin kaŝas, li komencas grati tie. Subite Renardo aperas kaj ekĵetiĝas; li kredas kapti lin, sed li malsukcesas sian aferon. Nigreto vigle pafiĝas flanken, flugas, saltas kaj kuras, eligante kriojn de malespero. Bertono aŭdas lin; li eliras el la loĝejo, serĉas de kie venas la tumulto, kaj rapide rekonas la vulpon postkurantan sian virkokon. "Ha ! Estas vi, majstro ŝtelisto ! Vi baldaŭ estos traktita de mi".

Li tiam eniras en la domon, por preni ne tranĉan armilon (li scias ke kampulo ne rajtas uzi tion kontraŭ sovaĝa besto), sed fumaĵitan reton, plektitan, mi kredas de la diablo, tiom la maŝaĵo estis lerte prilaborita. Estas tiel kiel li intencas kapti la malbonfarulon. Renardo vidas la danĝeron kaj kaŭriĝas sub dika brasikokapo. Bertono, kiu nek ĉasis nek ŝtelis dum sia vivo, kontentiĝas transverse etendi la retojn sur la platbandon, kriegante kiel eble plej laŭte li povas, por pli bone timigi Renardo : "Ha ! Ŝtelisto ! Ha ! Glutemulo ! Ni fine tenas lin !" Kaj dirante tion, li frapis per bastono sur la brasikojn, tiel bone ke Renardo, tiel pelita, decidiĝas salti per granda eksalto; sed kien ? meze de la reton. Lia pozicio fariĝas pli kaj pli malbona : la reto ĉirkaŭpremas lin, envolvas lin; li estas kaptita ĉe la piedoj, ĉe la ventro, ĉe la kolo. Ju pli li baraktas, des pli li volviĝas kaj implikiĝas. La kampulo ĝuas pro lia turmenton : "Ha ! Renardo, via juĝado estas alveninta, jen vi kondamnita sen pardono". Kaj por komenci verdikton, Bertono levas la piedon kiun li tuj metos sur la gorĝon de la kaptito. Renardo prenas sian tempon; li ekkaptas la kalkanon, kunpremas la dentojn, kaj la akraj krioj de Bertono servis al li kiel unuan venĝon. La doloro de la mordado estis sufiĉe alta por faligi la kampulon senkonscian; sed baldaŭ rekonsciiĝinta, li pene klopodas por liberiĝi; li levas la pugnojn, frapas sur la dorson, la orelojn kaj la kolon de Renardo kiu sin defendas kiel li kapablas sen tamen malstreĉi la dentojn. Li faras pli : per lerta movo, li tiam

haltigas la dekstran manon de Bertono, kiun li kunigas kun la kalkano jam konkerita. Kompatinda Bertono, kion vi venis fari kontraŭ Renardo ! Kial ne esti lasante al li virkokon, kaponojn kaj kokinojn ! Ĉu ne sufiĉis kapti lin per la reto ? Tiom gratas la kaprinon, ke ĝi malbone kuŝas, tio estas saĝa proverbo kies vi devintus pli frue rememori.

Tiel mastriĝante la kalkanon kaj la piedon, Renardo ŝanĝas sian konduton kaj afektante mienojn de venkanto : "Pro la fido kiun mi donis al mia amatino, vi estas mortema kampulo. Ne esperu senpekigi vin; mi ne prenis la trezoron de la imperiestro; vi estas tie, pli bone enfermita ol Karolo la granda estis en Lansono⁽²⁾".

Nenio povas tiam esti komparita kun la timego, la malespero de la kampulo. Li larmas tra la okuloj, li suspiras en la koro, li petas indulgon per la plej plorinda tono. "Ha ! Kompaton, siro Renardo, kompaton per la nomo de Dio ! Ordonu, diru tion kion vi atendas de mi, mi obeos; ĉu vi volas akcepti min kiel vian ĉiofaranton, dum la resto de mia vivo ? Ĉu vi volas... - Ne, kampulo, mi volas nenion : antaŭ momento, vi superŝutis min per insultoj, vi ĵuris ne eksenti kompaton al mi : nun estas mia vico; per sankta Paŭlo ! estas vi kiun oni baldaŭ punos, malbona fripono ! Mi tenas vin kaj mi gardas vin, mi alvokas sanktan Juliano" kiel atestanton, kiu punos vin pro esti tiel malbone gastiginta min.

"Monsinjoro Renardo, daŭrigas la kampulo, plorsingultante, estu rilate al mi pardonema, ne faru al mi pli malbone ol vi povus. Mi scias tion, mi havis malestimon kontraŭ vi, mi humile riproĉas min pri tio. Decidu pri la puno kaj mi plenumos tion. Ricevu min kiel vian ĉiofaranton, kiel via servutulon; prenu mian edzinon kaj ĉion kio apartenas al mi. Ĉu la interkonsento ne valoras la penon ? En mia loĝejo, vi trovos ĉion laŭdezire, ĉio estas via; mi neniam ricevos moneron pri kiu vi ne ricevos la dismon; ĉu estas nenio havi en sia servado, viron kiu povas disponi tiom da aferoj !"

Necesas nun diri tion, por laŭdo de grandsinjoro Renardo, kiam li aŭdis la kampulon plori kaj preĝi pro provi protekti lian virkokon, li sin sentis kortuŝita per milda kompato. "Nu; kampulo, li diras, silentu, ne

2 En la originalo estas "Lançon". Ne konante ĝian tradukon, mi donas nur la fonetismon.

plu ploru. Ĉi-foje oni povas pardoni vin; sed ke neniam vi revenu ĉi tie, ĉar tiam mi volas revidi nek mian edzinon, nek miajn infanojn, se vi eskapas el mia justeco. Antaŭ ol reakiri vian manon kaj vian piedon, vi tuj ligos vin per promeso neniam fari ion kontraŭ mi. Poste, tuj liberlasata, vi pruvos vian submetiĝon kaj fordonos ĉion kion vi posedas. - Mi tutkore devontigas min, diras la kampulo, kaj la sankta Spirito respondecu pri mi ke mi estos lojala en ĉiu okazo". Bertono sincere parolis; ĉar esence, malgraŭ sia avareco, li estis honestulo; oni povis kredi al li kiel al pastro. "Mi, diris Renardo, fidas al vi; mi scias ke vi havas renomon de honestulo". Li tiam liberigas lin, kaj la unua uzo kiun Bertono faras de tio, estas sin ĵeti al la genuoj de Renardo, bani lian pelton per siaj larmoj, etendi la liberigitan manon al la plej najbara monaĥejo, prononcante la ĵuron de submetiĝo laŭ la kutima formo.

"Nun, diras Renardo, kaj unue, formetu de mi vian abomenan reton". La kampulo obeas. Renardo re-estas libera. "Ĉar vi nepre devas de nun fari mian bonvolon, mi tujtuje provos vin. Vi scias tiun belan Nigreto" kiun mi elatendis dum la tuta tago, necesas ke vi alportas ĝin al mi; mi taksas laŭ tiu prezo mian amikecon por vi kaj vian malsklavigon de la submetiĝo kiun vi prononcis. - Ha ! monsinjoro, respondis Bertono, kial vi ne petas plibonaĵon ? Mia virkoko estas malmola kaj seka, li aĝas pli ol du jarojn. Mi anstataŭ proponas tri molajn kokidojn, kies la karnaĵoj kaj la ostoj certe estos malpli malindaj je vi. - Ne, bela amiko, reparolas Renardo, mi fajfas pri viaj kokidoj; gardu ilin kaj iru serĉi al mi la virkokon". La kampulo ĝemis, ne respondis, malproksimiĝis, kuris al Nigreto, forpelis lin, atingis lin kaj alkondukis lin antaŭ Renardo :

"Jen, siro, Nigreto kiun vi deziras, sed per sankta Mandeso, mi plenplezure donintus al vi miajn du plej bonajn kaponojn. Mi multe amis Nigreto" : neniam estis virkoko pli diligenta, pli vigla apud miaj kokinoj; kompanse li estis profunde amata. Sed vi volis lin, monsinjoro, mi prezentas lin al vi. - Bone, Bertono, mi estas kontenta, kaj por pruvi tion, mi kvitigas vin de via submetiĝo. - Dankegon, grandsinjoro Renardo, ke Dio redonu tion al vi kaj sinjorino Sankta Maria !"

Bertono malproksimiĝas, kaj Renardo tenanta Nigretoⁿ inter siaj dentoj vojiras al Mopertui, ĝoja pro pensi ke li baldaŭ povos dividi kun Hermelina, lia kara amatino, la karnaĵon kaj ostojn de la kompatinda besto. Sed li ne scias tion kio ankoraŭ povas okazi al li. Pasante sub iu volbo kiu krucis la vojon de alia vilaĝo, li aŭdis la virkokon ĝemi kaj lamenti. Renardo, iom tenera tiun tagon, tutsimple demandas al li tion kion li havas por tiom plori. "Vi bone scias, diras la koko; malbenita la horon kiam mi naskiĝis ! Ĉu mi tiel devus esti pagita por miaj servoj ĉe tiu Bertono, la plej nedankema el la kampuloj ! - Pri tio, Nigreto, diras Renardo, vi malpravas, kaj vi devus montri pli da kuraĝo. Aŭskultu min iomete, bona Nigreto mia. Ĉu la senjoro rajtas disponi pri sia servutulo ? Jes, ĉu ne ? Tiel vera kiel mi estas kristano, la mastro komandas, la servutulo obeas. La servutulo devas doni sian vivon por sia senjoro; eĉ pli, li ne povus deziri pli bonan, pli belan morton. Vi bone scias tion, Nigreto, oni centfoje ripetis tion al vi. Nu ! Sen vi, Bertono pagintus per sia persono : se li ne havus vin por elaĉeti sian korpon, li estus mortinta en la nuna horo. Do rekuraĝiĝu, amiko Nigreto, anstataŭ belega kaj glora morto, vi havos la kompanion de la anĝeloj, kaj vi ĝuos, dumeterne, de la vido de Dio mem".

"Mi bonvolas tion, siro Renardo, respondas Nigreto, ne estas la morto kiu min afliktas kaj ribeligas; ĉar finfine, mi finos kiel la krucistoj, kaj mi estas certa, kiel ili, pri bona soldo. Se mi afliktiĝas, estas pro la kaponoj, miaj bonaj amikoj, ĉefe pro tiuj karaj kaj belaj kokinoj kiujn vi vidis laŭlonge de la heĝoj, kaj kiuj iam estos manĝitaj sen la sama profito por iliaj animoj. Nu ! Ni ne plu pensu pri ili. Sed donu al mi kuraĝon, grandsinjoro Renardo; ekzemple, vi farus bonan faron, se vi dirus al mi mallongan pian kanton por helpi min pli bone meriti la enirrajton de la Paradizo. Mi forgesus ke necesas al mi morti, kaj mi estus pli bone akceptita inter la elektitoj. - Ĉu ne estas tio, Nigreto ? Tuj reparolas Renardo, He ! Kial vi ne diris tion ! Per la fido kiun mi ŝuldas al Hermelina, ne estas dirota ke vi estu rifuzota; prefere aŭskultu".

Renardo tiam ekkantis novan kanzoneton, pro kiu Nigreto ŝajnis tre plezuriĝi. Sed dum li plidaŭrigis longan sonon, Nigreto faras

movadon, eskapas, svingas la flugilojn, kaj atingas la supron de granda apuda ulmo. Renardo vidas lin, volas haltigi lin, jam estas tro malfrue. Li stariĝas sur la trunko de la arbo, saltas, kaj ne kapablas atingi la branĉaron. "Ha ! Nigreto, li diras, tio ne estas bona, mi vidas ke vi malbele mokis min. - Ĉu vi vidas tion ? diras Nigreto, nu ! Antaŭ momento vi ne vidis tion. Eblas fakte ke vi malpravus kanti; tial, mi ne petas al vi daŭrigi la saman arion. Saluton, grandsinjoro Renardo ! Iru ripozi, kiam vi estos bone dorminta, vi eble trovos alian predon !"

Renardo tute konfuzita, ne scias kion fari kaj kion solvi. "Per sankta Anna !, li diras, la proverbo pravas : bele kanti nocas aŭ enuas; kaj la kampulo prave diras : inter la buŝo kaj la kulero estas ofte embaraso. Mi travivis tion. Katono ankaŭ diris : '*vane manĝi malmulte da paroloj*'⁽³⁾. Kial mi ne rememoris ĝin !"

Malproksimiĝante, li ankoraŭ murmuris : "Malbona kaj stulta tago ! Oni diras ke mi estas lerta, kaj ke la bovo ne kapablas plugi kiel mi kapablas tromplogi; jen tamen malica virkoko kiu donas al mi lecionon en trompo ! Povu almenaŭ la afero resti sekreta, kaj ne iri ĝis la kortego ! Tio estus elfinita por mia reputacio".

Noto de la eldonisto : Ezopo kantigis la korvon longtempe antaŭ la naskiĝo de Ŝanteklero kaj Nigreto. Ĉiam estis (dum la malnovaj tempoj, kompreneble) homoj tre lertaj pri kantigi la aliajn. Aŭskultu kiel Petro de Sankta Klodovaldo sukcesis doni novan agrablecon al la ezopa fablo de la Vulpo kaj de la Korvo.

3 Sen bone komprini tiun parolon, mi nur tradukis laŭvorte.

O4a Aventuro.

*Kiel Tiselino la korvo kaptis fromaĝon al la maljunulino,
kaj kiel Renardo deprenis ĝin de Tiselino.*

En flora ebenaĵo kiun limigis du montoj kaj kiun klara akvo irigaciis, Renardo iam ekvidis de la kontraŭa bordo solan fagon plantita malproksime de ajna irebla vojo, ĉe la komenco de la deklivo. Li transiris la rojon, atingis la arbon, faris ĉirkaŭ la trunko siajn kutimajn pasadojn, poste ĝuplene sin rulas sur la freŝa herbo, anhelante por bone malvarmiĝi. Ĉio en tiu loko ĉarmis lin; ĉio, mi eraris, ĉar li sentis unuan pikilon de malsato, kaj nenio donis al li la esperon kvietigi ĝin. Dum li hezitis pri tio kion li devis fari, grandsinjoro Tiselino, la korvo, eliris el la najbara arbaro, ŝvebis super la herbejo kaj estis deflugonta en ĉirkaŭbaritejo kiu ŝajnis promesi al li bonan fortunon.

Tie troviĝis milo da fromaĝoj kiujn oni dismetis por sekigi ilin en plena suno. La gardantino estis reirinta por momento en la loĝejo, kaj Tiselino, kaptante la okazon, haltis sur iun el la plej belaj kaj denove reflugis ĉe la momento kiam la maljunulino reaperis. "Ha ! bela sinjoro mia, estas por vi ke sekiĝis miaj fromaĝoj ! Dirante tion, la maljunulino ĵetis ŝtonojn kaj ŝtonetojn. "Silentu, silentu, maljunulino, respondis Tiselino, kiam oni demandas kiu prenis ĝin, vi diros : estas mi, estas mi ! ĉar malbona gardado nutras la lupon".

Tiselino malproksimiĝas kaj alvenas surflugi sur la fagon kiu kovris grandsinjonon Renardoⁿ per sia freŝa ombro. Kunigitaj de la sama arbo, ilia situacio tute ne estis sama. Tiselino frandis tion kion li plej bone ŝatis; Renardo, simile frandema pri fromaĝo kaj pri tiu kiu posedis ĝin, rigardis ilin sen espero atingi ilin. La fromaĝo duone sekigita donis facilan eniron al la bekpikadoj : Tiselino eltiris el ĝi la plej flavan kaj la plej molan; poste li atakas la kruston el kiu peceto eskapas al li kaj iras fali ĉe la piedo de la arbo. Renardo levas la kapon kaj salutas Tiselinoⁿ kiun li vidas fiere instaliĝinta, kun la fromaĝo staranta inter la kruroj. "Jes, mi ne eraras; jes, estas

grandsinjoro Tiselino. Bona Dio protektu vin, kunulon, vin kaj la animon de via patro, la fama kantisto ! Neniu antaŭe, oni diras, kantis pli bone ol li en Francio. Vi mem, se mi memoras tion, vi ankaŭ faris muzikon; ĉu mi songis ke vi longe lernis ludi la orgenon ? Vere, ĉar mi havas la plezuron renkonti vin, vi ja konsentos, ĉu ne, diri al mi mallongan ritornelon ?"

Ĉi tiuj paroloj estis tre mildaj al Tiselino, ĉar li havis pretendon esti la plej agrabla muzikisto de la mondo. Li do tuj malfermas la buŝon kaj aŭdigas longdaŭran krion. "Ĉu ja estas tio, grandsinjoro Renardo ? - Jes, diras la alia, tio ne estas malbona, sed se vi volus, vi altigus eĉ pli laŭte. - Do, aŭskultu min". Li tiam plengorĝe strebas pli forte. "Via voĉo estas bela, diras Renardo, sed ĝi estus ankoraŭ pli bela se vi ne manĝus tiom da nuksoj. Daŭrigu, tamen, mi petegas". La alia, kiu absolute volas gajni la kantopremion, tiom sin forgesas ke, por pli bone daŭrigi la sonon, li iom post iom malfermas la ungojn kaj la fingrojn kiuj retenis la fromaĝon kaj lasas ĝin fali ĝuste ĉe la piedoj de Renardo. La glutemulo tiam tremetas pro plezuro; sed li sin detenas, esperante kunigi kun la fromaĝo, la malmodestan kantiston. "Ha ! Dio, li diras, afektante peni por stariĝi, kiom da malbonoj Disinjoro sendis al mi en ĉi tiu mondo ! Jen mi ne kapablas ŝanĝi lokon, tiom mi suferas de la genuo; kaj ĉi tiu fromaĝo kiu ĵus falis, venigas al mi fetoran kaj neelteneblan odoron. Nenio pli danĝera ol tiuodoro por la vundoj de la kruroj; la kuracistoj ja diris tion al mi, rekomdante al mi neniam gustumi tion. Malsupreniĝu, mi petegas vin, kara Tiselino mia, venu forigi de mi tiun abomenaĵon. Mi ne petus al vi ĉi tiun malgrandan servon, se mi alitage ne rompis al mi la kruron en damnita kaptilo metita je kelkaj paŝoj de ĉi tie. Mi estas kondamnita resti en ĉi tiu loko ĝis kiam bona plastro venos komenci mian resaniĝon".

Kiel malfidi pri tiaj paroloj akompanataj de ĉiaspecaj doloraj grimacoj, Tiselino cetere estis en la plej bonaj inklinoj por tiu kiu fine ĵus rekonis la agrablecon de sia voĉo. Li do malsupreniris de la arbo; sed tuj tuŝante la grundon, la apudeco de Renardo pripensigis lin. Li antaŭeniris paŝon post paŝo, kun la okulo atentema, kaj trenante sin sur la vostobazon. "Dio mia !, diris Renardo, rapidu do,

antaŭeniru; kion vi povas timi de mi, kompatinda kriplulo ?" Tiselino pli proksimiĝis, sed Renardo, tro senpacienca, pafiĝas kaj maltrafas lin, gardante kiel pruvo nur tri aŭ kvar plumojn. "Ha ! perfida Renardo ! tiam diras Tiselino, mi devis bone scii ke vi trompus min ! Mi perdas kvar el miaj plej belaj plumbutoj; sed tio estas ĉio kion vi havos, malbona kaj fetora ŝtelisto, Dio malbenu vin !"

Renardo, iom konfuzita, volis pravigi sin. Estis podagra atako kiu kontraŭvole saltigis lin. Tiselino ne aŭskultis lin : "Gardu la fromaĝon, mi forlasas ĝin al vi; pri mia haŭto vi ne havos ĝin. Nun ploru kaj ĝemu laŭ via plaĉo, mi ne venos al via savo. - Nu, foriru malbonaŭgura kriaĉulo, diras Renardo, reprenante sian naturon; tio konsolos min pri esti ne povanta ŝlosi al vi la bekon. Per Dio ! li poste daŭrigis, vere jen bonega fromaĝo; mi neniam manĝis pli bonan; ĝi estas ĝuste la rimedo kiu necesis al mi por la doloro de la kruroj". Kaj, la manĝon finitan, li facilmove revojiris al la arbaroj.

05a Aventuro.

Kiel Renardo ne sukcesis akiri de la Paruo la pacan kison.

Renardo komencis konsoliĝi pri la malicaj ruzoj de Ŝanteklero kaj de Tiselino, kiam, sur la branĉo de maljuna kverko, li ekvidis la Paruoⁿ, tiun kiu demetis sian kovitaron en la trunko de la arbo. Li donis al ŝi la unuan saluton : "Mi oportune alvenas, babilulino; malsupreniĝu, mi petegas vin; mi atendas de vi la pacan kison, kaj mi promesis ke vi ne rifuzus ĝin. - Ĉu al vi, Renardo ? eligas Paruo. Nu, se vi ne estus tio kio vi estas, se oni ne konis viajn lertaĵojn kaj viajn malicaĵon. Sed, unue, mi ne estas via babilulino; sed, vi diras tion por ne ŝanĝi la kutimojn aŭdigante unu veran vorton. - Kiel vi estas malmulte bonkora ! respondas Renardo : via filo ja estas mia baptofilo laŭ la graco de la sankta bapto, kaj mi neniam meritis malplaĉi al vi. Sed se mi farintus tion, mi ne elektus tagon kiel tiun ĉi por rekomenci. Bone aŭskultu : siro Nobla, nia reĝo, ĵus proklamis ĝeneralan pacon; plaĉu al Dio ke ĝi estu longdaŭra ! Ĉiuj baronoj ĵuris tion, ĉiuj promesis forgesi la malnovajn temojn de kverelo. Tial la negravaj homoj ĝojas; la tempo de diskutoj, procesoj kaj murdoj pasis; ĉiu amos sian najbaron, kaj ĉiu povos kviete dormi.

- Ĉu vi scias, grandsinjoro Renardo, diras Paruo, ke vi ĵus diris belajn aferojn ? Mi bonvolas duone kredi ilin; sed serĉu aliloke kiu kisos vin, ne estas mi kiu donos la ekzemplon.

- "Vere, babilulino, vi iom troigas la malfidon; mi konsolus min, se mi ne ĵuris akiri la pacan kison de vi kiel de ĉiuj aliaj. Jen vidu, mi fermos miajn okulojn dum vi malsupreniĝos por kisi min. - Se tiel estas, mi bonvolas, diras Paruo. Nu viaj okuloj : ĉu ili ja estas fermitaj ? - Jes. - Mi alvenas". Tamen la birdo estis provizinta sian kruron per eta floko de musko kiun li venas demeti sur la barbojn de Renardo. Apenaŭ tiu ĉi sentis la tuŝon ke li ekfaris salton por kapti la Paruon, sed ne estis ŝi, li elrevigita hontis. "Ha ! Jen do via paco, via kiso ! Dependas nur de vi ke la traktato jam rompiĝis. - He ! diras Renardo, ĉu vi ne vidas ke mi ŝercas ? Mi volis vidi ĉu vi estis

timema. Nu ! ni komencu; jen, mi denove estas kun okuloj fermitaj". Paruo, kiun la ludo komencis amuzi, flugas kaj saltetas, sed singardeme. Renardo montranta duafoje la dentojn : "Vi vidas, diras ĝi al li, vi ne sukcesos; Mi prefere ĵetus min en la fajron ol en viajn brakojn. - Dio mia ! diras Renardo, vi povas tiel tremeti pro la plej malgrava movado ! Vi ĉiam supozas kaŝitan kaptilon : tio estis bona antaŭ la ĵurita paco. Nu ! Iu tria fojo, estas la vera kalkulo; honore al sankta Triunuo. Mi ripetas tion al vi; mi promesis doni al vi la pacan kison, mi devas fari tion, nur estus por mia eta baptofilo kiun mi aŭdas kanti sur la najbara arbo".

Renardo sendube bone predikas, sed Paruo ŝajnigas aŭdi nenion kaj ne plu forlasas la kverkan branĉon. Tamen jen estas la kurĉasistoj kaj la ŝtelĉasistoj, la hundoj kaj la ĉasistoj de grandsinjoro Abato, kiuj siaflanke sin ŝarĝas. Oni aŭdas la sonon de la kornikoj kaj de la kornoj, poste subite : la vulpo ! la vulpo ! Renardo, je ĉi tiu terura krio, forgesas Paruon, kunpremas la voston inter la gamboj, por doni malpli da kapteblaĵo al la dento de la leporhundoj. Kaj Paruo tiam diras al li : "Renardo ! Kial do malproksimiĝi ? Ĉu la paco ne estas ĵurita ? - Ĵurita, jes; respondas Renardo, sed ne publikigita. Eble ĉi tiuj junaj hundoj ankoraŭ ne scias ke iliaj patroj decidis tion. - Restu, mi petegas ! Mi malsupreniras por kisi vin. - Ne; urĝas, kaj mi kuras al miaj aferoj".

O6a Aventuro.

Kiel la laika Frato ne malligis la hundojn.

Sed kiel superfluon da danĝero, malproksimiĝante Paruoⁿ por eniri en la arbaron, li trovas sin en la ĉeesto de unu el tiuj duon-kampuloj, duon-servistoj kiuj, pro karitato aŭ por kelka ŝuldo, akiris la favoron vivi per la vivo de la monaĥoj kiujn ili servis aŭ kies ili gardis bienojn kaj ĝardenoj. Oni nomis ilin per la nomo de Fratoj laikaj aŭ konvertitaj al monaĥa vivo; homoj malmulte estimataj, kaj kiuj malofte meritis pli. Tiu ĉi estis komisiita gardi per kondukŝnuro du ĉashundoj aŭ leporhundoj. Baldaŭ la unua servisto kiu ekvidas Renardoⁿ laŭte krias al li : "Malligu, malligu !" Renardo komprenas la danĝeron; anstataŭ provi fuĝon iĝintan neeban, li rezolute alpaŝas al la laika frato kiu, alparolanta al li : "Ha ! Malbona besto, estas elfinita por vi ! - Religia sinjoro, diras Renardo, vi ne estas nur honestulo : neniu devas esti senigita de sia rajto. Ĉu vi ne vidas ke inter la aliaj hundoj kaj mi, ni celas intereson kiun gajnos la unua alvenito ? Se vi forlasas la du ĉashundojn, ili malhelpos min konkursi la premion, vi havos la tutan mallaŭdon".

La laika frato, simpla homo pro sia naturo, pripensis kaj gratis al si la frunton : "Per nia Dipatrino, li diras al si, grandsinjoro Renardo povus ja rajti. Li do ne malligis la leporhundojn, kaj sin kontentigis deziri bonan sorton al Renardo. Ĉi tiu, rapidigante tiam la paŝojn, enprofundiĝas en la arbetan densejon kaj, ankoraŭ persekutata, ekĵetiĝas en ebenaĵon kiun finigas larĝa fosaĵo. La fosaĵo siavice estas transpita kaj la hundoj, post momento de necerteco, perdas liajn spurojn kaj revenas. Sekurigita kontraŭ iliaj kruelaj dentoj, Renardo fine povis remastri sin. Li estis elĉerpita pro laciĝo; sed li venkobatis siajn malamikojn, kaj se kelkaj horoj da ripozo ne satigis lin, almenaŭ ili redonis al li sian lertecon kaj sian tutan ardecon por la ĉasado kaj la marodado.

07a Aventuro.

*Kiel Renardo renkontis Fiŝvendistojn,
kaj kiel li akiris sian parton de haringoj kaj angiloj.*

Renardo, oni vidas, havis ne ĉiam laŭdezire tempon, kaj liaj entreprenoj ne estis ĉiuj same feliĉaj. Kiam la dolĉa vetero de somero cedis lokon al la akra vintro, li ofte estis ĉe la limo de proviantoj, li havis nenion por doni, **nenion de kiu dependi** : la lombardistoj mankis al li, li ne plu trovis krediton ĉe la komercistoj. Unu el tiuj malĝojaj tagoj de profunda malabundeco, li eliris el Mopertui, decidinta reeniri nur kun la poŝoj ŝvelitaj. Unue li enŝoviĝas inter la rivero kaj la arbaro en junkejo, kaj kiam li estas laca pro siaj vanaj serĉadoj, li alproksimiĝas al la fervojo, kaŭriĝas en la vojsulko, streĉante la kolon de iu kaj de alia flanko. Ankoraŭ nenio prezentiĝas. Kun la espero de kelka pli bona ŝanco, li iras lokiĝi antaŭ heĝo, sur la taluson de la vojo : finfine li aŭdas movadon de radoj. Estis vendistoj kiuj revenis de la marbordo, kunportante freŝajn haringojn kies, danke al la biza vento kiu blovis dum la tuta semajno, oni abunde fiŝkaptis; iliaj korboj krevis sub la pezo de la angiloj kaj de la petromizoj kiujn ili plie aĉetis survoje.

Ĉe la trafdistanco de pafarko, Renardo facile rekonis la petromizojn kaj la angilojn. Lia plano estis baldaŭ farita : li rampas sen esti vidata ĝis la mezo de la vojo, sin kuŝas kaj sterniĝas, kun la gamboj disigitaj, la dentoj paŭtemaj, la lango senforta, sen movado kaj sen spirado. La veturilo antaŭeniras; unu el la vendistoj rigardas, vidas senmovan korpon, kaj alvokante sian kunulon : "Mi ne eraras, estas vulpo aŭ melo. - Estas vulpo, diras la alia; ni elveturiĝu kaj ekkaptu lin, kaj ĉefe ke li ne eskapu nin". Tiam ili haltigas la ĉevalon, iras al Renardo, puŝante lin per la piedo, pinĉas kaj tiras lin; kaj ĉar ili vidas lin senmovan, ili ne dubas ke li estas morta. "Ni ne bezonis uzi altan lertecon; sed kiom lia peltaĵo povas valori ? - Kvar pundojn, diras unu. - Diru kvin, rebatas la alia, kaj minimume; vidu lian gorĝon, kiel ĝi estas blanka kaj densa ! Estas la bona sezono. Ni ĵetu lin sur la ĉaron".

Tiel dirita, tiel farita. Oni kaptas lin per la piedoj, ĵetas lin inter la korbojn, kaj la veturilo denove moviĝas. Dum ili gratulas sin unu la alian pri la aventuro kaj antaŭdecidas eltiri, alvenante, la felon de Renardo; tiu ĉi malmulte zorgas pri tio; li scias ke inter fari kaj diri, estas ofte longa vojo. Sen perdi tempon, li etendas la kruron al la rando de iu korbo, malrapide streĉiĝas, malaranĝas la kovrilon kaj tiras al si du dekduojn el la plej belaj haringoj. Estis por zorgi antaŭ ĉio pri la malsatego kiu turmentis lin. Cetere li ne rapidis, eble eĉ li havis tempon por bedaŭri la mankon de salo; sed li ne intencis kontentiĝi pri tiel malmulte. En la apuda korbo svingetiĝis la angiloj : li altiris al li kvin aŭ ses el la plej belaj; la malfacilaĵo estis kunpreni ilin, ĉar li ne plu malsatis. Kion li faras ? Li ekvidas en la ĉareto faskon da tiuj pikaĵojn el vimeno kiuj utilas por trapiki la fiŝojn : li prenas du aŭ tri el ili, trapasas ilin en la kapo de la angiloj, poste ruliĝas tiel ke li formas per tiujn pikaĵojn trioblan zonon, kies li kunmetas la ekstremaĵojn laŭ plektaĵo. Nun necesis forlasi la veturilon; tio estis ludo por li : sed li atendis ke la vojsulko venu tranĉi la verdan herbejon, por sin ŝovi sen bruo kaj sen risko lasi malantaŭ si la angilojn.

Kaj tio farita, li bedaŭrintus ŝpari pikparolon al la ĉaristoj. "Dio gardu vin en ĝojo, belaj fiŝvendistoj !" li kriis al ili. "Mi faris kun vi fratan dispartigon : mi manĝis viajn plej dikajn haringojn kaj mi kunportas viajn plej bonajn angilojn; sed mi lasas la plej multon".

Kia tiam estis la surprizo de la vendistoj ! Ili krias : "Vulpo, vulpo !" sed la vulpo apenaŭ timis ilin; li havis la plej bonajn krurojn. "Ĝena kontraŭaĵo ! ili diras, kaj kia perdo por ni, anstataŭ profito kiun ni pensis akiri de ĉi tiu malbenita besto ! Vidu kiel li malŝarĝis niajn korbojn; ke li povu krevi almenaŭ pro misdigesto !"

"Tiom kiom plaĉos al vi, diris Renardo, mi timas nek vi nek viajn dezirojn". Poste li kviete revojiris al Mopertui. Hermelina, la bona kaj saĝa sinjorino, atendis lin ĉe la enirejo; liaj du filoj, Virbranĉo kaj Transheĝo, akceptis lin kun la tuta respekto kiun li meritas kaj kiam oni vidis tion kion li alportis, estis ĝojo kaj senfinaj ĉirkaŭprenoj. "Tablen ! li ekkriis, ke oni zorgu bone fermi la pordojn, kaj ke neniu ekpensu ĝeni nin".

O8a Aventuro.

*En kiu oni vidas kiel Isengrino ekdeziris sin konverti,
kaj kiel li estis ordinigita monaĥon de la Abatejo de Tirono.*

Dum Renardo tiel festenis en Mopertui, dum la saĝa Hermelina (ĉar la sinjorino juĝis tauĝa forlasi sian unuan nomon Riĉeloⁿ, por preni alian pli milda kaj pli nobela) dum Hermelina frotas al li kaj refreŝigas la krurojn, dum liaj infanoj senhaŭtigas la angilojn, distranĉas ilin, etendas ilin sur tabuletoj el avelujo kaj delikate metas ilin sur la braĝon; jen kiam oni aŭdas frapi ĉe la pordo. Estas grandsinjoro Isengrino kiu, estanta ĉasinta dum la tuta tago sen kapti ion, venis hazarde sidi antaŭ la kastelo de Mopertui. Baldaŭ la fumo kiu eskapis supre de la tegmentoj, frapas lian atenton, kaj profitante de malgranda aperturo inter la tabuloj de la pordo, li kredas vidi la du filojn de la domo okupiĝantaj turni belajn kotletojn sur ardaĵ karboj. Kia vidaĵo por lupro mortanta pro malsato kaj malvarmo ! Sed li sciis la naturon de sia kunulo tiel malmulte regalema kiel sia; kaj la pordo estanta fermita, li restis kelkan tempon por leki al si la lipojn, sufokante ŝiajn avidajn kriojn. Poste li grimpas je la alteco de iu fenestro, kaj tio kion li vidas, konfirmas liajn unuajn malkovrojn. Nun, kiel eniri en ĉi tiun lokon de ĝuoj ? Kiel decidigi Renardoⁿ malfermi lian pordon ? Li kaŭriĝas, restariĝas, turnas kaj returnas, oscedas kiel hipopotamo, denove rigardas, provas fermi la okulojn; sed la okuloj revenas per si mem ĵetiĝi en la ĉambro kiu estas malpermesita al li : "Nu tamen, li diras, ni provu kortuŝi lin : Hej ! Kamarado ! Bo-nevo Renardo ! Mi alportas al vi bonajn novaĵojn ! Mi sentas haston diri ilin al vi. Malfermu al mi".

Renardo facile rekonis la voĉon de sia onklo, kaj estis nur pli bone decidiga turni surdan orelon. "Malfermu do, bela siro !" diris Isengrino. "Ĉu vi ne volas preni vian parton de la komuna feliĉo ?" Fine, Renardo, kiu havis sian ideon, decidiĝis respondi al la vizitanto.

- Kiu vi estas tie supre ?
- Mi estas mi.

- Kiu vi ?

- Via kamarado.

- Ha ! Mi konfuzis vin kun ŝtelisto.

- Kia eraro ! Estas mi, malfermu.

- Almenaŭ atendu ke la Fratoj estu eltabligintaj.

- La Fratoj ? Ĉu estas monaĥoj ĉe vi ?

- Certe ja, aŭ pli ĝuste veraj kanonikoj; tiuj de la Abatejo de Tirono, infanoj de Sankta Benedikto, kiuj donis al mi la favoron akcepti min en sia ordino.

- Per la nomo de Disinjoro ! Do vi gastigos min hodiaŭ, ĉu ne ? Kaj vi donos al mi ion por manĝi ?

- Tutkore. Sed unue respondu. Ĉu vi venas ĉi tien kiel almozulo ?

- Ne; mi venas aŭdi pri viaj novaĵoj. Malfermu al mi.

- Vi petas neblaĵon.

- Kiel tio ?

- Vi ne estas en taŭga stato.

- Mi estas en stato de granda apetito. Ĉu ne estas viando kiun mi vidas vin prepari ?

- Ha ! Bo-onklo ! Vi ofendas nin. Vi bone scias ke en religio oni ĵure promesas rezigni pri ĉiu karnaĵo ?

- Kaj kion do ili manĝas, viaj monaĥoj ? Molajn fromaĝojn ?

- Ne, ne precize; sed dikajn kaj grasajn fiŝojn. Nia patro, Sankta Benedikto eĉ rekomendas ĉiam elekti la plej bonajn.

- Jen novafero por mi. Sed fine ĉi tio ne devas malhelpi vin malfermi al mi kaj konsenti al mi kuŝlokon por ĉi tiu nokto.

- Mi ja ŝatus tion; bedaŭrinde necesas, por eniri, esti ordinigita monaĥon aŭ ermiton. Vi ne estas tia; bonan vesperon ! Foriru.

- Ha ! Jen malvirtaj monaĥoj; mi ne rekonas ilin per ilia bonkoreco, sed mi eniros malgraŭ vi. Ne ! La pordo estas tro firma, kaj la fenestro estas barita. Kamarado Renardo, vi parolis pri fiŝo, mi ne konas tiun karnon. Ĉu ĝi bongustas ? Ĉu mi povus havi unu solan pecon, nur por gustumi ĝin ?

- Plenkore, kaj benita estu nia angilfiŝado, se vi bonvolas manĝi ĝin. Li tiam prenas sur la braĝo du perfekte rostitajn pecojn, manĝas la unuan kaj alportas la alian al sia kamarado. "Prenu bo-onklo,

proksimiĝu; niaj fratoj sendas tion al vi, kun la espero ke vi baldaŭ estos kun ni.

- Mi pensos pri tio, tio ja povos esti; sed dank'al Dio ! intertempe donu.

- Jen. Nu, kio ŝajnas al vi ?

- Sed tio estas la plej bona manĝaĵo de la mondo. Kia gusto, kia saporon ! Mi sentas min tre proksime de mia konvertiĝo. Ĉu vi ne povus doni al mi duan pecon ?

- Evidente⁽⁴⁾ ! Se vi volas fariĝi monaĥo, vi baldaŭ estos mia superulo; ĉar, mi ne dubas, antaŭ la Pentekosto, niaj fratoj konsentiĝos por elekti vin kiel abaton.

- Ĉu tio povus esti ? Ho ! Ne, vi ŝercas.

- Ne vere, per mia estro ! vi farus la plej belan signon de la mondo, kaj kiam vi surmetos la nigrajn ŝtofojn sur vian grizan peltaĵon...

- Tiam vi donos al mi tiom da fiŝoj kiom mi volos ?

- Tiom kiom vi volos.

- Tio decidigas min; faru min tuj tonsuri.

- Ne, ne nur tonsuri, sed razi.

- Razi ? Mi ne kredis ke oni postulis tion. Do ke oni razu min !

- Necesas atendi ke la akvo estu iom varma; la krono estos nur pli bela. Nu ! Ĝi estas preskaŭ kiel taŭgas; nek tro malvarma, nek bolanta. Nur iom klinu vin kaj trapasu vian kapon tra la aperturo kiun mi malfermas nun.

Isengrino faras tion kion oni diras al li; li elstreĉas la spinon, antaŭenigas la kapon, kaj Renardo tuj renversas la poton kaj inundas lin per bolanta akvo. "Ha ! ekkrias kompatinda Isengrino, mi estas perdita ! Mi estas morta ! Foren la tonsuro ! Vi faras ĝin tro granda". Renardo, kiu kaŝe ridis : "Ne, kamarado, oni tiel metas ĝin; ĝi estas maksimume je la dezirata larĝo. - Tio ne eblas. - Mi certigas tion al vi, kaj mi aldonas ke la regulo de la monaĥejo postulas ke vi ekstere pasigu la unuan nokton en piaj vekitecoj. - Se mi sciintus ĉion ĉi, diris Isengrino, kaj ĉefe, kiel oni razis la monaĥojn, diablen se la deziro fariĝi tiu kaptis min ! Sed estas tro malfrue por kontraŭdiri ĝin. Almenaŭ, ĉu oni servos al mi angilojn ? - Unu tago, diras Renardo;

4 En la origina teksto, tiu sentesprimo tradukiĝus per "Per niaj botoj".

estas baldaŭ forfluita; cetere mi tuj kuniĝos kun vi por ŝajnigi ĝin al vi malpli longan". Tio dirita, li eliris tra sekreta pordo konata de li sole, kaj alvenis apud Isengrinoⁿ. Parolante pri la dolĉa kaj edifa vivo de la monaĥoj, li kondukis la novveninton ĉe la randon de fiŝbaseno kie okazis al li la aventuro kiun ni tuj rakontos al vi.

09a Aventuro.

En kiu oni vidos kiel Renardo kondukis sian kamaradon al la angilfiŝado.

Estis ne longe antaŭ Kristnasko, kiam oni pensas pekli la lardojn. La ĉielo estis disŝutita de steloj, estis tre malvarma, kaj la fiŝbaseno kie Renardo kondukis sian kamaradon, estis sufiĉe forte glaciigita, por ke oni povu tutsekure estigi sur ĝi ĝojigajn karolojn. Estis nur unu sola truo zorgeme tenata ĉiutage de la kampuloj de la vilaĝo, kaj apud kiu ili lasis la sitelon kiu servis al ili por ĉerpi la akvon.

Renardo, montrante per la fingro la fiŝbasenon : "Onklo mia, li diras, estas tie kie amase troviĝas la barbfiŝoj, la tinkoj kaj la angiloj; kaj jen ĝuste la ilo kiu servas por kapti ilin (Li montris la sitelon). Sufiĉas teni ĝin dum kelka tempo mergita en la akvo, poste eltiri ĝin kiam oni sentas per sia pezeco ke ĝi estas provizita per fiŝoj".

"Mi komprenas, diris Isengrino, kaj por bone fari, mi kredas, bonevo, ke necesus alligi la ilon al mia vosto; estas ŝajne tiel kiel vi mem faras, kiam vi volas havi bonan fiŝadon. - Prave, diras Renardo; estas mirinde kiel vi facile komprenas. Mi tuj faros tion, kion vi petas".

Li forte ŝnuras la sitelon al la vosto de Isengrino. "Kaj nun vi devas nur stari senmove dum unu aŭ du horoj, ĝis kiam vi sentos la fiŝojn enveni amase en la ilon. - Mi tre bone komprenas; pri pacienco, mi havos ĝin tiom kiom necesos".

Renardo tiam iom apartiĝas sub tufarbusto, kun la kapo inter la piedoj, la okuloj fiksitaj sur sia kamarado. La alia sin staras ĉe la rando de la truo, la vosto parte mergita en la akvo kun la sitelo kiu retenas ĝin. Sed ĉar la malvarmo estis ekstrema, la akvo ne malfruis frostiĝi, poste sin ŝanĝi al glacio ĉirkaŭ la vosto.

La lupo, kiu sentas sin malpacienca, atribuas la taŭzadon al la fiŝoj kiuj alvena; li gratulas sin, kaj jam pensas pri la profito kiun li baldaŭ tiros el mirakla fiŝado. Li faras movon, poste denove haltas,

persvadinta ke plu li atendos, pli li envenigos fiŝojn. Fine li decidiĝas eltiri la sitelon; sed liaj penoj estas senutilaj. La glacio firmiĝis, la truo estas fermita, la vosto estas alkroĉita tiel ke ne eblu al li rompi la obstaklon. Li baraktas kaj moviĝadas, li alvokas Renardoⁿ : "Mian helpon, bo-nevo ! Estas tiom da fiŝoj ke mi ne kapablas levi ilin; venu helpi min; mi estas laca, kaj la tago ne devas malfrui veni". Renardo, kiu ŝajnis dormi, tiam levas la kapon : "Kiel bo-onklo, ĉu vi estas ankoraŭ tie ? Nu, hastu, prenu viajn fiŝojn kaj ni foriru; la tago ne povas malfrui veni. - Sed, diras Isengrino, mi ne kapablas suprenlevi ilin. Estas tiom multe, tiom ke mi ne havas la forton por levi la ilon. - Ha ! reparolas Renardo ridante, mi vidas tion kio estas; sed al kiu la kulpo ? Vi volis kapti tro multe, kaj la kampulo rajtas diri tion : Kiu deziras ĉion, perdas ĉion".

La nokto pasas, la mateniĝo aperas, la suno leviĝas. La neĝo blankigis la grundon kaj Moŝto Konstanto de la Garbejoj, honesta subvasalo kies la domo tuŝis la lageton, leviĝas kun lia gaja hejmanaro. Li prenas kornon, alvokas siajn hundojn, seligas ĉevalon; kriegadoj foriras ĉiufanken, ĉio pretiĝas por ĉasado. Renardo ne atendas ilin, li lerte revojiras al Mopertui, lasante en la batalo la kompatindan Isengrinoⁿ kiu tiras de ambaŭ flankoj, kaj kruele ŝiris sian voston sen sukcesi liberigi ĝin. Ekaperas knabo tenanta du leporhundojn per hundoŝnuro. Li ekvidas la lupon haltigita de la vosto en la glacio, kaj kun la postaĵo sanganta. "Hoj ! Hoj ! La lupo !" La kurĉasistoj informitaj alkuras kun aliaj hundoj, kaj tamen Isengrino aŭdas Konstantoⁿ de la Garbejoj ordoni malligi ilin. La ŝtelĉasistoj obeas; iliaj sanghundoj kuniĝas kun la lupo kiu, kun la hirtigita peltaĵo hirta, pretiĝas por fari bonan defendon. Li mordas iujn, devigas la aliajn ne proksimiĝi. Tiam, Moŝto Konstanto deĉevaliĝas, alproksimiĝis kun spado en la mano kaj pensas distranĉi Isengrinoⁿ duone. Sed la bato maltrafas; Moŝto Konstanto, mem ŝancelata, falas sur la kapon kaj penege restariĝas. Li denove provas, celas la kapon, la bato glitas kaj la glavo malsuprenfalas sur la vosto kiun ĝi entute forprenas. Isengrino, superanta akran doloron, faras ĉefan fortostreĉon kaj sin ekĵetas inter la hundoj kiuj disiĝas por malfermi al li la trairon kaj tuj postkuri lin. Malgraŭ la tuta furioza hundaro

sur siaj spuroj, li atingas altaĵon de kie li defias ilin. Sanghundoj kaj leporhundoj, ĉiuj tiam rezignas sian ĉasadon. Isengrino reiras al la loĝejo, la bedaŭrante la longan kaj densan voston kiun li malvole devis garantie lasi, kaj ĵurante venĝi kontraŭ Renardo, kiun li komencas suspekti esti malice aranĝinta por li ĉiujn tiujn malagrablajn aventurojn.

10a Aventuro.

*Kiel Renardo trovis la skatolon da oblatoj,
kaj kiel Primoto, ordinita pastro, volis soni la sonorilojn
kaj kanti la meson : tio kion oni konsideris tre stranga.*

Iu pastro, iam, trairis la ebenaĵon, kunportante antaŭ si sur sia brusto, skatolon plenan de tiuj maldikaj kukoj konataj sub la nomo de oblatoj, kiujn oni pli poste distranĉis por fari hostiojn. Ĉe la fino de la ebenaĵo estis heĝo: la pastro, transirante ĝin, faligis la skatolon da oblatoj, kaj ne ekrimarkis tion.

Renardo alvenas, trovas la skatolon kaj forprenas ĝin tra la kamparo. Kiam li troviĝas en izolita loko : "Ni vidu, li diras, tion kio estas en ĝi. Li malfermas, trovas pli ol cent oblatojn, kaj manĝas ilin ĉiujn krom du kiujn li gardas duoble falditaj inter siaj dentoj. Li ne faris dudek paŝojn kiam li ekvidis grandsinjoron Primotoⁿ venantan al li per rapidaj paŝoj, kvazaŭ li rekonis lin. "Renardo, li diras, estu bonvena ! - Kaj vi, grandsinjoro Primoto, Dio gardu vin kaj donu al vi bonan tagon ! Ĉu oni povas scii de kie via Sinjora Moŝto alkuras tiel rapide ? - Mi venas de la arbaro kie mi longtempe ĉasis sen trovi ion. Sed kion vi portas tie ?

Renardo : Bonajn kaj belajn kukojn de preĝejo, oblatojn.

Primoto : Oblatojn ! Kie vi malkovris ilin ?

Renardo : Sed ŝajne tie kie ili estis; ili atendis min, mi supozas.

Primoto : Ha ! Kara amiko, ni dividu, bonvolu.

Renardo : Mi donas ilin al vi, kaj mi donus ilin al vi, eĉ se ili valorus kvincent pundojn.

Primoto grandkore manĝinta la oblatojn : Renardo, ĉu vi scias ke ĉi tiuj kukoj estas tre bongustaj ? Ĉu vi havas aliajn ? - Ne, nun. - Nu, mi havas bedaŭron pri tio; ĉar, je sankta Ĝermano kaj la animo de mia patro, mi sentas teruran malsaton. Mi nenion manĝis hodiaŭ, kaj malgraŭ viaj oblatoj, mi sentas min preta senfortiĝi. - Prenu, diras Renardo, iom da kuraĝo. Ĉu vi vidas tien tiun monaĥejon ? Ni iru, ni trovos tien tiom da oblatoj kiom ni deziras. - Ha ! Kara amiko

Renardo, se tiel estus, mi estus dankema pri tio dum mia tuta vivo.

- Lasu min fari, kaj vi estos kontenta, mi promesas tion per mia kapo. Paŝu antaŭe, mi sekvos.

Ili kuras kaj baldaŭ alvenas antaŭ la monaĥejo kiun pastris la pastro de la skatolo da oblatoj. La pordo estis fermita : ili fosas la teron sub la ŝtupoj de la enirejo kaj realigas aperturon.

Jen ili en la preĝejo. Sur la altaro troviĝis oblatoj kovritaj per blanka tuko. Elpreni la tolaĵon kaj formanĝi la kukojn estis por Primoto afero de momento. "Vere, frato Renardo, ĉi tiuj kukoj multe plaĉas al mi : sed des pli mi manĝis ilin, kaj ju pli mi deziris ankoraŭ manĝi ilin. Kiu estas ĉi tiu pankesto, tie proksime ? Ĉu ĝi ne enhavus kelkan bonan aferon ? Nu, ni malfermu ĝin. - Mi ne petas pli bonan".

Ili iras al la pankesto. Primoto, la plej forta kaj plej avida, rompas ĝian fermilon : ili trovas ene panon, vinon kaj bonan viandon. "Dio estu laŭdata ! Diras Primoto, tio estas ankoraŭ pli bona ol la oblatoj; kaj ni havas kion fari bonegan manĝon. Nu, Renardo, iru preni la tablotukon ĉe la altaro, etendu ĝin ĉi tie kaj alportu al ni salon. Honesta viro, tiu pastro, pro esti tiel bone provizinta la pankeston ! Jen ĉio pretigita; ni manĝu tion kion Dio sendas al ni".

Tiel parolante, Primoto eltiris la proviantojn. Ili estis metitaj sur la tablotukon, kaj, trankvilaj kiel en sia propra hejmo, la du kunuloj sidiĝis kaj konkure manĝis.

Sed se Renardo ne farus malicaĵon al Primoto, li havus mortigan honton. "Kara amiko, li diras, mi ĝojas vidi vin tiel bona sano. Verŝu kaj trinku, ni havas neniun por timi. - Jes, ni trinku, respondis Primoto, estas vino por tri". Tamen, pro multe ebriiĝi, la kapo de grandsinjoro Primoto konfuziĝas, kaj Renardo, domaĝante sin, daŭrigis eksciti lin. "Tio, li diris, ni nenion faras; vi trinkas per tro malgrandaj glutoj, mi ne rekonas vin. - Kiel ! Mi senĉese trinkegas, respondas la alia balbutante. Spitu min, mia kara, mia bona amiko Renardo : mi volas trinki pli ol vi".

- Ho ! Vi ne sukcesos tion. - Ĉu mi ? - Sciu ke mi havas dek glason antaŭe.

- Ha ! Renardo, vi ne diras la veron. Jen ! Trinku ! Vi pli multe trinki ol mi ! Mi plivole eldrinkus samtempe ambaŭ pokalojn, vian kaj mian.

Renardo ŝajnis trinki, sed lasis la vinon flui tra siaj barboj. La alia ne plu vidis ion pri tio; li trinkis, ĉiam trinkis, kun la okuloj elorbitaj, ruĝaj kiel du ardaĵoj. Ne estas fantazio kiu ne traflugis al li la kapon : jen li kredas sin la reĝon Nobla" ĉirkaŭita de lia kortego, meze de lia palaco; jen li bedaŭras siajn malnovajn malbonagojn kaj sin deklaras la plej grandan pekanto de la mondo.

"Renardo, li diras, mi havas ideon; Dio kondukante nin ĉi tien, certe havis siajn projektojn pri ni. Se ni irus al la altaro por kanti la meson ? La meslibro estas malfermita, la talaroj de la pastro estas apude. Mi lernis kanti kiam mi estis juna, kaj vi baldaŭ vidos ĉu mi forgesis tion.

Sed, diras Renardo, necesas unue sin deteni de sakrilegio. Por kanti ĉe la altaro, oni devas esti pastro, aŭ almenaŭ tonsurita kleriko. Vi ne tia estas, Primoto. - Vere, vi pravas, Renardo. Sed oni solvos tion, o-oni so-sol-vo-vos tion. Ĉu vi ne povos fari al mi la tonsuron kiu mankas al mi ? Krome oni povas rezigni meson; mi ne bezonas esti tonsurita por diri matutinojn kaj vesprojn. - Ne; sed tamen estus pli bone tuj doni al vi la ordinojn : mi ja tre bone povas fari tion, ĉar en la pasinteco, mi lernis por esti pastro kaj mi estas almenaŭ diakono. Do se mi trovus razilon, mi tonsurus vin, mi surmetus al vi la stolon ĉirkaŭ la kolon kaj deklarus vin pastron, sen bezoni nian sanktan patron, la Papon. - Dume, diras Primoto, nenio malpermesas nin kanti la vesprojn". La du amikoj antaŭeniras al la altaro, Primoto laŭirante laŭ la muroj por tie trovi la apoglokon kiun li tre bezonas.

Akompanante lin, Renardo rigardis tien kaj aliloken : malantaŭ la altaro de la pilgrimantoj, li ekvidis ŝrankon, kaj ŝance li trovas enen tranĉan razilon, helan pelvon el latuno kaj tondilon. "Jen, li diras, ĉio kio necesas al ni; ni nur bezonas iom da akvo".

Primoto havis la langon tro embarasita por respondi. La alia tamen, rekonas sub la sonorilturo, la ŝtonon de la baptejo, li tie elĉerpas la akvon, kaj revenante al sia kunulo : "Vidu, Primoto, la miraklon kiun Dio ĵus faris por vi; rigardu ĉi tiun akvon. - Estas, diras Primoto, ke Dio dankeme aprobas nian servon. Nu ! Rapide mia tonsuro. Vere, mi volas kanti la meson.

Li kuŝiĝas sur la slaboj, kaj Renardo tenante al li la kapon per iu

mano, verŝas per la alia la akvon el la pelvo. Primoto suferas ĉion sen grumbli, kaj Renardo, profitante de lia bonvolo, plilarĝigas al li la tonsuron ĝis la oreloj. "Ĉu mi havas tonsuron nun ? - Jes, vi povas mem senti ĝin. - Do jen mi vera pastro ! Nu tuj la meso ! Ni komencu. - Sed antaŭe, necesas sonorigi la sonorilojn. - Lasu min fari". Li iras al la sonoriloj, ekprenas la ŝnurojn kaj komencas sonorigi funebre kaj feste. Renardo tiam ekdeziregas tiom ridi, ke la morto de ĉiuj liaj gepatroj ne forprenus ĝin al li. Li sin kaŝas kiel li povas en la haroj de sia mantelo, kaj krias al li : "Bone ! Bone ! Pli forte ! Ĉiam pli forte ! Mi kredas ke ne estas kleriko, pedelo, kapabla pli bone sonorigi. Sed necesas kune preni ambaŭ ŝnurojn, la sonoriletoj ne plenumas sian laboron. - Ĉu estas pli bone kiel tiel ? - Jes, jes; nun ĉe la altaro ! Mi tuj helpas vin surmeti la albon kaj la pelerinon, la zonon, la **maniplon**⁽⁵⁾ kaj la stolon". Poste, inter liaj dentoj : "Ho ! Kiel li alimaniere kantos post momento ! Kiel oni alimaniere regalos lin per bastonado !"

Primoto, kun kazublo sur la dorso, supreniras al la altaro, malfermas la meslibron, turnas kaj returnas la folietojn; li eligas hurlojn kiun li rigardas kiel tiom da belsonaj ĉantoj. Tamen Renardo kredanta ke la momento forkuri alvenis, sin ŝovas sub la pordo tra la truo kiun ilin realigis, retropuŝas la teron kiun ili forprenis, fermas la aperturon, kaj lasas Primotoⁿ azenbleki kaj hurli tute laŭ sia plaĉo.

Nu, kiel oni bone pensas, la sono de la sonoriloj alvenas al la pastrejo ? La pastro mirigita eksaltas malsupren de sia lito, alproksimigas al la fajro la kandelon kiun li bruligas, alvokas Ĝiloⁿ, sian klerikon, sian kapelpastron, kaj lian edzinon, sin provizas per stangon, prenas la ŝlosilon de la monaĥejo, malfermas la pordon kaj maltrankvile antaŭeniras. La sinjorino armas sin per pistilo, la kapelpastro per vipo kaj la kleriko per klabo kiu donas al li ion havantan la aspekto kaj la irmaniero de giganta heliko.

La pastro estis la unua por distingi, antaŭ la altaro de kie foriris la krioj, individuo tonsurita, kun kazublo, kies li ne sukcesas rekoni la trajtojn. Li plurfoje retropaŝas, revenas, fine li imagas al si trakti kun la diablo kaj sentas sin kapita de tia timego ke li senkonsciiĝas.

5 Ornamo kiun la katolika pastro portas ĉe la maldekstra brako kiam li celebras meson.

La pastrino eligas laŭtajn kriojn, kaj la kleriko forkuras en la urbo kriante per sia tuta forto : "Alarm'! Alarm'! la diabloj eniris en la monaĥejon ! Ili mortigis Sinjoron Parokestron, kaj ni tre malfacile fuĝis". La kampuloj ekvekitaj, ellitiĝas, vestiĝas, kaj ĉiuj direktiĝas al la monaĥejo.

Necesis tiam vidi ilin : unu surmetis sian maŝkuto el ledο, la alia kapvestiĝis per sian malnovan nigriĝintan ĉapelon el fero; tiu ĉi eltiris el la sterko sian ankoraŭ malsekan forkon, tiu akompanigis sin per siaj hundoj; aliaj svingas rustajn spadojn, levas bastonojn, draŝilojn, skuas hakilojn, klaborojn; ĉiuj, finfine, preparas sin batali nur kontraŭ la diabloj de la infero. La pastro rekonsciiĝis : "Jes, infanoj miaj, li diras al ili, la diablo estas en la kirko; necesas kurataki lin. La bruο de la homamaso interrompas la meson de Primoto : li turnas sin, miras, la timo kaptas lin kaj malebriigas lin. Li kuras al la truo, ĝi estis fermita; li revenas al la altaro, li iras, reiras, pli kaj pli timigita. La pastro, vidante lin kun la orelo malalta, batas lin per sia stango : furioza, Primoto ĵetas sin sur la agresanton kaj dispecigintus lin se la kampuloj lasintus al li la tempon. Ĉiuj tiam huas lin, trabastonas lin, frakasas al li la lumbojn, forprenas al li la duonon de la dorso. La kompatinda Primoto tiam faras lastan strebon : li mezuras per la okuloj malfermitan fenestron, elanas, atingas ĝin per la unua salto kaj fine eskapas el la preĝejo. Vundoplena, li ne havas alian konsolon ol la vestaĵojn kiujn li kunportas, kaj estas en tiu kostumo ke li atingas la arbaron kaj ke li dankegas Dion por esti gardinta al li la vivon. "Malbenita estu la monaĥejestro ! Li multe pagos al mi alian tagon pro ĉiuj batoj kiujn mi ricevis ! Mi ĵuras, Hermengarta, edzino mia, nenion lasi ĉi tie, nek bovinon nek ŝafinon. Se li devas morgaŭ kanti meson, ke li serĉu tiun kiu realportos al li sian stolon kaj sian pelerinon; necesos ke li prunteprenu, por la diservo, la jupon de la pastrino, kaj ke li faru albon per sia subbluzo. Sed Renardo ! Kio li fariĝis ? Estas li tamen kiu kondukis min al la monaĥejo, kaj kiu lasis min post esti metinta min en embarason. Ha ! Se mi retrovus lin, mi ne irus plendi min al la kortego de reĝo Nobla, mi mem venĝus min, kaj mi malebligus lin iam provi tiajn lertaĵojn. Sed mi devintus senti min kiel spitita, kaj la ekzemplo de mia frato Isengrino bone povus

roli kiel averta".

Tiel parolante, li malkovras sub kverko majstro Renardo kiu, kun pentema mieno kaj la okuloj larmantaj, ŝajnis haltinta por atendi lin. "Ha ! Do jen vi, finfine, siro Primoto, li diras, estu bonvena ! - Kaj mi, diras Primoto, ne salutas vin. - Kial ? Kian malbonon mi do faris ? - Vi lasis min solan, kaj sen averti min, vi fermis la breĉon de la monaĥejo. Ne estas via kulpo se mi ne estis svenbatita : necesis defendi min kontraŭ cento da obstinemaj malamikoj. Malvirta etulo, senhonora rufulo ! Ha ! Se mi ne estas la unua, mi ja povos esti la lasta el tiuj kiujn vi perfidis".

"Siro Primoto, respondas Renardo perpeteganta voĉo, mi krias al vi dankon; mi scias ke en ĉi tiuj malproksimaj lokoj, vi kapablas hontigi min kaj malutili min; sed mi atestas per Hermelina, mia kara edzino, Virbranĉo kaj Transheĝo, miaj du filoj, ke mi ne memoras ofendi vin. Ne estas mi kiu fermis la truon, estas la malica monaĥejestro. Mi vane petegis lin malpermesi tion al si, li respondis al mi per minacoj, tiel bone ke vidante lin pretan mistrakti min, mi povis nur fuĝi tra eta malluma pado kiun mi konis. Mi atendis vin sub ĉi tiu kverko, malkvieta pri tio kio vi fariĝus, ĉar mi ĉagrene antaŭvidis ke oni atakus vin. Tia estas la vero, mi ankoraŭ plorsingultis ĉe la momento kiam vi alvenis".

Tiuj paroloj faligis la koleron de Primoto : "Nu ! Renardo, mi vere akceptas kredi vin, kaj gardi venĝemon nur kontraŭ la monaĥejestro kies mi kunprenis, kiel vi vidas, almenaŭ la albon, la pelerinon, la kazublon, la **maniplon** kaj la zonon. Li serĉos aliajn ? kiam li volos siavice kanti meson.

"Nu, ĉu vi scias, diras Renardo, tion kio estus por fari ? - Ne. - Necesus morgaŭ alporti ĉi tiujn vestaĵojn al la foiro kaj vendi ilin tie, eĉ al la monaĥejestro mem se li sin prezentus tie. - Jen kiu estas bone pensita, diras Primoto; sed unue ni ripozu ĉar mi estas severe vundita kaj elĉerpita. Kiam ni estos bone dormintaj, ni parolos pri la foiro; ni tien alportos la vestaĵojn, kaj ni ricevos, mi imagas, sufiĉe bonan prezon. - Mi kredas tion kiel vi, respondis Renardo, kaj kiu scias ĉu ni trovos rimedon por venĝi nin kontraŭ tiuj kiuj tiom multe mistrakis vin, por puni vin pro via fervoro pri la servo de Dio ?"

11a Aventuro.

*Kiel Renardo kaj Primoto iris al la foiro,
kaj pri la bona negoco kiun ili faris survoje.*

Ĉe la tagiĝo, la du amikoj stariĝis kaj faldis la vestaĵojn de la parokestro, laŭ la volo de la komercistoj. Primoto tranĉis vimenon kaj pendigis ilin ĉirkaŭ sia kolo; Renardo metis sin malantaŭ li kiel sia servisto, kaj en tiu aranĝo, ili gaje ekvojiris al la foiro.

Ili ne paŝis longtempe sen renkonti monaĥejestron kiu ĝuste iris al la foiro por tien aĉeti surplison, stolon kaj pelerinon; sed li volis unue iri matenmanĝi ĉe unu el siaj kunfratoj, al kiu li alportis anseron el la plej molaj kaj el la plej grasaj.

Renardo estis la unua por ekvidi lin. "Bonŝance, kunulo, li diras al Primoto, mi vidas tien antaŭ ni, pastron kiu, se mi ne eraras, baldaŭ estos al ni granda helpo. Eble li aĉetus al ni niajn vestaĵojn, ni jam kontentiĝus per tio; ĉar, meze de la foiro, oni povas suspekti nin esti ŝtelintaj ilin, kaj ni tiam pagus malbonan kontribuaĵon. Aliparte, la monaĥejestro kunportas belan anseridon kiun ni ŝategus gustumi. Kion vi opinias ? - Necesas fari tion kion vi diras nun".

La pastro, kiam ili preterpasis, diras al ili, levante pro ĝentileco la baskon de sia mantelo per ĝentileco : "Dio gardu vin, belaj siroj ! - Ankaŭ vin, grandsinjoro pastro, kaj vian kompanion !" Parolante tiel, Renardo rigardis la anseridon. "Kiun vojon vi sekvas, reparolis la pastro, kaj el kiu lando vi alvenas ?"

Renardo : Ni estas anglaj komercistoj, kaj ni iras al la foiro por alporti kompletan sortimenton de monaĥejestro : la albon, la kazublon el bela kaj bona brokaĵo, la stolon, la **amikton**, la **maniplon**, la zonon. Estas ni kiuj provizas la kanonikojn de la venonta preĝejo; sed se vi bezonas iliin, grandsinjoro monaĥejestro, ni donos al vi la preferon, kaj ni lasos al vi la tuton por tiom kiom ĝi kostis al ni.

Monaĥejestro : Ĉu vi havas ĉiujn tiujn vestaĵojn kun vi ?

Renardo : Jes, siro monaĥejestro; ili estas ĉi tie en niaj pakaĵoj, tre bone premitaj.

Monaĥejestro : Ni vidu ilin, mi petegas vin; mi estas iranta al la foiro nur por aĉeti tion; kaj se vi estas nepostulema, mi akomodiĝos al ili.

Primoto : Ho ! Pri tio, vi estos feliĉa de ni.

Primoto tiam metas sian ŝarĝon teren, kaj montras la vestaĵojn. La pastro ilin ekzamenas. "Ne bezonas, li diras, longajn parolojn, kiom vi demandos al mi por tio ?

Primoto : Mi diros al vi sen trokarigi. Donu al mi vian anseridon, kaj la vestaĵoj estas por vi.

Monaĥejestro : Bone parolita, per mia fido ! Mi konsentas tion; prenu ĝin kaj donu al mi la vestaĵojn.

La interŝanĝo tuj okazas. Primoto gaje prenas la anseridon, kiu estis grasa kaj bone dika. Li metas ĝin sur sian kolon kaj fortrotas kiel eble plej rapide, sen eĉ pensi adiaŭi Renardo". Ĉi-tiu postkuras kaj rekuniĝas lin kun la espero esti akceptita dum la disdivido. Unu tiel sekvanta la alian, ili atingas la randon de la arbaro, ne tre zorgoplena pri la kampuloj kiuj, de tempo al tempo, baras al ili la pasejon; kaj survoje, ili plenkore ridis, ĉefe Primoto, pri la stulteco de la monaĥejestro kiu kapablis doni tiel bonan beston kontraŭ kelkaj vestaĵoj.

Alvenintaj sub granda kverko, Primoto metis la anseridon surgrunden, kaj antaŭiĝante al la reklamaciojn de sia kunulo : "Vere, Renardo, ni malpravis ne peti al la monaĥejestro duan anseridon; mi certas ke li donintus ĝin al ni. Vi scias ke ne estas por mi ke mi parolas; sed mi bedaŭras vidi ke vi ne estas tiel favore lotumita kiel mi.

Renardo : Kiel ! Siro Primoto, ĉu vi volus diskrete malkuniĝi kaj forigi min el la disdivido ?

Primoto : La disdivido ? Pri tio, vi ne pensadas. He ! Kion dirus mia patrono, la bona sankta Leŭ ?

Renardo : Tamen vi havos grandan honton kaj vi faros mortan pekon, se vi gardas ĉion por vi.

Primoto : Jen tre senutilaj paroloj : ĉu mi bezonas viajn predikojn ? Se vi malsatas, kiu malpermesas vin promeni en la arbaro kaj serĉi tien vian predon, kiel la aliajn tagojn ?

Renardo ne respondas; li scias ke nun la riproĉoj malmulte servus al li. Por minaci kaj defii Primotoⁿ, necesus esti tiel forta kiel li, kaj Renardo konfesas al si siajn kulpojn. Li preferis malproksimiĝi; sed li ĉefe koleris esti trovanta sian majstron pri perfidado :

"Grandsinjoro Primoto, li diras, ĵus rolis mian personon; vere, mi kredis lin pli stulta. Li faris al mi tion kion oni nomas la kompanion Tesoⁿ⁽⁶⁾. Mi devintus malfidi tiun abomenan glutemulon. Sed se estas vere ke mi kapablas pli bone prifriponi ol iu bovo kapablas plugi, mi alvokas kiel atestantojn, miajn bonajn amikojn, la burĝojn de Araso, ke neniuj povos ekde nun fanfaroni, ho kara Hermelina mia, pentigi vian edzon pri sia sincereco".

⁶ Ĉrkaŭ 1110, Roberto, duko de Normandio, estinta devigita eliri el **Kaeno**, la gardisto de la ĉefa pordego de la urbo, nomata Tesoⁿ, haltigis unu el la ĉefaj servistoj de la princo kaj prirabis lin. La homoj de Teso faris kiel li, kaj ĉiuj bagaĝoj de la duko estis prirabitaj.

12a Aventuro.

*Kiel la anserido ne restis al tiu kiu aĉetis ĝin,
kaj kiel Primoto ne sukcesis kortuŝi Muflarto", la vulturon.*

Nun ni revenu al Primoto kiu ĝuadas rigardi la anseridon antaŭ manĝi ĝin. Per kio li komencos ĉi tiun ĝuplenan manĝon ? Per la femuraĵoj. Ne : la kapo estas pli delikata, kaj fine, se li unue atakis la krurojn, li ne plu estus malsata por demordi la plej bongustajn pecojn. Dum li sekvis ĉi tiun rezonadon, siro Muflarto, la vulturo, rondiris en la aero kiel kutime. Li rimarkas Primoto absorbiĝinta en la kontemplado de sia anserido, kaj li, kiu ne manĝis dummatene, uzas la okazon, malsuprenflugas, antaŭenigas la ungegojn kaj forkaptas la pezan kortobirdaĵon. Primoto ekstremokaze povintus eviti tion; sed li esperis samokaze retenigi la anseridon kaj la akcipitron : li perdis unu kaj la alian. Kia estas tiam lia ĉagreno ? Li sekvas Muflarto" per la okuloj, vidas lin surflugi sur kverkon, kaj mienante kiel honesta persono : "Siro Muflarto, li diras, tio ne estas bona forpreni de homoj tion kio apartenas al ili; **je** mia saviĝo, mi ne traktintus vin simile. Nu, ni ne kverelu, kara amiko; malsupreniru, ni paciĝu; vi distranĉos la anseridon, kaj vi elektos mem la duonon kiu plej bone plaĉos al vi. Ĉu vi ne volas tion, bona Muflarto mia ?"

"Ne, Primoto, respondas la alia, ne esperu tion; mi konservas tion kion mi tenas. Al mi ĉi tiun anseridon, al vi la aliajn kiun vi kaptos. Sed se vi volas, mi diros Patronian por vi, mia bonfaranto : ĉar necesas konsenti, la ansero estas bonega; mi neniam manĝis ĝin tiel mola kaj tiel graseta. - Almenaŭ lasu min gustumi ĝin. Nur unu femuraĵo, mi petegas ! - Vi ne pensas tion, siro Primoto. Kio ! Vi volas ke mi malsupreniru ĝis vi, por la plezuro partigi ! Necesus esti freneza, por meti malantaŭ sian dorson tion kion oni havas en la manoj. Sed atendu, iom da pacienco; kiam mi estos manĝinta la karnojn, mi ĵetos al vi la ostojn.

Primoto rezignis. Li atendis la falon de kelkaj restaĵoj kies Muflarto ne plu volis; kaj tamen li sentis realan memriproĉon pro esti farinta al Renardo artifikon pri kiu li tiel malbone profitis.

13a Aventuro.

*Kiel Renardo faris venĝon al Primoto,
kaj kiel li batigis lin de la fiŝvendistoj.*

Ni lasu Primoto tie por reveni al Renardo kiu strebas sin konsoli pro la perdo de la anseridon, kaj vane klopodas por trovi aliaĵon por meti en la buŝon. Sed post esti sufiĉe kurinta, li komprenis ke la arbaro ne prezentis al li grandan ŝancon de predado, li reiris laŭ la pado kiun direktis al la vojo de la foiro, kaj revenante ĉe la randoj de la ŝoseo, li decidis atendi tie kelkan aventuron. Li ne gvertis de longtempe kiam li aŭdis veni pezan ĉaron. Estis fiŝkomercistoj kiuj alportis al la foiro provianton da tinkoj kaj da haringoj. Renardo, tute sen timiĝi pro ilia alproksimiĝo, etendiĝas en la malseka tero, kuŝiĝas tra la vojo, kun la vosto rigida, la peltaĵo tute blankigita de fango. Li lokas sin kun la kruroj supren, la dentoj premitaj, la malsupra lipo enigita, la lango elŝovita kaj la okuloj fermitaj. La komercistoj preterpasante ne malsukcesas ekvidi lin. "Ho ! Rigardu, diras la unua, per mia fido ĝi estas vulpo. Bona okazo por pagi per sia haŭto la pagoparton de la nokto ! Ĝi vere estas bela, oni farus el ĝi bonan garnaĵon de surtuto; mi ne donus ĝin por kvar pundoj. - Sed, diras la alia, ĝi valoras tion, kaj eĉ pli multe, necesas nur rigardi la gorĝon. Vidu kiel ĝi estas blanka ! Nu, ni metu lin en la veturilon, kaj tuj kiam ni estos alvenantaj, ni forprenos de li tiun mantelon kiu devas gardi lin tro varma.

Tio dirita, oni levprenas lin, ĵetas lin sur la ĉaron, etendas lin super granda korbo, kovras lin per la ŝirmtolaĵo, poste oni revojas. Tiu korbo enhavis almenaŭ milon da freŝajn haringojn. Renardo, kiun la komercistoj apenaŭ pririgardis, komencas gustumi dekduon el ili; poste la malsato ĉesas kaj la satiĝo alvenas. Estas la momento por pensi eskapi; kaj ĉar, vorante, li ne forgesis la perfidecon de Primoto, li ekvidas oportunon kiu baldaŭ donos al li bonegan venĝrimedon. Li kaptas inter siaj dentoj unu el la plej belaj haringoj, kunigas la piedojn, faras salton kaj jen li sur la herbejo. Sed antaŭ ol

malproksimiĝi, li ne sukcesas deteni sin iom moki la komercistojn :
"Bonan vojaĝon, la kampuloj ! Mi ne plu bezonas vin kaj mi admonas vin ne kalkuli kun mia haŭto por via pagoparto. Viaj haringoj estas tre bonaj; mi ne bedaŭras la prezon. Al vi la cetero, krom ĉi tiu kiun mi kunportas por la venonta malsato. Dio gardu vin, kampuloj !"

Tio dirita, Renardo ekkuras, kaj la fiŝvendistoj rigardas unuj la aliajn, konfuzitaj kaj miregitaj. Ili huadas lin, minacadas lin; vanaj penoj, li ne eĉ iomete rapidigas sian irmanieron. Li iras trote, paŝe, amble; trans montetoj, bosketoj, ebenaĵoj kaj valoj, ĝis kiam li fine reiris al la loko kie li forlasis Primotoⁿ.

Primoto ankoraŭ estis tie; kaj necesas siahonore diri tion, ke li ne povis, revidante Renardoⁿ, sin deteni verŝi du larmojn pro pento. Li eĉ stariĝas, iras kelkajn paŝojn renkonte al li, kaj kiam li troviĝas videbla de li, li salutas lin kun pentema mieno. Pri Renardo, li ŝajnigas ne vidi lin. "Bela kamarado, diras Primoto, mi petegas, ne riproĉu min. Mi pekis, mi konfesas tion; sed mi proponas al vi kontentigon : kiun vi volas ? - Primoto, respondis Renardo, almenaŭ vi ja povus deteni vin de mokadon : se vi sole manĝis la pecon kiun ni gajnis kune, tio estas glutema trajto kiu devas sufiĉi al vi, sen tio ke vi bezonas preteksti malbonajn bedaŭrojn. La okazoj por korektiĝi ne mankos, se vi serĉas ilin. - Ha ! Renardo, mi diras la veron; jes, mi sentas profundan bedaŭron pro esti damaĝinta vin : sciiĝu ke mi tute ne profitis ĝin. Mi pretigis por manĝi nian anseridon, kiam subite jen Muflarto kiu sturmis al mi kaj forkaptis ĝin, sen lasi al mi tempon por reteni ĝin. La kampulo prave diris tion : inter la buŝo kaj la kulero estas ofte embarasego. Mi provis kortuŝi la vulturon, vanaj penoj; li respondis al mi kiel mi faris al vi, kara kamarado mia, ke mi difektis mian francan, kaj ke mi manĝus nur liajn restaĵojn. Ĉu mi do ne havas bonan kialon por pentofari, pro ne partigi kun vi la anseridon ! Sed, amiko Renardo, ĉiuj ne estas tiel saĝaj, tiel honestaj kiel vi : la frenezulo devas fari frenezaĵojn, feliĉa, se li havas, kiel mi, penton kaj decidon agi pli bone alian fojon. Ni restu bonaj amikoj, fidu min, kaj ni ne parolu pri tio kio estas pasinta".

"Nu, konsentite ! diras Renardo, mi forgesas ĉion ĉar vi deziras tion; sed mi volus ke via fido estu devontigita : promesu teni

lojalecon al mi, kaj mi same devontigos min al vi". Ambaŭ tiam etendis la manojn en signo de interkonsento. Sed sole Primoto decidis teni la donitan parolon.

Tamen, Primoto ne ĉesis fasti, kaj ekvidante la haringon kiun Renardo alportis : "Kion vi tenas tie, kamarado, li diras, inter viaj piedoj ? - Ĝi estas haringo, simpla haringo : mi ĵus manĝis de ili tiom kiom mi volis, en ĉaro kiu iris al la foiro. - Ha ! kamarado, daŭrigis Primoto, vi scias ke de hieraŭ matene mi nenion manĝis; ĉu vi bonvolus doni al mi ĉi tiun fiŝon ?

"Volontege, diras Renardo, jen ĝi". Primoto rapidege formanĝis ĝin. "Ha ! la bona haringo, kial ĝi ne estas pli bone akompanata ! Bedaŭrinde ! li ne sukcesis tute sole kontentigi malsaton kiel mian. Sed, amiko Renardo, mi petegas, kiel vi sukcesis gajni tiujn kiujn vi manĝis ? - Jen la tuta historio, respondas la alia. Kiam mi vidis alveni la ĉaron, mi kuŝiĝis laŭ mia tuta longeco sur la vojo, mienante morton. La komercistoj kredis ke sufiĉis ĵeti min sur iliaj korboj por fariĝi mastroj de mia haŭto. Tiam mi manĝis, poste, elĉariĝante, mi kunprenis haringon viaintence; ĉar vi vidas, Primoto, malgraŭ via malbona konduto, mi ankoraŭ amis vin. Sed nun mi pensas pri tio : dependus nur de vi por havi la saman fortunon; sed necesus postkuri la ĉaron antaŭ ol ĝi alvenu al la foiro. Vi scias kiel mi faris, vi nur devos rekomenci. - Per sankta Leŭ ! diras Primoto, vi estas bonega konsilanto; mi postkuras la komercistojn; atendu min ĉi tie, mi revenos tuj kiam mi bone satigos la gorĝon per iliaj fiŝoj".

Primoto tuj ekkuras; li atingas la ĉaron kiam ĝi alproksimiĝis al la ĉirkaŭaĵo kie staris la foiro. Li preterpasas ĝin, ne perdas tempon, sin kuŝas sur la vojo kaj ŝajnigas esti morta kiel Renardo instruis lin. La komercistoj ekvidinte lin : "Ha ! ili kriis, la lupu ! la lupu ! ni iru al li; oni opinius ke li estas morta. Ĉu li volus ludi al ni la saman ruzaĵon kiel la malbenita Vulpo ? Ni tuj vidos".

Ĉiuj homoj de la ĉaro alvenas per la sama paŝado ĉirkaŭ Primoto kiu atentigas ne movi dum ili turnas kaj returnas lin. "Li estas morta ! diras unu. - Ne. - Vere jes, per la kapo de Dio ! - Mi diras al vi ke li trompe imitas. - Nu, ĉi tiu bastono akordigos nin". Oni trabastonas, Primoto suferas ĉion. Unu el la ĉaristoj havis grandegan levstangon :

li faligas ĝin sur la lumboj de la kompatinda lupo kiu sufokas siajn ĝemadojn, eltenas la doloron kaj ne montras signon de vivo. Tamen la kampulo rimarkas suspiron : tuj li elprenas larĝan tranĉilegon per kiu li estis batonta lin, sed Primoto ĝustatempe juĝas ne atendi lin; li faras salton, faligas unu el siaj malamikoj, kaj forfuĝas persekutata de la huadoj de ĉiuj. Jen li tre kolera, tre draŝita, tre trabatita, li pene atingas la rifuĝejon kie atendis lin lia kara kamarado. "Ha ! Renardo, vi perfidis min".

"Kiel, siro Primoto, ĉu vi ne bone manĝis haringojn ? - Vere temas pri regalo; la fiŝvendistoj atakis min, batis min, draŝis min, ne multe mankis por ke ili svenbatis min. Kian momenton kaj kian timon, kiam post esti havinta la ripojn rompitaĵojn per levstango, mi vidis brili la tranĉilegon kies oni estis ludonta sur mia kolo ! Estis tiam kiam mi ĉesis esti mortinta kaj ke mi kolektis ĉiujn miajn fortojn por eskapi al tiuj malbenitaj kampuloj.

"Ha ! La kampuloj ! tiam reparolis Renardo bremsante deziregon ridi, nu jen ili ! veraj demonoj kies eĉ ne necesas paroli, tiom oni havus malbonojn por diri. La kampulo ne havas amikojn, li kompatas nenium. Sed, siro kamarado, ĉu vi ne estas vundita ? Ĉiaokaze, ni bone danku Dion esti savinta vian vivon. Ripozu, kaj poste ni iros vidi ĉu ni povos aliloken trovi por manĝi; ĉar vi tre malsatas, ĉu ne ? - bedaŭrinde ! jes, respondas Primoto kiu ne vidis Renardo" kiu grimacis al li per la tuta longo de sia lango, mi ne scias pro kio mi plej suferas, pro la malsato aŭ pro la batadojn kiujn mi ricevis".

La ambaŭ amikoj tiam sin kuŝas sur la freŝa herbo; Primoto grumblante kontraŭ la kampuloj, Renardo ĝoje prenante la tempon, kun sia kapo envolvita en siaj kruroj. Estas tiel ke li allasas sin al la dormo de la justulo, kiun ne ĝenas ajnan bedaŭron kaj kies ĉiuj deziroj estas plenumitaj.

14a Aventuro.

Kiel Renardo alkondukis Primoto" en la peklaĵejo de la kampulo, kaj tio kio rezultis por la kampulo kaj por li.

Primoto, kiun malsato turmentis, vekis Renardo antaŭ la tagiĝo : "Kamarado, mi malsatmortas, vi scias tion; sciigu do al mi kien mi povas trovi por manĝi.

Renardo frotas al si la okulojn, pripensas momente, poste : "Se vi volas fari bonan manĝon, estas apud ĉi tie domo de mia konato kiu donos al vi ĉiujn rimedojn. Ĝi apartenas al kampulo, posedanto de kvar dikaj lardoj : mi scias tra kie oni povas eniri, kaj se vi volas, mi kondukos vin tien.

"Se mi volas tion ! diras Primoto, sed tuj mi petegas vin. Ĉu vi ne vidas ke mi bolas esti antaŭ tiujn lardojn ? - Nu ! Ni foriru.

Alvenintaj antaŭ la domo, Renardo komencas ekzameni la pordojn kaj la fenestrojn : ili ĉiuj estis fermitaj, kaj la hejmanaro de la kampulo ankoraŭ dormis. Renardo memoris pri artifiko kiun li ofte provis. Estis kontraŭflanke al la pordo, en la ĝardeneto, mallarĝa aperturo : li alkondukas tien Primoto", trapasas unue kaj invitas sian amikon sekvi lin. Primoto renkontis grandegajn malfacilaĵojn por trapasi; sed la malsato maldikigis sian ventron kaj donis al li apartan viglecon; jen ili en la domo. Ili alvenas en la peklaĵejon, ili malkovras la lardojn. "Nun estu kontenta, siro kamarado, diras Renardo, neniam vi havos pli bonan okazon kontentigi vian malsaton. La alia, anstataŭ respondi, impetegas al la ŝinkojn, voras ilin, kaj eĉ ne proponintus ilin al Renardo, se tiu ĉi ne anticipe antaŭzorgis. Sed ĉar li ne forgesas ke oni povas surprizi ilin, li informas Primoto" por hasti. "Mi estas preta foriri, respondas la alia, sed mi tiom manĝis ke mi malfacile paŝas. Fakte, lia ventro fariĝis pli larĝa ol lia korpo estis longa : lampaŝe, ili revenas al la aperturo kiun Renardo trapasis sen tro da peno; sed estis tute alie pri Primoto. La ventrego kiun li realportis, starigis neatenditan reziston. "Kiel fari, li diris, kiel eliri el ĉi tie ? - Ĉu vi havas ion, frato ? mallaŭte diras Renardo. - Ion ? Mi havas ke

mi ne kapablas transiri. - Transiri ? Vi volas sendube ridi. - Mi diras al vi, per miaj dentoj, ke mi ne kapablas eliri. - Nu, provu antaŭenigi la kapon kaj puŝi". Primoto sekvas la konsilon kiun oni donas al li; Renardo tiam prenas lin ĉe la oreloj, tiras plej forte kiel li povas, ĝis meti transverse al li la skalpon. Sed li vane tiras alten, malalten, flanken, ĉio estas senutila, la ventro ankoraŭ malcedas. "Ni provu alian rimedon, diras Renardo, ĉar la tago ne multe malfruos; la kampulo povas veni, kaj se li trovas nin ĉi tie... Atendu min, kamarado, mi havas ideon; mi tuj provos eltiri vin el ĉi tiu malbona situacio". Li kuras al la arbaro por detranĉi branĉon, per kiu li faras ligilon kaj revenante al Primoto : "Necesas nun puŝi kaj tiri per ĉiuj viaj fortoj, ĉar neniapreze mi ne lasos vin en tia danĝero. Kaj tion dirante, post esti metinta la ligilon ĉe la kolon de Primoto, li sin apogas iuflanke de la murfaco kaj tiras aliflanken tiel ke parto de la korpo eniĝas kiel la kapo; li senĉese ripetas kun konvinko : "Sankta Spirito, helpu nin ! Ĉu necesos lasi ĉi tie mian kamaradon, mian amikon ! Ne, certe". De la kolo ĝis la supro de la kapo, li forigas kaj kuspas la haŭton de la kompatinda Primoto; venkata de doloro, la suferanto eligas longan kriadon, la kampulo vekiĝas kaj ellitiĝas, jen li kiu alkuregas.

"Lasu min, lasu min, Renardo, mi pli bone preferas provi eniri en la ĝardeneton por defendi min kontraŭ la kampulo. Renardo ne ripetigas lin, li malproksimiĝas, preskaŭ certa ke finfine lia kara amiko ne elturniĝos.

Primoto, tamen, trovis la forton por liberigi sian antaŭparton, kiam la kampulo alvenis tenante kandelon per iu mano, lancan stumpon per la alia. Li provas eviti la baton, sed li nur duone sukcesas; ŝance, la kandelo estingiĝas. Primoto, kies la okulo estas pli bona ol tiuj de la kampulo, uzas la okazon por reveni al sia malamiko kaj kapti lin dum li provis revigligi la lastajn lumetojn. La kampulo, vikle mordita ĉirkaŭ la malalta parto de la dorso, eligas longan krion de senhelpeco : "Al mi ! bonaj homoj; helpu !" Lia edzino aŭdas lin unue; ŝi stariĝas, prenas sian ŝpinbastonon, alvenas sur la batallokon kaj venas tani per malforta mano la haŭton de la lupo. Vanajn penojn, Primoto gardas sian predon. Necesis tiam aŭdi la blekadojn de la du geedzoj :

"Murd ! Ŝtel ! Oni strangulas min ! Oni mortigas min ! La diabloj forprenas min !" Kaj cent malbenojn.

La virino decidiĝas malfermi la pordon de la ĝardeneto, kun la espero ricevi helpon de ekstere. La lupo profitas la okazon, premas la dentojn, kunprenas pecon de graso el la femuro de la kampulo kaj rapidege aliras al la kampoj; ĉar la danĝero redonis al li siajn fortojn kaj sian lertecon. Li retrovas en la arbaro Renardoⁿ, kiu vere afliktita pro revidi lin, ŝajnas esti tia pro la travivaĵoj kiujn lia kamarado ĵus suferis. "Nu, diras Primoto, la damaĝo ne estas tiel grava kiel ĝi povus esti : mi bone elturniĝis kaj se vi volas manĝi viavice, mi alportas al vi karnon de kampulo; ne estas io tia; koncerne min, mi preferas ĝin ol tiu de porko. - Mi opinias alie ol vi, respondas Renardo, per la amo kiun mi montras por mia filo Virbranĉo, la karno de la kampulo, ĉu ĝi estas blanka ĉu nigra, ĉiam estos de kampulo : mi neniapreze volus tuŝi tion, mi kredus min por ĉiam malpuran".

15a Aventuro.

*Kiel Primoto estis denove mokita de Renardo,
kaj kiel li estis mirakle retenita sur la tombo de sankta martiro.*

"Sed, daŭrigis Renardo, mi scias ion pli bona ol karnon de kampulo. Apud la loko kie ni estas, trans la heĝo kiu fermas ĉi tiun ĉirkaŭbaritejon, longa aro da grasaj anseroj povus esti por ni, se ni volus tion. - Kie ili estas ? Ni iru tien, sed ĉu ne estas danĝero ? - Ne, ili estas gardataj de iu sola kamparano. - Tio sufiĉas, diras Primoto, kaj mi kuras tien. Mi volas alporti unu aŭ du el ili, kaj ĉifoje ni manĝos ilin kune. - Bonan vojaĝon do ! siro kamarado"; kaj Renardo restas, esperante ke lia kara amiko trovos novajn misaventurojn.

Fakte, Primoto alvenas meze de la grego da anseroj, kaj unue ĉio sukcesas al li. Li elektas la plej grasa, atakas ĝin kaj jam revenigis ĝin, kiam la paŝtisto, revenanta de la arbaro, ekvidas lin kaj ĵetas al li la du laniariojn kiuj akompanis lin. La vojo estanta tiel fermita al li, Primoto rezignacias liberigi sian predon, ne sen esti ricevinta ataketojn de la hunda dento. Li revenis al Renardo pli rapide ol li foriris, sed ĉifoje en tre malbona humoro.

"Fulmotondro ! Renardo, li diras alvenante, jam de longe vi malestimas kaj mokas min. Vi nenion atendis de mia morto, sed vi povos bone penti pro esti volanta prepari ĝin. Ha ! Mi nun vidas tion : kiam vi sonorigis al mi la sonorilojn, tio estis por alvoki la monaĥejestron; kiam vi sendis min al la komercistoj de haringoj, tio estis por svenbatigi min; kiam vi montris al mi la vojon de la peklaĵejo, tio estis por lasi al la kampulo mian haŭton kiel garantiaĵo; vi sciigis al mi antaŭ momento pri aro da anseroj, kaj vi kalkulis je la hundoj por disŝirigi min. Majstro maliculo ! Vi estas tro lerta; mi tuj pagos definitive ĉiujn miajn ŝuldojn". Li tiam metas sian furiozan piedon sur la muzelon; Renardo moviĝas flanken, sed sentante sin haltigita : "Siro Primoto, li diras, vi malbonuzas vian forton; la potenculoj ne povas sen peko tiel premegi la ordinarulojn. Mi iros plendi al la Reĝo, al la Reĝino, al ĉiuj egaluloj. Sed mi petegas,

almenaŭ aŭskultu; vi vidos ke mi ne meritis vian koleron. - Ne, ne ! Tute ne pardono por la perfidulo, la insidemulo, la stratulaĉo; vi mortos nur per mia mano. - Sed plie ! Bone pripensu pri tio, siro Primoto, se vi mortigos min, vi devos trakti kun multaj homoj. Mi havas filojn, vi scias tion; mi havas gepatrojn, potencajn amikojn; necesos kalkuli kun ili; kaj kiam oni sciiĝos ke vi surprizis min, sovaĝe mortigis min, vi estos morte juĝita aŭ vi forlasos la landon". Ĉiuj ĉi paroloj nur kreskigas la koleron de Primoto.

Li ekkaptas Renardoⁿ ĉe la nuko, ĵetas lin teren, piedpremas lin, surpaŝas sur lia ventro kaj kovras lin per mordadoj. Renardo jam mortas pro timo morti. Kunigante tiam ĉiujn siajn fortojn : "Dankon ! grandsinjoro Primoto : mi ĵuras, kaj tio estas mia lasta konfesado, ke mi neniam strebis malutili al vi". Ĉi tiuj vortoj subite haltigas la koleron de Primoto. La dubo komencas ekregi lin : "Se, tamen, Renardo havis nenion por riproĉi al si !" Renardo vidas la efikon de siaj lastaj paroloj, li daŭrigas per pli laŭta tono : "Jes, mi atestigas la relikvojn, mi nesciis ke la anseridoj estis sub la gadado de hundoj. Ne, mi ne fermis la pordojn de la preĝejo; ne, mi ne divenis ke la fiŝvendistoj traktus vin pli malbone ol mi. Mi plorpetas justecon, kaj mi ĵurpetas mian edzinon kaj miajn infanojn iri peti ĉe la Reĝo venĝon pro mia morto".

Primoto ne plu frapis, li cerbumis pri la konsekvencoj de ĉi tiu afero. "Nu ! Renardo, mi lasas la vivon al vi, mi volas forgesi ĉion. Staru vin, vi ne plu devas timi ion de mi. - Ĉu vere mi povas kredi tion ? - Jes, mi pardonas vin. - Kaj kiu certigos tion al mi ? - Se vi volas, mi ĵuros tion. - Jes, mi volas tion. - Nu ! Bone. Montru al mi la monaĥejon kies mi atestigos la sanktajn relikvojn. - Estas unu sufiĉe najbara; se vi deziras, mi alkondukos vin tien. - Mi konsentas, ni iru !"

Ili ekvoĵiras, sed Renardo jam meditis novan perfidon. Ĉe la enirejo de la ĉirkaŭbaritejo troviĝis kaptilo konata de li, konsistata de kverka branĉo kurbigita kaj tenita de ŝlosilo kiun la plej malgranda pezo cedigis. Estas tie kien li kondukas Primotoⁿ. Alvenitaj en tiu loko : "Tie, diras Renardo, kuŝas sankta korpo, tiu de konfesanto kaj martiro, dumlonge ermito en ĉi tiu mondo, kaj nun en la paradizo. Mi havas grandan devotecon por lia tombo, kaj sen iri pli

for, se vi bonvolu ĵuri per ĝi ke vi ne plu batos min kaj ke vi restos mian fidelan amikon, mi konsideros min kiel kontentigita.

"Mi konsentas pri tio per sankta Agnesa", diras Primoto. Tuj li genuiĝas, metas la manon super la kaptilo, kaj prononcas tiujn ĉi parolojn : "En la nomo de sankta Ĝermano, de ĉiuj beatuloj kaj de tiu kiu kuŝas ĉi tie, mi konsentas ne vidi la sekvan tagon se mi gardas rankoron kontraŭ Renardo kaj se serĉas kverelon kun li kaj kun liaj. - Tiel Dio estu helpo por vi ! respondas Renardo. Tiam Primoto, por sin restari, metas la piedon sur la kurbigita branĉo, la ŝlosilo eskapas, kaj la piedo restas kaptita en la kaptilo. "Helpon ! Al mi ! Siro Renardo, mi estas kaptita. - Ha ! Vi estas kaptita, perfidulo ! Estas ĉar vi parolis kontraŭ via penso; estas ĉar vi estas ĵurrompanto, kaj jen kial la sanktulo punas vin. Mi ja min detenos de kontraŭstari la Divolon; li retenas vin, preĝu lin lasi vin eskapi. Ha ! Mi nun rekonas viajn ĉarlatanaĵojn, kaj vi vidas tion kiun kostas ne esti lupo de bonfaro".

Tio dirita, Renardo malproksimiĝas kaj revojiras al Mopertui. Survoje, li renkontas alian anseridon kiun li ekkaptas, kaj triumfa revenas trovi Hermelinaⁿ kiu ne sciis, ŝi kaj siaj infanoj, kiel sufiĉe festeni tion. Li gaje rakontis ĉiujn lertaĵojn kiujn li ludis dum sia ekskurso, kaj kiel Primoto, ĉiam trompita, fine restis en la kaptilo. Hermelina tutkore ridis pri tio : ŝi apenaŭ interesiĝis pri la frato de Isengrino, kaj tuj kiam ŝi retrovis sian baronon kaj partoprenis en lia predo, ŝi ne plu vidis tion kio povis resti al ŝi por deziri. Koncerne Primotoⁿ, ni ne bone scias tion kio li fariĝis. Ĉu li nur suferis lasi garantie unu el siaj piedoj en la kaptilo, aŭ ĉu li mortis sub la dentoj de la hundoj kiuj trovis lin, estas iu punkto kiun la rakonto ne klarigis ? Nur ekde tiu lasta kaj malfeliĉa aventuro, la libro silentas pri li, kaj ebligas al ni supozi ke li eligis sian animon sur la tombo de la sanktulo kiun li havis la malbonan ideon alpreĝi.

16a Aventuro.

*Kiel Tiberto prenis la soldojn de Renardo,
kaj kiel estas malagrabla ataki kontraŭ maljuna kato.*

Eskapinta el la renkontiĝo de kurĉasistoj kaj de la laika frato Renardo atingis larĝajn fosaĵojn kiujn li konis, kaj metis ilin inter la hundaro kaj li. Sed li tre bezonis ripozon, lia malsato, plurfoje iritita, ne estis kontentigita. Li promesis al si sin venĝi kontraŭ la korvo, kontraŭ la paruo kaj ĉefe kontraŭ Ŝanteklero kiam, post vojturmo de malnova vojo, li ekvidas Tiberto", la katon, rezonanta kun si mem kaj sen kompanio. Feliĉa Tiberto ! Lia vosto sufiĉis al li por disvolvi sian talenton kaj ellasi lin : li strabe gvatis ĝin, postkuris ĝin, lasis ĝin iri kaj reiri, kaptis ĝin ĉe la momento kiam ĝi tute ne pensis tion, haltigis ĝin inter siaj kruroj kaj kovris ĝin per karesoj, kvazaŭ ĝi timis esti iomete tro taŭzinta ĝin. Li ĵus prenis la plej senzorgan pozon, laŭvice etendante la ungojn kaj revenigante ilin en ilia veluran ingon, fermante la okulojn kaj duonfermanta ilin kun feliĉega mieno, zumante tiun apartan murmuron kiun nia lingvo sukcesas nomi nur imitante ĝin iom malbone, kaj ŝajnas montri ke la perfekta ripozo de la korpo, de la menso kaj de la koro povas konduki al la plej dolĉa kaj la plej dezirinda stato. Subite jen li eligita el lia volupta meditado per la plej malpli atendata vizito. Renardo estas je kelkaj paŝoj de li, Tiberto rekonis lin pro sia rufa robo, kaj tiam leviĝanta tiom por sin gardi kiom pro taŭga sento de respekto : "Siro, li diras, estu bonvena ! - Mi, abrupte respondas Renardo, mi ne salutas vin. Mi eĉ konsilas vin ne provi renkonti min, ĉar mi neniam vidas vin sen deziri ke tio estu por la lasta fojo".

Tiberto ne opiniis konvena provi pravigon; li kontentiĝis respondi mallaŭte : "Bela sinjoro mia, mi bedaŭras tiel malbone trovi favoron ĉe vi". Tamen, Renardo ne estis preta provoki disputon; ĉar li fastis de longe, kaj estis elĉerpita pro laciĝo. Koncerne Tiberto", li estis dika kaj belstatura; sub longaj arĝentaj kaj brilaj lipharoj viciĝis bone akritaj dentoj; liaj ungoj estis longaj, fortaj kaj akrapintaj;

cetere, grandsinjoro Renardo ne ŝatis egalfortajn batalojn. La decida mieno de Tiberto ŝanĝigis al li la tonon : "Aŭskultu min, li diras al li, mi bonvolas sciigi al vi ke mi entreprenis kontraŭ mia kamarado Isengrino seriozan kaj teruran militon. Mi jam antaŭdungis plurajn kuraĝajn soldulojn; se vi volus pliigi la nombron, vi ne sentus vin malkontenta pro tio, ĉar mi firme volas doni al li sufiĉe da klopodon antaŭ ol akcepti la plej malgrandan interpacon. Tre mallerta tiu kiu ne trovos kun ni la eblecon perlabori riĉan akiraĵon".

Tiberto estis ĉarmata per la evoluo kiun la konversacio prenis. "Siro, li diras, vi povas kalkuli kun mi, mi ne mankos al vi. Mi havas miaflanke kalkulon kun Isengrino, kaj mi nenion deziras pli ol ĝian domaĝon". La interkonsento estis baldaŭ traktita, la fideleco ĵurita, kaj Tiberto akceptis la soldojn de Renardo por milito kies li ne sciis la kaŭzon kaj kiu ne estis deklarita. Jen ili vojirantaj, ĉiu sur sia ĉevalo (*ĉar nia poeto volonte vojaĝigas siajn heroojn kiel noblaj militistoj*); ŝajne la plej bonaj amikoj en la mondo, sed fakte pretaj sin helpi per la perfido ekde kiam la okazo aperos.

Rajdante, Renardo ekvidas, plenmeze de la vojsulko kiu borderis la arbaron, fortan maŝkaptilon streĉita en duonfendita kverkstumpo. Ĉar li atentis pri ĉio, li evitis ĝin; sed la espero plaĉi al li vidi Tibertoⁿ malpli feliĉan. Li alproksimiĝas al sia nova soldato kaj grimace ridetas al li : "Mi vere ŝatus, kara Tiberto mia, li diras al li, provi la forton kaj lertecon de via ĉevalo. Sendube oni povas ricevi tion en la demonstracioj, sed mi ŝatus esti certa. Vi vidas tiun mallarĝan linion kiu laŭiras la arbaron, elanu galopege rekte antaŭ vi, la eksperimento estos decidiga. - Volonte", respondas Tiberto, kiu subite elanas kaj galopas. Sed alvenanta antaŭ la maŝkaptilo, li ĝustatempe rekonas ĝin, retroiras du paŝojn kaj rapide preterpasas. Renardo sekvis lin per la okuloj. "Ha ! Tiberto, via ĉevalo stumblas, ĝi ne gardas la direkton. Haltu kaj ni rekomencu ! Tiberto, kiu ne plu dubis pri perfido, ne faras malfacilaĵon. Li revigliĝas, pikas per la spronoj, duafoje alvenas antaŭ la maŝkaptilo, kaj duafoje saltas super kun la sama facileco.

Renardo komprenas ke lia malico estas malkovrita; sed sen konsterniĝi : "Vere, Tiberto, mi tro bone taksis vian ĉevalon; ĝi

valoras malpli ol mi pensis; ĝi baŭmas, ĝi deturniĝas, ĝi ne estos akceptita de la hufferisto de mia armeo, kaj vi ne akiros altan prezon por ĝi. Tiberto pardonpetas plej bone kiel li povas; sed dum li proponas fari trian provon, jen du laniarioj kiuj alkuregas kaj aŭdigas sian voĉon ekvidante Renardoⁿ. Ĉi tiu, pro sia konfuziĝo, forgesas la maŝkaptilon al kiu li alproksimiĝas por malaperi en la arbaron; sed Tiberto, malpli timigita, kaptas la okazon, kaj simulante egalan teruron, sin ĵetas al Renardo kiu, por sin mastri, antaŭenigas sian maldekstran piedon precize sur la maŝkaptilon. La ŝlosilo kiu streĉis la kaptilon falas, la larĝa fendo refermiĝas, kaj estas Moŝto Renardo kiu estas kaptita. Jen Tiberto en la kulmino de siaj deziroj, ĉar li kredas esti tre certa ke lia kunulo ne saviĝos: "Restu, li diras al li; restu, mia sinjoro Renardo; ne maltrankviliĝu pri mi, mi kapablos rifuĝi en sekuran lokon. Sed ne forgesu tion alian fojon: al trompanto, trompanton kaj duono; ne estas kontraŭ Tiberto ke Renardo devas plendi".

Dirante tiujn vortojn, li foriras ĉar jam la hundoj kruelis kontraŭ Renardo. Avertita de siaj bojadoj, la kampulo kiu aranĝis la maŝkaptilon, alkuras. Li levas sian pezan hakilon. Oni juĝas pri la teruro de Renardo! Neniam li vidis morton de tiel proksime. Feliĉe, la hakilo malĝuste falas, remalfermas la kaptilon kaj Renardo liberigita de tiu kiu devis mortigi lin, forkuras, malaperas en la arbarego sen tio ke la krioj de kampulo, la senespera jelpado de la hundoj kapablas turnigi al li la kapon. Vane li estas persekutata; li kapablas trompi ilin kaj kiam li estis liberigita de tiu ekstrema danĝero, li kuŝiĝas preskaŭ senviva sur la bordo de perdita vojo. Iom post iom la doloro de la vundoj kies li estis kovrita, reakirigas al li sian konscion: li miras esti kapabla kuri tiel longtempe, kaj lekante siajn vundojn, ŝtopante la sangon kiu elfluis, li memoras kun hororo kaj ĉagreno, la topon de la kampulo, la trompaĵon kaj mokadojn de Tiberto.

17a Aventuro.

Kiel Renardo kaj Tiberto, denove bonaj amikoj, malkovras andujon, kiun Tiberto kunprenis kaj kiun Renardo ne manĝis.

Vi vidis kiel Renardo malfacilege eltiris sian kruron el la terura kaptilo. Kiam li estis iom ripozinta per malkvieta dormo, li malĝoje daŭrigis sian vojon, lamante kaj incitita de kruela malsato. Tiberto kredis lin vere mortan, kiam li vidis lin alveni al li, kun subtirita vosto, la okulo dolĉa kaj bonvola. Ne estas ĉar vidante tiu kiu tiel bone moktrompis lin, ke la sango ne furioze ekbolis en li; sed por certigi sian venĝon, li sentis ke necesis sin devigi.

"He ! Tiberto, kio vin venigis ĉi tien, li diras al li, vidante lin fuĝi. Nu ! Nu ! Ne kuru tiel rapide. Lasu min diri al vi kelkajn vortojn : ĉu vi forgesis la ĵuritan fidelecon ? Se vi povus supozi de mi la plej malgrandan rankoron, vi forte erarus. Al Dio plaĉu ! Mi reiris ĉi tiun vojon, nur kun la espero rekuniĝi kun vi, kiel lojala kavaliro". Pro tiuj vortoj laŭte prononcitaj, Tiberto malrapidigas la paŝadon; li eĉ haltas, zorgante tamen bone pretigi siajn ungojn. Pri Renardo, elĉerpita pro malsato kaj laceco, li estis ankoraŭ malpli inklinata ol la antaŭtago okazigi deklaran lukton. "Vere, kara Tiberto mia, li diras, la mondo estas tre kruela, oni ne plu distingas bonkorecon en ĝi; oni pensas nur trompi la aliajn, kvazaŭ la malbona fido ne estis ĉiam punita. Mi diras al vi tion pro tiu granda predikisto, la kamarado Isengrino, kiu antaŭnelonge pastrigis : mi ekscias ke li estis ĵus surprizita de tiu kiun li volis trompi, kaj lia ekzemplo malblindigis min. Mi ne volas esti traktita kiel li; neniam la malvirtuloj faris bonan finon, kaj cetere mi bonege scias tion kion kostas ne havi veran amikon. Vi, ekzemple, Tiberto, al kiu mi ĉiam sentis specialan korinklinon, kiam vi kredis min mortinta, vi forkuris. Ne ĉar vi primokis mian malfeliĉon; mi mistraktus tiun kiu akuzus vin pri tio, ĉar estis inter ni ĵuritan fidelecon. Sed vere, diru al mi la veron, kara Tiberto : vi havis grandan korĉagrenon, ĉu ne, vidante min haltita en la kaptilo, kiam la hundoj diligentis ĉe miaj flankoj kaj kiam

la kampulo levis por mi sian toporon ? Li kredis mortigi min per la bato, kaj per la bato, li liberigis min, tiel bone ke, dank'al Dio, mi konservis mian haŭton. - Mi vere ĝojas pro tio, diras Tiberto. - Ĉu ne ? Mi certis pri tio, kvankam vi eble iom helpis peli min en tiu malbona kaptilo, tio kiun mi pardonas al vi, kaj tutkore. Sed mi diras, ne por riproĉi tion al vi, ke vi povintus agi iom pli kompateme. Ni ne plu parolu pri tio !"

Tiberto, post ĉi tiuj dolĉaj paroloj, malvigle respondis certigante pri siaj bonaj intencoj; kaj ĉar oni ŝajnis preta kredi lin, li proponis renovigi sian omaĝon, dum Renardo sin devontigus defendi lin malgraŭ kaj kontraŭ ĉiuj. Jen la paco denove subskribita, paco kiun ambaŭ intencas teni kiel kutime.

Ili sekvis, sen multe babili, la ireblan padon, turmentitaj de preskaŭ egala malsato, kiam ili renkontas grandan andujon forlasitan apud la vojo, ĉe la eniro de plugita tereno. Renardo ekkaptas ĝin unue. "Mi partoprenas en tio ! tuj kriis Tiberto. - Certe ja, respondas Renardo; se mi senigus vin je tio, kio fariĝus la ĵurita fideleco ? - Nu, ni dividu kaj ni manĝu. - Ne, dolĉa amiko, la loko ne staras sufiĉe aparta; ni ĉi tie estus malkomfortaj. Necesas kunporti ĝin aliloken. - Mi konsentas, ĉar vi volas tion".

Renardo prenas la andujon en la mezo, tiel ke la ambaŭ finoj pendis. Tiberto sekvis lin, zorgoplena pri tio kion li enpense havis. Ha ! se li mem tenus la delectindan pecon, li estus pli certa havi almenaŭ sian parton. "He, Dio mia ! li diras, kamarado, kiel do vi tenas ĉi tiun andujon ! Vi lasas la finojn treniĝi en la polvo kaj vi malsekigas la mezon per via salivo; tio estas por naŭzi. Se vi daŭrigas, mi cedos al vi mian parton. Ho ! kiel mi alie portus ĝin ! - Kiel vi portus ĝin ? - Vi estas vidonta : mi ankaŭ devas havi la tutan penon, ĉar vi unue vidis ĝin". Renardo, ĉion bone konsiderinta, lasis lin fari. Ĉar, li pensis, la ŝarĝo embarasos lin, kaj mi pli facile mastros lin.

Tiberto prenas la andujon, premas unu el la finoj inter siaj dentoj, svingas ĝin kaj ĵetas ĝin sur sian dorson. "Vi vidas, kamarado, li diras, tio nomiĝas porti andujon. Ĝi ne prenas polvon kaj mia buŝo tuŝas nur tion kion oni ne manĝas. Ni sekvu la vojon; ĝi alvenigas al la kruco kiun ni tie videtas sur tiu altaĵo, bonan lokon por komforte

manĝi; oni ĉiuflanke vidas, oni ne timas surprizon". Renardo ne tro multe samopiniis; sed la kato, sen atendi permeson, kuregis, kaj estis Renardo kiu sekvis lin. "Atendu min do ! Kamarado. - Sed vi, reparolas Tiberto, urĝu la paŝon, se vi volas alveni akurate".

Kiam li estis ĉe la supro de la teramaso, Tiberto kiu, ekde sia plej frua infanaĝo lernis la arton supren- kaj malsupren-iri, streĉas la piedojn, kaj dank'al siaj ungoj, facile grimpas sur la brakojn de la kruco. Li tie haltas ronronante, dum Renardo alvenas : "He ! Tiberto, kiel vi komprenas tion ? - Kiel necesas, kamarado. Grimpu, ni manĝos kune. - Tio estus malfacila por mi, vi devas malsupreniri. Vi scias al kiu la andujon apartenas; tio cetere estas sanktigita objekto kiun necesas disdividi antaŭ ol manĝi. Gardu la duonon kaj ĵetu al mi la alian; tiel nia asocio estos agnoskita. - Ha ! Renardo, kion vi diras nun ! Ĉu vi estas ebria ? Mi ne farus tion por cent pundoj. Jes, la andujo estas simbolo de fido, kaj estas pro tio ke oni ne povas pli bone manĝi tion ol sur iu kruco aŭ en iu preĝejo. Oni devas plene riverenci al ĝi. - Sed, diras Renardo, ne estas loko por du sur via kruco; vi scias tion, insidema kavaliro. Vi ĵuris al mi vian fidelecon, ĉu vi jam rompas vian promeson ? Kiam du amikoj estas kune, se ili ŝance trovas fortunon, ili devas dividi; faru do tie supre la dividon de la andujo kaj ĵetu mian parton; mi akceptas mian pekon. - Vere, respondas Tiberto, vi estas pli malbona ol herezulo; vi volas ke mi forĵetu tion kion oni devas teni kun la plej alta respekto ! Necesus ke la vino bone ebriigu min por tiel iri kontraŭ la fido; ĉar, fine, mi ripetas tion, tio estas andujo, afero kiun necesas gardi inter la fingroj. Aŭskultu min : se vi kredas min, ĉifoje vi abstinis ĝin; sed la unua kiun ni trovos, mi promesas tion al vi, ĝi estos via. - Almenaŭ Tiberto, lasu fali kelkajn pecetojn de tiu ĉi ! - Ne, vi estas tro glutema; he kio ! Ĉu vi ne povas atendi ke okazu alia, eble pli bona ?" Li ne diras pli kaj komencis manĝi la andujon.

Antaŭ tiu vido, la koro de Renardo ŝvelas, liaj okuloj malsekiĝas. "Mi plezure vidas, diras Tiberto, ke vi ploras pri viaj malnovaj pekoj; Dio, atestanto de via pentado, pardonos vin. - Tio vere troegas ! ekkrias Renardo ŝaŭmanta pro furiozo, vi multekoste pagis tion al mi; ĉar necesos ja ke vi malsupreniru, se nur estus por iri trinki. -

Koncerne tion, Renardo, Dio provizis tion. Li praktikis en la kruco truon kie konserviĝis la akvo de la lasta pluvo. Estas pli ol necesas por kontentigi mian soifon. - Tamen necesos ke vi malsupreniru. - Ne estos hodiaŭ. - Nu ! Estos post unu monato, unu jaro. - Ĉu vi restos por atendi min ? - Jes ! Eĉ dum sep jaroj se necesas. - Vi ĵurus tion ? - Jes ! Mi ĵuras ne forlasi ĉi tiun krucon antaŭ ol vi malsupreniru. - Ĉu vi scias ke estas damni sin esti ĵurrompanto. - Ho ! Mi ne estos tiu; kaj por pli devontigi, mi ĵuras tio per la kruco. - Vi afliktas min, Renardo; ĉar vere vi estas nemanĝinte kaj resti ĉi tie dum sep jaroj sen trovi ion por enmeti en la buŝon, tio ŝajnos al vi tre kruela. Sed ĉar vi ĵuris tion - Silentu ! - Ho ! Mi bonvolas, tio permesos al mi elfini mian bonegan manĝon".

Grandsinjoro Renardo ne longe tenis la ĵuron kiun li prononcis. Laniario, kiu elflaris siajn spurojn, eligis voĉojn, poste la sanghundoj kaj la kurĉasistoj. "Kio estas tiu bruo ? li diras kun emocio. - Atendu kaj ĉefe ne movu, diras Tiberto; tio estas agrabla melodio, antaŭsigno de la alveno de ĉarma societo kiu venas ĉi tien distriĝi per petolado. Ili serĉos meson en la ĉirkaŭaĵoj, kaj vi oportune estos tie ĉar mi kredas memori ke vi estis pastro".

Renardo ne trovis sian ĉeeston tiel necesa en la kunveno. Li leviĝis kaj kiam li estis foriranta : "Dio mia, diras al li Tiberto, kion vi estas faranta ? kaj pri via ĵuro, Renardo, ĉu vi forgesis ĝin ? Pensu ke vi ŝuldos konton pri tio ĉe la lasta Juĝo. Kial timigi vin ? Mi plej bone rilatas kun la hundoj; se necese, mi por vi donos al ili, mian garantion". Renardo ne plu aŭskultis lin, li estis for kiam la hundoj alvenis. Tamen, kurante kiel eble plej bone, li grumblis pro la perfida Tiberto kaj promesis al si persekuti lin ĝis la morto.

18a Aventuro.

*Kiel du monaĥejestroj rajdis irante al la Sinodo;
kiel ili renkontis Tiberto" kaj
kiel Tiberto eniris en la pastrejon, rajdanta sur la paradĉevalo.*

Ĉi tie, la rakonto revenigas nin al Tiberto. Kontenta pro esti akaparinta la andujon, malmulte zorgema pri la venĝaj projektoj de grandsinjoro Renardo, li komencis volupte fermi la okulojn kiam hazarde du pastroj pasis antaŭ la kruco kiu tiel bone servis lin. Ili iris al la sinodo aŭ iu episkopa kunvoko. Unu rajdis maljunan ĉevalinon, kaj la alia gvidis amblantetan paradĉevalon. La pastro kun la ĉevalino diras la unua : "Venu do, kamarado; Kian beston ni vidas tien ? - Haltu, ventkapulo kiun vi estas, diras la alia, estas belega sovaĝa kato, kaj mi estus pli feliĉa ol reĝo se mi sukcesus kapti lin. Ĝia haŭto protektus mian kapon kontraŭ la malvarmo, mi facile tajlus en ĝi grandan kaj bonan ĉapon; Dio, sciante la bezonon kiun mi havas, verŝajne sendis ĝin al mi. Tio fakte estas via opinio, ĉu ne, Turgiso ? Por nenion perdi, mi volas gardi la voston : ĝi donos al la ĉapo pli belan aspekton, ĝi falos pli agrable sur la nuko. Vidu, kiel ĝi estas longa kaj bone densa !

"Tre bone, respondas la alia, sed vi ne parolas pri la parto kiu estas atribuita al mi. - Vian parton ? He ! ĉu vi ne vidas, moŝto Turgiso ke mi bezonas la tutan felon ? Tial vi lasos ĝin al mi. - Rezigni ĝin ? Kial, bonvolu ? Ĉu mi devas samopinii, ĉu vi iam faris ion por mi ? - Plagon al vi ! diras Rufrangiero; de la avarulaĉoj, oni devas nenion atendi. Ni do dividu, mi konsentas. Sed la rimedo ? - Mi tuj diros al vi : vi deziras fari el ĝi ĉapon, ĉu ne ? Nu, ni donos por ĝin taksi, kaj vi pagos al mi la duonon de la valoro. - Ni ankoraŭ faru pli bone, diras Rufrangiero, ĉar mi volas la tutan beston : irantaj kune al la Sinodo, ni devos gastigi en hotelon kaj manĝi, mi proponas pagi dum la vojaĝo duoblan pagoparton, sed kondiĉe ke vi cedos vian parton de la kato. - Ni ne disputu, respondas Turgiso, mi konsentas tion. - Nur necesas ankoraŭ kapti la katon : kiu ĝin taskas al si ? - Ha ! Diras Turgiso, ne

estos mi, kiu devas havi ĝin kaptu ĝin ! - Mi do plenumos tion". Dirinte tion, kaj dum Turgiso iom antaŭiris, la bonan Rufrangiero alproksimiĝas la krucon kaj levas la manojn; sed, lia paradĉevalo estanta ne sufiĉe alta, li ne sukcesis atingi la predon. Li tiam decidiĝas stari rekte sur la selo, tute persvadata ke sufiĉus al li nur ekkapti; sed Tiberto starigas la harojn, svingas al li la ungojn en la vizaĝon, saltas, sovaĝe ŝiras lin, tiel bone ke Rufrangiero plej rapide deturniĝas kaj renverse falas ĉe la piedojn de sia ĉevalo. Dum la doloro de la falo kaj la mordoj de la kato senigas al li lian spiritĉeeston, Tiberto malsupreniras sur la selarkojn kiun la monaĥejestro ĵus forlasis; la timigita ĉevalo galopege ekfuĝas, alvenas hejmen tra la kampoj, kaj eniras en la korton ĉe la momento kiam la edzino de la monaĥejestro sin klinis por pluki ligneton. Ŝi ne vidis la ĉevalon kiu, incitita de granda frenezeco, venas trafi ŝin ĝuste ĉe la brusto. "Helpon ! Ŝtel ! Al la infera diablo !" Ĉar tia ŝajnis al ŝi Tiberto, kaŭranta sur la selo; sed Tiberto konis la domon, kaj kiam la ĉevalo pafiĝis al la stalo, li faris salton, kaj la plej trankvile de la mondo, li iris provi skoltadon en la subtegmento de la loĝejo.

Tamen Rufrangiero rekonsciiĝis. Li alvokas Turgisoⁿ, kaj petegas lin alkonduki al li sian paradĉevalon. Turgiso alvenas : "Ha ! Monsinjoro ĉu vi estas vundita ? - Vundita, ne; sed buĉita. Tio ne estas kato, ĝi estas demono kun kiu ni traktis. Ni estas ensorĉitaj, ni estas kondamnitaj; ĉi tiu loko estos fatala al ni. Kaj mia paradĉevalo ! Mia paradĉevalo !" Tiam li komencas sian litanion, li diras Kredon, Miserere^{on(7)}, Patronian, kaj Turgiso kantas la responsoriojn. Post esti longtempe atendinta ĉu la ĉevalo revenu, ili ankoraŭ faras krucosignon, rezignas pri la sinodo kaj revenas al la loĝejo. "He ! Kion vi havas ? diras la plendema edzino de Rufrangiero. - "Ni havas, respondas la monaĥejestro, ke la diablo batis nin, min kaj monsinjoro Turgiso de Longarbusto; ke li ensorĉis nin kaj ke, sen niaj preĝoj kaj niaj krucosignoj, li estus forpreninta nin ambaŭ".

7 Latina preĝo kiu povus esti tradukita per "Kompatu".

Noto de la eldonisto : La justeco devigas nin deklari ke la aventuro de la dividita andujo ne estas rakontita de ĉiuj historiistoj avantaĝe al Tiberto : pluraj subtenas ke Renardo denove ĉi tie trovis la plej bonan lertaĵon. Estis facile antaŭvidi ke ĉi tiuj du majstroj pri ĉiaj friponaĵoj havus siajn ekskluzivajn subtenantojn, kaj ke la senpartia juĝisto ĉiam malfacile donus avantaĝon al unu el la du super la alia. Mi volas ĉi tie esti nur la raportanto. Tiuj do kiuj priskribas al ni Tiberto" kiel viktimo de Renardo raportas la rakonton pri la andujo kiel vi estas vidonta.

19a Aventuro.

Kiel Ruselo kaj Tiberto, Blanka kaj Fremonto ludis al marelo, kaj kiel Renardo manĝis la andujon.

Iam Renardo atingis, fine de grandaj novalaj terenoj, kampon antaŭnelonge rikoltitan kiu ŝajnis al li tre taŭga por tie dormeti, milde kuŝinta en fojnamaso. Komencis tagiĝi kiam li vekiĝis. Je mallonga distanco, li ekvidis ĉe la rando de la pado krucon ombratan de abio; oni starigis ĝin por memorigi pri malnova murdo. La gepatroj de la viktimo pie fosis la tombon de tiu kiun ili volis honori, kaj sur la tero kiu kovris la korpon, ili kuŝis grandan ĉizitan ŝtonon, kun kruco metita ĉe la kapo kaj abio ĉe la piedo. La paŝtistoj de la lando ofte haltis kaj kuniĝis en tiu loko, kaj eĉ, per la pinto de siaj tranĉiloj, ili desegnis sur la ŝtono marelon.

De la loko kie li estis, Renardo povis facile distingi ĉirkaŭ la ludo kvar ulojn : estis Fremonto la formiko, Blanka la ermeno, Tiberto la kato kaj Ruselo la sciuro. Ĉiuj kvar kune vojaĝantaj survoje trovis perfekte ŝnurligitan andujon. Kiu perdis ĝin kaj de kie ĝi venis ? Ili ne zorgis pri tio, sed ja pri scii kiel ili dividus ĝin. Ĝi estis ŝvela ĉe la mezo, maldika kaj gracila ĉe la ekstremaĵoj; sekve, grava embaraso por doni tiom al unu kiom al ĉiu el la aliaj. Post longaj intertraktoj, ili ekrigardis sur la tomban ŝtonon, kaj ili konsentis perludi sian andujon per la marelo.

Ili sin lokis Blanka kaj Fremonto unuflanke, Ruselo kaj Tiberto aliflanke; tiuj du lastaj proksimaj por reciproke sin kontroli kaj antaŭeviti friponadon de iu aŭ de alia flanko. Ĉar ili estis tute absorbita de la ludo, kaj ĉar oni ne jam povis diri kiu gajnus, jen Baldueno, la azeno, trairante la padon kun sia ŝarĝo, turnis la kapon al ili kaj brue kriis al ili : "Jen Renardo, bonaj homoj; savu vin !" Tuj oni vidintus la ludantojn forkuri; Tiberto, pli lerta, prenas sian tempon, metas la piedon sur la andujon, kaj grimpas sur la kruco kun ĝi. La afero daŭris momenteton; venu nun tiu kiu volos, Tiberto timas nek reĝon, nek grafon, nek vulpon.

Renardo efektive alvenis. Lia unua ekrigardo estis por Tiberto, kiu kun senzorga mieno sin deturnas, kaj kun la vosto streĉita, malrapideme prezentas al li la dorson. "He ! Mi ne eraras; estas vi, kara Tiberto mia !" La alia retoturnanta sur si mem : "Jes. Kaj de kie vi venas, eta Renardo mia ? - El la najbara arbaro, mia kuzo. Sed ĉu oni povus scii kial vi grimpis tiom alte ? - Por pli granda sekureco. - Ĉu vi do timas iun ? - Sed, jes. - De kiu ? - De vi, ekzemple. - La kialon ? - La kialo estas la franda peco kiun mi havas sub la mano, kaj kiun mi ne konsolus min perdi ĝin. - Kiu do estas tiu franda peco ? Bona kaptaĵo ? - Jes. - Kiu ? Ĉu estas malpermesata scii tion ? - Ne, sed pli ĝuste preni ĝin : ĝi estas andujo. - Ha ! Vi estas feliĉa sukcesi trovi tian viandon. - Kion tio gravas al vi, ĉar vi ne devas gustumi ĝin ? Sen vi, ni estas kvar por la disdivido. - Mi tamen bone ŝatus fariĝi la kvina,. - Mia eta Renardo, por tio, vi alvenas iom tro malfrue".

Renardo silentas, pli incitita, pli malkvieta ol oni povus diri. Li lekas siajn lipharojn, gratas per la piedoj, stariĝas, kliniĝas, staras malsupre de la kruco, eligas krietojn de ĉagreno kaj de deziro. La andujo estas tie, antaŭ liaj okuloj, jam atakita de la maldikaj kaj bonaj dentoj de la kato; ĉiu ekrigardo aldonas al siaj deziroj, al siaj sopiradoj. Fine li imagas neatenditan elturniĝon : li ekĵetas sin al la alia fino de la tombo, antaŭenŝovas la muzelon en la herbo, serĉas, ŝajnas traserĉi de iu flanko al alia, kun la okulo ardanta, la korpo vigle malkvieta. "Ĉu vi vidis, Tiberto ? li krias. - Kion ? eligas la alia kun la dorso turnita; nu, kion vi malkovris ? - Per Dio, muson. - Muson !" Je ĉi tiu nomo de la aĵo kiun li plej ŝatas en la mondo, Tibero faligas ĉion en forgeson, eĉ la andujon; li vigle turnas sin al Renardo, kaj en tiu movo li iom antaŭenigas sian kruron, la andujo falas. Renardo eksaltas, kaptas ĝin kaj dum li memkontente etendas ĝin sur la ŝtonon, Tiberto de la supro de la kruco sentas maldolĉan funebbron. "Renardo, vi perfidis min; ve al tiu kiu interparolas kun vi. - Kial do vi parolas al mi ? - Jes, malbeno al tiu kiu fidis al vi ! - Kaj al tiu kiu volos nenion dividi kun vi ? Ĉu vi nur rigardis min, kiam mi petis al vi malgrandan parton de ĉi tiu vere bonega andujo ? Mi nun havas ĝin; de ĝi mi proponas al vi la ŝnureton. Adiaŭ bo-kuzo, kara Tiberto mia : vere, mi ne havas rankoron. Ĝis revido !"

Noto de la eldonisto : La rakonto parolas pri alia renkonto inter Tiberto kaj Renardo, kiu ne tre ĝuste akordiĝas kun la tri aferoj de la kaptilo, la andujo kaj la du monaĥejestroj. Ŝajne estas nur falsaĵo pri la okazaĵoj kies la farmejo de Konstanto Delanuksoj estis la scenejo. Ni lasas al la leganto la liberecon atribui al ĝi sian veran lokon en la tuto de la agoj kaj faroj de grandsinjoro Renardo.

20a Aventuro.

*Pri la rajdado de Renardo kaj Tiberto en la domon de kampulo,
kaj kiel Tiberto tie devis garantie lasi sian voston.*

Dum bela printempa tago, ĉirkaŭ la ĉieliro, grandsinjoro Renardo, eliranta el Mopertui tre senfortigita pro longa malabundeco, renkontis Tiberto" al kiu li unue alparolis. "Bela amiko mia, ĉu mi povas scii kio venigis vin ĉi tien ? - Certe ja; mi iris viziti kampulon kies la ĉirkaŭbaritejo troviĝas je mallonga distanco. La kampulo estas edzigita, lia edzino disponas pri ĉio; ŝi enfermis en sia pankesto grandan poton da lakto, mi volas scii kiun guston ĝi havas. Ni iru kune, siro Renardo, mi montros al vi kiel oni povas eniri en la domon; sed mi metas kondiĉon al tio, estas ke vi promesos esti por mi bona kaj lojala kompanio kaj enveni nur post mi. Tie estas multaj kaponoj kaj kokinoj, mi nenion postulas. - Bone ! respondas Renardo, mi devigas min sekvi vin kaj postuli nenion antaŭ vi pri tio kio povus taŭgi por ni ambaŭ. Ili tiam rapidigas la paŝojn. Alvenintaj antaŭ la heĝo, ili troviĝas en la ĉeesto de rompita paliso kiu jam pli ol unu fojon permesis la pasadon al Tiberto; baldaŭ ili estis en la ĉirkaŭbaritejo. Renardo jam flaris la kokejon kaj sin direktis tiuflanken, sed Tiberto haltigante lin : "Oni sukcesas nur per lerteco kaj singardeco : la kampulo dormas, atako de la kokejo povas veki lin, kaj de tiam necesus retiriĝi. Ni iru al la pankesto, ni sendanĝere malfermos ĝin, la kaponoj postvenos". Ĉi tiu rezonado ne persvadis Renardo". "Aŭskultu do min, daŭrigas Tiberto, se vi unue irus al la kokinoj, la hundoj povus senti vin, postkuri vin kaj mordi vin : mi havus ĉagrenon ĉar tio malutilus al miaj intereso. Ni pli bone faru : ni unue iru al lakto, restos el ĝi por vi, mi certigas vin. - Mi promesis sekvi vin ! respondas Renardo kiun la lakto ja iom tenti, ni do iru al la pankesto".

Tiberto montras la vojon, eniras en la domon, kaj indikante la grandan kofron al sia kunulo : "Levu la kovrilon, amiko Renardo, por ke mi povu unue eniri : vi scias niajn konvenciojn. Renardo faras tion kion oni diras al li; Tiberto pasas la kapon, la korpon, la voston; li

ekklopodas kaj diligente langotrinkas la lakton. Renardo subtenis la kovrilon, sed la vido de la lakto ĝemigis kaj tremetis lin pro avido. La lango brulis al li, vidante Tiberto" flari kun tiom da ĝuo. "Ha ! Tiberto, vi sentas vin bone tie, ŝajnas al mi; vi havas ĉion kion via koro volis. Nun estu bona kamardo; revenu, ĉar per sankta Denizo, mi estas laca subteni ĉi tiun pezan kovrilon, kaj mi ne havos forton por daŭrigi. "Revenu, kara Tiberto mia, bona Tiberto mia !..."

La alia, absorbata de sia lakto, ne perdis tempon por respondi. Vane Renardo amasigis la dolĉajn urĝajn petojn : "Bela amiko, rapidu, per Dio ! Mi ege suferas; mi baldaŭ lasos refali la kovrilon". Ĉiuj paroloj estis senutilaj, Tiberto glutis tiom ke li havis tion ĝis la lipharoj, kaj multe pli. Aŭ intence aŭ neglekteme, li renversis la poton kaj disverŝis la tutan lakton kiun li ne kapablis trinki. "Ha ! diris Renardo furioze, jen kiu estas malbona, Tiberto. Tio estas pli malbona ol se vi ungis min, mordis min, min via sinjoro. Sed fine ĉu vi eliros ? - Dio mia ! Kamarado, atendu iomete. - Mi ne plu atendas unu sekundon. Tiam Tiberto sin decidis fari salton al la aperturo; sed Renardo, ĝuste kiam li vidas pasi la kapon kaj la korpon, retiriĝas kaj la vosto de kompatinda Tiberto restas tiel forte kaptita ke necesis lasi duonon el ĝi kiel punon. La doloro tiam elŝiras el li fortegan vekrion; li restis apud la pankesto, senmova kaj kun flagraj okuloj. "Kiel vi sentas vin, bona Tiberto mia ? tiam diras al li Renardo per sia plej karesa voĉo. - Ha ! Malbona kamarado, vi servis al mi de via ordinara plado; vi lasigis al mi la plej karan parton de mi mem. - Ĉu vi povas akuzi min pri malfeliĉo kiu estas via laboro ? Estas vi kiu prenante tro fortan impulson fermis la pankeston, sen tio ke eblis restigi ĝin malfermitan. Sed finfine, pro kio vi plendas ? Vi devus esti plena de ĝojo pro havi kelkajn colojn ($1\text{colo} = 2,54\text{cm}$) de vosto malpli; vi estos pli malpeza, malpli embarasita. Pensu pri la avantaĝo havi nenion pli por treni post vi, kiu haltigas vin. Vi nenion faris per tiu vosto; vere ! mi bonvolus ke simila afero okazus al mi.

Grandsinjoro Renardo, grandsinjoro Renardo, diras la kompatinda Tiberto, vi scias mokpiki pli bone ol neniu; sed ni lasu tion kaj, de ĉi tiu momento, ni ĉesigu la societon kiun ni faris. Tiel bone, sen mia vosto mi povas provi grandajn entreprenojn. Mi kredas aŭdi bruon

proksime al ni, la hundoj ŝajne estas vekintaj; lasu la kokinojn tie, kaj ĉiaokaze mi forlasas vin al ili, ni ne estas faritaj por kune iri longtempe.

"Nu ! bone, diras Renardo; mi konsentas, ni havas nenion por gajni unu kun la alia. Mi redonas al vi vian fidelecon, kaj mi ne ŝuldos al vi soldojn. Adiaŭ ! Ni povos revidi unu la alian aliloken".

"Jes ? diras Tiberto forlasante lin, ni revidos unu la alian; sed ĉe la kortumo de la Reĝo".

21a Aventuro.

Pri la alveno de Renardo ĉe Damo Hersento dum la foresto de Isengrino, kaj kiel la milito komencis inter la du baronoj.

Post kelka tempo, Renardo troviĝis antaŭ amaso da interplektitaj branĉoj kiuj formis heĝon kaj kaŝis la enirejon de subteraĵo. Li transpasis la heĝon, malkovris la aperturon kaj, aŭ pro movado de scivolemo, aŭ kun la espero trovi en ĝi ion por preni, li malsupreniris kaj sen malfacilaĵo rekonis la loĝejon de sia bo-onklo Isengrino. La mastro estis foririnta, damo Hersento, antaŭnelonge liberigita de akuŝo, mamnutris kaj lekis siajn lupojn. Ĉar ŝi demetis sian kufon, la suno trafis ŝin sur la vizaĝo kiam Renardo malfermis la pordon; tio faris ŝin rigardi kiu venis viziti ŝin. Por Renardo, la timo de malbona akcepto decidis lin resti senmove malantaŭ la pordo; sed Hersento tuj rekonis lin per lia rufa felo. "Ha ! ŝi diras ridante, estas do tiel, grandsinjoro Renardo, kiel vi venas spioni la homojn ?" La alia silentas kaj ne faras geston; sendube li kalkulis kun la mallumon de la ĉambro por erarigi la damon. Hersento duafoje alvokas lin per lia nomo kaj eĉ signas al li per la eta fingro por alproksimiĝi. "Mi havus multajn riproĉojn por diri al vi, grandsinjoro Renardo; sed mi vidas ke vi volas nenion fari por esti agrabla al mi. Vere neniam oni traktis sian bo-onklinon tiel malbone kiel vi faras". Ĉi tiuj paroloj diritaj laŭ karesa tono havigis fidon al Renardo. "Sinjorino, li diras, mi atestigas Dion, ne estas memvole ke mi kredis devi eviti viziti vin dum viaj akuŝoj; tute kontraŭe, sed Isengrino, vi scias tion, instigas min al disputo kaj senĉese spionas min tra la tuta lando; kial li tiel sentas abomenon al mi, mi ne scias tion, neniam donante al li la plej malgrandan okazon. Ĉu li ne asertas ke mi amas vin kaj ke mi serĉas anstataŭi lin ĉi tie ? Ne estas unu el viaj najbaroj, kiuj ne aŭdis lin rakonti ke vi havas amon al mi, kaj ke li venĝos pro tio iun tagon aŭ alian. Kaj tamen vi scias ĉu mi iam diris al vi unu solan vorton kiu ne taŭgis. Por kio povus utili petegi amon al granda damo kiu ne mankus ridi pri tio malfavore al ni ?"

Ĉi tiuj paroloj, Hersento aŭskultas ilin kun kolero miksa de ĉagreno. "Vere, oni parolas pri mi ĉe niaj najbaroj ! La kampulo diras : Tiu alvokas sian honton, kiu pensas venĝi ĝin. Mi povas laŭte diri tion; ĝis nun mi ne havis malbonan penson, sed ĉar Isengrino akuzas min, mi volas pravigi lin; kaj de hodiaŭ, Renardo, mi volas ke vi estu mia amiko. Ĉiam kalkulu kun mia bona akcepto, mi sincere promesas esti tute al vi". Renardo, ĉarmita de tiaj bonaj paroloj, ne faris ilin ripeti al si. Li alproksimiĝis al damo Hersento, ĉirkaŭprenis, kaj la novaj geamantoj faris interŝanĝon de plej teneraj promesoj. Sed la longaj amdiroj ne plaĉis al grandsinjoro Renardo; li baldaŭ parolis pri disiĝo kaj pri neceso antaŭpensi la revenon de Isengrino. Antaŭ ol eliri el la domo, li zorgas alpaŝi al la lupoj kaj malpurigi ilin per sia fekaĵo. Ĉiujn proviantojn kiujn li renkontas, li ekprenas ilin, poste duafoje revenas al la lupoj kiujn li batas kvazaŭ li volis silentigi ilin, sed reale por pli bone devigi ilin paroli. Li traktas ilin kiel trovitulojn, sen timi la honton kiu devis efiki sur Hersento". La damo, ekde kiam li foriris, prenas la lupojn, viŝas iliajn larmojn, flatas ilin kaj karesas ilin. "Miaj infanoj, ŝi diras al ili, almenaŭ vi ne diros al la patro ke Renardo venis kaj ke li malbone traktis vin. - Kiel ! ili respondas, ne plendi pri la malbona rufulo kiun vi akceptis kaj kiu malhonoras nian karan patron ? Dio gardu nin ! Necesas ke justeco sekvu". Renardo, ĉe la pordo, aŭdis ion pri la kverelo, sed li ne maltrankviliĝis kaj reiris al la vojo.

Tamen Isengrino revenas al la loĝejo. Li faris bonan ĉasadon, li enirante demetas multajn manĝaĵojn; poste li iras al siaj infanoj por kisi ilin. La lupoj konkure plendas pri la insultoj kaj vundoj kiujn ili ricevis : "Renardo, la malbona rufulo, malpurigis, batis, malkaresis nin; li diris ke ni estis trovitaj kaj forlasitaj infanoj; li eĉ aldonis kontraŭ vi insultojn kiujn ni ne komprenis".

Imagu nun la surprizon kaj furiozon de Isengrino ! Li kriaĉas, kriegas, ne plu regas sin. "Ha ! li diras, ĉu estas mi kiun oni devis tiel trakti ! Malbona kaj malhonora edzino, ĉu estis por doni azilon al mia malamiko ke mi ĉiam bone nutris vin, riĉe zorgis pri vi ? Ĉu estis por vidi min preferi stinkan rufulon tiel kiel Renardo ? Per la okuloj de Dio ! Vi ne troigos alte tiun ofendegon; mi malpermesas al vi mian

kuŝejon; mi forpelas vin de hodiaŭ el la domo, krom se vi faru ĉion kion mi diros".

Ne estis la momento por respondi per la sama tono; Hersento komprenis tion. "Vi koleras, Isengrino, ŝi diras, kaj kolero estas miskonsilo; mi petas la provon de la ĵuro kaj la juĝo. Bruligu min aŭ pendigu min se mi ne eliras pravigita antaŭ viaj okuloj kaj antaŭ ĉiuj. Cetere, ordonu, mi plenumos ĉion kio plaĉos al vi ordoni".

Ĉi tiuj vortoj havis la povon restarigi iom da kvieto en la koro de Isengrino. Li rigardis siajn infanojn, faris paŝon al Hersento kaj fine kisis ŝin, post kiam ŝi ripetis la promeson redoni al Renardo ĉiun eblan malbonon, kaj ĉiufoje kiam la okazo montriĝus.

22a Aventuro.

Kiel Renardo havis timigan sonĝon kiu estis klarigita de Hermelina, kaj kiel li tromplogis la Kornikon.

Renardo, post kelka tempo de tiam, kviete ripozis en sia kastelo de Mopertui, apud sia edzino Hermelina. Ĉirkaŭ la mateno, li havis strangan sonĝon (*kiu bedaŭrinde ege revokas tiun de Ŝanteklero*). Li kredis esti sola apud iu arbaro; li surhavis peltaĵon el ruĝa fusteno truitan ĉe pluraj lokoj kaj borderitan ĉe la kolumo de tute blanka garnaĵo. Ĉi tiun garnaĵon, li penegre transpasis ĝin, ĝi tiel multe ĉirkaŭpremis lin ĉe la kolo ke ne necesis multe por ke li sufokiĝu.

Tute timigita, Renardo subite ekvekiĝas kaj serĉas tion kion tia sonĝo povas signifi. Hermelina siaflanke malfermas la okulojn kaj ricevas la konfidencon pri la vizio kiun ni ĵus raportis.

"Renardo, ŝi malgaje diras al li, via sonĝo maltrankviligas min kaj donas al mi fortajn antaŭtimojn pri vi. Estas certe ja la anonco de grandaj malagrablaĵoj kaj doloroj. La ruĝa dise truhava fusteno aŭguras nenion bonan, kaj tiu longa blanka bordero estas la duobla vico da dentoj kiu devas rompi al vi la ostojn. Mi ankaŭ ne ŝatas tiun mallarĝan enireblecon kiun vi ne povis trapasi, kaj mi konkludas pri tio, ke vi baldaŭ troviĝos malkomforta. Feliĉe mi konas sorĉon kies la efiko subtenos vin dum la danĝeroj kiuj minacas vin. La tago kiam oni uzas ĝin, oni povas nek morti nek perdi unu membron. Jen ĝi : Kiam vi eliras el azilo, tra la fosaĵo, tra la fenestro aŭ tra la pordo, necesas desegni tri krucojn sur la sojlo de la fosaĵo, de la fenestro aŭ de la pordo : oni poste certas reveni sana kaj sekura".

Renardo, revigligita de ĉi tiuj bonaj paroloj, ellitiĝas, malfermas la pordon kaj faras la sorĉon kiun Hermelina ĵus instruis al li. Li grimpas deklivon en la arbaro, kaj de tie ne malfruas distingi kornikon kiu, post esti mergiĝinta en klaran akvon, riparis per sia beko la malordon de siaj plumoj. Renardo, por altiri ŝian atenton, kuŝiĝas senmove sur la dorso, kun la okuloj fermitaj, kaj la lango elŝovita. Li esperas ke la birdo, tuj kiam li vidos lin, kredos povi

deflugi sur lin kaj volos ekkapti tiun frandan langon. La korniko fakte ĵetas la okulojn tien kaj tien, poste haltigas ilin sur Renardo kiun ŝi supozas esti antaŭnelonge viktimo de murdo. La ruĝa kaj malseka lango vekas sian deziregon; ŝi svingas siajnflugilojn, malsupreniras vertikale al la supozata kadavro; sed kiam ŝi estas dononta la unuan bekpikon, Renardo sturmas, haltigas ŝin per laflugiloj, kaj sen alia ceremonio faras unuan matenmanĝon per la korpo de la nesingarda birdo.

23a Aventuro.

*Kiel Isengrino volis venĝi kontraŭ Renardo,
kaj kiel li bedaŭris tion.*

Tio estis bone komenci la tagon. Renardo poste ĉirkaŭiras la deklivaĵon, kaj malsupreniras al la marĉo kiu, ĉe iu flanko, finis ĝin. Li tie sin banas, kaj donas al siaj membroj novan lertecon. Kiam li revenis sur la teron, li vidis alveni al li Sinjoron Isengrinoⁿ kiu, ekde la aventuro rakontita de siaj lupidoj, ne havis tre teneran amikecon por li. "Ha ! Do, finfine jen vi ! diras Isengrino furioze ekrigardante lin, vi tuj, mi esperas, pagos ĉion kio estas ŝuldata al mi. Mi scias kiel vi transpaŝis la sojlon de mia domo, kiel vi malhonoris mian familion, ofendegis, malpurigis, batis miajn infanojn. Aŭskultu tion kion mi decidas fari. Vi asertis vin mian nevon, vi ŝajnigis ami min kiel mi mem havis la malsaĝecon ami vin; nu ! mi loĝigos vin en malliberejon kiu malhelpos vin ekde tiam trompi kiun ajn en la mondo. Vi estos trankvila viaflanke, sen bezoni starigi kaptilojn, embuskojn aŭ insidon, sonorigi la sonorilturon, ĵeti ŝtonojn aŭ ludi ĵetmaŝinojn. Vi ne plu timos la venĝon de reĝo, princo, aŭ landestro pli potenca ol vi. Kaj tiu malliberejo, vi konas ĝin, mi supozas".

Renardo, al kiu ĉiu eskaprimedo estis malebligita, sentas ke li ne povas eviti la sorton per kiu oni minacas lin nur humiliĝante antaŭ sia danĝera malamiko. Li genue falas, kun la vosto inter la kruroj, kaj per pentema kaj peteganta tono : "Onklo, li diras, kutimas en kortumo de baronoj proponi kaj preni la monpunon laŭ tio kio oni malbonagis. Vi pensas ke mi malbonagis, do diru kiun monpunon vi postulas de mi, kaj Dio helpanta, mi kontentigos vin. - Per Dio la patro ! respondas Isengrino, la monpuno kiun mi petas, estas la loko, kiun mi aranĝas por vi en mian ventron. Mi deziregas aldoni vian karnon al mia, miksi mian sangon kun via, kunigi per tiu rimedo la ruzojn de via menso kun la nobleco de mia kuraĝo. Nu ! Ne lasu vin petegi, bo-nevo mia; ĉi tiu bela vico da dentoj estas preta, kiel vi vidas, ricevi vin. Vi vere uzas tro da ceremonio".

Dirante tion, Isengrino ĵetis sin al Renardo, retenis lin senmove sub siaj piedoj, batis lin, mordis kaj taŭzis lin kiel neniam tiel estis kaptito sur Saracena grundo. Li vane petas indulgon, alvokas la kompaton de sia bona onklo, Isengrino kaptas lin ĉe la nuko, ŝiras al li la haŭton kaj fine reduktas lin nur eligi obtuzajn ĝemadojn.

Iu afero antaŭgardis grandsinjoron Renardoⁿ, lia karno estis tute ne, eĉ por Isengrino, franda peco. Post esti longtempe martiriginta lin : "Mi hezitas, li diras, pri la speco de morto kiun mi donos al vi. Ĉu mi ekbruligus ardan fajron por rosti vin ? Poste mi manĝus vin; ne, vi estus tro rapide mortinta". Kaj tamen, vidante Renardoⁿ atendi, kun larĝe malfermitan faŭkon, la momenton spiri la lastan spiron, Isengrino fermas al li la gorĝon per sia piedo, kaj ne multe mankis ke li premsufoku lin.

Sed ĉe la momento mem, urĝis, jen la kompato kiu trovas lokon en la koro de Isengrino. Li memoras la malnovajn ligojn de amikeco, la bonajn lertaĵojn kiujn ili ofte faris kune, la ludojn, la distraĵojn, la agrablaĵojn de ilia unua junaĝo. Iom post iom liaj okuloj nebuliĝas kaj fine pleniĝas per larmoj. "Ha ! Dio mia, jen li mortinta ! Kaj kion mi faris ? Mi kapablis bati mian malnovan amikon, mian plej bonan konsilanton ! Malbenita kolero ! Tiuj vortoj alvenas al la mortiĝantaj oreloj de Renardo, li faras nerimarkeblan movon. "Kio estas ? diras Isengrino, mi kredas ke li moviĝis : jes, liaj vejnoj ankoraŭ batas, kvankam oni apenaŭ sentas lian spiradon. - Jes, mi vivas, diras Renardo, sed vi faris grandan krimon, traktante kiel via plej grandan malamikon, la kompatindan nevon kiu tiom amis vin. Vi estas forta kaj vi premis la malfortan, la sendefendan senkulpulon". Isengrino restis longe sen respondi, kaj kiel turmentata de veraj rimorsoj, dum sia nevo reakiris fortojn kaj kuraĝon.

"Jen, diras unue Renardo, anstataŭ maltrakti min sen kialo, rigardu kaj profitu la aventuron, kiu venas sin oferi al ni".

24a Aventuro.

*Kiel Renardo tromplogis la kampulon,
kaj kiel Isengrino kunprenis la lardon kiun li ne volis dividi.*

Estis kampulo kiu trairis la ebenaĵon, kliniĝanta sub ŝarĝo de peklita porkaĵo kiun li alportis hejmen. "Kiu malhelpus vin, bo-onklo, haltigi tiun lardon kaj kontentigi vian malsaton per ĝi ? Ĝi pli bone valoras ol mia sengrasa, malmola lumbaĵo". Isengrino samopiniis. "Jen, onklo, lasu al mi la plezuron akirigi al vi la posedo de ĝi. Se vi ne havas ĝin, mi submetas min suferi ĉion sen plendi. Vi havos la lardon, kaj se restos el ĝi al vi post esti manĝinta ĝin ĝissate, ni vende proponos ĝin; ne estas en la mondo pli bona vendisto ol mi. Ni poste dividos ĝian prezon : al vi du trionojn, al mi la trian; estas la regulo".

"Per sankta Klara, diras Isengrino, mi ne havas inklinon al la renkonto de kampuloj. Ankoraŭ hieraŭ, rapide trapasante tra vilaĝo, unu el ili donis al mi baton de klabo kiu faligis min grunden; mi ne kapablis venĝi min, kaj mi hontegas pri tio. - Do ne miksu vin, respondas Renardo, mi povas sukcese direkti la aferon, kaj vi pendigos min kun la ŝnuro ĉe la kolo, se post momento vi havos la lardon. - Bonege, do ! diras Isengrino, mi ja volas juĝi pri tio kion vi kapablas fari".

Li unue sin trenas kun sufiĉe da peno, la batoj kiujn li ricevis forigintaj de li lian naturan lertecon; sed ade laŭirinte la arbaron pene tra kovrita pado, li iom antaŭas la kampulon, kaj uzante unu el siaj preferataj lertaĵoj, li sin etendas laŭlonge de la vojo, kiel li sendube farintus en la arbaro, por resaniĝi de la krudaj travivaĵoj kiujn lia kamarado ĵus suferigi al li.

La kampulo vidante Renardoⁿ treni la lumbojn, kaj tiel fali sur la vojo, kredis lin morte vundita, kaj pensis ke estus facile kapti lin. Li do antaŭeniras kaj sen demeti sian portaĵon, kun la mano metinta sur la irbastono kiu servis al li kiel apogilo, li kliniĝas kvazaŭ por levi Renardoⁿ de la tero. Ĉi tiu faras salteton flanken : la kampulo ne

senkuraĝiĝas, li faligas la irbastonon sur lian lumbaĵon, kaj Renardo kies la doloroj renoviĝas, eligas ekkrion kaj malproksimiĝas. "Ĉio ĉi, diras la kampulo, ne malebligos min kudri vian felon sur mian mantelon". Sed inter fari kaj diri, estas ofte multe por diri.

La kampulo ne postkuris dek paŝojn al Renardo ke li sentas sin deviganta demeti sian ŝarĝon de lardo, por pli rapide kuri. Li do demetas ĝin teren, kaj nur pensis kunigi kun Renardo kies haŭto, li pensis, devis redoni al li la prezon de la porkaĵo kiun li ĵus aĉetis; sen kalkuli kun la kolfelo kiun li gardus por aldoni al la kolumo de sia mantelo. Isengrino sekvis pro scivolo kaj sen tro da espero, la movadojn de Renardo kaj de la kampulo; sed kiam li vidis ĉi tiun forlasi lian lardon, li rapidigis mem la paŝojn, li malsupreniris en la ebenaĵon, forportis la valoran ŝarĝon, kaj revenis al kie li foriris.

Pri la kampulo, li kredis sin certan kapti la vulpon kiam li vidis la lupon reiri al la arbaro kun sia lardo. Renardo, siaflanke, nenion perdis pri la movadoj de Isengrino, kaj tuj ĉesanta dolore rampi, li foriris kiel sagon de arbalesto, lasante la kampulon inter la besto, kiun li volis kapti kaj la lardon kiun estis forprenita de li, ŝirantan al si la harojn, malbenantan Isengrinoⁿ, Renardoⁿ kaj la avidecon kiu kondukis lin havi nek la eskudon nek la groŝon. Tiel estas kiel li revenis hejmen, sufiĉe persvadinta ke li estis sorĉita.

Ni nun lasu la kampulon, kaj ni reiru al niaj du amikoj. Isengrino, ĉe la alveno de Renardo, estis jam tutsata : la reston de la lardo, li jam kovris ĝin per foliamaso, por pli bone gardi ĝin en malvarma loko. Proksime de tie, estis la vimeno per kiu la kampulo ligis ĝin por porti ĝin pli facile.

"Siro Isengrino, diras Renardo, vi estas dononta al mi, mi esperas, la parton kiu apartenas al mi en la lardo ? - Amiko, vi volas ridi, diras la lupo, certe vi devas senti vin tre feliĉa pro esti eskapinta el mia rankoro. Tamen, mi permesas al vi preni la vimenon, faru kun ĝi tion kio plaĉos al vi; sed petu nenion pli".

Renardo komprenis ke, kun karamado kun la forto de Isengrino, ne estis por postuli. "Se iu, li diras, meritas la vimenon, certe ne estas mi. Mi vidas tion, oni ne havas grandan profiton por atendi de via kompanio, permesu al mi foriri. Cetere mi havas la konsciencon

Ŝarĝita de kelkaj gravaj pekoj, kaj mia intenco estus, por ricevi la absolvon, pilgrimi al Sankta. Jakobo. - Bone, diras Isengrino, mi ne retenas vin; mi rekomendas vin al Dio. - Kaj vi al diablo ! reparolas duonlaŭte Renardo, almenaŭ, ne estas mia preĝo kiu liberigos vin de ĝi".

25a Aventuro.

Kiel Renardo iĝinta pilgrimanto renkontas grandsinjoron Froberto", la grilon, tiu kiu diris siajn horpreĝojn, kaj kiel li ne sukcesis decidi lin doni al li sian libron.

Do jen li en ŝajno de pilgrimanto, iranta tra montoj kaj valoj proksime de la arbarego, kutima restadejo de Isengrino. Iun matenon, li haltas antaŭ vilaĝo, eniras en la ĉirkaŭbaritejon de la pastro, kaj tie trovas abundon da freŝaj kaj peklitaj karnoj. "Mi pravis, li diras al si, veni ĉi tie, sed ni nin gardu; ofte estas malbonaj streĉaj kaptiloj". Zorgeme traserĉante ĉien kaj atente aŭskultante, li aŭdas kelkan bruon kaj tuj tremas esti denunciata. Estis Froberto, la grilo, kiu gaje disvolvis sian kutiman kanton ĉe la aperturo de la forno. Ekvidante Renardo", li silentis. "Ha ! vere, diras Renardo kiam li rekonis lin kaj post esti antaŭenirinta siajn piedojn, estas nur la klerikoj por bone kanti. Daŭrigu vian psalmaron, grandsinjoro Froberto, mi ankaŭ volas fari de ĝi mian profiton. - Per Dio ! Respondas Froberto, vi apenaŭ havas la mienon de pentema pilgrimulo, kaj mi sufiĉe scivolas vidi kie estas tubero en la afero". Li tiam trotetas per rapidaj paŝoj al Renardo kiu tuj ĵetas al li la manikon de sia pelerino. Li kredis teni lin kaj baldaŭ pasigi lin tra sia glutejo; sed li mistrafis la okazon, kaj Froberto ŝance ektrovis eliron tra la kovraĵo : "Ha ! Renardo ! Mi rekonis vin, li diras, vi ne ŝanĝis vian naturon ŝanĝante la vestojn. Ili estas pilgrimuloj de la diablo, tiuj kiuj elatendas la homojn sur la vojo; sed feliĉe Dio venis helpe al mi. - Grandsinjoro Froberto, respondis Renardo, ĉu vi ne iom tro trinkis ? Mi elatendi vin ! Ĉu vi ne vidas ke mi volis nur vian libron ? Se mi sukcesis ekkapti ĝin, mi certe sciiĝus pri belaj kantikoj. Mi tre bezonis kanti tion, ĉar mi malbonfartas : la pilgrimadoj elĉerpis min, mi ne plu havas longan tempon por vivi, kaj mi ne kuraĝas pensi sen timego pri ĉiuj pekoj kiujn mi faris. Eĉ se mi havus konfesprenanton ! Ĉu plaĉus al vi, grandsinjoro Froberto, servi kiel tiu por mi ? Ĉar vi scias tion, mi ne devas esperi renkonti ĉi tie la

pastron kiun mi venis viziti; li partoprenas, oni diris al mi, en la sinodo".

"Paciencu ! respondis Froberto, la pastro ne povas longe malfrui reveni". En la sama momento, oni aŭdas la bojadojn de pluraj laniarioj akompanataj de ĉasoservistoj, de arbalestistoj kaj de ĉasistoj. Renardo tuj ekkuras; sed li estas ekvidata, la ĉaservistoj malligas siajn hundojn. La vulpo ! La vulpo ! Ili krias konkure. "Hola ! Taboso, Rigoso, Klaramboso; he ! Tribuleto ! He ! Plezuro !" Sed Renardo, siaflanke, ne endormiĝis; pro timo esti ĉirkaŭita, li revenas, kaŭriĝas sur la supro de la forno, restas tie kaŝita ĝis kiam la hundaro estu malproksimiĝinta, ĉiam kredante sin proksimigi al li. Nu tiu hundaro samtempe vekis Isengrino", kies spurojn ĝi rekonis. Oni lin persekutas, oni lin atingas, oni lin grandapetite demordas. Li kuraĝe sin defendas; pli ol unu hundo estas knokaŭtitaj kun la intestoj ŝiritaj. De supre de sia forno, Renardo faris sin arbitracian juĝiston. "Ha ! Bo-onklo, li kriis, jen la profito de la lardo kiun vi rifuzis dividi. Vi estus malpli peza kaj pli vigla se vi estintus malpli glutema". Sed tiuj vortoj, anstataŭ malkuraĝigi Isengrino", duobligas sian viklecon. Li strangulas la unuan hundon per iu dentobato; la aliaj, pli malpli demorditaj, sangokovritaj, fine rezignas la partion.

Isengrino pene revenas al sia loĝejo, sed lia plej granda doloro estas la ĉagreno ne esti liberigita de Renardo, kaj ne esti strangulinta lin kiam la okazo prezentiĝis.

Li estas ne ankoraŭ libera, kaj la ĉieliro ne forflugos sen viktimigi lin de la novaj malicaĵoj de sia bo-nevo.

26^a Aventuro.

Kiel Renardo renkontis Noblaⁿ, la reĝon, kaj Isengrinoⁿ, kaj kiel la du baronoj donis unu la alian la pacan kison.

Isengrino, post esti lasante vivi Renardoⁿ kiam li povintus venĝi sin kontraŭ li, ne estis malpli persvadita ke damo Hersento, lia nobla edzino, havis gravajn plendomotivojn kontraŭ lia kunulo; kaj Renardo, siaflanke, obeis al sia natureco, lasante eskapi nenian eblecon malglori kaj trompi Isengrinoⁿ. Iam li embuskis en la arbaro, kun la espero alporti hejmen ion por sia kara Hermelina. Li ne estis tie de longe sen vidi alveni siaflanke monsinjoron Noblaⁿ, la reĝon, akompanata de Isengrino, la konestablo. Ili paŝotenis unu la alian, agrable babilante. Renardo ne deturnas sin; kaj eĉ por profiti el la renkontiĝo malfavore al sia kunulo, li antaŭeniras kaj salutas la reĝon per profunda kliniĝo: "Estu bonvena, nobla kompanio! li diras. - Ĉu estas vi, grandsinjoro Renardo! respondas la reĝo kiu, sciante la misaventurojn de Isengrino, penis ne ridi. Mi deziras al vi bonan tagon kaj feliĉan sorton por la ruza lertaĵo kiun vi sendube pretiĝas ludi".

"Fakte, mia monsinjoro, mi bezonas viajn bondezirojn, ekde la tagiĝo mi estas ĉasanta; mi esperis alporti ion al la edzino kiu ĵus donis al mi novan infanon, kaj ĝis nun mi nenion trovis".

"Ĉu vi estas ĉasanta? respondis la reĝo kun severa tono, kaj ĉu estas tiel ke vi faras sen ni viajn aferojn?"

"Siro, reparolis Renardo, je la fideleco kiun mi ŝuldas al vi, mi tro bone scias ke al mi ne konvenas samrange paŝi kun viaj ordinaraĵoj kunuloj kaj esperi rigardon de la reĝo meze de tiom da gravaj moŝtuloj. ! Vi kompreneble devas ol nin, la malgravulojn, preferi la altajn baronojn, tiajn kiel sirojn Brunoⁿ la urson, Belacentoⁿ la apron, Ronjausoⁿ la ĉashundon, Sinjoron Isengrinoⁿ, kaj iliajn samspeculojn".

"Kaj jen, rebatis la reĝo, el viaj ordinaraĵoj mokadoj; sed, fine, restu kun ni, se vi bonvolas; almenaŭ hodiaŭ mi akceptas vin en mia ĉasado, kaj ni tuj serĉos kune la necesaĵon por taŭge tagmanĝi.

"Ha ! siro, eligas Renardo, mi ne kuraĝus, pro monsinjoro Isengrino, kiu ĉiam vidas min kontraŭvole. Li destinis, kial mi ne scias, mortigan malamo, kaj tamen, mi ĵuras tion per mia estro, neniam mi faris al li la plej malgrandan ofendon. Li akuzas min esti malhonorinta sian edzinon, dum mi nenion petis, per la virto de Dio, al mia bo-onklino Hersento, ke mi ne povus postuli de mia propra patrino. - Mi pensas kiel vi, Renardo, reparaĵis la reĝo, nenio gravas en tio ĉio. Kvankam vi subtenintus la kriminalan komercon kies vi estas suspektata, necesus por kondamni vin, kelkaj konkretaj pruvoj, kaj oni ne prezentas ĝin. Ni ĉesu do ĉi tiujn miskomprenojn, mi volas restarigi pacon inter vi. - Povu Dio, siro, rekompenci vin pro tio ! ĉar, vere, kaj per fideleco ke mi ŝuldas al Hermelina, la rajto estas en mia flanko".

"Nu, Isengrino, reparaĵis la reĝo, ĉu tiu malamo kontraŭ Renardo estas saĝa ? Vi vere frenezas imputi al li malnoblaĵon, kaj laŭ mi, mi certas ke li havas nenion por riproĉis al si koncerne damon Hersento". Montru vin pacema; Lasu la malnovajn ĝermojn de rankoro. Ĉu ni devas malami homojn pro malbonaj diroj dise kolektitaj ? Mi konas Renardo" pli bone ol vi, kaj mi estas certa, ke, per la ĉefturo de la imperiestro Oktavio, li farus nenion pri tio kion oni riproĉas al li".

"Siro, diras Isengrino, ekde kiam vi atestas tion, mi kredas tion. - Nu, kiu do malhelpas vin ? Tuj, alproksimigu vin, pardonu lin bonkore kaj tutaprobe. - Mi ne bonvolas tion. En via ĉeesto, siro, mi pardonas lin, mi demetas ĉian rankoron de la pasinteco, mi pretendas ke ni restus dum nia tuta vivo, bonajn amikojn kaj kompanojn".

Tiam sin donis unu la alian, la kison de amikeco, tiuj kiuj ne multe amis unu la alian kaj neniam amos unu la alian. Ili diru tion kion ili volas, ili ĵuru ĉiujn reamikiĝojn de la mondo, eĉ en la ĉeesto de la reĝo, ili ĉiam malamos unu la alian, kaj mi ne vetus multe pri iliaj kisoj. Tio estas la plej mensoga kaj trompa paco; por diri ĉion per unu vorto, tio estas Renarda paco.

27^a Aventuro.

Kiel la Reĝo Nobla, Isengrino kaj Renardo ekiris ĉasi, kaj pri la renkontiĝo de kampulo kiun Renardo dronigis.

Jen la tri personoj revojirantaj; Nobla unue, poste Isengrino, poste Renardo. "Kiel ni komencu ? diras la reĝo rigardante Renardo. Vi kiu konas la bonajn lokojn, estu nia gvidanto; oni fidas al vi. Ĉu vi scias apud ĉi tie herbejon, bosketon aŭ paŝtejon kie ni povus renkonti bonan predon ? - Per sankta Remiĝo, siro, respondas Renardo, mi nenion povas promesi. Tamen mi memoras ke inter ĉi tiuj du montoj, tie, oni trovas verdan valon kie la brutaro de la najbara vilaĝo ofte venas paŝti. Ĉu vi volas iri al tiu flanko ? - Mi konsentas, diras la Reĝo".

Ili paŝas, kaj vi tuj juĝos kiom la paco freŝe ĵurita estis solida. Alvenintaj en la herbejo, Isengrino la unua ekvidas al la alia fino, belegan predon. Tiam tute gaja : "Ni estas sur la ĝusta vojo, siro, li diras, mi tien distingas virbovon, bovinon kaj ĝian bovidon; necesas ke ili ne eskapu nin. Sed estus bone sendi Renardo" antaŭen, por konstati ĉu ne estus laniario aŭ kampulo por timi, oni ne kapablos preni tro da singardemoj. - Vi bone parolas, diras la reĝo. Renardo estas lerta kaj ruza, li rekonos pli bone ol neniu la lokojn. Iru do antaŭen, Renardo, kaj kiam vi estos vidinta, vi revenos por informi nin. - Plenkore, siro".

Tuj kuranta tra la kampoj, li alvenas apud la atingebla predo. La kampulo, gardisto de la brutaro, dormis trankvile sub ulmo. Renardo sin ŝovas tute apud li, serĉante en sia kapo rimedon por forigi lin. Sen veki lin, li kaptas branĉon de la arbo kaj rapide saltas pli alten : li iras de branĉo al branĉo kaj finfine haltas precize super la kapo de la paŝtisto. Ĉu estos al mi permesita daŭrigi ? Renardo, kiel vera fiulo, sin turnas, strebas, kaj faligas sur la kampulon plenan pelveton da fetora fekaĵo. La paŝtisto, sentante verŝiĝi sur lin tian buljonon, salte ekvekiĝas, direktas la manon al sia humida vizaĝo, kaj ne divenas kiel tia aĵo povis falis de la arbo. Li levas la okulojn kaj vidas

nur frondojn el la plej belaj verdoj de la mondo, ĉar Renardo malaperigis sin sub la plej dikaĵo de la foliaro. La surprizo de la kampulo estas supermezura; li kredas sin la ludon de fantomo, li tuŝas per sia mano, sentas grasan malsekecon kies fetoro estas neeltenebla; poste li stariĝas kaj kuras rekte al la kavaĵo kiu fermis la herbejon kaj kiu enhavis dudek futojn profunde da akvo. "Ni unue lavu nin, li diras al si, poste mi provos malkovri al kiu mi ŝuldas ĉi tiun malbonan aventuron".

Kiam li alvenis al la kavaĵo kaj kiam li komencis kaŭre kliniĝi por sin lavi, Renardo kiu ne perdis lin el la vido, lasis sin gliti grunden kaj rekuniĝis kun li. Kiam li vidis lin kun kurbigita dorso, kapo klinita super la akvo, li vigle saltis sur lian lumbon, kaj per sia pezo decidigis la falon de la kampulo al la fundo de la kavaĵo. Pri Renardo, li eĉ ne tuŝis la surfacon de la akvo. La kompatindulo, glaciigita de teruro, etendis la brakojn kaj svingis la piedojn por eskapi el la danĝero; sed Renardo ĉeestas, kiu ekvidas je kelka distanco larĝan ŝtonon, platan kaj kvadratan; li ŝovas ĝin, levas ĝin, fine faligas ĝin per tia forto sur la dorson de la kampulo ke tiu ĉi malsupreniras kun ĝi en la ŝlimon de la kavaĵo.

Dume la reĝo kaj la konestablo, lacaj pro tiel longa atendo, iom antaŭeniris. Isengrino, kies la okuloj estis bonegaj, videtis Renardo" apud la kavaĵo, kaj montrante lin al monsinjoro Nobla : "Vidu, siro, kiel Renardo zorgas servi vin; li petoladas dum vi perdas paciencon. Li trovis por li, li petas nenion pli. Oni povas sendi lin serĉi la morton; certa rimedo por longe atendi lin ! Se vi trovas tion bonan, siro, ni antaŭeniros al tiu flanko, almenaŭ ni scios de li tion kio retenas lin tie. - Konsentite, diras la reĝo, sed per sankta Juliano ! se Renardo ŝercis nin, li severe pagos tion kaj longtempe ne emos rekomenci".

Dum ili alvenis en tre malgaja humoro, la kampulo estis batinta la akvon dum longa tempo, dufoje mergiĝis kaj dufoje malmergiĝis, kaj perdis ĉion kio restis al li kiel forto. Renardo, siaflanke, deziris sin liberigi de tio por pli rapide reiri apud la reĝo; li rapide faras amason da dikaj terbuloj kaj ĵetas ilin dense kvazaŭ hajlo sur la dorson de la viktimo kiu mergiĝas por la tria kaj lasta fojo. La kampulo restis sub la akvo, haltigita en la herbaroj. Dio bonvolu akcepti lin en sia

paradizo ! Almenaŭ li povas esti certa ke ekde ĉi tiu tago, oni ne plu faros pri li malbonajn dirojn. Pri la predo, ĝi dependis de niaj ĉasistoj, nenio plu malhelpis ilin kapti ĝin.

Post tiu grava faro, grandsinjoro Renardo ekreiris, kaj kiel ni vidis, monsinjoro Nobla kaj siro Isengrino evitigis al li la duonon de la vojo. "Estu bonvenaj, li diras al ili, vi Monsinjoro kaj via kompanio ! - Mi, respondas la reĝo, mi ne salutas vin, grandsinjonon Renardo", kaj mi eble devus pendumigi vin ĉe la arboforkoj, pro esti forlasanta nin tiom longe. - La kulpo ne estas mia, Monsinjoro, eligis Renardo. Per la fideleco kiun mi ŝuldas al mia edzino, mi havis kiel distraĵon, la kampulon kiu gardis la brutaron, kaj vi komprenas ke se li vin vidintus, li ŝirmintus siajn bestojn kontraŭ ĉia atako; sed, dank'al Dio, vi vidas ke mi revenas freŝa, sana kaj mallaca, dum li iris kuniĝi kun la ranoj funde de la kavaĵo. Mi imagas ke vi deziris mian revenon; tre enuas, kiu longe atendas. Sed kiam vi scios kiel mi laboris, vi pli amos min. Aŭskultu min de punkto al punkto".

Tiam li rakontis al ili kiel li grimpis sur la ulmon, kiel li makulis la vizaĝon de la kampulo, kiel la timigita kampulo kuris sin lavi ĉe la kavaĵo, kiel alvenante paŝete, li saltis sur lian lumbon, poste rulfaligis lin en la marĉeton, kaj zorgis por ke li neniam eliru el ĝi.

La reĝo aŭskultis lin, kaj iom post iom lia kolero anstataŭiĝis per la deziro ridi; li kunbatis la manojn, ĵuris ke neniam kampulo estis pli bone traktita laŭ siaj meritoj. - Ho ! diras Isengrino, siavice, tio fakte ŝajnas tre amuza; sed por kredi tion, mi ne ĉagreniĝus vidi tion per miaj okuloj. - Nu, diras Renardo, vi povas plezurigi vin; iru ĉe la fundon de la akvo, la kampulo diros al vi ĉu mi mensogis de unu vorto. - Ne necesas, reparaĵis la reĝo kiu volis savi la dignon de la konestablo. Mi ne sufiĉe estimas la kampulojn por iri vidi unu pli, kaj mi plivole ŝatus enŝovi mian kapon en tunon da vipuroj. Li estas funde de la akvo, ke li restu tie ! kaj pri ni, ni hastu por ekplenumi la dispartigo de la predo".

28^a Aventuro.

Kiel Isengrino ne estis tiel bona partodonanto kiel Renardo.

Nobla unue sin turnis al Isengrino. "Estas vi, grandsinjoro konestablo, kiu decidis pri tio kio devas alfali al ĉiu; vi facile trovos manieron por kontentigi nin tri. - Mi obeas, monsinjoro, ĉar tiel estas via plaĉo; cetere, mi konfesas ke mi volonte manĝos. Pri kio temas ? Pri virbovo, bovino kaj bovido..." Li ŝajnis heziti dum momento, kiel serĉanta rimedon por plej bone aranĝi ĉion; ĉar li memoris tion kion diras la kampulo :

Kiu bonon vidas kaj malbonon elektas,
Tiu ofte prave pentas.

Ĉiaokaze, li strangoligus sin plivole ol nenion proponi avantaĝe al Renardo.

"Monsinjoro, li finfine daŭris, mia opinio estas, ke vi gardu por vi la taŭron kaj la belan gunon. Mi kontentigos min per la bovido, kaj pri la rufulo kiun vi akceptis en via kompanio, mi scias ke li ne malmulte ŝatas ĉi tiujn specojn de viando; ni invitos lin serĉi manĝaĵon aliloken".

Ho ! Kiel granda afero estas Senjoreco ! Necesas al Sinjoro doni ĉion por konservi, ĉion fari laŭ ŝia volo kaj ĉefe, neniam paroli al li pri disdivido. En ĉiuj landoj la kutimo estas sama; Ĉu la konestablo Isengrino povis forgesi tian veron ! Nu, tio kio devis okazi, okazis : Nobla ne aŭskultis lin sen svingi la kapon kaj sen aperigi viglan indignon. Apenaŭ la partiganto finis, kiam li stariĝas, faras du paŝojn, levas sian teruran kruron kaj sendas ĝin sur la vangon de Isengrino per tia forto ke li forigas la haŭton, la felon de la vizaĝo, kaj lasas la kulpulon kovrita de sango. "Isengrino, li diras, nenion komprenas pri la partigo, mi devintus diveni tion. Estas al vi, Renardo, pli lerta kaj saĝa, por kontentigi ĉiun el ni. - Siro, respondis Renardo, vi faras al mi honoron kiun mi ne aŭdacis esperi; sed jen mia propono : Prenu, Sinjoro, tion kion plaĉos al vi kaj forlasu al ni la ceteron.

- Ne, ne ! diras Nobla, mi ne tiel konsentas tion, mi volas ke ĉio estu

aranĝita per juĝo, laŭ senpartieco, kaj tiel ke neniu rajtus plendi. - Nu ! reparolis Renardo, ĉar vi volas tion, mia opinio unue estas, kiel Isengrino proponis, ke la taŭro estu via; ĝi estas la parto de la reĝo, ĝi ne povas fali en pli glorajn manojn. La guno estas delikata, grasa kaj juneta; ĝi estos por Sinjorino Reĝino. La imperia princo, via filo, estis, se mi ne eraras, antaŭnelonge demamigita, li devas esti unujaraĝa, aŭ malmulte mankas; al li devas alfali ĉi tiun etan bovidon, delikatan kiel lakto. Pri ni aliaj, ĉi tiu kampulo kaj mi, ni iros serĉi nian sorton aliloken".

Tiuj paroloj dissemas videblan kontentiĝon sur la fierfa vizaĝo de la reĝo. "Jen, li diras, kiu estas bone parolita, tial neniu reklamacias. Estas bone, Renardo, mi estas kontenta. Sed diru al mi, kiu instruis vin tiel bone partigi ? - Siro, respondas Renardo, la ruĝa kufolino de Isengrino estas por mi de granda aŭtoritato. Mi eĉ estas tentanta kredi ke la krono kiun vi faris al li, indikas kardinalon, se ne la Papon mem. Ho, la bela koloro de purpuro ! Necesas kliniĝi antaŭ ĝi".

"Majstro Renardo, Majstro Renardo, eligas la reĝo dolĉe frotante la brakon sur lian orelon, vi estas sagaca persono, kaj vi scias manĝi pli bonan ol vian panon. Domaĝe por tiuj kiuj rifuzus viajn bonajn servojn; vi bone memoras tion kion oni diras, kaj vi kapablas admirinde profiti de la malsaĝeco de la aliuloj. Restu ambaŭ ĉi tie kaj en bona amikeco; sed mi konsilas al Isengrino, se li volas ŝpari al si grandajn bedaŭrojn, pli bone dispartigi aliafoje. Pri mi, mi havas grandajn aferojn kiuj devigas min malproksimiĝi. Serĉu, trairu ĉi tiujn arbarojn, kaj se vi tie trovas vian tagmanĝon, mi permesas al vi preni ĝin. Adiaŭ, Renardo ! bone partigita, vere bone partigita !"

"Nu, siro Isengrino, kion vi opinias ? diras Renardo ekde kiam Nobla estis malproksima forkondukante la predon antaŭ li. Ĉu la Reĝo sufiĉe ofendegis nin ? Ĉu tiaj baronoj kiel ni devas esti tiel malbone traktitaj kaj trompitaj ? KREDU min, iomete konkordante nin, ni kapablas doni al li sufiĉe da embaraso. Kiel via amiko, mi ŝuldas al vi miajn plej bonajn konsilojn, kaj mi volonte helpos vin per miaj tutaj fortoj por preni de tiu malbona reĝo brilan venĝon. Ĉar fine estas tro da honto sin lasi tiel trakti kaj ni emigus lin fari ankoraŭ pli malbone. Mia opinio estas unue venĝi la ofendon kiun li faris al vi,

poste la rifuzo de justeco kiu senigis nin je la posedaĵo kiu apartenis al ni".

Isengrino atente aŭskultas Renardoⁿ. Li gardas akran rankoron pro la traktado kiun li spertis; li feliĉus povi venĝi tion, sed aliflanke necesas havi aliancanojn por entrepreni militon kontraŭ la reĝo. La singardo postulas ke oni unue petu konsilon al siaj veraj amikoj. "Tamen, li diras al si, kie mi trovus pli saĝan konsilanton ol Renardoⁿ, kunulon pli lertan, pli utilan ?... Sed se li perfidus min ? Se li elpumpis el mi mian sekreton nur por iri riveli ĝin al la reĝo ? La perfido sufiĉe estas en siaj kutimoj kaj en tiuj de lia gento... Ne ! Mi ofendas lin; li finfine estas mia kamarado, li ne volus damaĝi min ? Li estas honestulo, la reĝo ankoraŭ diris tion antaŭ momento, reamikigante nin. Tamen mia edzino ! mia edzino !... Malbona diro, tio tute; mi volas venĝi kontraŭ la reĝo, Renardo proponas al mi liajn konsilojn kaj lian helpon, mi frenezus forpeli lin".

Li do respondas al Renardo : "Bela amiko, kara kaj dolĉa kamarado, mi reale bezonas vian helpon kaj mi petas ĝin al vi. Mi ŝatus antaŭ la alveno de la unua nokto fari venĝon al nia malbona reĝo. - Ho ! tu ĵas reparolas Renardo kiu deziris nur erarigi sian kamaradon pri la ĉefa motivo de liaj rankoroj, necesas ne tiom rapidi; ni reparolos pri tio alian fojon; nuntempe, mi havas la plej grandan bezonon revidi mian familion; mi estas ekster Mopertui de tre longtempe, kaj mi volas iri promeneti tien. Adiaŭ, kara onklo Isengrino; ni restu en plena akordo kontraŭ la orgojlo de la reĝo". Tion diritan, la novaj amikoj adiaŭis unu la alian. Antaŭ ol esti farintaj cent paŝojn, ili estis forgesintaj la militon kiun ili devis entrepreni, kaj la fidelecon kiun ili jam tiom ofte ĵuris kaj forneis.

29^a Aventuro.

*Kiel Renardo eniris kaj feliĉe eliris el la puto;
kiel Isengrino tien eniris, sed eliris tre malfavore al li.*

Mi promesas silentigi tiujn kiuj, ne inklinantaj aŭskulti la predikon aŭ la vivon de kelka sanktulo, deziregus aŭdi rakonti aferojn plaĉigajn kaj facilajn por memori. Mi ne havas la reputacion havi grandan provizon da racieco; sed ĉe la lernejo, oni oftege vidis ke la frenezuloj povis vendi saĝecon. Lasu min sciigi al vi novan ruzon de grandsinjoro Renardo, tiu fama majstro en friponaĵoj, Renardo, la natura malamiko de la rektaj vojoj, kiu facile trompus la tutan mondon, kaj kiu malice luktus kontraŭ la demono mem.

Li iris ĉasi sufiĉe for de sia domo, sed la ĉasbestoj estante malabundaj, necesis al li rehejmeniri el la arbaro sen vespermanĝo. Li eliris duan fojon, kaj duafoje penis senutile : en la junkoj, meze de kiu li vane restis gvate, li aŭdis nur sian ventron murmuri pro la pigrecon de siaj dentoj kaj pro la ripozo de sia glutejo.

Ĉi tiuj ripetitaj plendoj decidigis fari alian provon. Iu mallarĝa ombra pado kondukis lin en ebenaĵon ĉe la ekstremaĵo de kiu estis barilo formanta la ĉirkaŭbaritejon de grandaj konstruaĵoj. Tio estis abatejo de monaĥoj Blankuloj, homoj kiujn oni ne ofte surprizas sen abundaj proviantoj. La garbejo estis maldekstre de la klostro, kaj Renardo deziris fari tien pian viziton; sed la muroj estis altaj kaj solidaj. Kia domaĝo tamen ! Tie, sendube, estis kunigita ĉio kion deziris iu vulpo : kokinojn, kokojn, kaponojn kaj anasojn. Renardo, rigardante sub la pordo, videtis la kokejon kie devis kvieti tion kion li ŝatis plej bone en la mondo, kaj liaj okuloj ne povis elŝiriĝi el tiu neeltenebla vido. Ĉu do estis tie nek ekstera fenestro, nek truo, nek la plej malgranda lukso ? Ĉar li komencis malesperi kaj ĉar, por pli bone sekvi la sinsekvon de siaj malgajaj pensoj, li estis kaŭriĝonta piede de la pordo, ho feliĉo ! malforta premo cedigas la malbone alfiksitan pordeton kaj havigas al li neatenditan trapason.

Senprokraste jen li en la korton. Sed ne sufiĉas esti enirinta, se li

estas ekvidata, lia peltó povas certe resti kiel admonpago. Antaŭenirante do zorgeme, li alvenas je kaptodistanco de la kokinoj : unu paŝon plie, ili estas por li. Sed se la kokinoj eligas krion ? Ĉi tiu pripenso haltigas lin kaj eĉ decidigas lin retroiri. Li do estis retrapasonta la pordeton, kiam hontsento retenas lin en la korto kaj instigas lin doni ion al la aventuro. La bezono kiu instigas maljunulinojn troti, vige bildigas al li ke tiom valoras esti trabastonita kiom morti pro malsato. Li tiam revenas al la celoj de sia avideco laŭ alia ĉirkaŭvojo kiu devas pli bone certigi lian paŝadon kaj lian retiriĝon. Baldaŭ li ekvidas tri kokinojn kiuj endormiĝis sidiĝintaj, trans fojnamaso, sur longa peco el ligno. Ĉe la unua movado kiun ili rimarkis en la fojno, ili ektremis kaj iris sin kaŝi iom pli for; Renardo sturmas al ili, strangulas ilin unu post la alia, manĝas la kapon kaj la flugilojn de la du unuaj kaj kunportas la trian.

La kampanjo estis feliĉa; Renardo glate foriris el tiu feliĉega garbejo de la monaĥoj. Sed la soifo postvenis la malsaton, kaj kiel kvietigi ĝin ? Antaŭ la domo troviĝis puto al kiu li evidente kuris. La akvo, bedaŭrinde, ne estis atingebla. Li boletas de senpacienco, lekas siajn sekigajn barbojn, kaj ne imagis elturniĝon kiam, supre de sia kapo, li vidas vinĉon aŭ cilindron al kiu tenis iu duobla ŝnuro. Unu malsupreniris en la puton, la alia subtenis malplenan sitelon samnivele kun la fundo. Renardo diveni la uzon kiun oni povas fari kun ĝi, kaj demetante la kokinon kiun li elportis el la garbejo, li alproksimiĝas al la aperturo de la puto, sin alkroĉas al la ŝnuro kaj tiras ĝin per siaj tutaj fortoj kun la espero revenigi la sitelon kiu kuŝis ĉe la fundo. Sed aŭ ĉu la vazo ne estis plenigita, aŭ ĉu la ŝnurego volvita sur la vinĉo eskapis de la maleolo kiu retenis ĝin, Renardo estis, kiam li la plej malmulte atendis tion, mem kuntirata en la abismon.

Li nun havas plenan liberecon por trinki; li eĉ havus tempon por fiŝi laŭ sia plaĉo. Sed mi dubas ke li ekkonsciis tion; la soifo ne plu turmentis lin, ĝi cedis la lokon al timo, al teruro. Jen do li kaptita, la fama prenanto de aliaj ! Kion li fariĝos, ho Dio mia ! Necesus flugiloj por eliri el ĉi tie. Por kio utilas al li pseŭda saĝo ? Li restos en ĉi tiu loko ĝis la Juĝa tago, krom se aliulo venas eltiri lin el ĝi. Kaj en tiu kazo, eĉ kion li ne devos timi pri tiuj monaĥoj, malamikoj de sia raso,

kaj tiom avidaj de la blanka kolumo de sia felo ?

Farante ĉi tiuj dolorajn pripensadojn, li sin tenis per unu kruro ĉe la ŝnuro de la puto, per la alia ĉe la anso de la sitelo kiu flosis super la akvo. Nu, la hazardo volis ke Isengrino estis elirinta el la arbaro proksimume samtempe ol li, kaj ke pro sama intenco, li alvenis en tiuj ĉirkaŭaĵoj, suferante pro malsato kaj soifo. Tro mallerta por malkovri la difekton de la pordeto : "Jen, li diris retropaŝante, iu lando de la demono, ne de la vivanta Dio. Oni trovas en ĝi nenion por manĝi, nenion por trinki; mi bone vidas tien tion kion ili nomas puton, sed la rimedo por elpreni unu solan guton da akvo ?"

Isengrino tamen alproksimiĝis al ĝi; li metis siajn piedojn sur la rondan ŝtonon kaj mezuris per la okuloj la profundecon. Grandsinjoro Renardo, trankvila kiel ombro, konservis al la akvo en kiu li duone mergiĝis, ĝian tutan travideblecon. "Kion mi vidas tien ! subite diras Isengrino, funde de ĉi tiu puto, grandsinjoron Renardo" ! Ĉu eblas ?" Li denove rigardas, kaj tiufoje, lia bildo reproduktinta flanke de la korpo de Renardo donas al li la plej strangajn ideojn. Li kredas vidi proprukule Renardo" en la kompanio de damo Hersento, li supozas rendevuon konsentitan inter ili. "Vere estas li ! Vere estas ŝi ! Ha ! Perfidulino, ĉu vi nun diros ke vi ne estis surprizata kun la malica Renardo ?" La resonanta puto resendas *Renardo*" ! Ĝi ripetas liajn insultojn kaj la eĥo alportas al li konfirmon pri lia honto kaj lia malfeliĉo.

Renardo facile rekonis sian kunulon, li lasis lin grumbli kaj kribi. Tamen post kelkaj minutoj : "Kiu estas ĉi supren ? li diras, kaj kiu arogas al si paroli ? - Ho ! diras Isengrino, mi rekonas vin. - Ankaŭ mi rekonas vin; jes, mi antaŭe estis via bona najbaro, via kamarado, kaj mi amis vin kiel via nevo; sed hodiaŭ mi estas ĵus mortinta Renardo; mi estis sufiĉe saĝa dum mia vivo, hodiaŭ mi estas, Dio dankon, mortinta, kaj mi troviĝas en loko de ĝuoj. - Se estas vere ke vi estas morta, respondis Isengrino, tio verdire kontentigas min; sed ekde kiam ? - Ekde du tagoj. Ne miru, siro Isengrino; ĉiuj tiuj kiu estas ankoraŭ vivaj, mortos; ĉiuj trapasos la pordeton de la morto. Nia Disinjoro, en sia boneco, eltiris min el la valo de la mizero, el la fetora jarcento en kiu mi estis implikita, ke li povu ankaŭ viziti vin,

Isengrino, je la horo de la morto ! Sed unue, mi instigas vin, kaj nur en via intereso, ŝanĝi la inklinon rilate al mi. - Mi bonvolas tion, respondis Isengrino; ĉar jen vi morta, mi atestigas Dion ke mi ne plu havas malamon; mi eĉ komencas bedaŭri ke vi ne plu estas en la mondo. - Kaj mi tre feliĉas. - Kiel ? Ĉu vi parolas serioze ? - Estas pura vero. - Sed klarigu vin. - Volonte. Iuflanke mia korpo kuŝas en la domo de mia kara Hermelina, aliflanke mia animo estas en la paradizo, metita antaŭ la piedoj de Nia Disinjoro. Ĉu vi nun komprenas ke mi havas kialon esti ĝoja kaj kontenta ? Mi havas ĉion kion mi povas deziri. Ha ! Siro Isengrino, mi ne volas laŭdi min, sed vi devintus rigardi min kiel pli kara ol vi faris, ĉar mi neniam deziris al vi malbonon, kaj mi ofte havigis al vi bonon. Ne ĉar mi pentas pri tio, miaj virtoj estas hodiaŭ tro bone rekompencitaj; kaj se vi estas unu el la plej gravuloj de la tero, mi estas ankoraŭ pli bone konsiderata en la alia mondo. Mi ĉi tie vidas nur riĉajn kamparojn, belajn herbejojn, ĉarmajn ebenaĵojn, arbarojn ĉiam verdajn. Ĉi tie, grasaj ŝafinoj, kaprinoj, ŝafidoj, kiel oni ne vidas ilin ĉe vi. Ĉi tie, dudek fojoj pli da kunikloj, da leporoj, kaj da anseridoj ol vi povus kalkuli. Unuvorte, mi havas ĉion kion mi deziras, kiel ĉiuj kiuj vivas en malmulte da distanco de mi. Tiom da kokinoj kiom ni volas. Ĉu vi volas pruvon pri tio ? Ĉe la rando de ĉi tiu aperturo devas troviĝi iun kiun mi ĵetis kiel superfluan, elirante el nia lasta festeno. Rigardu, vi trovos ĝin".

Isengrino iomete turnas la kapon kaj fakte trovas la kokinon kies Renardo parolis al li. "Li ja diras vere, li pensis, sed kia bona paradizo, tiu kie oni abunde havas tian viandon ! Mi neniam volas alian". Samtempe li ĵetis la dentojn al la kokino kaj voris ĝin sen lasi ion ajn krom la plumoj. Poste revenante al la puto, "Mortinta Renardo, li diras, kompatu pri via kamarado, instruu al mi, per la favoro de Dio, kiel, same kiel vi, mi povos atingi la paradizon".

"Ha ! respondas Renardo, vi tie petas ion tre malfacila. Komprenu, la paradizo estas la domo de la ĉielo, oni ne eniras en ĝin kiam kaj kiel oni volas. Vi konsentos ke vi ĉiam estis perforta, ŝtelema kaj mallojala. Vi ĉiam persekutis min per maljustaj suspektoj, kiam vi havis edzinon plenan de virtoj, vera modelo de ĉasteco. - Jes, jes, mi konsentas tion, diras Isengrino, sed je ĉi tiu horo mi estas pentanta.

- Nu ! se vi estas en la bonaj emojn kiujn vi diras, rigardu la du vazojn kiuj estas unu apud vi, la alia apud mi. Ili servas por pesi la bonon kaj malbonon de la animo. Kiam oni sin kredas en stato esperi la ĝojojn de la paradizo, oni eniras en la supran korbon, kaj se fakte oni estas pentanta, oni facile malsupreniras; sed oni restas supre se la konfeso ne estis bona kaj kompleta. - Konfeso ? diras Isengrino, ĉu vi konfesis viajn pekojn ? - Certe ja : antaŭ morti mi vidis preterpasi maljunan leporon kaj barban kaprinon, mi petis ilin aŭskulti min kaj mi ricevis absolvon de ili. Necesas do se vi volas malsupreniri apud min, unue konfesi vin kaj penti pri viaj malbonfaroj. - Ho ! Se nur tio necesas, diras Isengrino tre ĝoja, mi estas bona stato : hieraŭ mi ĝuste renkontis sur mia vojo, grandsinjoron Hubert^{on}, la akcipitron, mi vokis lin, petigis lin aŭdi mian ĝeneralan konfeson kaj absolvi min; tio kion li faris senhezite".

"Se estas tiel, diras Renardo, mi bonvolas petegi al la Ĉieloreĝo prepari lokon por vi apud mi. - Mi petegas vin, kamarado, kaj mi atestigas sanktan Apetitoⁿ ke mi diris la veron. - Genuigu do vin kaj petu al Dio ke Li permesu al vi la eniron en sia paradizon".

Isengrino turnis al oriento sian postaĵon, kaj al sunsubiro sian kapon. Li balbutis, li kriegis por tranĉi la orelojn. "Renardo, li poste diras, mi finis mian preĝon. - Kaj mi, mi akiris vian gracon. Eniru en la korbon, mi pensas ke vi facile malsupreniros".

Oni tiam estis plennokte : la ĉielo estis inundita per steloj kies la puto reflektis la lumon. "Vidu la miraklon, Isengrino, tiam diras Renardo, mil kandeloj estas flamigitaj ĉirkaŭ mi, certa signo ke Jesuo pardonis vin".

Isengrino plenplena de konfido kaj espero longtempe provas sen sukceso; sed fine, helpita de la konsiloj de sia kamarado, li sukcesas sin teni ĉe la ŝnuro per la antaŭaj piedoj, metante la du aliajn en la sitelon. La ŝnuro tiam malbobenas kaj cedas sub la nova kontraŭpezo de lia korpo. Li malsupreniras, Renardo multe pli malpeza leviĝas en la sama mezuro. Jen por Isengrino nova kaŭzo de surprizo : meze de la vojo li sentas sin albatigita de Renardo. "Kien vi iras, kara kamarado, diru al mi ? Ĉu mi estas sur la bona vojo ? - Jes, vi estas sur ĝi kaj mi tute forlasas ĝi al vi. Tia estas la kutimo ĉi tie : kiam

unu venas, la alia foriras. Je via vico, bela kunulo, resti en la kompanio de la monaĥoj kun la blankaj manteloj. Bona okazo por vi lerni pli bone kanti". Eldirante tiujn lastajn vortojn li tuŝas la randon de la puto; saltas per kunigitaj piedoj seninsiste, kaj ne ĉesas kuri ĝis kiam li perdis el la okuloj la abatejon de la Bernardanoj.

Miro, honto kaj furiozo ne permesis al la kompatinda Isengrino provi respondon. Li estintus el tiuj kiuj estis kaptitaj antaŭ la urbo de Alepo⁽⁸⁾ ke li ne estus pli konfuzita kaj pli senespera. Li vane provas resupreniri, la ŝnuro glitas inter siaj brakoj, kaj ĉio kion li povas fari, estas, dank'al la sitelo kiu malaltigis lin, gardi la kapon super la glacia akvo en kiu la cetero de lia korpo estas mergita.

Tiel fluis la tutan nokton, por li tiel longan kaj tiel kruelan. Nun ni vidu tion kion oni faris en la monaĥejo. Ŝajne la monaĥoj blankuloj tro salis la trapikitajn fabojn kies ili antaŭtage vespermanĝis ĉar ili vekiĝis tro malfrue. Post esti ronkintaj kiel orgentuboj, tiuj bravaj serĝentoj de Jesuo Kristo fine ellitiĝis kaj petis por trinki. La kuiristo, gardanto de la proviantoj, tuj sendis al la kelo kaj bonvolis mem iri al la puto akompanita de tri fratoj kaj de dika azeno de Hispanio kiun ili alligis al la ŝnuro. La lupu tiam zorgis sin teni sur la akvo. La azeno komencas tiri; sed ĝi ne havas sufiĉe per siaj tutaj fortoj por levi la pezon kiun la puto kontraŭmetas al li. La fratoj frapas ĝin, la batoj estas senutilaj. Tiam unu el la fratoj ekpensas rigardi funde de la puto. Ho, surprizo! Li ekvidas la piedojn, rekonas la kapon de Isengrino. Li alvokas la aliajn: "Jes! estas la lupu". Ili rehejmeniras, sonorigas alarmon en la dormejo, en la refektorio. La abato ekkaptas klabon, la prioro kandelabron; ne estas monaĥo kiu ne havas palison, pikrostilon aŭ bastonon. Kun tiu ilaro, ili revenas al la puto, sin lokas ĉiuj ĉe la ŝnuro, tiel bone ke fine, dank'al la streboj de la azeno kaj de la monaĥoj, la sitelo supreniras kaj tuŝas la supran finon de la puto. Isengrino ne atendis tiel longe; per unu saltego, li saltis super la kapoj de la unuaj fratoj; sed la aliaj fermas al li la trairejon. Li ricevas hajlo da batoj, la klabo de la abato perpendikle falas sur sian kompatindan dorson, tiel bone ke,

8 Aludo al la bataloj komencita en 1146 dum la kampanjo de Alepo, kaj al la reakiro de Edeso fare de Nuredino, sur Joselino de Kurteneo. Vidu la historiistojn de la krucmilitoj.

foroferante sian vivon, Isengrino ne plu sin defendas kaj restas surgrunde sen movo. Jam la prioro metis la manon al la tranĉilo. Li estis komenconta fuŝtranĉi lian nigran pelton, kiam la abato, respektinda ulo, retenis lin : "Kion ni povus fari per ĉi tiu haŭto ? li diras, ĝi estas tute disŝirita, tute truoplena. Ni foriru kaj forlasu tiun kadavraĵon".

Isengrino ne plendis pri la malestimo kiun oni faris pri lia pelto, kaj kiam la fratoj, obeemaj al la voĉo de la digna abato, estis malproksimaj, li baraktis, leviĝis, kaj malrapide sukcesis sin treni ĝis la unuaj tufarbustoj kiu antaŭis la arbaregon. Estas tie kie lia filo retrovas lin : "Ha ! kara patro, kiu metis vin en tia stato ? - Filo, estas Renardo, la perfidulo, la malhonestulo, la fripono. - Kiel ! tiu rufa nano kiu, antaŭ ni, hontigis mian patrinon kaj malpurigis nin per lia fekaĵo ? - Li mem, kaj ke la justa ĉielo donas al mi tempon por bone pagi lin !" Dirante tion, Isengrino prenis sian filon ĉe la kolo, kaj subtenita de li, atingis la sojlon de sia loĝejo. Damo Hersento revidante lin en tiu stato, kriis pli laŭte ol la aliaj, kaj ŝajnis afliktita pro la misaventuro de sia kara edzo; oni ekserĉis bonajn kuracistojn, oni alvenigis ilin kaj ili diligentis viziti la vundojn, purigi ilin, apliki bonajn topikojn sur ilin, kaj prepari por la malsanulo pocion faritan de la plej maloftaj kuracherboj. Dank'al ilia scio, la malsanulo reakiris siajn fortojn, li reakiris la apetiton, li kapablis stariĝi, li kapablis paŝi. Sed se li deziris vivi, tio estis pro la espero ke baldaŭ prezentiĝu la okazo sin plene venĝi kontraŭ la perfidulo Renardo.

30^a Aventuro.

*Pri la nova malbonsorto okazita al damo Hersento,
kaj pri la decido de Isengrino iri plendi ĉe la Reĝa kortego.*

Ni vidis ke Isengrino, apenaŭ resanigita de siaj podagroj, kaj resaniĝanta de la malsano akirita en la puto de la Bernardanoj, tuj meditis pri la rimedoj por certigi sian venĝon. Spiti sian malamikon, deklari al li malkaŝan militon, estis riskegi; ĉar la reĝo povis interveni, kaj Renardo havis multajn amikojn kiujn li facile dungus sub sia standardo. Isengrino do trovis pli saĝa komenci spioni Renardoⁿ, aranĝante al li embuskon kiu povis fini ĉion pli rapide kaj pli sekure por li.

Li raportigis al si ĝustan priskribon pri la lokoj kiujn Renardo kutime vizitis. En iu tago, li volis ĉirkaŭi lin kaj peli lin laŭlonge de muro de ĉirkaŭbarilo, por tiel forigi al li ajnan rimedon de saviĝo. Estis dum la tempo de la distranĉo de pizplantoj, la tigoj estis ligitaj kaj kunigitaj sur la vojo, kaj Renardo ne neglektis viziti ilin. Isengrino, ekde kiam li vidis lin alproksimiĝi, klinis la kapon, eligis krion kaj kuris al li. Sed Renardo neniam paŝis sen antaŭkalkuli kelkan danĝeron; li ne perdis la senson, kaj kiam Isengrino sin kredis certa kapti lin, li jam estis for, kun subtirita vosto kaj streĉita kolo.

Isengrino kaj damo Hersento komencas postkuri lin : dum grandsinjoro Renardo elŝteliĝas tra serpenta pado kaj dum Isengrino kredas atingi lin perdiĝante en alia vojo. Damo Hersento, pli atenta al la movadoj de Renardo, ne forlasis liajn spurarojn, ĉu ŝi volis averti lin pri la danĝeroj kiuj minacis lin, ĉu ŝi aspiris mem venĝi pro la malnova ofendo. Siaflanke, Renardo ne bone komprenis la verajn inklinojn de la damo; anstataŭ atendi ŝin, li plirapidigis ĝis la apero de kava vojo kiu dependis de Mopertui kaj kiu ĝuste estis sufiĉe larĝa por ebligi lin trapason. Sed la malfeliĉa Hersento, pli larĝa ĉe la flankoj kaj ĉe la postaĵo, impetinta post li, trovis sin retenata tiel ke ŝi povis nek antaŭeniri nek retroiri de unu paŝo, kun la kapo kaj la korposupro enŝovitaj en tiu roka fendo. Pro la timplena krio kiun ŝi

ne sukcesis reteni, Renardo, revenante de la kontraŭa flanko, alkuris al ŝi. "Ha ! estas vi, damo Hersento, li diras al ŝi per mokema tono, estas bone de vi tiel veni trovi la amantojn ĝis en ilia loĝejo ! Jes, mi vidas tion, vi enŝoviĝis per la kolo, por havi pretekston resti pli longtempe kun mi. Ho ! Restu tiom longe kiom plaĉos al vi. Se la kunulo Isengrino trovus vin, mi ne entrudiĝus, ke li pensu tion kion li volos. Ĉu vi ankoraŭ diros al li ke vi ne amas min, ke vi neniam konsentis al mi duopan intimecon ? Koncerne min, mi deklaras tion al vi, mi diros tute la malon, ke vi amas min centfoje pli ol vian edzon kaj ke nenio haltigas vin kiam vi havas esperon renkonti min".

La kompatinda Hersento, pli konfuzita ol oni povus diri, respondis petegante al la malvirtan rufulo kompati al ŝi kaj eligi ŝin el la malagrabra situacio kie ŝi troviĝis; Isengrino alvenis kiam Renardo fakte provis helpi ŝin. Kia ne tiam estis lia kolero ? "Ha ! malbenita nano, ĉi tiu lasta ofendego multe kostos al vi. - Kiu, kaj pri kio vi parolas ? respondas Renardo kiu haste estis reveninta en la loĝejon kaj sin remontris tra la plej mallarĝa aperturo. "Vere, siro Isengrino, vi malbone akceptas la servon kiun mi estis faronta al via digna edzino. Ĉu vi ne vidas kiel ŝi estas kaptita ? Ĉu estas mia kulpo se ŝi venis enŝovi sin tie ? Tamen, anstataŭ danki min pro la helpo kiun mi donis al ŝi, vi ŝajnas kolera. Ĉu vi supozus ke mi volis frapi damon Hersento ? Mi pretas ĵuri ke mi faris ĉion kio dependis de mi por liberigi ŝin. - Vi ĵuri ! duobla perfidulo ! sed via vivo estas nur longa ĵurrompo. Lasu viajn mensogojn kaj viajn fabelaĵojn; mi vidis, mi aŭdis. Ĉu estas insultante ŝin per parolojn ke vi montras vian respekton al ŝi kaj al mi ? - Vi vere estas tro ruza kaj tro subtila, siro Isengrino. Via edzino propravole enŝovis sin tra tiu pordo; ŝi ne ankoraŭ eligis ŝin, mi konsentas tion, sed mi estis liberigonta ŝin kiam vi alvenis. Se mi ne pli rapidis, estis ĉar mi estis, antaŭ nelonge, vundita ĉe la gambo, kaj ke mi ne sukcesis pli diligenti. Mi diris al vi la veron; vi konsentiĝos, krom se vi decidis fari kontraŭ mi senmotivan kverelon. Cetrere, sinjorino estas tie; vi povas pridemandi ŝin, mi tute certas ke, tuj kiam ŝi estos liberigita, ŝi ne akordigos sian kolerkrion al via. Dio gardu vin, siro Isengrino !" Tio dirita, li ekenigis la kapon en Mopertui^{on}, fermis la lukon kaj

malaperis.

Isengrino ne estis trompita de ĉi tiuj belaj vortoj. Li kredis esti sufiĉe spertinta tion; la ekskuzoj de la kulpulo estis, li pensis, nova ofendego. Li venas al sia edzino kiun li provas liberigi. Li kaptas ŝin per la piedoj ekstere restitaj, li tiras tiagrade ke li vundas ŝin kaj elŝiras el ŝi novajn kriojn. Por plenigi la malagrablajn, la eksceso de tiom da emocioj ĵetis en la internaĵoj de la sinjorino ian certan malordon pri kiu la malfeliĉa Isengrino travivis la malgajajn efikojn. Dum momento li staris tute flanke, poste kunigante siajn strebojn al tiuj de la kompatinda ploremlino, kaj plej bone ludante per manoj kaj piedoj, ili forigis kelkajn ŝtonojn, iomete plilarĝigis la vojon, kaj damo Hersento, kun la dorso kaj la genuoj skrapvunditaj, estis eltirita el tiu malbenita kaptilo. Tiam necesis al ŝi suferi la riproĉojn de Isengrino : "Ha ! Abandonita lupino, venena kolubro, fetora serpento ! Kial ne esti sekvanta la saman vojon kiel mi ? Kial ne esti avertanta min ke mi vojeraris ? Renardo devis renkonti vin, vi ne povas nei tion. - Ne, siro, mi ne provos tion. Renardo kapablas por ĉiuj krimoj, sed ne dependis de mi puni lin kiel mi volintus tion. Ne parolu pri ĉio kion mi aŭdis, pri ĉio kion mi suferis. La ofendo ne pliboniĝos per tio kion vi aŭ mi povus diri. Sed ĉe la kortumo de la reĝo Nobla, oni gardas la pledojn kaj la asizojn; oni konas ĉiujn kazojn de milito kaj kverelo; estas tie kien ni devas iri, kien ni devas meti nian kolerkrion kaj peti venĝon".

Tiuj paroloj, prononcitaj kun dolore rezignita mieno, estis por Isengrino kiel bonfara balzamo metita sur la vundoj de sia koro. "Fakte, eblas, li diras, ke mi tro akuzis vin; estas la efiko de mia malmulto da pripenso; mi forgesis la kutimojn kaj leĝojn de nia lando. Via konsilo, damo Hersento, revivigas min. Jes, ni iros meti nian kolerkrion al la reĝo, kaj malbeno al la malloga nano, se li aperos antaŭ la kortumo de niaj pajroj!"

FINO DE LA UNUA LIBRO.

LIBRO DUA

Noto de la eldonisto.

La Proceso de Renardo prezentos alian karakterizaĵon ol la aventuroj pri kiuj li devas esti pentofero. Ne plu estas nur sinsekvo da rakontoj kies la unua formo jam estis en la publika kampo, kaj ofte datumis de la plej malproksima antikveco; niaj trubaduroj ĉi tie montros pli altan kaj malpli kontestablan elpensadon. Konservante al la bestoj ilian agnoskitan personecon, ili kapablos taksu la veran mezuron de la socio de sia tempo, aŭ pli ĝuste de ĉiuj tempoj; ĉar la institucioj ŝanĝas formon, ne la homoj kiuj bone-malbone submetiĝas al la jugo de tiuj institucioj. Estis dum la 12a jarcento, reĝoj, baronoj, burĝoj, kamparanoj aŭ vilaĝanoj, klerikoj, rimistoj kaj artistoj; ni havas ĉiujn ĉi en nia tempo, kaj mi certas ke ĉiuj ĉi estos ankoraŭ longtempe. Petro de Sankta Klodovaldo, la feliĉa genio al kiu ni jam ŝuldis la Partoⁿ de la Leono, kaj la Farmobienoⁿ de Bertono la Urbestro, unue enscenigos sub la aspektoj de Nobla la leono, de Renardo kaj de Hersento, de Isengrino, Lombarto la kamelo kaj Briŝmaro la cervo, la tutan politikan sistemon de sia tempo, la Reĝon, la Kortegon, la Eklezion, la Kavalirojn kaj la Sinjorinojn. Eble oni pli bone konos la verajn formojn de feŭda justico sub la reĝado de Ludoviko la Juna, post esti leginta la Procesoⁿ de Renardo, ol provante akordigi tion kion la modernaj instruistoj provis eduki nin. Ĉi tiu studo ankaŭ povos kontribui por redukti la antaŭjuĝojn kiujn ni kontraŭvole gardas kontraŭ la sendependeco kaj la juĝfirmeco de niaj antaŭuloj; ĉar la aŭtoroj de la romano de Renardo ŝuldis la ĉefan popularecon de siaj rakontoj al la morpentraĵoj pri kiuj ĉi tiuj rakontoj estis la fidela esprimo.

La homoj de religio, transdonante al la postaj generacioj ĉion kion ili neniam skribis, bone erarigis nin pri la kutimoj de la ordinara homoj de sia tempo, kiuj multe agis, sed malmulte skribis. La senfina nombro da piaj libroj kaj acidaj deliraĵoj komponitaj por la monaĥejoj, hodiaŭ lasas nin supozi ke la mezepoko estis speco de granda monaĥejo en kiu oni apenaŭ faris uzon de la penslibereco, aŭ oni vivis nur por pensi pri morto. Sed, reale, ĉiuj ĉi skribaĵoj de alta edifado pasis preskaŭ nerimarkitaj de la ordinara homoj al kiuj ili ne estis destinitaj, kaj la literatura instruado de la jarcento plivole baziĝis sur kantoj pri amo kaj milito, sur fabeloj de la gaja scio, sur la romanoj de Trojo, de Artuso aŭ de Renardo, kies la aŭtoroj, honoritaj kaj festitaj de la reĝoj, de la baronoj, la burĝoj kaj eĉ la klerikoj, sin esprimis per iu libereco pri la homoj kaj pri la aĵoj, kiuj ne estis superitaj. La Proceso de Renardo almenaŭ devigos nin konsenti ke tiam oni sufiĉe bone konis la ĝustan limon de la rajtoj kaj de la devoj, ke la sindefendo ne mankis al la akuzitoj, ke la obstakloj kontraŭmetitaj al la arbitraj tendencoj estis sufiĉe bone kalkulitaj, ke la ŝajnigo de rigida pieco eskapis ne multe pli ol hodiaŭ el la suspekto de hipokriteco, kaj ke koncerne la guston oni ne konfuzas la veran elokventon kun la vana aŭ aroganta babilado.

Oni ankoraŭ povas diri pri la *Proceso de Renardo* ke ĝi estas la komedio de teatro kies la ĝestokantoj estus tragedio. Petro de Sankta Klodovaldo kiu, la unua, enigis la politikan nocion en tiu speco de rakontoj, sekvis paŝon post paŝo, aŭ prefere konkreteme, la aranĝon, la vivecon, eĉ la formojn de nia epopeo; kaj tiu ĉi observado, kies mi ne pensas ke oni povu kontesti la pravecon, jam sufiĉas por senkulpigi la pretendon de la fremduloj al la primitiva elpenaĵo de la plej originala parto de la romano. Oni rekonas en Petro kaj en sia daŭriganto, la tiamulojn de la poetkantistoj de *Gerardo de Rusiljono*, *Oĵiero la dano*, de *Rubusvaloj*⁽⁹⁾ kaj de *Loreno*. La kolerkrio eligita de *Isengrino*, la mesaĝoj proprariske plenumitaj fare de *Belacento*, de *Bruno* kaj de *Tibeta*; la asizo kaj la enketo, la pledadojn de la akuzanto kaj la sindefendoj de la akuzito; la juĝado kaj juĝa batalo, tio ĉio jam troviĝas per pli alta tono en la ĝestoj de *Aspremonto*, *Oĵiero*, *Gerardo* kaj *Garino*. Ne troviĝas ĝis la mortverdikto deklarita kontraŭ *Renardo* kaj anstataŭigita per ĝismorta enŝlosilo en monaĥejo, kiu ne estas sagaca imitaĵo de juĝoj puntruditaj al *Bernarto de Nesilo* kaj al lia nevo *Fromondino*. Finfine la alveno de la *sinsekvo* de damo *Kopeta* en la juĝejo nevole memoras la alvenon de la ĉerko de *Begono* de *Belino* ĉe lia frato *Garino* de *Messo*. Siro *Nobla*, la leono, ja estas *Karlo*, la reĝo kun plumpa barbo, kaj kiam oni memoras pri *Bazino de Ĝenovo*, pri *Ganelono*, pri *Mogiso de Egremonto* kaj eĉ iom de *Renaŭdo de Montalbano*, oni ne povas kontesti ke *Renardo* de *Petro de Sankta Klodovaldo* estas el la sama familio.

Jen multe pri libro tiel malmulte grava : almenaŭ ne estas ĉi tie la loko por klarigi tiujn unuajn kritikajn detalojn. Mi nur aldonos unu vorton : mi ŝatus havi la tempon por reveni al ĝi alian fojon.

9 Ĝi estas mia traduko de la franca komunumo Roncevaux.

31^a Aventuro.

*Kiel la konestablo Isengrino kaj damo Hersento
faris sian proteston ĉe la kortego de la Reĝo.*

Isengrino ne perdis tempon por iri al kortumo kun sinjorino Hersento. Li estis, necesas ne forgesi tion, altrangulo, investita en la domo de la reĝo de la servado de konestablo; oni konsentis ĉefe trovi en li profundan sperton pri ĉiuj kutimoj de la kortego.

Li supreniris la ŝtupojn de la ĉambro kie la reĝo donis aŭdiencon, kaj trovis la grandan kaj plenan kunsidon, provizitan de altrangaj kaj potencaj bestoj, de riĉaj kromvasaloj, ĉiuj pli malpli ŝatindaj. La reĝo sidis en la kurulseĝo⁽¹⁰⁾, kun la tuta digno kiu taŭgis al la supera rango, kaj la baronoj formis specon de glora krono ĉirkaŭ lia persono.

Isengrino, tenanta sian kompaninon sinjorinon Hersentoⁿ per la mano, antaŭenpaŝis ĝis la mezo de la ĉambro kaj rompis la ĝeneralan silenton, laŭtigante kolerkrion laŭ la sekvanta maniero:

"Siro, ĉu ne plu estas fido en la mondo? Ĉu la justico estos malestimata; ĉu la vero devos cedi lokon al mensogo? Vi distrumpetigis ke neniu estonte estu tiom maltima kiom por malrespekti la geedziĝan leĝon; Renardo zorgis nek pri viaj deziroj nek pri viaj ordonoj. Renardo, origino de ĉiuj malkonkordoj, kunaĵo de ĉia malico, sen respekto al la interligoj de amikeco kaj de konateco, malhonoris min tra la persono de mia kara edzino. Kaj ne kredu, siro, ke blinda penso de malamo kaj de rankoro min kondukas al vi: la kolerkrio kiun mi alportas al via kortumo, estas bedaŭrinde nur tro prava, kaj damo Hersento tuj subtenos ĝin per sia atesto".

"Estas vere, siro, tiam Hersento diras, kun la okuloj mallevitaj, la vizaĝo vualita pro konfuzo, ekde kiam mi estis sufiĉe aĝa por edziniĝi, Renardo tedis min per siaj strebadoj. Mi ĉiam evitis lin, mi montris la plej konstantan malestimon de liaj petadoj kaj de liaj petegoj, kiam, la alian tagon, akompanante al ĉaso mian noblan edzon, mi havis la malbonŝancon alveni antaŭ lia loĝejo. Tie, mi troviĝis tiel perdita

¹⁰ Mi ne trovis ĝin en PIV. Ĝi estas faldoseĝo el eburo rezervita por romiaj juĝistoj zorgantaj pri la plej altajn oficojn. La franca vorto estas "faudesteuil" aŭ "siège curule".

en la pasejoj de lia hotelo, en kiuj mia korpulenteco senigis min je la libereco elŝoviĝi, ke damo Renardo kapablis frapi min, superŝuti min per la plej malpli merititaj insultoj, en la ĉeesto, kaj tie estas tio kio duobligas mian honton, de mia edzo mem".

Ŝi silentis, sed tuj Isengrino : "Jes, siro, vi ĵus aŭdis la veron. Kaj nun, kion vi opinias ? Ĉu Renardo estis kontraŭ rajto kaj saĝo ? Mi do eligas kolerkrion kontraŭ li, kaj petegas vin transdoni la kazon al viaj baronoj, por ke justeco estu redonota al mi. Mi aldonos tion kion damo Hersento ne diris, kaj tion kion ŝi ne kontraŭdiros. Renardo venis antaŭ kelka tempo veki kverelon al miaj filoj en mia propra hotelo; li malpurigis ilin per sia fekaĵo, batis, distaŭzis, nomis ilin bastardojn kaj filojn de forlasitino. Li senhonte mensogis pri tio. Sed kiam, retrovante lin por ĉi tiu malbenita ĉasado pri kiu sinjorino Hersento parolis al vi, mi riproĉis al li sian abomenan konduton, li neis ĉiujn faktojn kaj proponis al mi veni kaj elpurigi sin per ĵuro, en ia ajn loko kiu plaĉu al mi indiki. Mi do konkludas, siro, demandante ke la kazo estu akceptata, ke estu juĝo, por ke oni ne vidas tiajn krimegojn renoviĝi en la estonteco".

Isengrino revenis al sia lokon. Siro Nobla, kun la kapo iom klinita, ŝajnis voli subpremi rideton : "Konestablo, li diras, ĉu vi havas ankoraŭ ion por aldoni ? - Ne, monsinjoro, krom ke, por mia honoro, mi ne publikigus ĉi tiun kverelon, se mi havus la elekton de la rimedoj; sed la ofico kiun mi plenumas en la ŝtato, ne permesis al mi doni la ekzemplon de la malobeco de viaj ediktoj, farante justecon al mi mem; afero kiu estus facile por mi. - Hersento, rekomencis la reĝo, respondu viaŭce. Vi venis ĉi tien por rakonti al ni ke grandsinjoro Renardo deziregis vin, sed vi, ĉu vi neniam amis lin ? - Mi, siro ? Ne. - Kiel do okazis ke, ne estanta lia amikino, vi havis la malbonan ideon ekvojiri al lia loĝejo ? - Pardonu, siro, tio ne estas ĝusta, kaj vi povus pli bone paroli. Monsinjoro, la konestablo, kiun ja certe oni povas kredi, diris al vi ke li estas kun mi, dum la momento kiam mi havis por plendi pri la agmanieroj de Renardo. - Ĉu li reale estis kun vi ? - Tute sen dubo. - Tiam, kiu iam povos akcepti ke nano kiel Renardo senpune ofendegis vin, en la ĉeesto de via barono ?"

Isengrino vigle stariĝante : "Siro, vi ne devas ĉi tie defendi nek lin

nek mi. Sufiĉas al vi aŭskulti mian kolerkrion, akcepti ĝin kaj agi tiamaniere ke ĝi estu konsiderata aŭ rifuzata. Mi alvokas Renardoⁿ antaŭ la justico, kaj kiam li aperos, estos al mi nur tro facile konvikti lin pri ofendego kaj pri perfido koncerne mian edzinon, miajn infanojn, kaj min mem".

Estas trafe rimarki ĉi tie ke monsinjoro Nobla le reĝo nature emis ne lasi sian kortegon scii la deliktojn kies la amo estis la okazo aŭ la preteksto; tiel longe ĝis li vidis esperon repacigi tian kverelojn, li rifuzis preni promeson de batalo. La kolerkrio eligita de Isengrino estis do tre malagrabla al li. Li plie diras : "konestablo, por nenio en la mondo, mi volus vidi la batalon komenciĝi inter vi kaj Renardo la nano. Ŝajnas al mi ke oni povus trovi rimedon por reamikigi vin. - Ŝajnas al mi, siro, respondis Isengrino, ke vi subtenas la kazon de mia malamiko. Sankta Maria ! Vi tamen pli prave ekzorgus mian kverelon ĉar mi ĉiam servis vin pli bone ol Renardo. Sed mi vidas tion : se mi estus kiel li, malsincera, perfida kaj malfidela , mi trovus grandan favoron ĉe vi. Per mia muzelo ! Vi bedaŭrigas min pri ĉiuj miaj malnovaj rezignoj, kaj mi iom malfrue ekkomprenas pri la vero de la proverbo : Kia la moŝto, tia la luprezo".

La reĝo kiu senpacience aŭskultis lin, noblece respondis : "Jes, mi ne kaŝas tion, mi senkulpigus Renardo", se la amo estis la kaŭzo de liaj malbonagoj. La ĉagreno kiun li kaŭzintus al vi, por la bono de lia pasio, ne farus lin estimi pro tio malpli ĝentila kaj malpli lojala. Tamen, ĉar vi volas tion, oni asignos lin, oni ekzamenos la aferon kaj oni traktos ĝin laŭ la kutimo de mia kortumo; ekde tiu momento mi akceptigas la kazon".

32^a Aventuro.

Kiel monsinjoro Kamelo, la legato, faris pri la protesto de Isengrino sciplenan paroladon kiu ne estis komprenita de ĉiuj.

Kaj pri la sekreta konsilio de la baronoj, en kiuj aŭdiĝis Briŝmaro, Bruno, Belacento, Pleto la damao kaj Kuintraŭ la simio.

Tiun tagon, inter la konsilianoj de la reĝo, troviĝis monsinjoro Kamelo kies la kortego alte estimis la saĝecon. Li naskiĝis proksime de Konstantinopolo, kaj la Apostolo, kiu tenere amis lin, sendis lin de Lombardio al la reĝo Nobla estiel legato. Li estis leĝisto kun granda aŭtoritato. "Majstro, diras al li la reĝo, ĉu vi havas rememoron pri tiaj protestoj esprimitaj kaj akceptitaj en via lando ? Ni ja ŝatus havi pri ĉi tiu punkto vian opinion". La Kamelo tuj ekparolis :

"Quare Messire me audité ; nos trobames en decret, à la Rebriche de matremoine violate, primo se doit essaminer, et se ne se puo este purgar, le dois grevar tu ensi que te place, perché grant meffait ha fatto. Hec e la moie sentenza ; et sel vuol tornar en amendance, je dis que si puo prender molto de la pecune, ovvero lapidar ou ardre lo corpo de l'avversari de la Renarde ; et si vo di, buon Rege, que nus ne deit vituperar la lei, et que l'en deit toute jorno ben et dreitement judicar, si com fece Julius Cesar l'empéreres. Et ensi fais, bon signor, ce que juger dois, quar non es bone rege, se ne vuol far de droit tort. Vide bon favela, et tene toi par la tue baronie, car autrement cure n'aras de roialta, et tu ne pas estar bon rege : Favellar come ti plaira, che plus n'en sa ne n'en vuol dire" ⁽¹¹⁾.

Ĉi tiu parolado estis diversemaniere akceptita de la baronoj. Tuj murmuris pri tio, aliaj ridis pri tio. Siro Nobla gardanta sole sian tutan seriozecon : "Aŭskultu min ĉiujn, baronojn kaj altrangulojn, mi

11 Suka franca-itala slango, punktita de latina... (kaj do kiun mi ne sukcesi traduki). Temas fakte pri atako kaŭzita al la respekto ŝuldata al la geedzeco, kaj tie estas punkto kie la Sankta Eklezio estas aparte interesiĝanta kaj kompetenta. La legato bonvole akceptas : "Quare, mesire, me audite...

Kaj de lia amuza ĵargonaĵo, aperas ke estas oportune atente ekzameni la aferon kaj, se Renardo kulpas, li devas esti traktata kun alta severeco. Ne pli da elturniĝo por Nobla kiu evidente sentas inklinon por la vulpo.

donas al vi por juĝi aferon de amdelikto. Vi devos unue decidi ĉu, por deklari kondamnon, oni povas akcepti la ateston de la persono kiu partoprenis en la kulpo". Ĉi tiujn vortojn aŭditajn, ĉiuj stariĝas kaj la plej saĝaj iras, elirante el la reĝa pavilono, estiĝi en konsilio.

Briŝmaro la cervo komprenanta la gravecon de la kazo, konsentis gvidi la diskuton. Ĉe lia dekstro sin lokis Bruno la urso, konata pro sia malamo kontraŭ Renardo, ĉe lia maldekstro, Belacento la apro.

Belacento ne estis partia, li volis nur aŭskulti rajtecon kaj justecon. Jen do ili kuniĝintaj, sidantaj kaj pretaj por komenci la esploradon de la afero.

Briŝmaro, preninte la opinion de Belacento, petis por paroli : "Sinjoroj, vi aŭskultis la proteston de Isengrino kontraŭ Renardo. La kutimo de nia kortumo, kiam oni venas postuli al ĝi la punon de eraro, estas neprigi pruvon de triulo; fakte, tiu hodiaŭ mem povus eligi proteston kies estus viktimo la plej senkulpa besto. Ni venu al la atesto de sinjorino Hersento : ŝi estas virino edzinigita de Isengrino, ŝi loĝas kun li, ŝi estas tute submetiĝinta al li; ŝi ne povas paroli aŭ silenti, iri aŭ veni sen la bontrovo de sia barono; ŝia atesto ne povas do esti sufiĉa, necesas peti al la akuzanto pli liberajn kaj pli senprofitemajn aliojn".

"Per Dio ! Sinjoroj, tiam diras Bruno la urso, mi ne kapablas, kiel juĝisto, aprobi la parolojn kiujn vi ĵus aŭdis. Ne temas ĉi tie pri senfamulo, ordinarulo : Monsinjoro konestablo rajtas sen ajna dubo esti kredita laŭ lia parolo. Ho ! se la plendanto estis malbona knabo, minestra rabisto aŭ vojŝtelisto, la subteno de lia edzino ne estus niaopinie grandpeza; sed tia estas la aŭtoritato de la nomo de Isengrino ke li devus esti kredata, eĉ se li ne havus alian atestanton de sia parolo ol si mem".

"Monsinjoro Bruno, diras siavice Belacento, sendube pravas; ne estas iu ĉi tie kiu estus preta ĉion kredi pri tio kion asertas monsinjoro Isengrino. Sed nun, la vera malfacilaĵo estos decidi kiu estas la plej kredebla inter tiu kiu asertas aŭ tiu kiu neas. Se vi diras ke la plej bona barono estas monsinjoro konestablo, Renardo respondos ke, eĉ sen okupi la saman oficon, li estas nek malpli lojala nek malpli fidinda. Ne necesas ĉi tie konsideri la meriton aŭ la

dignecon de la persono; alie, vidu tion kio okazus : ĉiu povus eligi proteston, proponante sian edzinon kiel atestantulinon. Oni dirus : Iu ŝuldas al mi cent soldojn, mia edzino atestas tion, do la ŝuldo estas reala; kaj tre honestaj uloj povus tiel esti kondamnitaj. Ne, neniam mi aprobos tian manieron procedi. Siro Bruno, ke li permesu al mi diri tion, ne estas ĉi tie en la vero, kaj mi opinias kiel grandsinjoro Briŝmaro; ne eblis paroli per pli saĝa, pli sagaca kaj pli vera maniero".

Nun Pleto la damao petis por paroli. "La protesto ankoraŭ koncernas alian aferon : Isengrino akuzas Renardo" esti forpreninta siajn proviantojn, esti malpuriginta siajn lupidojn, esti batinta ilin, distaŭzinta, nominta ilin bastardoj. Nu tiaj eksceso postulas pezan admonon, se ni ne volas ke ili senĉese renoviĝu".

"Vi prave diras, reparolis Bruno, kaj mi diras pli : honton kaj malhonoron al tiu kiu defendos Renardo" ! Kiel ! Oni povus malglori iun saĝulon kaj ekposedi lian posedaĵon kiel rajtan alproprigon, kiel trovitan riĉaĵon aŭ perditan trezoron ! Mi plendus la reĝon se li tiel forlasus la kazon de siaj baronoj; sed, finfine, mi ne estus alie surprizata. Ĉar '*por tia peco, tia kulero*', kaj '*la kato ĉiam bone scias kiajn barbojn ĝi lekas*'. Mi pri tio diras nenion pli; se ne ke monsinjoro la reĝo, malgraŭ lian gracon, ne faris al si multe da honoro ridante dum la protesto de Isengrino, kaj decidiĝante al senvalora kaj malestiminda flatulo kiel Renardo. Lasu min, sinjoroj, pri tio, rakonti al vi kiel mi mem iam estis trompita de tiu rimarkinda fripono. La rakonto ne estos longa.

"Renardo faris la malkovron de grandan vilaĝon nove konstruitan : li estis ĉe la rando de la arbaro rekoninta la domon de kampulo, abunde provizata de brutoj kaj proviantoj : estas ĝi ke li elektis kiel celon de siaj noktaj butikumadoj. Ĉiutage li revenis al Mopertui kun unu el tiuj kompatindaj bestoj, post esti surloke manĝinta alian. Tio daŭris tutan monaton. Fine, la kampulo reprezalie aranĝis siajn hundojn, kaŝis en la vojoj kaj en ĉiu el la aleoj de la arbaro, ĉiajn kaptilojn, maŝkaptilojn, enfalulojn, allogaĵojn, retojn kaj baskulkaptilojn; tiel bone ke Renardo, blokita de tre proksime, ne plu kuraĝis eliri el la ŝirmejo kaj ekvojiri al la farmejo".

"Sed tiam li memoris ke mia alta staturo kaj mia impona aspekto rekonigis min ĉie, dum sia staturo malalta kaj maldika ebligis lin eskapi. Li pensis ke se oni surprizus nin kune, oni taksus min pli grave, dum li evitus la serĉadon kaj la persekuton de la kampulo kaj de siaj hundoj. Kaj ĉar li scias ke mielo estas la afero kiun mi plej ŝatas en la mondo, li venis al mi, estos unu jaro je la Sankta Johano. - Ha ! Siro Bruno, li diris al mi, mi konas belan poton da mielo ! - Kie ĝi estas, kie ĝi estas ? mi demandis. - He ! ĉe Konstanto Delanuksoj. - Ĉu mi povos meti la kapon en ĝi ? - Jes vere, venu nur kun mi".

"Kaj ekde la sekva nokto, ni estis palpantaj la terenon, por alveni al la Farmobieno. Ni antaŭeniris paŝon post paŝo, metante piedon nur post esti atente rigardintaj ĉu neniu sekvis la saman spuron. Ni trovas la pordeton malfermitan, ni eniĝas tra la malgranda eniro, kaj por nenion riski, ni restas kelkan tempon sen movado en la brasikoj. Estis interkonsentita ke unue ni irus al la poto, ni rompus ĝin, ni manĝus la mielon kaj ni revenus. Sed Renardo, pasante antaŭ la kokejo, ne sukcesis sin deteni grimpi tien kaj ekigi la alarmon inter la kokinoj. Ili elligas akutajn kriojn; la vilaĝo emociiĝas, la kampuloj alkuras de ĉiuj flankoj, oni rekonas Renardo" kaj ĉiu huadas, plej bone kuras al li. Vi komprenas ke en tiu momento, mi spertis kelkan timeton : mi plengalope fuĝis; sed ĉar Renardo sciis multe pli bone la ĉirkaŭvojojn kaj la rifuĝejojn, tiuj kiujn li arigis, rekonante min tuj forlasis lin por fermi al mi la trairejon. Mi tiam vidis lin, la perfidulo, forfuĝi : - He kio ! Renardo, mi diris al li, ĉu vi povas ja lasi min sola en embaraso ? - Vere, bela siro Bruno, li respondis, ĉiu faras sian plejbonon; mi forkuras, 'la bezono trotigas maljunulinoj'. Ek ! laboru por elturni vin sendamaĝe; kial vi ne havas rapidan kurĉevalon kaj pikan spronojn ? Estas via kulpo se la kampuloj fine metos vin en sia peklujon. Ĉu vi aŭdas ilian bruegon ? Se via felo estas tro varmiga, kalkulu kun ili, ili malŝarĝos vin de tio. Pri mi, mi iras al kuirejo, pretigi honore al vi la kaponinon kiun mi forportas; sed mi forgesis, grandsinjoro Bruno, kun kia saŭco vi volas ĝin ? Tio dirita, la perfidulo elŝteliĝas kaj lasas min en la urĝeco. Ĉu oni iam vidis, diru al mi, pli

abomenindan mokemulon ?"

"Tamen la bruo fariĝas timiga, la kampuloj ĉirkaŭas min, la hundoj ĉirkaŭbaras min, mi sentas la denton de iuj kaj la sagon de aliaj. Mi komprenas la danĝeron kaj decidiĝas netimi ĝin. Mi revenas al la laniarioj, mordas ilin, ŝiras ilin, faligas ilin unun sur la alia. Neniam ĉasistoj pli bone renkontis reziston. Kvankam trapikitaj de cent dornoplenaj sagoj, la hundoj ne kuraĝis tuŝi min, kaj mi devigis la kampulojn lasi min mastri la bataalkampon. Sed estis nur dum momento; dum neniu el ili plu aŭdacis atendi min, mi trafis unu al kiu mi aperigis la tremetantajn internaĵojn. Mi plugis lin per miaj piedoj kaj per miaj dentoj, li eligis lastan suferegan krion, kiam bedaŭrinde, alia alvenante de malantaŭe, pafsendis sur la nukon baton de klabo kiu ŝancelis kaj faligis min. Hundoj kaj kampuloj ĉiuj denove revenis : mi sentas la ĉirkaŭpremado de la dentoj, la ferpinton de la lancoj, la pluvon da ŝtonoj kaj da sagegoj. La laniarioj falis, senĉese revenis. Fine mia sanga korpo estis nur vundo, mi decidiĝis reveni al la arbaroj. Oni ne kuraĝis persekuti min; mi malrapide direktis min al la unua densejo, kaj de tie mi baldaŭ troviĝis meze de miaj proprietaĵoj".

"Tia estas la bela servo kiun Renardo faris al mi. Mi ne pretendas elvoki proteston, mi nur volis montri per ekzemplo, kia estis lia maniero procedi. Hodiaŭ grandsinjoro Isengrino metas plendon kontraŭ li; la alian tagon estis Tiselino kiun li inside elsuĉis, kaj kiun li volis meti en sekuran lokon. Tiberto la kato respondecigas lin pri la vosto kiun li perdis, kaj sinjorino Paruo, lia propra babilulino, rakontos al vi kiel li volis formanĝi ŝin, proponante al ŝi kiel alia Judaso, la pacan kison. Necesas fine puni tiom da malbonfaroj; estas la senpunecon kiu sola sukcesis doni al li tiom da aŭdaco".

Al tiu longa parolado, Belacento petas permeson respondi per malmultaj vortoj : "sen atenci vian gracon, monsinjoro Bruno, ni ne povas subite fini la kazon kiun ni devas taksi. La protesto de Isengrino ne jam publikiĝis; kaj certe ja necesus grandan saĝecon por juĝi, laŭ rajto kaj prudento, kazon en kiu ni aŭdintus nur la akuzanton. Ni aŭskultis la plendon, ni devas aŭskulti la defendon. Kiu nin urĝigas ? Ĉu Romo estis farita en unu tago ? Kaj mi ne parolas por la

bono de Renardo aŭ por tiu de Isengrino; sed ĉu ni ĉiuj ne devas deziri antaŭeviti publikan interbatiĝon antaŭ la kortumo ? Necesas pridemandi ĉiujn ambaŭ kaj aŭdi ilin : kiam Renardo ĉeestos kaj ke la kazo estos diskutita, ni klare vidos kian punon decas postuli de la kulpa partio".

"Jes, diris Kuintraŭ, la simio, kaj la diablo kaptu tiujn urĝemajn homojn kiuj volas juĝi sen atendi la kialo. - Por vi, Kuintraŭ, rebatis Bruno, vi mirigos nenuin, se vi partianiĝas kun Renardo; vi havas la saman specon de agmaniero. Renardo jam sin tiris el plurajn embarasojn, li eliros el tiu ĉi, se eĉ malmulte ni rilatas al vi. - Nu, mastro, respondis la simio farante unu el siaj plej belaj paŭtoj, almenaŭ diru al ni kiel vi pravigus tiom hastan juĝon. - Per sankta Riĉero ! diris Bruno, ne ekzistas kortumo en la mondo kie mi ne estu preta deklari ke la tuta malbono devenas de Renardo kaj ke Isengrino pravas akuzi lin. Ĉu ni bezonas pruvojn kiam edzino kaj la edzo konsentas por postuli justecon ? Decus do komenci per certiĝi pri la personeco de la kulpulo, alkonduki lin kun manoj kaj piedoj ligitaj, ĵeti lin en malliberejon aŭ karceron, vergi lin kaj kripligi lin por malhelpi lin iam insulti aliajn noblajn matronojn. Estas tiel ke ĉie ofendego estas punita; kaj la sankcio de krimo estas severa, eĉ kiam temas pri virino komuna, forlasita. Ĉu ni ne montros nin pli indulgemaj kiam la viktimo estas virta kaj nobla edzino kiu neniam sin konsolos pro la insulto kiun ŝi suferis ? Ĉar fine, ne prezentiĝos al ies penso ke Isengrino metis ĉi tiun proteston, se la ofendo ne estis tiel klara kiel la tago; kaj kia ne estus lia honto, se nun ni rifuzis justecon al li ?

"Vere ! respondis Kuintraŭ rikanante, estas stranga ke, pro speco de puntilio, oni klopodas por evidentigi antaŭ la okuloj de ĉiuj sian propran honton. He, Dio mia ! se Renardo faris tion kion oni riproĉas al li, al ĉiu pekanto kompaton, kaj nia devo estas akomodi la partiojn. KREDU MIN, cetere, la lupo ne estas tiel granda kiel oni pensas, kaj Renardo malmulte timas lin; li scias ke pluveto ofte malvigligis grandan venton. Li venos, pri tio mi estas konvinkita. Pri monsinjoro Bruno, parolante tiel longe, li vere perdis bonan okazon silenti".

Grandsinjoro Briŝmaro estis el tro granda saĝeco por daŭrigi ĉi

tiujn kruelajn ŝercojn. Klare resumante do la debaton : "Sinjoroj, li diris, ni devas pripensi nur fiksi tagon por akordigi la partiojn. Renardo proponis ĵuri, ni ordonu al li plenumi tiun promeson. Tiel same, kiel Belacento saĝe rimarkis tion, oni ne povas pledi okaze de murdo aŭ de morta ofendego, ĝis kiam la fakto ne estas eksterduba. Kaj ĝis tiam ni devas provi kvietigi la kverelon. Sed necesas anticipi surprizon kaj miskomprenon. Tuj la ĵuro plenumita, povus okazi ke la reĝo forestus el la lando; tiam antaŭ kiu starus la tribunalo ? Ŝajnas al mi ke Ronjauso, la hundo de Froberto de La Fontano, povus esti nomumita kiel juĝpovo. Li estas honesta persono, el ekzempla pieco; la elekto estus aprobita de ĉiuj". Ĉi tiu propono estis akceptita de ĝenerala aplaŭdo, la kunsido estis deklarita finita, kaj la konsilantoj revenis al la reĝo por raportoj pri tio kio oni tie decidis.

33a Aventuro.

*Kiel Briŝmaro, la seneskaldo, raportis al la reĝo Nobla
pri la konkludoj de la Konsilio,
kaj kiel Grimberto estis komisiita kunvoki Renardo".*

Briŝmaro, al kiu alfalas la honoron raporti la paroladon, faris tion laŭ bona retoriko : "Siro, li diras, ni informiĝis pri la kutimoj de la tero pri tio kio tuŝis la estanta afero. Ni retrovis ilin kaj mi tuj, anstataŭ ĉiu alia, prezentos ilin, sen atenci vian gracon". La Leono turnante la vizaĝon al li faris signon de konsento; kaj Briŝmaro, post esti klininta sin, daŭrigis laŭ ĉi sekva maniero :

"Aŭskultu min, sinjoroj, kaj riproĉu min se mi ne bone diras. Ni unue rekonis ke la protesto de Isengrino devas esti akceptita kaj ke ni plenumos ĝin; sed se li pli bone volas pruvi la justecon de sia kazo, li devos prezenti, en difinota tago, trian atestanton de la faktoj kies li postulas venĝon. Poste, ni estigis ke la atesto de lia edzino tute ne valoris kaj ne povis doni al li ia ajn avantaĝon. La punkto estis vigle diskutita inter Bruno kaj Belacento; sed la konsilio ŝajnis decidiĝi al la decido kiun mi ĵus submetis. La afero cetere estas aranĝita tiamaniere ke neniu rajtu plendi. Dimanĉe, fine de la meso, Renardo plenumos la ĵuron kaj, tujtuj, la juĝado estos plenumota antaŭ Ronjauso, la laniario. Kia ajn ĝi estu, ambaŭ partioj devos akcepti ĝin kaj konsenti reciprokan repaciĝon".

"Per la sanktaj lokoj de Bet-Leĥemo ! gaje diras la reĝo, mi donintus pli ol mil pundojn por esti tiel liberigita de ĉi tiu malagraba afero. Jen do kiu estas bone aŭdata : la kortumo kunvenos dimanĉon, ĉe la fino de la meso, antaŭ la virta Ronjauso, hundo de Froberto de La Fontano. Kaj Renardo ne estanta jam sin prezenti, mi baldaŭ asignigos lin per Grimberto, la melo, por veni post la procesio plenumi ĵuron aŭ reagi al ĉiuj faktoj kies Isengrino plendis".

Post ĉi tiu parolado, ĉiuj silentis, la ĉeestantaro stariĝis kaj ĉiu revenis al sia sinjordomo. Grimberto siaflanke ne perdas unu momenton por siaj preparoj de foriro : li ekvojiras, alvenas al

Mopertui, trovas tie Renardoⁿ kaj detalias al li kiel la baronoj kaj la grafoj prokrastis lin por la ĵurado kaj por la pledado kiu estos plenumata sub la prezidanteco de Ronjauso, kaj kiel la reĝo vokas ke li troviĝu tie. Renardo respondas ke li nenion deziras pli bonan, ke li obeos, kaj ke li antaŭtempe estas preta konformiĝi al la konsidero aŭ verdikto de la kortumo.

34a Aventuro.

Pri la profiteza vizito de Isengrino al Ronjauso la laniario.

Grimberto malproksimiĝas kaj lasas Renardoⁿ konfidantan al sia fortune kaj al siaj ruzaĵoj. Li scias ke li havas multajn malamikojn, sed li tute ne zorgas por revenigi ilin al li, tiom li malamas kaj malestimas ilin ĉiujn. Isengrino ne tiel preterlasas la aferon kaj, tri tagojn antaŭ la juĝo, li iras trovi Ronjausoⁿ kiam li dolĉe ripozis sur lito el pajlo antaŭ la ĉirkaŭbaritejo de Froberto de La Fontano. Unue li ne certis ke estu tre prudente ĝeni lin; sed Ronjauso, konsiderante la interpacojn, signis al li konfide alproksimiĝi; Isengrino bonvole akceptis. "Mi tuj diros al vi, li eligas al Ronjauso, la temon de mia vizito. Mi bezonas bonan konsilon; mi estas militanta kontraŭ Renardo kies vi konas la multnombrajn malbonfarojn. Mi metis proteston kontraŭ li, la kazo estas akceptita, oni fiksas tagon, dimanĉon post la meso Renardo devas aperi antaŭ vi, ĉar la kortumo elektis vin por direkti la pledadon. Sed antaŭ la debatoj, Renardo devos purigi sin per ĵuro. Tio sendube malmulte kostos al li; mi do venas plorpeti vian amikecon, por gvidi la aferon por konfuzi lin. Kaj unue, kie ni devas serĉi la sanktejon sur kiu li devos ĵuri? La punkto havas gravan konsekvencon kaj, mi konfesas tion al vi, ĝi iomete embarasas min. - Per mia fido, diras Ronjauso, vi trovos en ĉi tiu vilaĝo sufiĉe da sanktuloj aŭ da sanktulinoj, kaj vi bezonos nur elekti. Sed aŭskultu; se Briŝmaro volus plenumi la rolon kun justeco, oni provus ion pli bonan. Mi ŝajnis min morta, mi kuŝiĝus en fosaĵo ekster la vilaĝon, vi disvastigus famon pri mia edifa fino, kaj kiam oni venus levi mian korpon, oni trovus min kuŝanta sur la dorso, kun makzeloj malfermitaj, lango elŝovita. Vi kunvenigus la konsilianaron ĉirkaŭ mi, kaj Renardo veninta, vi deklarus lin kvitigata pri ĉio, kondiĉe ke li konsentu ĵuri sur mia dento ke li neniam ofendegis vian edzinon. Se li starus sufiĉe proksime al mia kapo por ebligi min kapti lin, li povos fanfaroni ke neniam sankta korpo pli bone retenis kaj mordis. Kaj se, divenante la insidon, li rifuzus antaŭeniri ĝis la

sanktejo, li gajnos malmulte da afero, ĉar mi embuskigos pli ol kvardek laniariojn el unua forto. Aŭ Renardo estos pli ol diablo, aŭ li ne eskapos el miaj sanktrestaĵoj iuflanke, kaj el miaj bonaj amikoj aliflanke. Dio vin gardu, Isengrino ! Pensu bone aranĝi ĉion, mi zorgos pri la ceteron".

35a Aventuro.

*Pri la parlamento de Isengrino kun ĉiuj liaj parencoj kaj amikoj,
kaj pri la alveno de la du baronoj kaj iliaj aliancanoj,
en la ĉeesto de sankta. Ronjauso.*

Isengrino multe aprobis la penson de Ronjauso. Tute ĝoja pro la vizito, li adiaŭas sian helpanton, reiras al la arbarego kaj ekserĉas siajn amikojn. Li ne sendas al ili mesaĝon, sed mem iras al ilia hejmo, en arbaroj, en ebenaĵoj, en montaroj. Baldaŭ alvenis al sia sinjordomo Briŝmaro, la seneskallo, kun fiera kapo, memfida paŝado; grandsinjoro Bruno, la urso; Belacento, la apro; Musarto, la ĉamo; la leopardo, la tigro, la pantero; la sorĉisto Kuintraŭ antaŭnelonge alveninta el Hispanio, kiu sen malmulte zorgi pri iu aŭ alia el la pledantoj, iris tamen scivole loki sin ĉe la flanko de Isengrino. "Sinjoroj, diris tiu ĉi al ili, mi kunvenigis vin ĉiujn esperante trovi bonan helpon en vi". Ĉiuj tiam, fremdaj aŭ familiaraj, parencoj aŭ amikoj, devontigas sin ne disiĝi antaŭ ol atingi por li kompletan kontentiĝon. Tiaj do estis la subtenoj de Isengrino. Renardo, siaflanke, povis kalkuli kun tiom da defendantoj de sia kverelo. Lia standardisto estis Foino, la putoro; Tiberto, la kato, sekvis de proksime, li ne ŝatis Renardoⁿ sed li estis katenita de la devoj de parenceco; Grimberto, posedanto de la skoldo, ne povis ankaŭ kiel rekta kuzo rifuzi sian subtenon. Ruseluto, la sciuro, alvenis trotante, poste Gento, la marmoto, Kurta, la talpo, grandsinjoro Fava, la rato, grandsinjoro Kovardo, la leporo, la lutro, la mustelo, Kojpo la kastoro, la erinaco, la ermeno; la formiko, fiere kaj unu el la unuaj, venis certigi la helpon de siaj brakoj al Renardo; grandsinjoro Bubaĉo, la kuniklo, li pardonpetis ĉar veni en tia kunveno donis al li tro da maltrankviloj, kaj oni konsideris lian motivojn de sindeteno.

Renardo rapidis konduki ĉi tiun noblan kompanion en la ĉirkaŭaĵoj de la vilaĝo kie la pledado devis okazi. Isengrino kaj ĉiuj siaj amikoj antaŭis ilin. Komence estis kelkaj malfacilaĵoj; sed oni fine konsentis ke Isengrino okupus la valon kaj Renardo la montaron. Inter la du

partioj, en la fosaĵo, grandsinjoro Ronjauso, kun la kolo ŝrumpita kaj la lango elŝovita, movis nek piedojn nek kapon. Je kelka distanco kaj kaŝintaj per fruktarbejo stariĝis ĉiuj amikoj kiujn oni scias; ili povis esti cento, nur ĉashundinoj, nur laniarioj, ĉiuj vigligitaj de la samaj sentoj kontraŭ la malamiko Isengrino.

36a Aventuro.

Kiel grandsinjoro Renardo havis skrupulojn de konscienco kaj ne volis ĵuri sur la dento de sankta Ronjauso.

Briŝmaro, elektita de komuna konsento kiel la Parolanto de ĉi tiu unua kunveno, starigante sin sur siaj piedoj : "Renardo, li diras, vi devas iri renkonte al tio kion Isengrino asertas kontraŭ vi; alproksimiĝu kaj faru senhezite la promesitan ĵuron. Ni bone scias ke oni povus rilati al via simpla aserto sen devigi vin atestigi la sanktajn restaĵojn. Tamen, almenaŭ konvenus ke vi ĵuru, sur la dento de sankta Ronjauso, la grumblulo, ke vi neniam trompis Isengrino", ke vi ne insultis vian bo-onklinon, kaj ke oni ne rajtas pridubi vian honestecon kaj via lojalecon".

Renardo starigas sin surpiede (*à son tenir?*), faldas la voston de sia mantelo, pozas kaj fiere sin pretigas por ĵuri tion kion oni petas al li. Sed, koncerne ruzojn kaj insidojn, Renardo ne havis majstron. Li do ekkonsciis ke la paŝoj estis observataj; li divenis, ke Ronjauso estis ankoraŭ en la mondo, pere de la batado de liaj flankoj kaj de lia reakirado de spiro. La movo kiun li tiam faris malantaŭen, ne eskapis al la okulo de Briŝmaro : "He ! Kio estas, Renardo ? li diris al li, ĉu vi hezitus ? Temas nur meti vian dekstran manon sur la denton de Sankta Ronjauso. - Siro, respondas Renardo, mi scias ke prave malprave mi devas plenumi la decidon, tamen mi kredas vidi ion kion vi ne suspektas kaj kies mi devas informi vin. - Ne, ne, respondas Briŝmaro, mi ne akceptas vian ekskuzon, necesas ĵuri aŭ submetiĝi al la kondamnoj kiujn ni verdiktos kontraŭ vi".

Bonŝance grandsinjoro Grimberto, la melo, ankaŭ malkovris la perfido, sed ne volante sin riski kontraŭ la malamo de tiom da potenculoj, li ekpensis lertan elturniĝon. "Sinjoro, li diris, la saĝeco volas almenaŭ ke Renardo ne devu sin defendi kontraŭ la premateco, kaj ke oni ne lasas sufoki baronon el lia rango per homamaso kiu surfalas sur lia dorso. Malproksimigu la ĉeestantojn por lasi al la nobla akuzato la senĝenecon por alpaŝi al sanktejo. - Efektive, diras

Briŝmaro, kaj mi ne pensis tion; jes vi pravas, grandsinjoro Grimberto; mi tuj liberigos la vojon". Samtempe, li donas la ordonon por forigi la homamason antaŭe, malantaŭe kaj ambaŭflanke. Renardo kaptas la favoran momenton; li returne iras, kaj anstataŭ halti ĉe la sanktejo, li ekĵetas sin plenrapide en la trairejon kiun oni ĵus malfermis al li; li transiras la monton kie siaj tutaj familianoj ariĝis, malaperas en gorĝo kaj trapasas malnovan fervojon, dum krias, blekas kaj jelpas la amikoj de Isengrino kaj dum la hundoj aranĝitaj de Ronjauso pafiĝas kiel tiom da plumizitaj sagoj laŭ liaj spuroj.

37a Aventuro.

*Kiel la amikoj de sankta Ronjauso, indignigitaj de la forkuro
de grandsinjoro Renardo, persekutas lin,
kaj kiel la konestablo Isengrino ĵuris renovigi sian proteston
en la venonta asizo.*

Koni la nomon de tiuj sindonaj laniarioj ? Estis unue Ronjauso, tuj restariĝinta el la kavaĵo; estis Espilarto la hundo de la riĉa kampulo Moberto; poste Harpino, Moranto, Bruie, Egrilarto, Bufraĉo, Malemo la hundo de Ĝilano, edzino de Everardo la drapisto; Afeteuso, Gorfoso, Tirano, Rŭaleto, Lovelaso, Amirano, Klarmonto, Galiniero la hundo de Makarto de Rivo, Kornebuo, Herbeloto, Friarto, Brizegoto, Frizanto, Vŭazie, Leoparto, Braĝo, Kurtino, Rigoto, Pasaslupo, Gracilulo, Luprezo, Preterpaso, Silarto, Bakularto, Esturmio la hundo de siro Tiberto de Fresno, Pintvostanaso, Ŝapeto, Pasturo, Esturo, La Dupo, la pudelo Skraplando, Malfloro, Violo, Birdeto, Grajleto, Koakseto, Sturno, Esklario, Ŝanuto, Morgino, Viĵiero, Antaŭpaso, Boleto, Porĉo, Maletto, Korŝiranto la hundo de la buĉisto Rimboto, Gastamo, Spureto, Returnfuĝo, Stultaĉo kaj Transmarĉo, ĵus alvenintaj de Pontodemaro.

Inter la ĉashundinoj oni rimarkis Boda kaj Folŭaza, Konka, Almozpelteta, Briara veninta de Stulturbo, Falva, Bloeta, Moreta, Skatola, Viola, Karaba, Malignema, Klaĉema kiu estis de Roberto de La Marleto, Rozgenta, Nigrapremia la ĉashundino de la monaĥejestro, kaj Pinkoneta kiu minacas Renardoⁿ de pli proksime; ne estos pro ŝi se li ne estos kaptita ĉe la enirejo de la arbaro. Renardo siaflanke rezervas neniajn el siaj bonaj lertaĵoj, kaj oni certe ne povas mallaŭdi lin pri tio, *la bezono trotigas maljunulinojn*. Tri el la plej bonaj laniarioj atendis lin sub la unuaj tufarbustoj de la arbaro; estas Tranĉono, Boemonto kaj Erarinto; jen do li en pli granda danĝero ol neniam; ili surfalas sur li, rulfaligas kaj disŝiras lin; la sango ŝprucas sur la restojn de lia riĉa felo; sed fine li sukcesas surprizi ilin kaj, duonkurante, duonrampante, li alvenas al sia

sinjordomo de Mopertui.

Dum li tie trovas ripozon kiun li tre bezonis, kaj dum li estas strebonta pansi kaj cikatrigi siajn vundojn, ĵurante mortigan malamon al Ronjauso kiu fariĝis la farinto de la perfido de la sanktejo, Isengrino travivas grandan aflikton pro tio ke Renardo eskapis. Ĉu li iam retrovos similan okazon ? Li kunvokas ĉirkaŭ li ĉiujn bestojn el sia partio : "grandsinjoro Bruno, grandsinjoro Ronjauso kaj grandsinjoro Belacento, vi apartaj amikoj de la reĝo, vi liaj pli intimaj konsilianoj, vi vidis kiel la perfida Renardo tenis sian promeson; ĉu vi povis pli bone vidigi ke li malpravus kaj ke li ne kapablis plenumi la decan ĵuron ? Aŭskultu do min, grandajn kaj malgrandajn bestojn, via honoro estas instigita atesti antaŭ nia sinjoro reĝo, kiam li kunvenigos sian altan kortumon, ke Renardo neplenumis la ĵuron. - Kaj la reĝo, interrompis grandsinjoro Bruno, estos tre malbona se li ne donos justecon, se li ne kondamnos lin esti publike pendigota. - Pendumota aŭ bruligota, reparaolas Isengrino. - Sed tamen, diras Grimberto, oni certe rajtigos min diri ke Renardo atingante la malproksimon kiam vi estis ĉe la ponto Ruzanto, ne faris tiel malbone kiel vi diras. Li ŝajne konjektis ian insidon, li rimarkis ke Ronjauso, tute longe kuŝanta kun elŝovita lango, ne estis morta kaj bremsis sian spiradon". Ĉi tiuj paroladoj kaŭzis en la ĉeestantaro veran skandalon kaj fariĝis signalo de granda tumulto. Ronjauso skuata de timo kaj honto stariĝis : "Grandsinjoro Grimberto, ĉu vi volas kontraŭstari perfidbruon al mi ? - Mi ne diras tion, respondas Grimberto, sed mi provas senkulpigi Renardo". Ni ne veku kverelon ĉi tie, ni iru en kortumon, kaj se Renardo kulpas, li kontentigos vin. - Mi estas tute decida, diras Isengrino; kaj kio ajn okazu, mi sekvos mian proteston dum la venonta kunveno de majo; mi postulos justecon ĉe la kortumo de miaj egaluloj, kaj mi alvenigos atestantojn kiuj pruvos ke perfida Renardo neplenumis la ĵuron kiun oni postulis de li".

Post ĉi tiuj vortoj, ili disiĝis kaj retrovis sin nur antaŭ la Reĝo, dum la sekvanta asizo, kiam estis denove kunvenigitaj la altan kortumon.

38a Aventuro.

*Kiel la reĝo Nobla tenis plenan kunsidon,
kaj kiel Isengrino faris duan proteston kontraŭ Renardo.*

Peroto kiu metis ĉion kion li havis da spirito kaj da lernado por fari versojn pri Renardo kaj lia kara kunulo Isengrino, Peroto kiu tiel bone rakontis al ni kiel siro Nobla, la leono, dividis la predon, kaj kiel Renardo rifuzis ĵuri sur la dento de Sankta Ronjauso, tamen forgesis la plej belan parton el sia kazo; mi aŭdas la juĝan decidon en la kortumo de la reĝo Nobla, pri la kverelego de tiu abomena Renardo kun monsinjoro Isengrino kaj damo Hersento, lia nobla edzino.

La historio diras ke la vintro pasis, kratago floris kaj rozo komencis disflori; oni alproksimiĝi de la Ĉieliro, kiam siro Nobla, la reĝo, kunvokis la bestojn en sia palacon, por tie formiĝi en kortumo. Ĉiuj respondis al la kunvoko, ĉiuj escepte grandsinjoron Renardo", la trompanton kaj la malbonan friponon. Ĉiuj tiam povis konkure misfamigi lin kaj rememorigi liajn gestojn. Isengrino ne devis esti la lasta por kapti la okazon certigi sian venĝon, li antaŭenpaŝis ĝis la reĝa brakseĝo, kaj parolis per ĉi tiuj vortoj :

"Bela tre afabla siro, mi petas al vi justecon pri la ofendego farita de Renardo koncerne damon Hersento", mian edzinigitan edzinon. Li surprize alvenigis ŝin en sia kastelo de Mopertui. Antaŭ ol lasi al ŝi tempon por orientiĝi, li ofendegis ŝin per faroj kaj vortoj; mi alvenis por esti atestanto de liaj malrespektoj. Kelka tempo antaŭe, li ŝtelmove penetris en mian loĝejon kaj malpurigis per sia fekaĵo miajn lupidojn, kvazaŭ por nenion kompati pri tio kion mi havis kiel kara en la mondo. Pro la plendo kiun mi antaŭnelonge deponis al via kortumo, Renardo aperis por senkulpigi sin, sed, la sanktuloj prezentitaj, li juĝis pli oportuna, per kiaj konsiloj, mi ne scias tion, abrupte retropaŝi kaj reiri al sian rifuĝejon. Tio estis, kiel oni bone pensas tion, je mia granda bedaŭro".

La atente aŭskultinta imperiestro respondis : "Isengrino, kredis min, rezignu vian proteston; vi havas nenian intereson rememorigi

vian honto. La baronoj kaj la grafoj, la reĝoj mem, estas submetitaj al tiaj malagrablaĵoj, ili malmulte estas facile trafitaj de tio. Ĉiuj kiuj staras ĉe la altaj kortumoj estas ĉio kion vi opinias esti, kaj neniam, pro tiom malmulte da afero, mi vidis fari tiom da bruoj. La hejmaj ĉagrenoj ĉiam estas el tiuj pri kiuj oni bone faras nenion diri".

"Ha ! Siro, tiam diris Bruno la urso, vi povus paroli kun pli da konveneco. Ĉu Isengrino estas mortinta aŭ tenita mallibera, ke li ne kapablis trovi la rimedojn mem venĝi sin por la insultoj de Renardo ? Tute male, ni scias lin sufiĉe potenca por senigi ĉe tiun rufulo la rimedojn por malutili; sed li estis bridata de la ĵuse ĵurita respekto de paco. Estas via decidpovo, suvereno de la lando, por eviti la reprenon de la armiloj, por daŭrigi la konkordon inter viaj baronoj. Ni pretas devigi tiujn kiujn vi akuzos. Isengrino plendas pri Renardo; decidigu juĝon pri la kverelo, kaj se iu ŝuldas al la alia, necesas ke li kontentigu kaj krome pagu al vi la punmonon de la malbonago. Sendu do asigni Renardo" en Mopertui : pri tio kio koncernas min, se vi komisias al mi la mesaĝon, mi opinias min kapabla alkonduki lin ĉi tie kaj informi lin pri la decreguloj de la kortumo".

"Siro Bruno, diris Bruema la taŭro, ve, mi ne diras al vi, sed al kiu kuniĝus kun vi por konsili la reĝon preni la punmonon de la damaĝo kaj de la honto kiujn Renardo estus farinta al sia bo-onklino ? Renardo faris tiom da krimoj, ofendegis tiom da honoraj bestoj ke neniu devu volonte ricevi tion. Kial monsinjoro Isengrino venus senkulpigi agojn kiuj estas konataj de ĉiuj ? Oni diru tion kion vi oni deziras, sed se ĉi tiu notinda fripono, ĉi tiu abomena trompanto, ĉi tiu malafabla rufulo Renardo iam diris al mia edzino unu solan ofendan parolon, ekzistas nek fortikaĵo nek kastelo, ne estas Mopertui kiu malhelpus min frakasi lin kaj ĵeti en iun necesejon sian stinkan kadavraĵon. Al kio vi do pensis, damo Hersento, por ne venĝi vin mem ? Vere, mi komprenas vian konfuzon esti ricevante plenkonscie kelkan ofendon de la flanko de estulo tiel facila por puni !"

"Aŭskultu, siro Bruema, tiam diras Grimberto la melo, necesas ĉiapreze silentigi la famon de tiel malbona kazo. Tiu kiu diskonigis ĝin, komentis, pligravigis, baldaŭ bedaŭrus ne povi retenigi ĝin. Ne temas ĉi tie pri evidenta perforto, frakasita pordo, nuligita

militpaŭzo; ĉiuj malbonaj agmanieroj riproĉitaj al Renardo povas esti la efiko de tre pardonebla amo. Konsekvence, oni ne devis rapidi malbone paroli pri tio kaj meti plendon. Renardo amis Hersentoⁿ de longe, kaj sinjorino Hersento ne estigus proteston, se tio dependintus de ŝi. Por Isengrino, ni agnosku ke li mute tro grave konsideris tion, kaj ke li devontus reteni sin informi la reĝon kaj la baronaron. Li bonvolu iomete ekzameni : ĉu restas la plej malgrava spuro de la delikto, ĉu la domo estas damaĝita aŭ la mebloj rompitaĵ, fine ĉu li perdis en ĉio la valoron de avelo, mi devontigas min, en la nomo de Renardo, remeti ĉion en bonstato, kaj promesigi tion de li tuj kiam li estos alveninta. Sed, finfine, la honto de ĉio refalos sur Hersento. Jes, sinjorino, la plej klara profito por vi pri la bruo kiun faris via edzo, estos esti la celo de ĉiuj konversacioj, de ĉiuj pikparoloj. Ha ! Vi estus la lasta el la estuloj, se vi amus Isengrinoⁿ post tio, kaj se vi povus suferi ke li donu al vi la nomon de fratino aŭ de edzino !"

Ĉi tiuj paroloj aperigis la ruĝon sur la vizaĝo de sinjorino Hersento; ŝia tuta korpo tremetis kaj la ŝvito ŝajnis inundi ŝian frunton. Fine, eligante longan suspiron : "Siro Grimberto, ŝi diris, vi pravas, miloble pli bone mi ŝatus ke monsinjoro kaj Renardo restu bonaj amikoj. Certas ke neniam Renardo ricevis de mi la plej malgrandan favoron, kaj por pruvi tion, mi estas preta sperti la provon de la arda fero aŭ de la malvarma akvo. Sed bedaŭrinde ! El kia pezo estos mia deklaro ? Oni ne konsideras kiel kredinda tion kion povas diri malriĉa kompatindulo. Jes, mi atestigas ĉiujn gesanktulojn kiujn ni adoras kaj Dio, mia savanto mem, ke Renardo neniam traktis min alie ol se mi estus lia patrino. Ne ĉar mi diras tion por Renardo aŭ por lia kazo; mi ne zorgas pri li kaj pri tiuj kiuj amas lin aŭ malamas lin pli ol la onopordon kies azenoj frandas; sed mi diras tion por monsinjoro Isengrino kies la ĵaluzado ne lasas al mi paŭzon, kaj kiu ĉiam imagas ke oni malfidelis al li. Per fido kiun mi ŝuldas al mia filo Pinĉisto, estos dek jaroj je la unua de aprilo, la tagon mem de Pasko, ke oni geedzigis nin, Isengrino kaj mi. La edziĝofesto estis pompa; niaj fosaĵoj, niaj ternestoj apenaŭ povis enteni la bestojn invititajn al la festo; ansero tie ne trovus lokon por demeti sian ovon. Ekde tiam mi

vivis kiel lojala edzino, sen rajtigi iun ajn por mallaŭdi min aŭ rigardi min kiel freneza besto. Tial, ĉu oni kredas min aŭ ne, mi ne malpli atestigus sanktan Mariaⁿ ke neniam mi faris ion kiun saĝa kaj pia monaĥino ne povu konfesi".

La parolado de Hersento kaj la natura maniero per kiu ŝi pravigis sian konduton, disradiis neesprimeblan ĝojon en la bona animo de la azeno, grandsinjoro Bernarto. Li konkludis ke Isengrino povus ja pravi, sed ke damo Hersento ne malpravis. "Ha ! li ekkriis, afabla baronino, plaĉus al Dio ke mia azenino estus tiel saĝa, tiel lojala kiel vi ! Vi ĵurpetis Dion kaj la sanktulojn de la paradizo, sufiĉas : mi subtenos vian kazon kaj mi estas tute preta ĵuri kun vi. Ke Dio ne montru kompaton al mi, ke li ne permesu al mi trovi unu solan molajn onopordojn, se vi iam faciligis la amon kaj insistojn de Renardo. Sed tia estas la malafableco, la kalumnio kaj la envio de la jarcento, ke li asertas tion kion li ne vidis kaj mallaŭdas tion kion li devus honori. Ha Renardo ! Malbenita la horo kiam vi naskiĝis, kiam vi venis en la mondon ! Ĉar estas per vi ke la klaĉo disvastiĝis pri la cedemo de Hersento cele al vi. Vi estas rimarkinda mensogulo. Kia ŝajno, fakte, kiam ŝi venas hodiaŭ proponi pravigi sin per la provo de la arda fero aŭ de la bolanta akvo !"

Hersento aŭskultis lin kun agrablan surprizon, sed sin detenis aldoni vorton. Ĉiu tiam plej bone malgloris Renardoⁿ; estas tiel ke oni agas koncerne tiujn kies kazo estas senespera; la sola Grimberto, kiel fidela amiko, subtenis kontraŭ ĉiuj la interesojn de sia kuzo. Li antaŭenpaŝas antaŭ la reĝon, refaldas sian kapuĉon sur siajn ŝultrojn kaj suprenfaldante sian mantelon : "Mi petas, li diris, momenton de silento. Siro, bonvolu kiel afabla indulgemulo, kvietigi la kverelon de viaj du baronoj kaj volonte ricevi grandsinjoron Renardo". Permesu al mi alkonduki lin ĉi tien; vi aŭdos liajn respondojn, kaj se via kortumo kondamnos lin, vi taksos la monpunon kiun li devos suferi; li plenumos ĝin. Se li neglektis veni al tribunalo, kaj se li ne pravigis sian maleston, vi povos direkti al li severan riproĉon kaj devigi lin duoblan punon".

La kuniklo honoris ĉi tiun paroladon kaj tiun de Bernarto, la arkipastro, per sia aprobo. "Per sankta Amanto ! li diris, monsinjoro

Grimberto saĝe parolis. Se grandsinjoro Renardo devigis forlasi la teron sen esti aŭdita, la justeco estus vundita pro tio. Ke Renardo estu do vokita; mi fidas al li pri la zorgado de lia pravigo. Sed se li reale meritis kelkajn riproĉojn koncerne damon Hersento", aŭ per diroj aŭ per agoj, li konstatos tion plivole ol kulpiĝi pri ĵurrompo. Tiel mi plenkore garantias por damo Hersento kun Bernarto, la prudenta arkipastro. Mi lasas parolon al aliaj, kaj mi silentas".

La kortumo post ĉiuj ĉi debatoj konkludas per ĉi tiuj vortoj :
"Sinjoro, bonvolu, en la okazo se Renardo, kunvokita por aperi, ne sin prezentus kaj sendus neniun motivon, ordoni ke li estu perforte trenita ĉi tien, por aŭdi la juĝdecidon kiun decos prononci".

"Baronoj, diris la reĝo Nobla, vi miskomprenas, volante meti juĝon kontraŭ Renardo. Vi donas ian agrablaĵon kiu, pli malfrue, eventuale, rompos al vi la dentojn. Bone pripensu pri tio, tiom multe ŝvebas super vi. Mi havas grandan kaŭzon por plendi kontraŭ Renardo, sed mi ne deziras perdi lin se li konsentas malkontesti siajn kulpojn. KREDU min do, Isengrino, konsentu la malfacilaĵon kiun via edzino petegas; aŭ, pro via manko, mi prenos sur min ordoni tion.

"Ha ! Siro, vige rebatis Isengrino, ne faru tion, mi petegas vin. Ĉar fine se tiu malfacilaĵo petita de Hersento fariĝus al ŝi fatala, se bolanta akvo aŭ fajro atingus ŝin, ĉiuj scios tion, eĉ tiuj kiuj ankoraŭ ignoras tion, kaj miaj malamikoj ĝojos pro tio. Ili diros vidante min : jen li, la ĵaluzulo, tiu kiun sia edzino trompis. Mi preferas depreni mian plendon kaj venĝi min mem. Venu la vinberrikolto, kaj mi vere intencas ĉassekvi Renardo" kies seruro aŭ ŝlosilo, murego aŭ fosaĵo ne sukcesos protekti lin.

"Estas do la diablo nun ! respondis indigne la reĝo Nobla, kaj ĉu via milito neniam finiĝos ! Per la Dimorto ! vi vane esperas diri la lastan vorton al Renardo; li pri tio scias pli ol vi, kaj vi devas pli timi liajn malicaĵojn ol li la viajn. Cetere la lando estas trankvila, paco estas ĵurita; ve al tiu kiu aŭdacos atenci ĝin !"

39^a Aventuro.

Kiel Ŝanteklero, damo Pajnto kaj ŝiaj tri fratinoj venis postuli justecon por damo Kopeta, kruele mortigita fare de Renardo.

Ĉi tiu deklaro de la reĝo kontraŭ iu ajn rekomenco de milito estis terura bato al Isengrino; li konfuziĝis, kaj ne scianta kiun decidon ekpreni, li iris residiĝi proksime al sia edziĝinta edzino, kun la okuloj fajraj, la vosto inter la kruroj. Tiel la kazo de Renardo prezentis plej bonan aspekton, kaj ĉio aŭguris paciĝon de la kverelo kiam oni vidis veni en kortumo, sub la gvidado de Ŝanteklero, damon Pajntoⁿ, kaj tri aliajn sinjorinojn. Ili venis plorpeti la justecon de la reĝo, kaj ĉi tiu incidento reflamigis la mortpretan fajron. Siro Ŝanteklero, la virkoko, Pajnto kiu demetas la dikajn ovojn, kaj ŝiaj fratinoj, Rufeta, Blanka kaj Nigreta akompanis portliton nigre tegita. Tie ripozis kokino mortinta de la antaŭtago : Renardo surprizis ŝin kaj disŝiris ŝin, forprenis al ŝi flugilon, rompis femuron, kaj fine disigis la animon de la korpo.

La reĝo tedita pro la pledadoj estis forpermesonta la kunvenon kiam eniris la ploremulinoj kaj Ŝanteklero fortege frapante siajn polmojn. Pajnto havis forton paroli unue : "Ha ! Per Dio, miaj sinjoroj, hundoj kaj lupoj, nobelaj kaj gravaj bestoj, ne forpelu senkulpajn viktimojn. Malbeninda la horo de nia naskiĝo ! Ho morto, venu kapti nin, antaŭ ol ni falus sub la kruela dento de Renardo ! Mi havis kvin fratojn de patro, Renardo voris ilin ĉiujn. Mi havis kvar fratinojn de patrino, unujn el la plej frua junaĝo, aliajn, jam kokinojn kun kompleta beleco, Gomberto de la Frakseno grasigis ilin por demetado de elektindaj ovo; vanaj zorgoj, Renardo el ĉiuj lasis nur unu, la aliaj trapasis tra lian gorĝon. Kaj vi, mia dolĉa Kopa, kuŝita en tiu ĉerko, kara kaj malfeliĉa amikino, kiu povos diri kiom vi estis grasa kaj mola ! Kaj kio fariĝos via malsaneta kaj malĝoja fratino ! Ha Renardo ! Povu la inferfajro vori vin ! Kiom da fojoj vi ĉasis nin, timigis nin, disigis nin ? Kiom da plumaroj vi ŝiris al ni ? Kiom da fojoj vi nokte transiris en nian ĉirkaŭbaritejon ? Estis hieraŭ, apud la pordo, ke vi lasis mian fratinnon etenditan, sen vivo. Vi ekfuĝis,

aŭdante la paŝadojn de Gomberto, kiuj bedaŭrinde ne havis ĉevalon sufiĉe rapidan por malhelpi al vi la retiriĝon. Jen kial ni venas al vi; ĉiu espero de venĝo estanta forprenita de ni, estas de vi solaj, noblaj sinjoroj, ke ni atendas justecon".

Post ĉi tiuj paroloj, ofte interrompitaj de plorĝemoj, Pajnto falis sveninta sur la slaboj de la ĉambro, kaj ŝiaj tri kunulinoj samtempe kun ŝi. Oni tuj vidis por helpi ilin, hundojn kaj lupojn envie forlasi siajn seĝojn. Oni relevas ilin, oni subtenas ilin, oni ĵetas al ili akvon sur la kapon. Rekonsciiĝante, ili kuris ĵeti sin ĉe la piedoj de la reĝo kiun genue Ŝanteklero samtempe malsekigis per siaj larmoj. La vido de la kavaliro plenigis la animon de Nobla per granda kompato; li eligis profundan suspiron, poste relevante sian grandan longharan kapon, li aŭdigis tian roradon ke ne estis tiel aventurema besto, urso aŭ apro, kiu ne tremetis pro teruro. La emocio de grandsinjoro Koarto, la leporo, estis eĉ tia ke li daŭre febris dum du tagoj kaj ke li eble ankoraŭ februs sen la bela miraklo kiun vi ekscios post momento.

Oni vidis samtempe la reĝo levi sian noblan voston por vigne sin frapi per ĝi la flankojn kun bruo kapabla ŝanceli la domon. Poste li eldiris tiujn ĉi parolojn : "Sinjorino Pajnto, per la animo de mia patro, por kiu mi ankoraŭ nenion faris hodiaŭ, mi tre kompatas pro viaj malfeliĉoj, kaj mi intencas puni la farinton. Mi estas asignonta Renardo", kaj per viaj okuloj kaj per viaj oreloj, vi povos vidi kaj aŭdi kiel mi kapablas puni perfidulojn, murdistojn kaj noktajn rabistojn".

40^a Aventuro.

*Kie oni vidas la honorojn donitajn al damo Kopeta, kaj ŝian epitafon;
kiel siro Bruno estis sendita kunvoki sinjoron Renardoⁿ;
kaj pri la belaj mirakloj plenumitaj sur la tombo de sankta Kopeta.*

Kiam Nobla ĉesis paroli, Isengrino starigas sin surpiede : "Siro, li diris, vi estas granda reĝo. Vi konkeros honoron kaj laŭdon, venĝante kontraŭ la murdisto la murdon de damo Kopeta. Mi ne aŭskultas ĉi tie mian malamon, sed la rimedon por ne interesiĝi pri ĉi tiu senkulpa viktimo ? - Jes, rebatis la reĝo, ĉi tiu ĉerko, ĉi tiuj kompatindaj kokinoj metis al mi doloron en la animo. Mi do plendas al vi, baronoj, kontraŭ tiu abomena Renardo, malamiko de la ligo de edzeco kaj de la publika paco. Tamen necesas pensi pri la plej urĝa. Bruno, vi tuj surmetos stolon kaj vi faros la rekomendon de la mortinto; vi aranĝos ŝian entombigon en la terenon kiu disigas la ĝardenon de la ebenaĵo".

Bruno rapidis obei. Li surmetas la stolon; la reĝo kaj ĉiuj membroj de la parlamento komencas la matutino. La heliko Posttempa sole kantis la tri lecionojn⁽¹²⁾, la pia Ronjauso ekkantis la versiklon kaj Briŝmaro la postgradualon⁽¹³⁾. La oracio de la "custodiat animam"⁽¹⁴⁾ estis eldirita de grandsinjoro Bruno.

Post la matutino, la laŭdoj; poste la korpo estis enterigita. Oni estis antaŭe enferminta ŝin en bela ĉerko el plumbo. La fosaĵo fosita ĉe la piedo de kverko estis kovrita per marmara plato, sur kiu oni gravuris per grifelo aŭ per ĉizilo sekvan epitafon :

Ĉi tie kuŝas Kopa, la fratino Pajnto,
kiu sanktece mortis,
forlasita al dolora martirigo
de Renardo, la malbona fotorulo.

Oni ne kapablis vidi, dum la ceremonio, Pajnto ekploregi, preĝi al Dio kaj malbeni Renardoⁿ, Ŝanteklero rigidigi la piedojn pro malespero, sen esti profunde kortuŝita kaj tenerigita.

Kaj kiam la grandaj doloroj estis kvietigitaj, la pajroj iris apud la

12 Legaĵo el la Biblio, ĉe la matenaj horpreĝoj.

13 Psalmo kantita anstataŭ la haleluja, inter la gradualo kaj la evangelio, ĉe la mesoj de la mortintoj.

14 Latina preĝo en kiu oni petas Jesuoⁿ gardi la animon en eterna vivo.

reĝo. "Siro, ili diris al li, ni petas venĝon al tiu glutemulo, plago por ĉiuj, malobeanto de la ĵurita fido. - Tre volonte, diris la reĝo Nobla, kaj estas vi, Bruno, al kiu mi komisias iri kunvoki lin. Ne havu por trakti lin ian ajn indulgon. Vi diros al li ke antaŭ decidi min asigni lin, mi atendis lin tri fojojn. - Mi ne forgesos tion, siro, respondis Bruno"; kaj tujtuj li adiaŭas, ekscitas sian ĉevalon ambli, kaj foriras. Sed dum li tiel vojiras tra valojn kaj montojn, okazis ĉe la kortego evento kiu tute ne rebonigis la aferojn de Renardo. Ni vidis ke, dum du tagoj, Koarto la leporo tremetis pro febro. Post la enterigo de damo Kopeta, la malsanulo absolute volis iri preĝi sur ŝia tombo. Li tie endormiĝis, kaj vekiĝante, li sin trovis resanigita. La miraklo fariĝis granda rumoro : Isengrino, ekaŭdante ke damo Kopeta estis vera martirino, rememoris pri dolora tintado kiun li havis en la orelo. Ronjauso, lia kutima konsilisto, kondukis lin kaj adorklinigi lin super la tombo; fulme tuj li resaniĝis. Estas per li mem ke oni eksciis tion. Sed se ne estus troriskema kontesti ion el tia bonfido, se cetere Ronjauso ne atestis ĝin, oni eble ne aldonus la tutan dezirindan fidon al la resanigo de Isengrino.

La sciigo de ĉi tiu duobla miraklo estis akceptita de la plejmulto kun klara favoro. Grimberto, male, afliktiĝis pri tio; ĉar prizorganta pri la defendo de Renardo, li antaŭvidis la malbonan impreson kiun ĉi tiu rakonto farus ĉe la malplej antaŭavertitaj mensoj. Sed estas tempo reveni al grandsinjoro Bruno, kaj akompani lin en lia vojaĝo al Mopertui.

41^a Aventuro.

*Pri la alveno de grandsinjoro Bruno en Mopertui,
kaj kiel li ne trovis dolĉa la mielon kiun Renardo gustumigis al li.*

Bruno la urso sekvis la serpentan padon kiu tra la arbaro kondukis al Mopertui. Ĉar la pordo de la kastelo estis tre mallarĝa, li estis devigita halti antaŭ la unuaj defendejoj. Renardo staris funde de la loĝejo, dolĉe dormetanta; li havis ĉemane la korpon de grasa kokino, kaj frumatene li matenmanĝis flugilojn de dika kaponio. Li aŭdis Bruno vokantan lin de ekstere tiel: "Renardo, mi estas kuriero de la reĝo. Eliru dum momento por aŭdi tion kion nia siro sciigas al vi". La alia apenaŭ rekonis grandsinjon Bruno, ke li ekserĉi kiam kaptilon li povus meti al li. "Grandsinjoro Bruno, li respondas de sia duone malfermita luko, oni vere prenigis al vi tre sennecesan penon. Mi estis forironta al la kortego de la reĝo, tuj kiam mi estos manĝinta bonegan francan manĝaĵon. Ĉar vi scias tion tiel bone kiel mi, grandsinjoro Bruno, kiam riĉa aŭ potenca homo venas al kortego, ĉiuj rapidas ĉirkaŭ li. Oni kverelas por scii kiu tenos lian mantelon, kiu diros al li: Purigu, purigu, siro! Oni servas al li bovaĵon je flava pipro, ĉiujn delikatajn viandojn kiuj pasas antaŭ la reĝo. Sed estas alie pri tiu kiu ne havas altan oficon kaj multe da mono: oni dirus lin elirintan el la fekaĵo de Lucifero. Li ne trovas lokon ĉe la fajro aŭ ĉe la tablo; li devas manĝi sur siaj genuoj kaj la hundoj de ambaŭ flankoj venas forigi de li panon el la manoj. Li trinkas unu mizeran fojon, du fojojn maksimume kaj da plej malbongusta; li tuŝas nur unu specon de viando, kaj la servistoj donas al li nur ostojn por ronĝi. Magaje forgesita en angulo, li devos kontentiĝi per seka pano, dum la grandaj kaj bonaj pladoj, servitaj de kuiristoj kaj seneskaloj al la tablo de la mastro, estas flankenmetitaj por esti sendita al karaj amikinoj de tiuj ĉiosciuloj kiujn demono povu forpreni! Jen, sinjoro Bruno, kial mi trarigardis ĉi tiun matenon antaŭ foriri, miajn proviantojn da pizoj kaj da lardo; kaj kial mi matenmanĝis ses manĝaĵojn el freŝa ĉelaro da mielo".

Ĉe ĉi tiu vorto de mielo, Bruno, forgesante tion kion li sciis pri la

malico de Renardo, ne sukcesis deteni sin interrompi : "*Nomini patre christum fili*⁽¹⁵⁾", amiko ! Kien vi ja kapablos trovi tiom da mielo ? Ĉu vi ne volus konduki min tien ? Diable ! Ĝi estas la afero kiun mi plej ŝatas en la mondo". Renardo mirigita tiel facile kapti lin per trompo, moke elŝovas al li la langon, kaj la alia ne rimarkas ke estas la rimeno kiu devas pendumi lin. "Dio mia ! Bruno, li daŭrigis, se mi certus trovi en vi veran amikon, mi donus al vi, mi atestigas mian filon Rovelon", tiom de ĉi tiu bonega mielo kiom vi povus deziri ĝin. Ne necesas serĉi ĝin for; ĉe la eniro de ĉi tiu arbaro kiun gardas la arbaristo Lanfroj. Sed ne, se mi kondukus vin tien nur por plaĉi al vi, mi ricevus malbonan kompenson. - He ! Kion vi nun diras, Renardo ? Vi do tre malmulte fidas al mi. - Certe ja. - Kion vi timas ? - Perfidaĵon, kovardaĵon. - Estas la diablo kiu donas al vi tiajn ideojn. - Nu ! Do mi kredas al vi, mi havas nenion kontraŭ vi. - Kaj vi pravas, ĉar la omaĝo kiun mi donis al la reĝo Nobla, neniam faros min malsinceran kaj mallojalan. - Mi nun estas konvinkita pri tio, kaj mi havas plenan konfidon al via natura bono".

Por renkonti la deziron de grandsinjoro Bruno, li eliras el Mopertui kaj kondukas lin al la eniro de la arbaro. Lanfroj, la arbaristo, jam fendis la trunkon de kverko kiu devis provizi lin per la tabuloj de granda tablo; li estis enmetinta du kojnojn en la truon por malhelpi ĝin refermiĝi. "Jen, dolĉa amiko Bruno, diras Renardo, tio kion mi promesis al vi. En ĉi tiu trunko estas la rezervo da mielo : eniru la kapon kaj prenu laŭ via plaĉo; ni iros trinki poste". Bruno, malpacienca, metas la du antaŭajn piedojn sur la kverkon, dum Renardo grimpas sur liajn ŝultrojn kaj signas al li etendi la kolon kaj antaŭenigi la muzelon. La alia obeas, Renardo per unu el siaj kruroj forte eltiras al li kojnojn kaj elsaltigas ilin. La du disaj partoj de la trunko ekproksimiĝas kaj la kapo de Bruno restas en malbona ĉirkaŭpremo. "Ha ! Nun, diras Renardo ridanta plengorĝe, malfermegu la buŝon, moŝto Bruno, kaj ĉefe elŝovu la langon. Kia bongusto, ĉu ne ? (Bruno tamen eligis akrajn kriojn). Sed kiel vi restas longtempe ! Ho ! Mi bone antaŭvidis tion; vi gardas ĉion por vi, sen sciigi tion al mi. Ĉu vi ne hontas nenion lasi al via amiko ? Se

15 Latina esprimo kiu signifas "Je la nomo de Kristo-Filo".

mi estis malsana kaj se mi bezonis iom da dolĉaĵoj, mi vidas ke vi ne donus al mi molajn pirojn". Tiumomente alvenas la arboristo Lanfroj, kaj Renardo ekkuras. La kampulo vidas dikan urson eniĝinta en la arbo kiun li fendis, kaj tuj reirante al la vilaĝo : "Helpon ! Helpon ! La urso ! Ni kaptis lin". Necesis tiam vidi la kampulojn alkuri kun klaboroj, draŝiloj, hakiloj, tuberplenaj dornaj bastonoj. Oni juĝu pri la timo de Bruno ! Li aŭdas malantaŭ li Ekfrapaĉoⁿ, Batalŝatoⁿ Bovinaroⁿ, Balduenoⁿ Brankardujoⁿ, Ĝirŭenoⁿ Barbedoⁿ la filo de siro Nikolao, Azenpikilon la fetoranto kiu fuĝigas la muŝojn, kaj la bonan suĉilon de teleroj Korbaranoⁿ de la Strato, poste Tigretoⁿ Tedaĉulo, Tigroⁿ de la Placo, Gombertoⁿ Fihakiloⁿ, Ponardoⁿ, grandsinjoro Herlinoⁿ, Otranoⁿ la Rufulo, Falĉilorompantoⁿ provostoⁿ de la vilaĝo, Humbertoⁿ Pezegaĵoⁿ, Fuŝeroⁿ Galopoⁿ kaj multe da aliaj.

Pro la krioj ĉiam pli proksimaj de tiu svarmo da kampuloj, Bruno pripensas. Pli bone estas por li perdi la muzelon ol forlasi sian tutan kapon, la hakilo de Lanfroj certe ne indulgus lin. Li palpas kaj repalpas per siaj piedoj, rigidiĝas, sentas la haŭton de sia kolo rezigni, disiĝi, lasante nude la sangajn orelojn kaj vangojn. Estis kun ĉi tiaj kruelaj kondiĉoj ke la filo de la ursino povis reeniri en posedo de sia kapo; oni ne povintus tajli monsaketon en la haŭto kiun li kunprenis de tio, kaj neniam tiel malbeleaga besto riskis esti trafita. Li fuĝas tra arbaro; la honto esti vidata, la timo esti svenbatata kuniĝas por gardi al li fortojn. La arego da kampuloj ankoraŭ persekutis lin. Nun jen li kiu renkontiĝas kun la pastro de la paroko, la patro de Marteno de Orleano, kiu ĵus returnis sian sterkon. Per la forko kiun li havis en siaj manoj, li frapas Brunoⁿ ĉe la lumbon, kaj la granda faranto de kombiloj kaj lanternoj, frato de Ŝievro apud Remso, trafas lin per longa korno de bovo kaj rompas ĝin sur liaj lumboj. Ho ! Ve al Renardo se iam Bruno povas rekuniĝi kun li ! Sed tiu ĉi zorgis sin ŝirmi en Mopertui, kaj kiam Bruno preterpasis antaŭ liaj fenestroj, li ne sukcesis bridi sin denove mokpiki lin. "Kiel vi sentas vin, bela sinjoro Bruno, pro voli manĝi la tutan mielon sen mi ? Vi vidas al kio la perfido fine kondukas; ne atendu pastron ĉe via lasta tago. Sed el kiu kongregacio vi do estas por havi ĉi tiun ruĝan kapuĉon ?" Bruno eĉ ne turnis la okulojn al li; kion li respondintus ?

Li fuĝis pli rapide ol la paŝado, ankoraŭ pensante esti persekutata de Lanfroj, la pastro, la lanternito kaj ĉiujn kampuloj de la lando.

Finfine li atingis la lokojn kien la reĝo Nobla tenis sian kortumon. Urĝis ke li alvenu, ĉar li kurbiĝis pro laceco kaj pro elĉerpiĝo antaŭ la sieĝoj. Ĉiu, vidante lin tiel senigita je liaj oreloj kaj je la haŭto de lia kapo, faris pro hororo kruccsignon. "He ! Granda Dio, frato Bruno, diras la reĝo, kiu sukcesis tiel malbone trakti vin ? Kial demeti vian kapuĉon ĉe la pordo ? Sed la ceteron, kie vi lasis ĝin ? - Siro, diras la kompatinda Bruno kun la plej granda peno, estas Renardo kiu metis min en ĉi tiu stato".

Li faris kelkajn paŝojn, poste falis kiel morta korpo piede de la reĝo.

42^a Aventuro.

Kiel la reĝo Nobla duafoje sendas Tibertoⁿ, la katon, kunvoki Renardoⁿ; kaj pri la musoj kiuj ne trapasis la gorĝon de Tiberto.

Oni tiam povintus vidi la reĝon Noblaⁿ rori, hirtigi sian teruran krinaron kaj bati al si la flankojn per sia potenca vosto, ĵurante per la koro, la vundoj, la sango kaj la morto de Dio. "Bruno, li diras, la abomena kaj malica rufulo kiu malbone traktis vin, ne plu devas atendi koncedon; la plej gravaj turmentoj estos ankoraŭ tro dolĉaj por li. Mi faros de tio tian justecon ke oni longatempe parolos pri tio tra la tuta Francio. Kie vi estas, Tiberto la kato ? Iru tuj trovi Renardoⁿ; diru al tiu malŝatinda rufulo, ke li estu senprokraste venanta fronti mian kortumon, kaj ke li zorgu preni kun li ne dosieron ŝarĝitan per oro kaj per arĝento por disdoni, ne da belaj predikoj por disdiri, sed la vimenon kiu utilos por pendumi lin".

Se li estus libera por rifuzi, neniu vidus Tibertoⁿ sur la vojoj; sed ne estis ekskuzo por montri; necesas vole nevole ke la pastro iru al la koncilio. Tiberto adiaŭinte trairas valon kiu kondukas lin al arbaro, kutima restadejo de grandsinjoro Renardo. Malkovrante la kastelon de Mopertui, lia unua penso estis por Dio kiun li pie postulis, poste li preĝis al Sankta Leonardo, patrono de la malliberuloj, protekti lin kontraŭ la malbonaj lertaĵoj de Renardo. Iu afero pliigis lian maltrankvilon : kiam li estis fraponta sur la pordon, li vidis transflugi de iu abio al plej proksima frakseno la birdon de Sankta Marteno, la korvo. "Dekstren, dekstren !" li kriis al li; la alia daŭrigis sian flugadon maldekstren. De ĉi tiu malgaja antaŭsigno, Tiberto konkludas ke li estis minacata de grava malfeliĉo, kaj tio forŝovis el li la deziron eniri en la domon de Renardo. Sed kiu kapablas eviti sian destinton ?

Vokante do de ekstere : "Renardo, sinjoro kamarado Renardo, ĉu vi estas tie ? Respondu al mi. - Jes, diras al si mem Renardo, kaj por via malbona aventuro". Poste laŭtigante la voĉon : " *Welcome*, Tiberto, estu bonvena, kvazaŭ vi alvenus kiel pilgrimanto, de Romo aŭ de Sankta Jakobo, iun tagon de Pentekosto. - Ne venĝemu kontraŭ

mi, kamarado, kaj ne juĝu pri miaj sentoj, laŭ tio kion mi estas komisiita diri al vi. Mi venas je la nomo de la reĝo kiu malamas vin kaj minacas vin. Ĉiu en la kortego plendas pri vi, Bruno kaj Isengrino antaŭ ĉiuj. Vi havas apud Nobla nur unu defendanton, li estas via kuzo Grimberto. - Tiberto, respondas Renardo, la minacoj ne mortigas, ke ili akriĝas siajn dentojn sur mi, mi ne vivos unu tagon malpli. Mi vere asertas iri al via kortumo; tie mi vidos kiu volos protesti kontraŭ mi. - Vi faros kiel saĝulo, bela siro, kaj mi konsilas tion al vi kiel amiko. Sed mi rapidegis kaj mi ekkonscias ke mi malsatmortas; mi havas pro tio la lumbon rompitan; ĉu vi ne havus por doni al mi iun kaponon aŭ kokonon? - Ha! Vi petas pli ol mi povus proponi al vi, kamarado Tiberto, kaj vi volas sendube elprovi min. Ĉio kion mi povus trovi por vi, estus ratoj, musoj, sed tre grasaj musoj, vere. Vi ne volus tion. - Kion! Musoj? Mi plezurege prenis tion. - Ho! Ne, tio estas tro malgranda manĝaĵo por vi! - Mi povas certigi vin, Renardoⁿ, ke se mi aŭskultus mian guston, mi ne vivus per io alia. - Tiukaze, mi povas doni al vi pli ol vi certe manĝos tion. Mi kuniĝas kun vi, kaj vi devos nur sekvi min".

La bezono sendube perdigis tiun tagon, la memoron al Tiberto; li ne plu suspektis pri perfidaĵo, kaj sekvis obeeme Renardoⁿ ĝis la pordoj de najbara vilaĝo kies ĉiuj kokinoj trapasis de longe tra la kuirejo de Hermelina. "Nun, li diras al Tiberto, ni nin ŝovu inter ĉi tiuj du domoj; ni alvenos ĉe la pastro, lia grenejo kiun mi konas, estas provizita per tritiko kaj aveno, la musoj trovas tie gastaman tablon. Lastfoje kiam mi skoltis tie, mi grandkvante kaptis tion kiun mi duone manĝis surloke, mi metis la aliajn en provizoj. Kaj jen la truo kiu donas enireblecon, trapasu kaj regalu vin".

Tio ĉio estis el la invento de Renardo. La pastro havis nek tritikon nek avenon, tute kontraŭe ĉiu en la vilaĝo plendis pri lia malbona edzino kiu faris lin patro de Marteno de Orleano. Ŝi tute ruinigis la kompatindan viron; el lia tuta brutaro restis nur unu virkoko kaj du kokinoj kies Renardo sin bone detenis alproksimiĝi, ĉar la bela Marteno kiu jam havis kronon de monaĥo⁽¹⁶⁾ (pli poste li devis havi la

16 Parta kalveco kiu memoras la monaĥan tonsuron.

kordonon⁽¹⁷⁾), metis en la truon du maŝkaptilojn por preni Renardo". Digna filo de pastro kiu metas sian studon por gvati katojn kaj vulpojn !

"Ni do iru gvati ! diras Renardo vidante lin iomete heziti. Antaŭeniru, Dipatrino, kiel vi fariĝis peniga; iru, mi atendos vin ĉi tie. Tiberto, ekscitata per ĉi tiuj paroloj, ekĵetiĝas, sed tuj rekonas sian malsaĝon, ĉar li sentas sin kaptata ĉe la gorĝo kaj premata de vigla maŝkaptilo. Ju pli li tiras, des pli li strangolas. Dum li klopodis eskapi per vanaj provoj, Marteneto alkuras. "Stariĝu ! Stariĝu ! li tuj krias, ek, bopatro ! Patrino mia ! Helpu ! Lumon ! Alkuru al la aperturo, la vulpo estas kaptita".

La patrino de Marteneto, unua ellitiĝinta, rapidas lumigi kandelon, kaj per la alia mano prenas sian ŝpinbastonon. La pastro sekvas, sen preni la tempon surmeti talaron, tiel bone ke la kompatinda Tiberto ricevis provizon da pli ol cent batoj. Estas kverelo inter la pastro, la pastrino aŭ ilia filo, por scii kiu batos lin. Fine, perdanta ĉian paciencon, Tiberto vidante la monaĥejestro apud li, kolere sin ĵetas kun ungoj kaj dentoj antaŭe, al unu el liaj vangoj kiun li mordas ĝis forpreni pecon. La pastro eligas krion de suferego, la virino volas venĝi al li, la kato sturmas al ŝi kaj traktas ŝin preskaŭ tiel malbone. Je la akraj krioj kiujn ŝi eligas, Marteneto revenas apud siaj karaj parencoj, sed Tiberto, ade laborinte, sukcesas ronĝi la maŝkaptilon kaj fuĝas draŝita, vundita, sed venĝinta kontraŭ siaj turmentistoj. Kial li ne povas ankaŭ sin venĝi kontraŭ Renardo ! Sed tuj kiam la perfidulo vidis Tiberto" en la kaptilo kaj Marteneto" alarmkriantan , li revojiris al sia loĝejo. "Ha ! Renardo, diris Tiberto, ke Dio neniam kompatu vin ! Koncerne min, mi meritis ĉiujn batojn kiujn mi ĵus ricevis. Kiel mi povis ankoraŭ lasi min trompi de tiu fetora rufulo ? Almenaŭ, vi, kruela pastro, vi memoros min. Ke Dio povu doni al vi malbonan logejon, malmultan panon, kaj fine la kompanion de la diabloj ! La spuro de miaj ungoj restos sur via malbela vizaĝo, kaj pri via digna filo, mi deziras al li neniam havi denaron en la monsaketo kaj forlasi sian abatejon kiel refalinto, por esti kondukata per la forkoj kiel ŝtelisto".

17 Ŝnuro uzata por teni la sutano ĉe la talio.

43^a Aventuro.

Kiel Grimberto portis la trian riproĉon al grandsinjoro Renardo, kaj kiel Renardo, post esti konfesinta, estis absolvita de siaj pekoj.

Estas ĵetante tiajn malbenojn ke Tiberto revenis al la valo kie loĝis la kortego de la reĝo. Alvenante, li genuiĝas ĉe la piedoj de Nobla kaj raportas al li pri la cirkonstancoj kaj pri la malbona sukceso de sia vojaĝo. "Vere, diras la reĝo, en la aŭdaco kaj la senpuneco de Renardo, estas io supernatura. Ĉu neniu kapablas liberigi min de tiu abomena nano ? Mi komencas dubi pri vi, Grimberto. Ĉu vi ne estas en akordo kun li, kaj ne informus lin pri ĉio kio okazas ĉi tie ? - Siro, mi neniam rajtigis meti suspekton pri mia lojaleco. - Nu ! Se tiel estas, iru al Mopertui kaj ne revenu sen via kuzo Renardo. - Siro, tiam diras Grimberto, tia estas la embarasa situacio de mia parenco, ke li ne venos se mi ne estas provizita de viaj leteroj. Sed nur vidante vian sigelon, mi konas lin, li ekvojaĝos. - Grimberto pravas, diras la reĝo; kaj tujtuj li diktis la leteron kiun Belacento, la apro, skribis kaj kiun Briŝmaro provizis per la reĝan sigelon. Grimberto genue ricevis el la manoj de la reĝo la sigelitan leteron; poste li adiaŭis la kortegon kaj foriris.

Ĉe la ekstremo de nova plugita kampo, li enŝoviĝas en mallarĝan pado kiu apartenis al la dependaĵoj de la kastelo de Mopertui : malfermita pordeto kondukis al la unuaj palisaroj. Renardo aŭdanta hupi, ekpensis ke oni venis ataki lin, kaj kuris direkte de kie foriris la bruoj. Li facile rekonis Grimberton kiam li ĵus transiris la levponton kaj ke li eniĝis en interkrutejon kiu finvenis al la sekreta enirejo de la nobeldomo. "Ĉu estas vi, kara Grimberto ? diras al li Renardo ĵetante ambaŭ brakojn ĉirkaŭ la kolon, nu, venu en miajn ĉambrojn kaj ke oni alportu al li du kapkusenojn; mi volas ke oni faru al mia kuzo la tutan eblan honoron".

Grimberto agis kiel saĝulo : li prezentis la temon de sia vizito nur post esti bone tagmanĝinta. Tuj kiam la tablotukoj estis formetitaj : "Aŭskultu min, sinjoro Renardo; viaj malicetoj elĉerpis ĉiujn, kaj la reĝo komisiis min alporti al vi la trian admonon. Vi do venos fronti

lian kortumon da pajroj. Vere, mi ne konjektas tion kion vi kontraŭdiros al Bruno, al Tibeto, al Isengrino. Mi ne volas flati vin per vanaj esperoj, vi estos kondamnita al mortpuno. Jen, rompu la sigelon de ĉi tiuj reĝaj leteroj, kaj vi mem juĝos la gravecon de la situacio".

Renardo rompis la vakson kun certa emocio : la letero estis tiel redaktita :

Monsinjoro Nobla, la Leono, superega mastro de ĉiuj regionoj kaj de ĉiuj bestoj de la mondo, postulas al Renardo honton kaj plej altan turmenton, se li ne venos morgaŭ por respondi al la protesto starigita kontraŭ li en mia kortumo. Li provizos sin, ne per dosiero ŝargita de oro kaj de arĝento, ne da bela prediko, sed per vimeno kiu povos servi por pendumi lin⁽¹⁸⁾.

Tuj post la legado de ĉi tiuj leteroj, Renardo ŝanĝis de koloro kaj ekembarasiĝis. "Ha ! Grimberto, li diras, malbenita la horon de mia naskiĝo ! Konsilu min, mi petegas vin; malebligu ke morgaŭ mi estu pendigita ! Mi devintus, kiam estis tempo, monaĥiĝi en Klarvalo aŭ en Klunizo; sed la monaĥoj mem estas apenaŭ facilaj por vivi, kaj mi ne longe eskapintus la malbonvolon de la blankaj manteloj⁽¹⁹⁾. Ili estus la unuaj por denunci min. - Lasu for tiujn bedaŭrojn, diras la saĝa Grimberto, kaj ne forgesu ke morgaŭ vi riskos grandan aventuron de morto. Neniu venos helpi min defendi vin; tiru do profiton el la tempo kiu restas al vi. Konfesu vin, jen mi por aŭdi vin, pro manko de pastro. - Bedaŭrinde ! eligis Renardo, mi konsentas ke konsilo estas bona por sekvi; ĉar fine se mi ne mortas, la konfeso ne suferigos min, kaj se oni pendigas min, ĝi malfermos al mi la pordojn de la Paradizo. Nu ! Aŭskultu, kuzo, mi komencas :

Sinjoro, mi deziris la edzinon de mia proksimulo. Hersento ne diris la veron; ŝi ĉiam estis bonega amikino al mi, kaj mi neniam devis plendi pri ŝiaj kruelecoj. Sed se mi tro malutilis al mia kunulo Isengrino por esti forigita ekster kortumo, almenaŭ ke Dio pardonu min pri

18 Ofte okazis ke oni amnestiis la kondamnitojn de mortpuno kiam ili prezentis sin nudpiede kun la ŝnuro sur la koloj aŭ la vimeno en la manoj.

19 Kromnomo donita al la benediktanoj vivantaj laŭ la regulo de Sankta Benedikto.

tio ! Mi pente batas al mi la bruston, ĝi estas mia tre granda kulpo. Mi trifoje kaptigis Isengrinoⁿ : la unua, kiam lupkaptilo haltigis lin en la vinberejo; la dua, kiam lia felo estis disŝirita de streĉita maŝkaptilo; la tria, kiam li tiom satigis sin per lardo ĉe honestulo ke li ne kapablis eliri tra la aperturo kiu unue ebligis trairon al li. Mi restigis lin sur fiŝbaseno ĝis kiam li havis la voston kaptitan inter la glacieroj. - Mi fiŝigis lin dum iu tuta bela nokto en la fonto, por tie kapti per la dentoj, la lunon kiun li kredis esti blanka fromaĝo. - Mi batigis lin per la fiŝkomercistoj. - Mi kronis lin per bela tonsuro helpe de bolanta akvo, li fariĝis monaĥo kaj kanoniko, sed vidante lin manĝi la ŝafaron, tiuj kiuj faris lin ŝafiston venĝis sin ne esti svenbatiginta lin. - Kaj Isengrino iun tagon entreprenis la sieĝadon de Mopertui helpe de Bruno la Urso kaj multaj bovoj kaj aproj, mi miaflanke havis je mia soldo, kaj retenis Ronjausoⁿ la laniarion kiu alkondukis al mi pli ol ses mil el siaj amikoj. Ili estis ofte batitaj kaj afliktitaj pro mi : la sieĝo ĉesigita, ili petis al mi siajn soldojn; mi akuzas min esti moke elŝovanta al ili la langon kaj esti rompanta mian vorton. Mi ne povas memori ĉiujn aliajn malicaĵojn kiujn mi faris, sed ne estas en la kortego de la reĝo ununura besto kiu ne havas por plendi pri mi. Mi ne parolas pri la kokinoj kaj kaponoj de la kampulo, pri la gefratoj de la juna Pajnto, pri Bruno kaj la mielo kiun mi kirlomiksis por li; pri Tiberto kaj la musoj kiujn mi servis al li; pri tiu ĉio kaj multaj aliaj malbonfaroj, mi pente batas al mi la bruston kaj mi volas pentofari, se Dio ne lasas al mi tempon por plenumi ĝin.

"Grandsinjoro Renardo, diras Grimberto, vi bone konfesis; necesas nun promesi ne plu refali en la samajn erarojn. - Ha ! Mi promesas tion; hodiaŭ estas la momento nenion diri aŭ fari kiu estu malagrabla al Dio". Li genuis, kaj duonlatine duonromanike, Grimberto donis al li ĝeneralan absolvon.

44^a Aventuro.

Pri la rajdado de grandsinjoro Renardo kaj de Grimberto, kaj kiel ili alvenis en la kortego de la Reĝo.

La morgaŭon, ĉe la tagiĝo, Renardo kisis sian edzinon kaj siajn infanojn kiuj sentis grandan funebron. "Infanoj de alta rango, diras li, mi ne scias tion kio okazos al mi; pensu gardi miajn kastelojn en bona stato. Tiel longe vi gardos ilin, tiel longe vi havos nenion por timi de reĝo, de grafo, de princo aŭ de kastelmastro. Ili restos dum ses monatoj antaŭ la barbakanoj, sen esti pli progresintaj ol la unuan tagon. Vi havas proviantojn por pluraj jaroj; mi konfidas vin al Dio, kaj preĝu lin lasi min baldaŭ reveni".

Kaj kiam ili estis ekstere, li denove faris la sekvan preĝon : "Bela siro Dio, mi metas sub via ŝirmado mian scion kaj mian spiriton. Faru ke mi havu ilin tre ĉeestantaj kiam mi estos antaŭ Nobla, kiam Isengrino protestos kontraŭ mi. Faru ke mi konfuzu lin aŭ neante, aŭ pledante aŭ batalante. Ĉefe, donu al mi la necesan tempon por malpezigi mian koron de la pezo de venĝo kiu bruligas ĝin, kontraŭ ĉiuj kiuj militas kontraŭ mi". Tiam li adorkliniĝis, batis trifoje la bruston, kaj faris krucosignon por sin antaŭgardi kontraŭ la diabloj kaj kontraŭ la reĝo leono.

La du baronoj ekiras al la kortego. Ili transiras riveron, sekvas interkrutejon, suriras monton, poste eniras en la ebenaĵon. Renardo estas tiom dolorplena, ke li perdas la veran vojon kaj ke ili troviĝas ambaŭ, kiam ili malpleje atendas ĝin, antaŭ la garbejo de la monaĥinoj. La domo estis abunde provizita de ĉiuj varoj de la tero. "Ni bone farus, diras Renardo, antaŭeniri laŭ tiuj heĝoj al tiu korto kie moviĝas tiom da kokinoj. Tien devas esti la vojo kiun ni perdis. - Ha ! Renardo ! eligas Grimberto, Dio scias kial vi tiel parolas. Vi vere estas pli malbona ol herezulo. Ĉu vi ne konfesis pri viaj malnovaj malbonagoj ? ĉu vi ne pro tio batis vian bruston ? - Mi forgesis tion, respondas Renardo, ni do malproksimiĝu ĉar vi volas tion. - Bedaŭrinde ! Ĉu vi retiriĝas, ĉu vi daŭrigas, vi mortas sen pliboniĝi; vi restos ĵurrompinto kaj nefidindulo ! Ĉu oni konceptas tian blindecon !

Vi riskas aventuron de morto, kaj vi scias tion; vi havis la feliĉon fari vian lastan konfeson, kaj vi imagas rekomenci vian malbonan vivon ! Malbenita horo kiam via patrino lasis vin fali sur teron ! - Jes, mia bo-kuzo, vi pravas; ni vojiru kaj ni ne kverelu". La timo de lia kuzo retenis lin; tamen, de tempo al tempo, li turnis la kapon direkte al la garbejo de la monaĥinoj, kaj se li estus la estro, li ne mankus impeti kontraŭ la kortobirdojn, riskante kompromiti la meritojn de sia konfeso.

Cetere li kontraŭvole antaŭeniris. Ju pli li proksimiĝis kaj des pli li tremetis pro maltrankvilo. Sed jen la lasta monto estas nun transirita, la valo kie la kortumo sidas aperas, kaj jam la kunsido estis malfermita, kiam ili desaltis teren kaj petis por esti enkondukitaj.

45^a Aventuro.

Kiel grandsinjoro Renardo, monsinjoro Nobla la reĝo kaj Grimberto faris belajn paroladojn kiuj persvadis nenium, kaj kiel monsinjoro Nobla informis grandsinjoron Renardoⁿ pri la akuzakto.

La alveno de grandsinjoro Renardo kaj de Grimberto kaŭzis grandan movon en la ĉeestantaro de la baronoj. Ne estis besto kiu ne montris la plej viglan sopiradon por subteni la prokuroron. Isengrino, la konestablo, eĉ akriĝas jam siajn dentojn, kun la espero ke la okazo estos donita al li : Tiberto kaj Bruno brulas de venĝo, la unua pro sia perdita vosto, la dua pro la ruĝa ĉapelo kiun li akiris. Ŝanteklero staras sin sur siaj ergotoj, apud Ronjauso kiu grumblas kaj bojas pro senpacienco. Sed meze de ĉiuj ĉi manifestadoj de malamo kaj de furiozo, Renardo, reĝinta si mem, ŝajniĝas videblan trankvilecon; li antaŭeniras kun kvieta mieno ĝis la mezo de la ĉambro, kaj post esti malrapide promeniginta siajn fierajn kaj disdegnajn rigardojn dekstren, maldekstren, kaj antaŭ li, li petas esti aŭdota kaj eldiras la sekvan paroladon :

"Siro reĝo, mi salutas vin, kiel tiu kiu faris al vi plej bonan servon, per si sole, ol ĉiuj viaj aliaj baronoj kunigitaj. Oni kalumniis min antaŭ vi : mia malfeliĉo volis ke mi neniam ĝuu tutan tagon de via bonkoreco. Oni diras al mi ke, danke al la flatuloj kiuj ĉirkaŭas vin, vi volas kondamni min al morto. Ĉu oni povas miri pro tio kiam la reĝo ŝategas la raporton de homoj sen honoro, kiam li forpuŝas la konsilon de siaj plej elprovitaj baronoj ? Tuj kiam oni mallevas la kapojn por laŭdegi la piedojn, la ŝtato devas troviĝi en malbona situacio; ĉar tiuj kiujn Naturo faris servutulojn, vane altiĝas en potenco, en riĉeco, ili ĉiam havas servutan koron, kaj ilia leviĝo utilas al ili nur por fari al la honestaj kaj denaskaj Nobeloj ĉian eblan malbonon. Neniam malsatega hundo kontentiĝos nur lekante sian apudulon. Ĉu la servutuloj ne estas la plago de la malriĉuloj ? Ili konsilas la ŝanĝon de monoj por ŝveligi sian monujon, ili ronĝas la aliajn kaj solaj profitas de ĉiuj maljustaĵoj kiujn ili okazigis. Sed mi ŝatus scii tion

kion Bruno kaj Tiberto venas postuli de mi. Certe, ili kapablas, kun la subteno de la reĝo, fari al mi multe da malbono, ĉu prave ĉu malprave; sed fine, se Bruno estis surprizita de la malbona Lanfroj, kiam li manĝis sian mielon, kiu povis malhelpi lin sin defendi ? Ĉu li ne havas manojn sufiĉe larĝajn, piedojn sufiĉe grandajn, dentojn sufiĉe fortajn, lumbojn sufiĉe facilmovajn ? Kaj se la digna Tiberto estis kaptita kaj kriplita dum li mordis ratojn kaj musojn, per kio tio povas trafi min ? Ĉu mi estis urbestro aŭ provosto, por ricevigi al li kompenzon ? Kaj kiel oni venus peti de mi tion kion ne estus en mia povo repagi ? Koncerne al Isengrino, vere mi ne scias kion diri. Se li asertas ke mi amas sian edzinon, li tute pravas; sed ke tio ĉagrenas la ĵaluzulon, mi ne estas ligita al tio. Ĉu oni parolas pri transpasitaj muregoj, pri rompitaĵoj pordoj, pri cedigitaj seruroj, pri frakasitaj pontoj ? Mi ne supozas tion : kia do estas la okazo de la protesto metita ? Mia amikino, la nobla sinjorino Hersento nenion riproĉas al mi; pri kio do plendas Isengrino ? Kiel lia malbona humoro povus kaŭzi mian pereon ? Ne, Disinjoro ŝirmos min de tio. Via reĝeco sendube estas tre alta, sed mi povas diri tion kun plena konfido, mi vivis tiom longe nur por agi, spite al ĉiuj, kun sindonemo kaj fideleco cele al vi. Mi atestigas Dion kiu ne mensogas, kaj sanktan Georgon, patronon de la bravaj kavaliroj. Nun kiam la aĝo detruis miajn fortojn, kiam mia voĉo estas difektita, kaj kiam mi eĉ havas sufiĉe da peno por kolekti miajn ideojn, estas malmulte nobla voki min en la kortumo kaj ekspluati mian malfortecon; sed la reĝo ordonas, kaj mi obeas. Jen mi antaŭ lia brakseĝo; li povas ĵeti min en la malliberejo, kondamni min al fajro, al la ŝnuro; tamen, koncerne maljunulon, la venĝo estus malmulte nobla, kaj se oni pendigus beston tia kia mi sen aŭskulti lin, mi kredas ke oni longtempe parolus pri tio".

Apenaŭ Renardo finis ke la reĝo Nobla siavice ekparolis : "Renardo, Renardo, vi kapablas paroli kaj defendi vin; sed la artifiko ne plu estas konvena. Malbenita la animon de via patro kaj de la malbona virino kiu portis vin sen aborti ! Eĉ se vi havus ĉiujn lertaĵojn de la sovaĝa azenino kies parolas la Libro, vi ne eskapus la punon de viaj nombraj malbonaĵoj. Lasu do for vian ŝajnan sekurecon; ĝi estas friponaĵo. Vi estos juĝita ĉar vi petas tion; miaj baronoj ĉi tie

kunvenintaj decidis kiel oni devas trakti tian perfidulon, murdiston, ŝteliston kia vi. Nu, ĉu iu ĉi tie volas diri ke ĉi tiuj nomoj ne konvenas al vi ? Ke li parolu, ni aŭskultos lin".

Grimberto stariĝis. "Siro, li diras, vi vidas ke ni respondis al via admono; ni venis kliniĝi antaŭ via juĝopovo : ĉu tio signifas ke konvenas ofende trakti nin, eĉ antaŭ ol aŭdi la kazon ? Jen grandsinjoro Renardo kiu sin prezentas por plenumi kaj kontentigi tion kion oni baldaŭ postulos de li : se iu protesto stariĝas kontraŭ li, vi devas, siro, lasi al defendo kompletan liberecon kaj ĉiujn rimedojn por publike forpuŝi publika akuzo".

Grimberto ne jam ĉesis paroli kiam stariĝis ĉiuj kune, Isengrino la lupo, Ronjauso la laniario, Tiberto la kato, Tiselino la korvo, Ŝanteklero la virkoko, Pajnto la kokino, Druino la pasero kaj grandsinjoro Kovardo la leporo; sen paroli pri Bruno la urso, pri Froberto la grilo, pri la korniko kaj pri la paruo. La reĝo ordonas al ĉiuj residiĝi, poste li mem elmetas la diversajn protestojn starigitajn kontraŭ Renardo, kaj submetitajn al la juĝado de la kunigita kortumo.

(Ĉi tie la originala verkisto entute donas tion kion oni hodiaŭ nomus la akuzakto : ĝi remetas, unu post la alia, la aventurojn kiujn la unua libro jam sciigis kaj kiuj estas la fundamentoj de la proceso de Renardo. Ni ne devas sekvi lin en ĉi tiuj rediroj, ni nur konsideros kelkajn aventurojn rememoriigitajn de Nobla kaj pri kiuj ni ne sukcesis trovi la lokon. Ĉar ili aperas inter la akuzaĵoj, ni devas informigi pri tio, alie, la historio de Renardo estus nekompleta.

La hundo Morhuo kiu, en unu el la sekvontaj aventuroj, zorgos pri la venĝo de la bona Druino, eblus ja esti la frato de Ronjauso, la laniario, kiu en la ĵurafero (probable memore al la malbonaj soldoj menciitaj ĉi supren en la konfeso de Renardo) fariĝis la instrumento de pia fraŭdo el la plej aŭdacaj. Unu el la malnovaj historiistoj de Renardo ankaŭ atribuas al Ronjauso la laniario, plurajn el la embarasajn renkontojn pri kiuj la famo volis ke Isengrino estu viktimo. Ĉio eble ne estas malvera en ĉi tiu izolita atributado; ĉar la hundo neniam estis samrange kun grandsinjoro Renardo. Oni do ne miros vidi lin volonte konsenti pri la venĝaj projektoj de Isengrino kaj Druino. - Kiam ni estos priskribintaj ĉi tiujn novajn aventurojn, ni daŭrigos la sekvaĵon de la proceso).

46^a Aventuro.

*Kiel iu prodo plurfoje vidis grandsinjoron Renardo",
kaj ĉagreniĝis ne sukcesi atingi lin.*

Estis antaŭlonge brava kaj laŭdinda kavaliro kiu konstruigis belan kastelon en la plej bela situo de la mondo. La konstruaĵo staris sur pinta roko; laŭlonge de la ĉirkaŭmuroj fluis vigla kaj profunda akvo entenata en larĝa fluejo super kiu turnoponto estis metita. La rivero transpasis malsupre de la teramaso kaj provizis la sinjordon de la kavaliro per ĉiuj aĵoj kiujn oni aĉetas; poste ĝi iris post kelka distanco perdiĝi en la maron. Longa herbejo ĉarmis la vidaĵon, kaj sur la kontraŭaj deklivoj sterniĝis la vinberejoj kiuj havigis la plej bonan vinon de Francio. Pri la arbaroj dependantaj de la bieno, ili kovris herbejon je pli ol cent arpentoj, abunde okupata de ĉasbestoj kaj de akvobirdoj.

Iam la kavaliro surrajdis sian bonan kurĉevalon, kaj diris ke li volis iri al arbaro por serĉi ĉasaĵon. Tuj, eskviroj kaj serĝentoj parigis la hundojn kaj la kurĉasisto paŝis antaŭen sur granda griza ĉevalo. Ili ne malfruis trovi iun vulpon, kaj la kurĉasisto vokanta la hundojn : "Ek ! Ek ! Ĉi tie la vulpo !" La hundoj sekvas kaj la ĉasistoj. Sed Renardo jam antaŭiĝis; li eliras el la arbaron, saltas sur la turnoponton kaj atingas la pordon de la kastelo. Kiam la kavaliro vidas lin eniri : "Li estas por ni, li diras, li mem aliris". Kaj, galopege impetante, li unue alvenas al la kastelo, eliras el la piedingo kiun tenas iu seneskalo, kaj baldaŭ ĉiuj aliaj eniras kaj elĉevaliĝas en la korto post li.

Ili ĉien serĉas la vulpon, ili priserĉis la stalon, la ĉambrojn, la kuirejojn, renversas ĉion kaj ne malkovras lin. Ili revenas en la ĉambregojn, rigardas sub la tablojn; ili supreniras al la neĉefaj ĉambroj (en la supra etaĝo), malsupreniras al la keloj, vizitas ĉiujn angulojn kaj kaŝangulojn, rigardas sub la benkojn kaj eĉ en malnovan abelujon kies oni forprenis la mielon; ili tie ne trovas la vulpon. "Dio mia ! ili eligas, kio li fariĝis ? Kiel neniuj sukcesis malkovri lin ? Necesas do ke li estu enirinta sub tero ! - Ĉion kion mi scias, diras la

kavaliro, estas ke mi vidis lin trapasi la pordon, kaj ke certe li ne eliris de kiam la ponto estas relevita. Sed fine, ĉar ni ne kapablas malkovri lin, ne ĉesu persekuti lin, li sin montros kiam ni ne plu pensos pri li. - Por ni, diras la aliaj, ni serĉos lin ĝis la nokto, ni havus tro da honto se li eskapus nin. - Kiel plaĉos al vi, diras la kavaliro, pri mi, mi ne estos kun vi".

Li malproksimiĝas, kaj la aliaj rekomencas serĉi, ĵurante ke ili ne haltos ĝis la noktiĝo. Ili denove renversis la benkojn, ili denove malaranĝis la litojn kiam sonoris la vespersignalon kiu avertis ilin ĉesi. Revenintaj apud la kavaliro : "Ha ! Sinjoro ! Renardo estas pli lerta kaj pli ruza ol ni. - Kio ! Ĉu vi ne havas lin ? Tio apartenus al sorĉo, ĝi estas antaŭsigno, averto kiun Dio sendas al ni. Finfine, ne estas facile gajni ĉe la ludo de Renardo : miaj kaponoj kaj tiuj kiuj gardas ilin, konas tiun aferon. Mi tamen vere kredis kapti lin; necesas ke Dio aŭ la demono forpreni lin de ni. Ni ĉasos lin alifoje; sed ke mi mortu se mi ne alkonduku lin al la mortiga celo : mi promesas tion al sankta. Denizo en Francio, al kiu mi aldirektas; mi volas ke mia peltaĵo estu pli varmiga en ĉi vintro, danke al la lia kiun mi kunigos. Nu ! Ni bruligu kandelojn, ni sidiĝu por manĝi; ni jam tro malfruis pro iu vulpo. Akvon ! Kaj ni lavu nin !"

Ili sidiĝas por vespermanĝi. Unue, la kavaliro kaj apud li, la edziniĝinta damo, bela, gracia kaj ridanta kiel la dolĉa nomo de Floria kiu estis la ŝia; la hejmanaro okupas la aliajn lokojn. Alvenas la ĉefaj manĝaĵoj, larditaĵoj aŭ cervaj kaj apraj fileoj, bonaj vinoj de Anĵuo, de Potevio, de Roĉelo. Oni parolas pri agrablaj aferoj, oni ĉefe ridas pri Renardo kiu tiel bone trompis ilin ĉiujn. Renardo mem ne estis for. Allogita de la aromo de la viandoj, li ŝovas sin sub la tablon kaj de tie aŭdas kiel oni parolas pri li. Sur la servoĉareto, je kelkaj paŝoj, troviĝis du belaj larditaj perdrikoj. Renardo prenas sian tempon, pafas sin al ili, kunprenas la plej grasan. Oni rekonas lin, oni ekkrias : "Ha ! Jen li ! Ni havas lin; ĉifoje li ne eskapos". Ĉiuj tuj stariĝas, sed ili kiom ajn kuras, serĉas, fermas la pordojn, Renardo antaŭiĝis al ili. Li estis rapidege atinginta en la korto truon konatan de li, tra kie elfluis la akvon de pluvegoj kaj dum oni ĉaspelis lin kun torĉoj, kandeloj, tra la ĉambrojn, la subtegmentojn, la kelojn, la

kuirejojn kaj la stalojn, li estas trankvila en malproksima kavaĵo, avidege disŝirante la perdrikon kaj agrable sin karesante la barbojn per ĝi.

"Ha ! Malbona Renardo, tamen diris la kavaliro, vi certe prenis lecionon ĉe la lernejo de la diablo; sed ke mi neniam sidiĝu por vespermanĝi se vi fine ne pagu tion al mi kiel mi volos tion. Formetu la tablojn, mi perdis ĉian deziron reveni por manĝi".

La tablojn forprenitajn, sinjorino Floria venas kisi sian baronon : "Kredu min, ŝi diras al li, iru ripozi, estas tempo, noktomezo baldaŭ sonos; vi devas esti laca pro tiom ĉasadi la vulpon en arbaro kaj domo. - La vulpon ? Ne pensu ke mi zorgas pri tio; sed ni iru dormi, ĉar vi deziras tion". Ili eniras en la ĉambron kie la lito estis pretigita. Ĉio estis laborita per sukceso; la pentristo figuris per bonega streko ĉiujn birdojn de la mondo, sen forgesi la Procesion Renardo. Nenio agraba kiel ĉi tiu laboraĵo, laŭ ĉiuj siaj partoj. La kavaliro, kiam oni estis senŝuigita lin, enlitiĝis kien la damo apenaŭ malfruis veni kuniĝi kun li, lasante sur iun tablon du ardajn kandelojn por batali kontraŭ la nokta mallumeco. Ĉiuj en la kastelo ripozis ĝis la morgaŭo kiam la serĝentoj kaj la eskviroj ellitiĝis ĉe la taglumiĝo. La kurĉasisto eniris unue en la ĉambron de la kavaliro kiun li trovis staranta, jam piedvestita kaj preta por iri en la ĉambregon kie ĉiu por honori lin stariĝis tuj kiam li aperis. "Bela siro, ili diras al li, havu hodiaŭ bonan tagon ! - Nu ! Ke tuj oni selu mian ĉevalon; mi volas kurĉasi la vulpon".

La varleto al kiu alparolis la kavaliro, kuras meti selon sur la ĉevalon; li alkondukas ĝin antaŭ la ŝtuparon, dum la kurĉasisto ordigas la hundojn. Ĉiuj surĉevaliĝas, transpasas la pordon kaj la ponton; ili ankoraŭ estis en la ĝardeno kiam ili ekvidis Renardo" trankvile kuŝantan sub pomarbo. La hundoj estas malligitaj, oni kornas vulpon, dum tiu ĉi, kolera pro la maloportunaĵo, forkuregas kaj atingas la arbaregon. La levreloj sekvas kaj faras kun li mil kurbiĝojn; li retropaŝas, eliras el la arbaro kaj duan fojon transiras la ponton kaj la pordon de la kastelo. La konfuzitaj levreloj ĉesas, la ĉasado finiĝas. "Necesas konfesi, antaŭ Dio, diras la kavaliro, ke Renardo devas tre moki nin kiu lasas lin tiel eskapi. Ni tamen serĉu lin ankoraŭ en la kastelo".

Oni revenas, oni movas ĉiujn pankestojn, oni malfermas ĉiujn kofrojn, oni rigardas sub ĉiujn tablojn, en ĉiujn tukojn, sur ĉiujn litojn; neniam tiom da movado kaj da urĝo en Senliso, iun tagon de foiro kiam oni kondukas pendumi ŝteliston. Tio ĉio por nenio. "Necesas ja rezignacii, diras la kavaliro, per sankta Jakobo, mi ne deziras fasti hodiaŭ kiel mi faris hieraŭ. Sufiĉas, metu la tablotukojn kaj sidiĝu por manĝi !"

47^a Aventuro.

*Pri la anoncita vizito al la Kavaliro,
kaj pri la ĉasado kontraŭ la cervo kaj sovaĝa porko.*

Jen do ili sidantaj por la matenmanĝo. Apenaŭ ili komencis tuŝi la manĝaĵojn, ke ili vidis tra la fenestro du bone armitajn eskvirojn alveni al la kastelo, ciun portantan grandan pecon de cervaĵo aŭ de apraĵo. Ili elseliĝas antaŭ la ŝtuparo, supreniras en la ĉambegon kaj salutantaj la kavaliron : "Siro, Dio benu vin kaj vian kompanion ! - Dio savu vin ! respondas la ĝentila Sinjoro, kaj estu ĉi tie bonvenaj ! Sed unue lavu kaj prenu lokon ĉe la tablo. - Ĉefe, siro, ni diros la motivon de nia alveno. Via kara patro salutas vin kaj viaj du fratoj; ĉiuj tri devas alveni ĉi tien morgaŭ. - Estu do duafoje bonvenaj, diras la kavaliro, eltabliĝante por brakumi ilin". Eniras tiam du belaj junaj varletoj, la unua portanta mantukon, la alia pelvon el pura arĝento. La pelvo, plenigita de klara travidebla akvo, estas prezentita al la du eskviroj kiuj post esti lavintaj diras duonlaŭte al varletoj : "Fratoj, iru preni la varojn kiujn ni lasis malsupre de la ŝtuparo, kaj ne forgesu niajn ĉevalojn". La varletoj malproksimiĝas, unu zorgas meti la pecojn de cervaĵo kaj apraĵo en la provizejon, la alia kondukas la ĉevalojn en la ĉevalejon, provizas ilin per fojno kaj aveno, preparas al ili bonan pajlaĵon kaj revenas en la ĉambregon kie la eskviroj prenis lokon apud sinjorino Floria. La tablotukoj refalditaj kaj la teleraro formetitaj, oni pretiĝas reiri al la arbaro por serĉi la necesan ĉasaĵon por bone ricevi tiujn kiujn oni atendas la morgaŭon. La ĉasisto estas alkondukita, la levreloj estas parigitaj, kaj ĉiuj eniras en la arbaron.

Ili ne estis tie de longe sen trovi grandan cervon kun kvar disbranĉiĝojn kiu ne juĝis taŭga atendi ilin. La liberlasitaj hundoj arde ekpersekutas ĝin. La cervo tamen lacigintus ilin sen iu arkisto kiu de malproksime ekĵetis al ĝi sagon, trafis ĝin ĉe la flankon kaj faligis ĝin sangan kaj sen forto. La levreloj alkuras kaj ŝiras ĝin; la cervo restas sub la potenco de la kurĉasistoj. Oni tiam religas la hundojn, kaj oni konfidas ĉi tiun belan kaptaĵon al la zorgoj de du eskviroj kiuj preparas ĝin kaj kondukigas ĝin al la kastelo.

Tio estis nur la komenco de la ĉaso. La kavaliro batas per longa kurba bastono la erikojn kaj la veprojn; la kurĉasisto sonigas kornon, kaj la sono eĥiĝas ĝis la ekstremoj de la arbaro. Vekita de la bruo, dikega apro eliras el kopso kaj ekkuras plej rapide. Iu granda kaj forta levrelo sturmas al ĝi, preterdistancas la aliajn je trafdistanco de pafarko, atingas ĝin, kaj por superforti ĝin, provas mordi ĝin ĉe la orelo. La apro furioza direktas la denton al la levrelo, ŝiras ĝian flankon, kaj portas ĝin ĉe la piedo de kverko sur kiu li ĵetas ĝin, eligante kune la internaĵojn kaj la cerbon. La aliaj hundoj ĉirkaŭas ĝin kun duobliĝo de kolero; ĝi eskapas el ili; la kruciĝantaj veproj, la interplektiĝantaj frondoj, la dikaj branĉoj longtempe kaŝas ĝin de ilia venĝo. Fine, sentante sin incitegita, ĝi decidiĝas eliri el la arbaro kaj fuĝi direkte al la rivero. Ĝi atingas la krutaĵon kaj falas ventrokuŝe en la akvo; ĝi tie kredis sin ŝirmite, kiam levrelo saltas post ĝi, ĵetas la dentojn ĉirkaŭ ĝian kolon, dum la tuta hundaro alkuras por helpi sian kamaradon; sed estis jam tro malfrue, la porko estis renversinta ĝin kaj droniginta sub la pezo de sia korpo. Ĉi tiu duobla ekzemplo ne haltigas la aliajn; ili naĝas ĉirkaŭ ĝi, furiozas kontraŭ ĝia postaĵo kaj ĝiaj flankoj, ĝis la momento kiam la ĉasistoj alvenas. La porko tiam kolektas siajn fortojn, transpasas al la alia bordo kaj fuĝas tra kampoj; la hundoj, la ĉasistoj kuniĝas kun ĝi kaj preterpasas ĝin; ĝi devas halti. Iu levrelo, pli arda ol la aliaj, estas trafita de ĝia terura dento, kaj ĵetita en la aero, ĝi refalas sen vivo, dum la besto, grave vundita, ankoraŭ sukcesas malproksimigi sin de la hundoj. Sed ĉia elirejo estas malpermesita al ĝi; la apro revenas al la akvo, la tuta hundaro denove kuniĝas tien kun ĝi, sed restas je kelka distanco, kaj estas kun ĉi tiu furioza eskorto ke li duafoje eniras en la arbaregon. Iu kvara levrelo, kiu aŭdacis kapti ĝin ĉe la gorĝo, estas ankoraŭ ekkaptita, ĵetita kontraŭ fagon, kun la kapo rompita, la ventro malfermita. Tiam la kavaliro antaŭen foriras je trafdistanco de arbalesto. Firme en la piedingo, kun lanco en la pugno, li atendas la apron kies vundoj kaj furiozo blindigis, kaj kiu venas sin ĵeti impetege kontraŭ li. La lignaĵo de la lanco rompiĝas, sed la ferpinto restas en la korpo kaj eniĝas kiel razilo de sub la ŝultro ĝis la intestoj. Tuj la monstro ŝanceliĝas kaj ĉesas sin defendi ĉesante

vivi. La kavaliro deĉevaliĝas, kaj ĉiuj ĉasistoj alvenintaj ĉirkaŭ li dankegas Dion pro la venko.

Nun estas al la kurĉasisto plenumi sian taskon. Li prenis longan tranĉilon kies tenilo estis el arĝento, entranĉas la apron, purigas ĝin, unue donas la intestojn kaj la pulmon al la levreloj, poste al la resto de la hundaro; sen forgesi iu ajn hundon, ĉiuj estantaj bone plenumintaj sian taskon. La ĉasvisceraĵoj voritaj, la kavaliro surseliĝas kaj post li ĉiuj aliaj. Oni ligas la apron sur forta ĉasĉevalo, la roto faras bonan eskorton ĝis la kastelo kies ponto releviĝas; la pordoj refermiĝas tuj kiam ili estas ene.

La kavaliro venis ripozi en la granda salono. Tamen la kurĉasisto kuŝigis la apron antaŭ la fenestroj. Oni aranĝas grandan amason da pajlo sur kiu oni sternas la grandegan beston : oni flamigas, kaj kiam la nigra lardhaŭto prenis la orruĝan nuancon kiun oni volis doni al ĝi, oni portas ĝin antaŭ sinjorino Floria. Ne demandu ĉu oni admiregis la grandecon de la kapo kaj la longecon de la dentegoj. Sed la tabloj estas pretigitaj, la eskviroj alportas la pelvojn plenajn de akvo kiujn ili prezentis al la sinjorino, al la kavaliro, al ĉiuj aliaj, kaj oni altabliĝis por manĝi.

48^a Aventuro.

*Pri la alveno de la patro kaj la fratoj de la Kavaliro;
pri bela nano kiu akompanis ilin,
kaj kiel oni malkovris grandsinjoron Renardoⁿ.*

La teleraron formetitajn, oni forlasas la ĉambron, oni grimpas la ŝtupojn de la ĉefa turo, por pli bone ĝui la belan vidaĵon. La kavaliro, kun la lanco enmane, apogas sin sur la kreneloj. La aliaj sidiĝas rigardantaj laŭplaĉe la vitejojn, la herbejon, la tritikokampojn, la riveron kaj la maron kiu perdiĝis en la vasteco. Sed aliaj objektoj altiras sian atenton. Spurhundoj, sanghundoj kaj leporhundoj alkuris al la kastelo, direktataj de servistoj sur ĉevalo. Unu kunportis kornon ĉirkaŭ sia kolo, kies li mallaŭte kornis. Poste venis du pezaj ĉaroj, antaŭataj de nano, kaj eskortataj de du eskviroj. Sekve de la ĉaroj, dek kvar soldatojn sur ĉevaloj kun riĉaj ĉevalkovriloj.

La kavaliro, alparolante al la du eskviroj matene alvenintaj : "Fratoj, li diras al ili, ĉu ne estas tien la akompanantaro de mia sinjoro patro ? - Jes, siro, ne dubu pri tio", ili respondas. Tamen la ponto malleviĝis, la kastelpordo malfermiĝis; oni rapidege malŝarĝas la ĉarojn, ĉar la nokto proksimiĝis. La kavaliro eniras en la ĉambregon kaj sidiĝas en la brakseĝon, sub riĉa baldakeno. Poste li stariĝas ĉe la alproksimiĝo de la soldatoj kiuj venante sin klini antaŭ lin : "Siro, ili diras, Dio donu al vi bonan nokton !" La kavaliro ĝentile reciprokas la saluton kaj alkondukas al tablo ĉiujn novajn alvenintojn. Kiam la manĝo finiĝis, la kavaliro donas stariĝante la signalon de la foriro; la fremduloj estas gvidataj al ĉambroj kie ili devas ripozi, kaj la morgaŭan matenon, ili estas vekitaj de la gardantaro kiu, supre de la kreneloj kornis la tagon. La kavaliro ellitiĝinta, surmetinta ŝuojn kaj vestojn, iris kun la sinjorino Floria al monaĥejo por tie aŭdi la meson de Nia Damo, kaj tuj kiam la diservo estas finita, li seligas la ĉevalojn por iri renkonte al sia patro sed antaŭ ol malproksimiĝi, li zorgas disdoni ordonojn por ke ĉio kontribuu al la bona akcepto kiun li deziras fari al tiuj kiuj estas alvenontaj.

Ili ne vojiris je duonleŭgo sur la eluzita vojo ke ili aŭdis la gajan

bruon de rajdantaro. Estas unue grupo de kvar lakeoj, tenante enmane la kondukŝnuron de sanghundo aŭ leporhundo. La kavaliro transpasas ĝis sian noblan patron kiun li tenere brakumas. Ne estas festo kiu tiel efikas sur li krom liaj du fratoj. Ili reiras sur la vojo al la kastelo kaj survoje, ili petas novaĵojn pri ĉio kio povas interesi ilin. Dum ili proksimiĝis al la fosaĵoj, ili ekvidas fuĝantan al la arbaro vulpon kiun la najbareco de hundoj elpeligis. "Ha ! vere, diras la kavaliro ridante, estas la sama vulpo, mi rekonas ĝin. - Mokado ! elias la aliaj, kaj kiamaniere ? - Mi tuj diros tion al vi : mi ĉasigis ĝin dufoje; kiam ĝi sentas sin tro turmentata de la hundoj ĝi ekfuĝas al la kastelo, ni vidas ĝin eniri, ni turnas la ponton, ni fermas la pordojn, kaj ni vane serĉas, ni ne trovas ĝin. Neeble scii kien li izoligas. - Amiko, diras la patro, tre lerta tiu kiu trompos la vulpon; tamen, se vi liberigus viajn hundojn, ni povus ĉasi ĝin kaj forigi el ĝi ajnan rimedon de retiriĝo".

Tuj la varletoj metis la hundojn sur la postsignoj de Renardo; sed tuj kiam tiu ĉi rekonas iliajn voĉojn, li reiras sur la vojo al la kastelo. Estis ĝenerala krio. La kurĉasistoj vane krias kaj la hundoj bojas, Renardo atingas la ponton kaj transiras la pordon. La varletoj, la eskviroj alkuras, penadas serĉi, ĉion malfermi kaj renversi, tiom da senutilaj penadoj. Oni tiam decidiĝas ridi, la kavaliro unue kaj pli laŭte ol la aliaj. "Jes, miaj sinjoroj, jen per sankta Lamberto, kiel la vulpo kondukas al ni ekde longe. Ni ne plu pensu pri tio, kaj pensu nur bone ripozi".

La patro kaj la tri fratoj, manoj unu en la alia, supreniras la ŝtupojn de la ĉambro, kaj la unua objekto kiun ili vidas enirante, estas la nano kiu akompanis ilin. Verdire oni povintus rigardi lin kiel demonon : ĝiban antaŭe kaj malantaŭe, kun piedoj torditaj, koksoj amasigitaj, du mallongajn branĉoj de pino anstataŭ brakoj kiujn la kvaronulno de serĝo sufiĉis por kovri; buŝo distordita, lipoj sufiĉe kuspitaj por aspekti kiel arumo; dentoj el la ovoflava koloro, nazo longa je duoncolo, okuloj de hundo, haroj nigraj kiel inko kaj oreloj de kaprino. Li estis okupanta plekti ĉapelon per branĉetoj de fenkolo; li ĉesis por strabe rigardi al tiuj kiuj eniris. "Nano, Dio gardu vin ! diras la kavaliro. Anstataŭ respondi, li skuis la kapon kaj aŭdigis grumbladon.

Por estigi kontraston kun ĉi tiu malbelega estulo, aperas sinjorino Floria kiu faras al la novaj venantoj la plej gracian akcepton. Oni ridas, oni interŝanĝas ĝentilajn kaj plaĉajn parolojn ĝis la horo de la manĝo. Tamen la tablotukoj estas metitaj, kaj sur la tablon la pano kaj la salo. Oni donas por lavi al ĉiu, oni altabliĝas. Mi priskribos nek la manĝaĵon nek la vinojn. Estis apro spicita per pipro, cervo bone lardita, bonegaj pasteĉoj de kaponoj, la tuto provizitaj per vinoj de Orleano kaj Aŭvernjo. Dum ili manĝis, oni rimarkis ke la sanghundoj levis la kapon, kun la okulo malkvieta, la buŝo anhelanta, kvazaŭ ili flarintus iajn vivantajn predojn.

La kavaliro tiam turnante sin al sia kurĉasisto : "Amiko, li diras, sciigu al mi, mi petegas vin, kiom da feloj de vulpo ni havas. - Vi havas naŭ el ili. - Ĉu naŭ ? Diable ! Mi vidas dek el ili, kaj mi ne komprenas tiujn sanghundojn kiuj vebojas tiel laŭte al ili". La kurĉasisto tiam proksimigas sin al la feloj; unu ŝajnis spiri kaj fakte spiris, ĉar estis Renardo mem, kun osto, karno kaj haŭto; li pendis ĉe la plej kaŝita el la pikaĵoj destinitaj por kunigi la felojn de siaj samspeculoj; li sin alkroĉis tie per la dentoj kaj la antaŭaj piedoj. La kurĉasisto rekonas lin : "Ha ! Per sankta Leonardo, vere estas la vulpo kiu troviĝas tie kun ĉi tiuj feloj, kaj jen kial la hundoj jelpas. Momenton, kaj mi alportas ĝin al vi".

Li tiam levas la manon al la pikaĵoj, atingas Renardoⁿ kiun li provas kapti; sed la alia duonturniĝas kaj anstataŭigas ĉe la kroĉilo la antaŭajn piedojn per tiuj de malantaŭe; kaj kiam la kurĉasisto faras duan provon, li ekkaptas per siaj dentoj la manon kiun li dispremas tiagrade ke la ungo disiĝas de la karno. La malfeliĉa kurĉasisto eligas akran krion, Renardo faras salton al la pordo, eliras el la domo kaj konjektante ke oni povos reatingi lin en la arbaro, iras sur la vojo de la herbejo. Li estas haltigita dum sia kurado de la rivero kiu baras al li la transpasadon; sed estis nenio pli por timi pri la persekutado de la varletoj de la kavaliro, kaj ĉar oni devis kredi lin en la arbaro, li scias ke oni tie serĉos lin, antaŭ ol pensi postkuri lin en la ebenaĵo.

49^a Aventuro.

*Kiel Pinĉisto, la ardeo, fiŝkaptis en rivero,
kaj kiel grandsinjoro Renardo kaptis la fiŝiston.*

Renardo estis sufiĉe kontenta je siaj lastaj tagoj; li tamen bedaŭris ke li ne havis sian parton de la granda vespermanĝo al kiu li ĵus ĉeestis. Malsato komencis viziti lin kiam, el la tufarbusto sub kiu li kaŭriĝis por esti vidata de neniu, li ekvidis la ardeon Pinĉisto kiu laŭlonge de la rivero fiŝis fiŝojn per la beko. Pinĉisto estas objekto de bona kaptado; sed la rimedo por iri ĝis ĝi ? "Eblas ke ĝi venu per si mem, sed kiam ? Mi povos morti pro malsato atendante ĝin, kaj plie, ĉu ia kampulo aŭ, tio kio estas eĉ pli malbona, ia laniario ne venos ĝeni min ? Pinĉisto tamen estus bonega vespermanĝo. Nu ! Ni klopodu, estas la leĝo de la jarcento, sen laboro, oni ne kapablas sukcesi ion".

Li tiam rampas ĝis la rando de la akvo. La rando estis kovrita de densa filiko, li elŝiras plurajn plenbrakojn el ĝi, kunigas ilin kaj kunpremas ilin laŭ formo de flosa kiun li lasas drivi super la lokon kie staras Pinĉisto. Vidante la trajnon, la fiŝista birdo levas la kapon kaj retrosaltas, sed rekonante ke estis nur amaso da filiko, ĝi retrankviliĝas kaj kviete rekomencas sian fiŝkaptado. Grandsinjoro Renardo faras novan provon, li elŝiras duan brakplenon pli dikan kaj denove ĵetas ĝin sur la akvon. La ardeo pli atente rigardas, sin alproksimigas al la flosanta objekto, esploras la filikon per la beko kaj kruroj kaj certiĝanta ke estis tie por li nenion por gajni aŭ por timi, li duafoje rekomencas fiŝi, decidiĝanta ne plu interrompi ĝin por aliaj samaspektaj alvenoj. Ĉi tiu konfido estis la kaŭzo de ĝia perdo ĉar Renardo baldaŭ profitos de tio por provi la decidan baton. Li faris trian floson kaj en ĝi aranĝas ian liton en kiu li povos facile sin kaŝi, ĉar la filiko estas ĝuste el la koloro de lia felo. Li tamen hezitas antaŭ ol eniri en ĝin; la tereno eble ne estas sufiĉe firma, sed fine rezignacias, sin metas sur la ondoj samtempe kun sia neforta konstruaĵo, kaj sentas sin portita tute proksime de la fiŝisto kun longa beko. Pinĉisto ne zorgas pri tio : "mi konas tion ! ĝi diras, mi ne

timiĝas pro kelkaj tigoj de filikoj". Kaj baldaŭ Renardo, utiligante la momento kiam la beko kaj la kapo de la birdo estis mergita en la akvo, ĵetas al ĝi denton, ekkaptas ĝin ĉe la kolo, relevas al li la kapon, saltas sur la teron kaj trenas ĝin sub la plej proksiman tufarbuston. Pinĉisto kriis per sia tuta forto; sed la alia ne estis el tiuj kiujn la plendoj kortuŝas; li metas ĝin sub siajn piedojn kaj tiel donas al ĝi la finofaran baton. Tuj strangolita, tuj manĝita, por tiel diri.

50^a Aventuro.

*Pri fojnamaseto sur kiu Renardo tranoktis,
kaj kiel li cedis la lokon al la kampulo kiu volis preni ĝin.*

Estis la fojnsezono; vesperiĝis. Renardo, tute kontenta pro la bonega manĝo kiun li ĵus faris, decidis kuŝiĝi sur iu fojnstako por tie atendi la sunleviĝon, ĉar li sciis ke estis danĝere ekvojiri tuj post esti manĝinta, almenaŭ la kuracistoj asertas tion. Renardo do ekdormis sur la stako. Ĉirkaŭ la tagiĝo, li havis malbonan sonĝon. Li kredis esti hejme, apud sia kara Hermelina. La kastelo de Mopertui ekbrulis, flamoj ĉiujflanke eliris el ĝi, iu nevenkebla potenco retenis lin kaj malhelpis lin eviti iun certan morton. Kiam li lastfoje strebis por kuntreni Hermelina", li vekiĝis inundita de timegoŝvito. "Sankta Spirito ! li diras krucsignante sin antaŭ ol malfermi la okulojn, antaŭsavu mian korpon kontraŭ malbona aventuro !" Li tiam rigardis ĉirkaŭ si kaj ekvidas kun teruro ke dumnokte la ŝveliĝinta rivero kovris la herbejon kaj ke la tuj invadita fojnstako estis levita kaj jam forportita for de sia unua loko. "Ha ! kion mi faris, li ekkriis, kaj kion mi fariĝos ? Kial ne esti reveninta al Mopertui kiam nenio estis por mi pli facila ! Nun la bordo estas ĝis nevidebleco; se mi forĵetus min, mi dronus, se mi restus, la kampuloj sendube baldaŭ alvenus, kaj kiel defendi kontraŭ ili mian felon ?"

Dum li estis kun ĉi tiuj malgajaj pensoj, jen ke kampulo moviganta boaton alproksimiĝas al la stako. Li ne malfacile ekrekonis grandsinjoron Renardo" : "Kia bonŝanco, mia bona sankta Juliano ! li diras, ĝi estas belega vulpo; kian dorson, kian belegan kolfelon ! Ni provu kapti lin, la afero tre certe valoras la penon : mi vendos el ĝi la dorson, la gorĝo servos al mi por provizii mian mantelon per kolumo; kaj tuj senhaŭtigita, la rivero liberigos min de ĝia stinka kadavraĵo".

Pri tio kio malsaĝulo pensas, multe restas, diras la proverbo. La afero ne iros kiel deziras nia kampulo. Li alvenas ĝis la fojnstako, kaj unue li etendas la brakojn al Renardo kiu eskapas lin. Li levas sian remilon, la alia sin returnas kaj la bato ne trafas lin. La kampulo sin turnas kaj revenas, sed li ne pli progresis. Li tiam decidas eliri el sia

boato kaj mem pasi sur la stakon post esti foriginta siajn pezajn ŝuojn. Sed ĉe la momento kiam li metis la piedon sur la fojnon, Renardo metis sian sur la boaton, ekprenis la delasitan remilon kaj foriris pli for. La kampulo estas konsternita, senespera : jen tio kion oni gajnas pro voli kapti vulpon. Dume Renardo puŝas la boaton al la malkovrita bordo, kaj poste trankvile haltas, videbla de tiu kiu kalkulis je li por pelte subŝtofi la kolon de sia mantelo : "Dio senmaskigu vin, kampulo ! Ah ! En kia bela malliberejo vi min gardigus, se vi konkerintus min ! La proverbo ja estas vera : de malnobelo malnoblaĵon ! Kiam kampulo maltrafas la okazon malbone fari, li koleras, ĉar lia tuta feliĉo estas noci bonajn klerikojn, noblajn kavalirojn. La envio, la perfideco, la kolerego havas la koron de la kampulo kiel ordinaran rifuĝejon. Ĉu oni iam rakontis pri kampulo, bonan agon ? Nu, kampulo, rezignu mian haŭton, sed povu Dio ne savi la vian, kaj doni al vi malbonan morgaŭon !" Tio dirite, li remas ĝis la bordo, lerte saltas sur la teron, kaj sen esti ĝenata, reiras kaj alvenas al sia kastelo de Mopertui.

51^a Aventuro.

Kiel Renardo renkontis Druinoⁿ, kaj kiel bonfaro kelfoje perdiĝas.

Pli gaja, pli volanta ol neniam, Renardo post kelkaj tagoj de tiam, eliris el sia kastelo, kaj baldaŭ sin trovis antaŭ ĉerizujo plenplena de la plej belaj ĉerizoj. Sur la arbo estis pasero saltadanta de branĉo al branĉo. "Bonan apetiton, amiko Druino, diras al li Renardo. Ĉu vi ne estas feliĉa meze de tiuj belaj fruktoj ? - Ili estas bonegaj, respondas al li la birdo, sed mi satas de ili, kaj mi lasas ilin al vi, grandsinjoro Renardo, se vi ne disdegnus ilin. - Necesus unue atingi ilin, kaj mi ne kapablos fari tion. Transdonu al mi kelkajn el ili, mi petegas vin, por ke mi povu almenaŭ juĝi pri ilia gusto. - Kion, ĉu miaj grandsinjoroj vulpoj manĝas ĉerizojn ? Diras Druino, mi ne kredis tion. Mi tuj sendos ilin al vi, tiom kaj tiom kiom vi volos. - Dankon, frato, respondas Renardo, almenaŭ kiam mi tenos ilin".

Druino ĵetas al li nodo da tri ĉerizoj, kaj Renardo plezure manĝas ilin. "Aliajn, kara Druino mia ! Mi trovas ilin bonegajn, vere". Kaj la birdeto plenigas siajnflugilojn per ili. - Ĉu vi ankoraŭ deziras ilin, grandsinjoro Renardo ? - Ne, dank'al Dio, mi ne plu malsatas".

"Sed grandsinjoro Renardo, reparaĵis Druino, se vi volas danki min por la ĉerizojn kiujn mi plukis por vi, vi certe aŭskultos min dum momento, ĉu ne ? - Mi aŭskultas vin, amiko. - Vi multe vidis, multe vojaĝis; vi memortenis belajn sekretojn; sed mi ne scias, ĉu vi bonvolas sciigi vian sciencon al magravaj homoj kiel ni. Mi konfesas ke tiumomente mi plejforte bezonus ĝin". Renardo respondis : "Mia eta Druino, post la ĝentileco kiun vi ĵus faris al mi, mi havas nenion por rifuzi al vi, krom kiel vi bone pensas, mian malbonon. Nu, pri kio temas ? - Aŭskultu min, grandsinjoro Renardo, mi havas ĉi tie, apud mi, naŭ paseridojn kiuj ĉiuj estas pli malpli afekciitaj de podagro, kaj mi sentas grandan doloron. - Rekuraĝiĝu, diras Renardo, ĉar nenio estos pli facile por mi ol kuraci ilin, mi volas diri tute resanigi. Vi scias ke mi loĝis du jarojn transe de la montoj, en Romo, en Apulio, en Toskanio, en Armenio; mi kvarfoje transpasis la maron, kaj mi daŭrigis ĝis Konstantinopolo por trovi la kuracilon kiu taŭgis por la

malsano de la reĝo Nobla. Mi vojaĝis en Anglio, mi vizitis la landon de la Irŭasoj kaj de la Eskotoj. Mi tiom faris ke mi resanigis la reĝon, kaj estas rekompence por ĉi tiu grava servo, ke li donis al mi la postenon de la kastelmastro de ĉi tiuj landoj.

"Nu ! Diru al mi kiel miaj infanoj povos resanigi. - Kara Druino mia, necesas bapti ilin; tuj kiam ili fariĝos etaj kristanoj, ili ne plu sentos podagron. - Mi tre volonte kredus tion, respondas Druino; sed necesus pastro, kaj mi tute ne konas iun el ili. - Pastro ? diras Renardo, kaj mi, ĉu do mi ne estas li ? - Pardonu min, siro kastelmastro, mi ne sciis tion. Sed ĉu vi bonvolus bapti ilin ? - Jes, sendube; kaj unue, mi donas al la plejaĝa la nomon de Lienarto; ni poste zorgos pri la aliaj. - Jes, jes ! diras Druino, la plejaĝa unue, li estas la plej malsana".

Li tiam revenas al la nesto, eltiras el ĝi la plej fortan el siaj infanoj kaj ĵetas ĝin en la brakojn de Renardo kiu tuj metas ĝin en la ombron de sia korpo. Druino reiras al la nesto, prenas la aliajn kaj ĵetas ilin laŭvice al la malbona kleriko kiu faras ilin kristanojn sammaniere. "Ĉefe, diris la konfidema Druino, bone baptu ilin. - Estu trankvila, mi certigas vin ke en la estonteco ili ne plu havos podagron kaj ne riskos malbone fali desupre".

Dume Druino rigardis de iu flanko al la alia, ĝi vane saltadis de branĉo al branĉo, ĝi ne revidis sian familion. La timeto ekkaptas lin : "Renardo, Renardo ! Kie estas miaj filoj ? Mi ne vidas ilin, kie vi retenas ilin ? Ĉu vi forrabus ilin ? - Mi diras al vi ke ili estas en sekura loko. - Ha ! Renardo, mi petegas, montru ilin al mi; Renardo, kie estas miaj infanoj ? - Ili ripozas tie. - Ha ! KrUELULO, vi formanĝis ilin. Vi manĝis miajn filojn ! - Hej ! Ne. - Vi manĝis ilin, perfidulo, kaj jen kiel vi rekompencis min ! - Sed vi frenezas, Druino; viaj filoj ekflugis. - Bedaŭrinde ! Ili ne ankoraŭ havis plumojn. Renardo, en la nomo de Dio kiu ne mensogas, garantidonu al mi vian fidon, ke ili vivas. - Ho ! Per mia fido, mi bonvolas. - Bedaŭrinde ! Kio estas ĵuro por vi ! Vi ne timas la ĵurrompon. Ho ! Kiel mi ŝatus frapi vin, krevigi al vi la okulojn ! - Nu, malsupreniru, provu. - Ne. - Kaj kial ? - Ĉar mi ne plu povas kaj ne plu volas tion. Sed Renardo, sincerece, diru al mi, kion vi faris per miaj paseroj ? - Ĉu vi volas nepre scii tion ? - Jes, per la

nomo de Dio ! - Nu ! Per la nomo de mi, mi manĝis ilin. - Ve ! - Vere. Ĉu mi ne promesis resanigi ilin ? Mi faris tion, ilia podagro tute forpasis, mi eĉ diros al vi pli bone : mi voluntus ke tiel tenera patro ne estu plu longe apartigita de siaj infanoj".

Post ĉi tiuj kruelaj paroloj, Renardo malproksimiĝas kaj Druino restas sola lamentante : "Ha ! Dolĉaj infanoj, kian bedaŭron mi devas travivi pro via morto ! Estas mi kiu transdonis vin; sen mi vi ankoraŭ vivus. Ah ! Mi ne volegas resti post vi". Li tiam lasas sin fali de la arbo, kiel ĉe ni mem homoj, tiuj kiuj pro malespero, sin deĵetas de la supro de sia domo; la herbo ricevis ĝin svene, senigita de sento. Kaj kiam li rekonsciiĝis, estis por denove lamenti, frapi sin ĉe la flankoj per sia beko, elŝiri al si la plumojn unu post la alia. Subite venis al li iomete da espero kiu redonas al li sian kuraĝon. Se li povus trovi venĝanton ! Ĉi tiu penso decidigas lin ne morti; li riparis la malordon de siaj flugiloj kaj faras la decidon vojaĝi ĝis kiam li renkontos la ĉampionon kiu prenos la regadon de lian kverelon.

52^a Aventuro.

Kiel Druino serĉas kiu venĝos lin kontraŭ Renardo, kaj kiel li konatiĝis kun Morhuo, la bonan laniarion.

Post esti tre pie petanta al Dio ke li direktu lin en sia esploro, li ekvojiras kaj ne renkontas ĉashundinon, laniarion kiun li ne petegas venĝi lin kontraŭ Renardo. Sed ĉiu, post esti atente aŭskultanta lin, pretekstis la malfacilaĵojn de la projekto; oni ne volis, oni ne povis ekrespondeci pri tiel grava afero. Renardo certe ja malpravis, sed li estis konsiderinda moŝtulo, kun kiu necesis kalkuli. La plej simpla prudento konsilis ne iri postuli rekontentigon al li pri tio kion li faris kontraŭ aliaj. "Viaj plendoj, Druino, estas pravaj kaj tute ĝustaj; Renardo sendube povintus pli bone agi rilate al vi, sed kion vi volas ke ni faru? Bona Druino, kredu min, foriru".

Kaj la pasero malproksimiĝis kun la koro premita pro doloro. Fine iam, sur sterko, li ekvidas senkarnan laniarion, malĝojan kaj malsatmortantan. Li antaŭeniras tute apud li: "Hej! Morhuo, kiel vi fartas nun? - Tre malbone, Druino, mi ne plu havas voĉon nek krurojn. Jen du tagojn ke pro la avaregeco de la kampulo kiun mi servas, mi nenion manĝis. - Estas ĉar li estas senproviza. Sed aŭskultu min, kara amiko: se vi volas fari ion kion mi diros al vi, mi povas certigi vin ke vi estos pagata pli bone ol la plej bona kampulo en la mondo povus fari.

"Se vi aranĝas la aferon tiel ke mi sufiĉe manĝas por revigliĝi kaj senti mian koron, vi vidos min preta por entrepreni tion kion plaĉos al vi peti. Mi ne estas fama, sed kiam mi bone fartis, ne estis en la arbaro lupo, cervo, damao aŭ apro kiu povis esperi eskapi min. Mi faru unu solan bonan manĝon, kaj mi refariĝos, certiĝu pri tio, tute tiom forta, tute tiom lerta kiom mi tia neniam estis.

"Bona Morhuo mia, respondas Druino, vi havos pli ol vi povus manĝi; vi lasos iom. - Pri kio temas? Vi volas, ĉu ne, venĝi vin kontraŭ iu? - Jes, Morhuo; La kruela rufa Renardo perfide mortigis, manĝis miajn infanojn; se mi estus venĝita de tio, mi ne pli petus ion ajn al la mondo. - Nu! Mi devontigas min kontentigi vin, per la animo de mia

patro; jes, kondiĉe ke vi plenumu antaŭe la promeson kiun vi faris al mi, Renardo estas en malbona situacio. - Venu do tuj kun mi, Morhuo".

53a Aventuro.

*Kiel Druino sukcesis havigi Morhuo"
la bongustan manĝon kiun li deziris.*

La laniario penegre restaris sin, sed la espero de manĝo donis al li forton; li sukcesis malrapide sekvi, laŭlonge de la vojo, sian etan amikon. Druino avertis lin kuŝiĝi sub iun tufarbuston. "Mi vidas veni al ni, li diras, veturilon ŝargitan de pano kaj de viandoj; bone rigardu, Morhuo; mi baldaŭ iros distri la ĉariston. Tuj kiam vi vidos lin kuri post mi, vi ne perdos tempon, vi iros al la ĉaro, nenio estos por vi pli facila ol preni lardon en ĝi. - Estas bone, diras Morhuo".

La veturilo proksimiĝis, kaj Druino estis farinta sian planon. Li lasis sin fali sur la teron antaŭ la ĉaristo, kvazaŭ li havis rompitan flugilon. La alia malsupreniras, kredas devi nur preni lin. Druino eskapas lin saltetante tien kaj tien. La ĉaristo, kiu sekvas lin paŝon post paŝo, gardas la esperon atingi lin; li kredas kapti lin dekstre, li retrovas lin maldekstren, aŭ malantaŭen kiam li havis ĉe la momento mem du antaŭajn paŝojn. Senpacienciĝinta, li iras preni sian bastonon en la veturilo kaj revenas al la birdo kiu iĝas singardema zorgante ne lasi pli ol kvin paŝojn inter la viro kaj li. Dum ĉi tiu ĉasado, Morhuo forlasas la arbedon, iras rekte al la ĉaro, uzas ĉiujn fortojn kiuj restas en li, por levi siajn antaŭajn piedojn ĝis la granda korbo da ŝinkoj; fine li eltiras unu el ili kiun li penegre kunportas sub la arbedon. Pri Druino, ekde kiam li vidas lin revenantan al lia unua sirmejo, li ĉesas la ludon kaj ekflugas per rapidaj flugiloj, malmulte atenta al la malbenoj de la ĉartisto kiu, tute ŝvita, revenas al sia ĉevalo, kaj daŭrigas sian vojon antaŭ ol konstati ke mankas al li unu el liaj plej bonaj ŝinkoj.

Druino, siaflanke, retrovinta sian bonan amikon : "Dio savu vin, Morhuo ! - Ha ! Druino, respondas la alia, estu bonvena kaj bonvolu senkulpigi min, se mi ne leviĝas antaŭ vi, mi ne havas la tempon por tio. Dirante tion, li voris sian lardon. "Ne ĝenu vin, kara Morhuo; manĝu tute laŭplaĉe, nenio urĝas. - Ha ! Druino, kian bonegan manĝon mi ŝuldas al vi; kaj kian plezuron mi havos venĝi vin ! - Ni ne ankoraŭ

parolu pri tio; nur diru al mi, Morhuo, ĉu vi ne bezonas aliaĵon ? - Ĉar vi petas tion al mi, mi konfesos ke mi tre soifas, ĉi tiu bonega lardo... - Nu, necesas pensi kontentigi vin. Ĝuste jen antaŭ ni ŝarĝo da vino; mi ja esperas povi baldaŭ demandi al vi, el kiu lando vi opinias ke ĝi venas".

Li diras, kaj per ĝoja kaj malpeza flugilo iras sin loki sur la vojo. Ĉe la trapaso de la veturilo, li saltas al la kapo de la timonĉevalo, furiozas kontraŭ la okuloj kiujn li perforte batadas per sia beko. La ĉevalo henas kaj baŭmas. La kondukanto, siavice furioza, prenas klabon kaj ĵetas ĝin sur Druinoⁿ kiun li rekonas kiel la kaŭzon de ĉi tiu tuta tumulto. Sed la malbone alsendita bato iras frapi la ĉevalon kiu, forte vundita, sinkis sur si mem, ŝancelas kaj fine faligas flanken la veturilon. La ĉaristo mem estas teren ĵetita, kaj pri la barelo, la falbrutaleco rompigas la ringojn; la malproksimaj slaboj ebligas aliron de la vino, kiu formas sur la vojo grandan ruĝan flakon. Nenio povis esprimi la ĉagrenon de la ĉaristo vidante sian plej bonan ĉevalon kaj sian bonan vinon samtempe perditajn kulpe de pasero. Necesis al li forlasi la kompatindan beston kaj daŭrigi sian vojon, dum Morhuo malsupreniris sur la vojon kaj trinkegis la vinon tute laŭ sia plaĉo, kvankam se li povintus elekti, li sendube preferintus la akvon de iu klara fonto.

"Kaj nun Morhuo, diras Druino, ĉu vi estas kontenta ? - Pli ol mi povas diri, bona Druino. Mi estas, kiel mi esperis, rekuperinta miajn fortojn, kaj mi havas nur unu deziron, estas baldaŭ trovi grandsinjoron Renardoⁿ sur mia vojo".

54^a Aventuro.

*Pri la vizito kiun Druino faris al grandsinjoro Renando,
kaj kiel oni vidas laŭ la ekzemplo de Morhuo,
ke bonfaro estas kelfoje rekompencita.*

"Verdire Morhuo, respondis Druino, vi ne parolas oni ne povas pli bone kaj se vi plenumos vian promeson, mi estos ĉe la kulmino de miaj deziroj. Atendu min, mi iras traserĉi la malamikon; mi baldaŭ revenos, ĉar mi konas la vojon al lia kastelo. Mi tre endanĝerigas min, eble mi lasos mian vivon al tiu kiu ŝtelis al mi ĉion kio faris al mi ami ĝin; sed se mi revenos, estos kun li ke vi retrovos min".

Tion dirita, Druino adiaŭas sian amikon. Li alvenas antaŭ Mopertui^{on} kaj ekstremas rekonante la mastron de la domo, trankvile kaŭrinte apud la fenestro. "Renardo, li komencis krei plejlaŭte kiel li kapablis, stariĝu, venu kunigi min kun miaj karaj infanoj; mi ne plu povas vivi sen ili. Mi certe irus fordoni min al vi se viaj fenestroj estis malfermitaj; sed eble vi ne volus malobservi la gastorajtojn. Almenaŭ mi volas atendi vin ĉi tie; mi ne moviĝos de ĉi tie ĝis kiam vi alvenos".

Renardo, duone dormanta, vekigis pro ĉi tiu dolĉa voĉo : li eligas plezurkrion, staras sin kaj alvenas ĉe la lokon kie Druino parolis al li. Sed ĉi tiu ne jam faris siajn lastajn dispoziciojn; li flugas je kelka distanco, poste haltas. "Ha ! diras Renardo, fi al timulo ! Oni dirus ke vi tremas nun, kaj ke vi ne malkuraĝu atendi min. Vi eble kredas ke mi volas malbonon al vi, eraro ! Verdire, mi ne ĉesis bedaŭri la etan malbonan lertaĵon kiun mi faris al vi. Se mi volas proksimiĝi al vi, estas por devontigi vin vivi farante bonan pacon kun vi. - Mi kredas vin Renardo; mia unua movo estis fuĝi; sed nu, mi ne plu timas !" Renardo, logita de ĉiuj ĉi tiuj etaj manieroj, kuras al li, la alia saltetas kaj pli dorseniras; li daŭrigas ĉi tiun ludon, ne sen danĝero por li, ĝis kiam li fine revenis al la tufarbusto kie Morhuo senpacience atendis lin. "Nu ! li diras, mi ne iras plue; estas ĉi tie ke mi volas morti, apud ĉi tiu arbo kiu memorigas al mi pri la ĉerizujo kie ripozis miaj kompatindaj infanoj".

Renardo, pli kaj pli incitita, eksaltas al la arbedo : tuj jen Morhuo kiu ricevas lin kaj ekkaptas lin per la haroj; antaŭ ol li havis tempon defendi sin, li estas mordita, taŭzita laŭ la plej bonan manieron. Unue li eskapas kaj forkuregas; Morhuo reatingas lin ĉe la enirejo de la arbaro, faligas lin sur la grundon, regalias al li per siaj dentoj la ventron, la flankojn, la orelojn, kaj detranĉas en lia felo bendon larĝe de pluraj fingroj. Neniam Renardo vidis morton pli proksime. Se Morhuo fine forlasas lin, estas ĉar li supozas, vidante lin senmovan kaj sangon, ke li fakte spiris la lastan spiron. La venkinto revenas al Druino kiu timis ke Renardo vere eskapu la unuan fojon : "Nu, Morhuo, kiaj novaĵoj ? - Bonaj. Renardo, vi povas kalkuli kun tio, neniam plu trompos iun, kaj se li eskapus, la diablo farintus por li miraklon. - Do dankon, bona Morhuo, se mi faris ion por vi, vi ducentoble redonis tion al mi. Adiaŭ ! Kaj estu milfoje rekomendita al Dio !"

Druino havis ankoraŭ unu deziron, tio estis alveni apud Renardoⁿ kaj ĉeesti ĉe lia lasta horo; li vlegis lastfoje paroli kun li. Li flugas, alvenas : "Hej ! Jen vi grandsinjoro Renardo ! Kiel vi fartas ? Hej ! Kion do vi faris de via tuta menso, por lasi vin tiel malbone ornamita ? Ĉu ne estas larĝa truo kiun mi ekvidas en via felo ? Jes, poste unu alia, tri, kvar, dek, ho ! Kiom da pecoj vi devos rekudri ! Kaj se la vintro estas malmilda, vi frostiĝos, mi timas tion, krom se la honestega sinjorino Hersento konsentu varmigi vin". Renardo povis aŭdi lin, sed havis nek la forton nek la volon por respondi. Druino, post esti ekkantinta ĝojan kanton de triumfo, foriris sata, sen adiaŭi sian malamikon. Pri Renardo, li traspertis dum pli ol unu sezono inter la manoj de la plej bonaj kuracistoj, antaŭ ol kapabli eliri el Mopertui kaj daŭrigi la fluadon de siaj grandfaroj.

55^a Aventuro.

Kiel Renardo estis, de juĝado de la egaluloj, kondamnita esti pendigita. Kiel li ne estis tia, kaj kiel li eniris en Mopertui.

Post esti serioze prezentinta kiajn estis la protestoj de Isengrino, de Bruno, de Tiberto, de Tiselino, de Froberto, de Druino, de Ŝanteklero, kaj de la sinjorinoj Pajnto, Korniko, kaj Paruo, la reĝo sin direktante al la kunigitaj baronoj : "Estas nun al vi, li diras, por eldiri la verdikton de ĉi tiu fama malbonfarulo, aŭ pli ĝuste por decidi per kia turmento li devos morti". La respondo de la kortumo estis ke Renardo estis trafita kaj konviktita pri perfido, kaj ke nenio povis defendi lin kontraŭ la forkaj kiujn li meritis.

"Vi bone parolis, diras la reĝo. Ke oni starigu la pendumilon ! Ni tenas la kulpulon, ne necesas ke li eskapu nin".

La pendumiloj estis starigitaj sur iu alta roko. Oni kaptis Renardoⁿ, oni devigas lin grimpi la deklivon. Kuintraŭ, la simio, paŭtas al li kaj per sia kruro vangofrapas al li la muzelon; la aliaj konkure taŭzas lin kaj pelas lin. Kovardo, la leporo, ĵetas al li ŝtonon, sed de malproksime kaj kiam li estas jam preterpasinta. Bedaŭrinde por li, Renardo, ĵus turninte la kapon, vidis lin, kuntiris la vizaĝon kaj Kovardo tiom timis ke li sin kaŝis sub iu heĝo kaj ne plu reaperis. Li volis, li diris, de tie rigardi la ekzekuton pli laŭ sia plaĉo. Por Renardo, ĉe la momento kiam li atingis la pendumilojn, li sin helpis per la elturniĝo kiun li tenis kiel rezervon, li sciigis ke li devas fari gravajn revelojn. La reĝo ne sukcesis eviti aŭdi lin.

"Siro, li diras, vi faris kapti min kaj enkatentigi; vi decidis ke mi estos pendigata. Mi estas, mi agnoskas tion, granda pekulo, sed vi ne volus forpreni de mi la rimedojn repacigi min kun Dio. Permesu min soldatiĝi por la krucmilito; mi forlasos la landon, mi vizitos la Sanktan Sepultejon. Se mi mortus en Sirio, mi estus savita, kaj Dio rekompencus vin, pro esti reveniganta min en lia graco". Dirante tion, li iras fali al liaj piedoj, kaj la reĝo ne sukcesas sin retenigi esti tre kortuŝita.

Grimberto venante helpi sian karan kuzon : "Siro, mi garantias por

Renardo antaŭ vi; defendu lin kontraŭ la mortpuno, kaj neniam li damaĝos vin aŭ aliajn. Disponu, por Dio, pri via barono laŭ via bonvolo ! Se li estas pendigita, kia malhonoro por lia tuta idaro ! Kaj vi scias tion, ĝi devenas el alta sango : kiom da servoj vi ne ankoraŭ povas atendi de ĝi ! Vi bezonos, antaŭ ses monatoj, bravan soldaton : lasu Renardoⁿ iri transmaren; je via unua alvoko li revenos.

"Tute ne, respondis Nobla, ĉar la kutimo de la krucmilitistoj estas reveni pli malbona ol kiam ili foriris. Eĉ tiuj kiuj estis el la plej bonaj ĉe la iro, estas malbonaj ĉe la reveno. - Nu ! Siro, li ne revenos, sed je la nomo de la ĉielo, ke li foriru !"

Nobla tiam turnante sin al Renardo : "Ha ! Malbona estulo, ĉiam for de la honesta vojo; ĉu vi ne centfoje meritis la ŝnuron kiun oni pretigis por vi ? - Dankon, kompleza reĝo, kriis Renardo. Ricevu mian fidon : neniam mi estos la okazo de protesto. - Mi ne devus kredi vin; sed mi atestigas ĉiujn sanktulojn de Bet-Leĥemo, ke se mi denove aŭdas malbone paroli pri vi, nenio garantios por vi kontraŭ la torturo."

Renardo klare komprenas ke la reĝo lasas al li vivon; sed Nobla faras eĉ pli; li etendas al li la manojn kaj relevas lin. Oni alportas la krucon; estas Bruno kiu, mallaŭdante la malfirmecon de la reĝo, alkroĉas ĝin al li sur la ŝultro. Aliaj baronoj, ne malpli malkontentaj, prezentas al li la skarpon kaj la pilgrimbastonon.

Jen do Renardo, kun enmane pilgrimbastono el frakseno, la skarpo ĉirkaŭ la kolo, la kruco sur la ŝultro. La reĝo deklaras lin al tiuj kiuj kondamnis lin, ke li gardas kontraŭ ili nenian malbonan volon; li estas (almenaŭ li diras tion) rezoluta ĉesigi la vivon de malbona knabo; antaŭ ĉio, li vologas la saviĝon de sia animo. Ĉio kion oni petas al li, Renardo senhezite konsentas tion; li disiĝas de ĉiu el la baronoj kaj pardonas ilin. La nona horo alvenis kiam li forlasis la kortumon.

Sed tuj kiam li sentis sin libera kaj kiam li metis murojn kaj ĉirkaŭbaritejojn inter la baronoj kaj li, sia unua zorgo estis spiti tiujn kiujn li ĵus kvietigis per sia pentado; li esceptis nur monsinjoron Noblaⁿ. Ĉi tie, mi ne devas preterlasi ke antaŭ ol foriri, li trovis en la ĝardeno de la palaco, sinjorino Fiera la reĝino, kies granda estis la beleco, la ĝentileco. "Grandsinjoro Renardo, ŝi diris al li, preĝu por ni transmare, ni preĝos ĉi tie por via reveno. - Damo, eligis Renardo sin

klinante, la preĝo venanta de supre estas la plej valora afero en la mondo; feliĉa tiu por kiu vi preĝas ! Li havos grandan kaŭzon por vivi en ĝojo. Ho ! kiel mi feliĉe plenumus mian pilgrimadon, se mi kunportus en Sirion garantiaĵon de via amikeco !"

La reĝino tiam deprenis la ringon de sia fingro kaj antaŭtenis ĝin al li. Renardo apenaŭ zorgis danki ŝin pro tio, sed diris inter siaj dentoj : "Ĉi tiu ringo, mi redonos ĝin kontraŭ nenio en la mondo"; kaj, surŝovinte ĝin sur sia fingro, li ricevis, kiel oni vidis tion, la adiaŭon de la tuta kortego kaj pikis per spronoj. Li baldaŭ estis apud la heĝo kie timo ankoraŭ retenis grandsinjoron Kovardo", la leporon; Kovardo, vidante sin malkovrita kaj ne aŭdacante provi fuĝi, diras al li per tremanta voĉo : "Grandsinjoro Renardo, Dio donu al vi bonan tagon ! Mi estas tre kontenta revidi vin bonstatan, estis granda aflikto por mi, la problemoj kies oni ŝargis vin antaŭ momento. - Vere, Kovardo, nia problemo afliktis vin ! Ah ! Dio mia, la bona animo ! Nu, se vi kompatis nian korpon, mi estas feliĉa povi frandis la vian". Kovardo aŭdas tiujn ĉi terurajn parolojn; li volas eskapi, estis tro malfrue. Renardo ekkaptis lin per la oreloj : "Damne, siro Kovardo, vi ne iros pli for sole; vi venos kun mi, vole nevole; mi volas prezenti vin ĉi-nokte al miaj infanoj kiuj ĝoje festos vin". Kaj dirante tion, li svenigas lin per bato de sia pilgrimbastono.

Poste li repaŝis kun sia malliberulo; li grimpis monton de kie oni supervidis super la valetan kies la reĝa kortego plenigis la spacon. De tie, li kontemplas tiujn kiuj ĵus kondamnis lin, kaj murmuretis kontraŭ la malfirmeco de Nobla; li eligas grandan krion por altiri la ĝeneralan atenton, kaj tuj malkudrante la krucon kiun oni alkroĉis al li. "Siro reĝo, li diras, reprenu vian ĉifonon, kaj Dio malbenu kiu embarasis min per ĉi tiu pilgrimbastono, ĉi tiu skarpo, kaj ĉi tiu tuta ĉifonaro. Li ĵetas al ili la pilgrimbastonon, la skarpon kaj la krucon, antaŭtenas al ili la lastan kaj reparolas : "Aŭskultu, siro reĝo, mi estas reveninta el Sirio kie mi iris laŭ viaj ordonoj. La sultano **Noradin**, vidante min tiel bonan pentofaranton, petas al vi savon por mi. La malpiuloj tiom timas vin ke ili ekforkuras tuj kiam oni prononcas vian nomon". Dum li havas plezuron tiel moki ilin, grandsinjoro Kovardo faras siajn disponojn, eskapas, kaj metanta longan distancon inter Renardo kaj

si, reiras al la lokoj kie la kortumo kunsidis. Li alvenas kun la flankoj rompitaĵ, la haŭto disŝiretita; li sin ĵetas al la piedoj de la reĝo, rakontas anhelante la novan malbonfaron kies ne multe mankis por ke li estu viktimo. "Granda Dio ! ekkrias Nobla, ve al mi esti kalkulanta kun la pento de tiu senhonora fripono. Ek, baronoj ! Kuru al li, kaj se li eskapos, mi ne pardonos al vi tion dum mia vivo. Mi konsentas liberecon kaj noblecon al ĉiuj infanoj de tiuj kiuj alportos lin al mi".

Necesis tiam vidi pelmele ekrajdi ĉevalon kaj piki per ambaŭ spronoj, siro Isengrino, Bruno la urso, Tiberto la kato, Belino la ŝafo, Senhara la rato, Ŝanteklero la virkoko, la Pajnto kokino kaj ŝiaj fratinoj, Ferumanto la ŝarĝĉevalo, Ronjauso la laniario, Blanketa la kapreolo, Tiselino la korvo, Froberto la grilo, Ĉaskuranteto la furo, Belacento la apro, la Bruema la virbovo, Briŝmaro la cervo, kaj Posttempa la heliko, komisiita kunporti la oriflamon kaj montri al ĉiuj la vojon. Renardo vidas ilin alkuri kaj facile rekonas la disvolvitan standardon. Sen perdi momenton, li sin ĵetas en groton; la malamikaj batalionoj sekvas lin de proksime, li jam aŭdas la venkokriojn ĉirkaŭ li. "Damnita rufulo ! Viaj kruroj ne savos vin, ne estas muroj, ĉirkaŭbaritejoj, fosaĵoj, densejo, barilo, kastelo, ĉefturo aŭ fortikaĵo kiu ŝirmos vin". Premegata de ekstrema laceco, ŝaŭmo kovras al li la buŝon, kaj lia felo ne plu estas ŝirmata kontraŭ la mordo de la plej ardaj. Tio estas fininta; oni baldaŭ fermos al li la retiriĝon kaj retenos lin malliberan. Sed ĉe tiu momento, li malkovras la supron de Mopertui kaj tiu vidaĵo reviglas siajn esperojn : li faras lastan strebon, fine atingas ĉi tiun azilo, nepenetrebla por ĉiu alia. Nu, eĉ se Nobla sieĝas tie; li pasigos plurajn jarojn antaŭ ol frakasi la pordojn. Renardo havas provianton por longa tempo; li atendas tute laŭ sia plaĉo tiujn kiuj persekutas lin. Lia edzino kiu honoras lin kaj respektegas lin, avertita de la kornoj de la reĝa armeo, venis akcepti sian noblan edzon ĉe la unua enirejo kun la kompanio de liaj tri filoj Transheĝo, Virbranĉo kaj Rovel (iuj nomas ĉi lastan Renardeloⁿ). Li tiam estas ĉirkaŭata, karesata, kisata. Oni ekzamenas liajn krudajn vundojn, oni lavas ilin per blanka vino; poste oni sidigas lin sur ŝvelmola kuseno. La vespermanĝo estas servata, nur Kovardo mankis en la festo; sed grandsinjoro Renardo

estis tiel laca, ke li nur apenaŭ kapablis manĝi la fileon kaj la
vostobazon de kokino. La morgaŭon, oni sangeltiris kaj surmetis
kupojn al li; kaj kelkaj tagoj sufiĉis por redoni al li liajn antaŭajn
fortojn kaj la plej bonan sanon.

*Noto de la eldonisto : Ni ne sekvos la maljunan poeton ĉe la sieĝo
de Mopertui, entreprenita de la armeo de la reĝo. Ĉi tiu parto de la
rakonto prezentas nenian memorindan incidenton. La reĝo Nobla
estis devigita forpermesi ĉiujn siajn baronojn kaj retiriĝi, post esti
pli ol unufoje, surprizita de la sieĝatoj; kiel la imperiestro Karolo la
Granda, kiam li iras liberigi la dek du Senjorojn en la ĝesto de Johano
de Lanson.*

*Ni preferas daŭrigi la alian rilaton kiu donas kiel konkludo de la juĝo
la batalon en turnirejo inter Renardo kaj Isengrino.*

56^a Aventuro.

*Pri la disputo de Renardo kun Isengrino,
kaj kiel la batalo estis regita inter ili.*

La historio diras ke, kiam la reĝo Nobla longe rememorigis la originon de ĉiuj protestoj prezentitaj antaŭ sia kortumo, la ĉeestantaro ŝajnis konvinkita pri la neceso fari gravan ekzemplon. Sed Renardo estis bone instruita; nenio maltrankviligis lin, li estis preninta la tempon por pesi ĉiujn siajn respondojn. Kiam li vidis la dispozicion de la spiritoj, li stariĝis kun grava mieno kaj petis la permeson kontraŭdiri ĉiun el la akuzoj alportitaj antaŭ la kortumo. "La peto estas justa, respondis la reĝo; oni ne kondamnas sen aŭdi. Parolu, ni aŭskultos tion kion vi povos diri por senkulpigi vin".

"Siro, diras Renardo, antaŭ ĉio, mi dankas vin esti admonanta min por aperi antaŭ la kortumo; tio estis doni al mi ĉiujn rimedojn por triumfigi la veron. La plendoj de Tiberto kaj de la paruo havas tiom malmulte da graveco ke, por damaĝi vian atenton, mi eĉ ne volas respondi pri tio. Mi ne havas plej malgrandan memoron esti vidinta Kopetaⁿ, mi do ne povas esti vundinta aŭ kontuzinta ŝin. Ĉio kion mi scias pri Ŝanteklero, estas ke, iam decidinte ŝin sekvi min, mi permesis al ŝi forlasi min je la alproksimiĝo de hundaro kiu povis damaĝi ŝin tiom multe kiom min mem. Kial siro Bruno, la urso, kuniĝas kun miaj akuzantoj, mi ne kapablas diri tion; ĉar mi neniam enviis al li unu lineon de sia haŭto. Mi ankoraŭ ne memoras esti riproĉanta al mi la plej malgravan aferon, aŭ koncerne Ronjausoⁿ, aŭ koncerne mian kunulon Isengrinoⁿ. Se la plimulto da miaj najbaroj akuzas min, tio estas ĉar la sendankeco kaj la envio hodiaŭ regas en la mondo; ĉiu scias tion, kaj mi ne povas miri ke miaj servoj estis ĉiam malbone aprobitaj. Oni estas oftege punita esti volanta tro bone fari, kaj ne estas ordinare la pli kulpa kiun oni ekkondamnas. Bedaŭrinde ! Dio ne prodigis al mi favorojn : tia estas mia destino, ke miaj plej bonaj agoj fariĝis la okazo de miaj plej gravaj malbonsortoj". (*Ĉi tie, Renardo ŝajnis cedi al fortan emociion, li direktis sian brakon al siaj okuloj kvazaŭ por forviŝi larmon kaj daŭrigis*) :

"Mi do diras tion tute sincere, mi neniam forgesis tion kion mi ŝuldis al damo Hersento, la virino edzinigita de mia kunulo. Ofendegisian bo-onklinon, estintus la faro de herezulo, kaj monsinjoro Isengrino hontas pri nenio kiam li venas publike akuzi min pri tia malsaĝaĵo".

Ĉi tie monsinjoro Isengrino ne sukcesis sin reteni interrompi lin : "Vere, estas afero de vi por nei malbonfarojn pli klarajn ol la tago ! Ha ! kiel vi bone scias kanti la meson de la frenezuloj ! Ĉu ne ankaŭ estis vi kiu konsilis al mi eniri en la puton el kie mi devis neniam eliri ? Vi troviĝis tie, vi diris, en paradizo, inter la arbaroj, la rikoltoj, la akvoj kaj la herbejoj; vi vivis meze de ĉio kio eblis deziri, perdrikidojn kaj kokinojn, salmojn kaj truton. Mi kredis al vi je mia malfeliĉo, mi eniris en la sitelon; laŭmezure, kiel mi malsupreniris, vi resupreniris, kaj kiam duonvoje mi volis scii tion kion vi pretendis, vi respondis al mi ke la kutimo estis, kiam unu malsupreniris, la alia resupreniris; ke vi eliris el la infero kien mi mem iris. Nun, kion mi diris pri la lageto en kiu mi lasis la plej bonan parton de mia vosto !

"Vere, respondis Renardo, ne estas serioze ke oni direktas al mi tiajn riproĉojn. Kiam ni iris al la lageto, Isengrino tiom deziregis kapti fiŝojn ke li neniam kredis esti sufiĉe prenanta ilin. Estas por li ke la kampulo diras : tiu ĉion perdas kiu ĉion avidas. Kiam li sentis la rombojn veni, kial li ne forlasis la lokon, eĉ se li poste revenos unu aŭ du aliajn fojojn ? Sed lia granda glutemeco parolis pli laŭte. Mi estis avertonta lin, li respondis al mi per furioza blekado, kaj estas tiam kiam, laca atendi, mi lasis lin labori. Se li ne bone fartis, al kiu la kulpo ? Certe ne estas mi kiu manĝis la fiŝojn.

"Renardo, reparolis Isengrino, vi tre bone erarigas tiujn kiujn vi trompas, kaj vi dum via tuta vivo trompis min. Alian tagon, iom tro manĝinte da ŝinko kaj sentante mian gorgon sekan, vi kredigis al mi ke la ŝlosilo de la vinkelo falis inter viajn manojn kaj ke vi havis la zorgadon de la vino. Mi eniris en la vinkelon, malbona perfidulo, vi regalis miajn orelojn per malbonaj kantoj, kaj danke al vi, mi havis la ripojn draŝitajn per batoj.

"Pri tio, diras Renardo, mi memoras tion, kaj la aferoj alimaniere okazis. Vi lasis vin kapti per la plej hontinda ebrieco; vi volis kanti la

horpreĝojn, kaj vi faris tian bruadon ke ĉiuj homoj de la vilaĝo alkuris. Mi ne perdis, kiel vi, la prudenton; kiam mi vidis ilin alproksimiĝi, mi foriris. Ĉu oni kulpigos pro krimo de esti kapabla konservi mian saĝecon ? Se vi lasis vin trabati, ĉu mi respondecas pri tio ? Kiu serĉas malbonon, malbono venas al li, oni diris tion unuafoje antaŭ longe.

"Ĉu verŝajne estas denove pro deziro plaĉi al mi ke iam, per bolanta akvo, vi desegnis al mi kronon kiu malŝirmis al mi la kapon kaj forigis de mi la tutan felon el la vangoj ? Alifoje, vi proponis al mi duonon de angilo kiun vi ŝtelis, sed por faligi min en novan kaptilon. Mi scivolis kie vi trovis ĝin; tio estis aŭdante vin sur ĉareto kiu estis tiel plenega ke la ĉaristoj volis ĵeti parton el ili por faciligi la ĉevalojn. Ili eĉ invitis vin preni lokon apud ili, por manĝi pli laŭ via plaĉo. Devigante min sekvadi vian ekzemplon, mi iris loki min sur la vojo de la ĉaristoj, kaj estis pagita por tio per tiom da batoj de bastono ke mia dorso estas ankoraŭ kontuzita pro tio. Sed la plej longa somertago ne sufiĉus por rakonti ĉiujn suferojn, ĉiujn malagrablaĵojn, kies mi ŝuldas al vi. Feliĉe, jen ni antaŭ la kortumo kie la ruzeco ne povas esti granda helpo.

"La kortumo faros kiel mi, ĝi nenion komprenos pri viaj akuzoj. Jam tiuj kiuj aŭdas nin, preskaŭ ne eliras el sia surprizo kaj rigardas vin kiel stultulon por esti tiel malbone koloranta viajn mensogojn. Ĉu vi povas do perdi vian animon tiel senpage ?

"Estas tro multe, reparolas Isengrino kun furiozo en la okuloj, mi nur atendas la forpermeson de la reĝo por peti kontraŭ perfidulo batalon en duelejo. - Kaj mi, diras Renardo, mi deziras ĝin almenaŭ tiom kiom vi".

Tuj unu kaj alia prezentis siajn garantiulojn; la reĝo ricevis ilin sen heziti. La tuta kortumo konsentis ke la batalo estis neevitebla, cetere oni pensis ke krom supernatura lerteco, Renardo ne povus elteni la penadon de la terura Isengrino.

57^a Aventuro.

*Kiuj estis la ostaĝoj metitaj inter la manoj de la reĝo,
kaj kiel estis nomumitaj la juĝistoj de la duelejo ?*

La Reĝo petis ke oni prezentu al li la garantiulojn, kaj ne volis indulgi iun. Isengrino donis pri la siaj Brunoⁿ la urso, Tibertoⁿ la kato, Ŝantekleroⁿ la virkoko kaj siro Kovardoⁿ la leporo. Renardo siaflanke elektis tiujn kies la sperto estis la plej konata : Bruemaⁿ la taŭro, Belacentoⁿ la apro, Dornartoⁿ la erinaco kaj sian kuzon Grimbertoⁿ la melo. La batalo estis prokrastita ĝis post dek kvin tagoj; Grimberto garantianta ke grandsinjoro Renardo aperos ĉe la loko kaj je la difinita horo, por krevigi la orgojlon de Isengrino. "Nu, diras la reĝo, ne revigligu la kverelojn; sed ke ĉiu el vi kviete reiru al sia sinjordomo".

Renardo certe ne estis samforta kiel Isengrino; sed li majstris pli bone ĉiujn sekretojn de la skermado, kaj tio decidigis akcepti la lukton. Se li estas la malplej forta, li estos la plej lerta. Li kapablos profiti de la interaĝo, li retretos por malkovri sian kontraŭulon dum favora momento. Li elkonas la stumbligon, la francajn, anglajn kaj bretonajn lertaĝojn, la revenon, la subitajn kaj neatenditajn batojn. Pri Isengrino, li ne kredas bezoni trejnadon; certa pri sia bona rajto kaj pri la malforteco de Renardo, li iras trankvile dormi en sian sinjordonon, tamen malbenante la prokrastojn kiuj malfruigas la kvietigon de sia venĝo.

La templimo estis ankaŭ uzita ambaŭflanke por la serĉado de la plej bonaj armiloj kaj por la zorgado meti ilin en bonega stato. Isengrino dediĉas sian atenton al la ŝildon kaj la tunikon el felto. Li provas la gamaŝojn, li elektas malpezajn kaj solidajn ŝuojn. La bastono kies li uzos, estas tuberplena branĉo de mespilujo. Por laki sian ŝildon, li elektas la orruĝan koloron. La amikoj de Renardo zorgis prepari lian armilaron : tio estis iu ronda ŝildo el flava koloro, iu mallonga kuto estanta apenaŭ du ulnojn longa; feltaj ŝuoj, iu tigo de kratago provizita de sia rimeno kiel bastono. Plie, ili zorgegis bone razi kaj tondi lin por lasi al lia kontraŭulo malpli da ekpreno. Kiam Isengrino

vidis lin alveni antaŭ la kunigita kortumo, li eksentis grandan ĉagrenon pro tio ke li ne povis, kiel li esperis, kruelece disŝiri lian riĉan felon; li ne degnis, pri si mem, forigi unu solan haron. Sed ke li moderigu sian malpaciencon, la lukto ne estos tiel facila kiel li plezuras kredi tion.

Oni vidis alveni antaŭ la barilojn, la prudan damon Hermelinaⁿ akompanita de tri lakeoj siaj filoj : Transheĝo, Renardelo kaj Virbranĉo. Ĉiuj kvar direktis al Dio ardajn preĝojn, genue petantaj al Li ke Li gvidu la brakon de Renardo kaj ke Li eksciu al li lertaĵon por venkigi lin. Renardo, aŭdinto de iliaj preĝoj, dankis ilin pro tio per la voĉo kaj per la gesto.

Damo Hersento estis samtempe genuinta en la oratorio kiun ŝi starigis ĉe la alia flanko. Ŝi kripostulis la helpon de la Sinjoro por ke Li ne lasu sian edzon reveni de la batalo, kaj ke la venko restu al sia kara amiko; ŝi forgesis nek la deklarojn de unu, nek la maldiskretaĵojn de la alia, kaj se grandsinjoro Isengrino havas la plej malbonan, ne estas la sincera burĝa Hersento kiu afliktiĝos pro tio.

Kiam la reĝo Nobla vidis la homamason kunpremiĝantan ĉirkaŭ la bariloj kaj laŭtege petanta la komencon de la batalo, li alproksimigis Brizmaroⁿ kaj transdonis al li la oficon de juĝanto de la duelo; estas li kiu redaktos la ĵurformulon, garantios la taŭgan kutimon kaj proklamos la gajnanton. Briŝmaro digne plenumis sian servon : li unue elektis tri baronojn de nobla deveno por helpi lin per siaj opinioj. La unua estas la fiero kaj malmulte eltenanta Leopardo; la dua, Belacento kun impona irmaniero; monsinjoro Bruema, la taŭro, estis la tria. Ili estis rigardata kiel la plej saĝaj de la ĉeestantaro, kaj fakte neniu pli bone konis ĉion kio rilatas al la garantiuloj de batalo.

58^a Aventuro.

*Kiel la juĝistoj de la duelo faris lastan penon
por kvietigi la kverelon,
kaj kiel la ĵuroj estis prononcitaj de Renardo
kaj malkonfirmitaj de Isengrino.*

Kunigitaj en konsilio, Briŝmaro diras al ili : "Sinjoroj, estas malfacile kredi ĉiujn akuziĝojn riproĉitajn al grandsinjoro Renardo. Ne estas nur nia amiko Bruno kiu akuzas lin; estas Ronjauso, Froberto, Tiselino, Pajnto kaj ankoraŭ aliaj. Feliĉe, ĉiuj individuaj protestoj silentas de kiam Isengrino kunigis ilin kun la sia. Isengrino prezentis garantiulojn je la nomo de ĉiuj, estas kun li sola ke ni devas kalkuli. En ĉi tiu situacio, Sinjoroj, ĉu ne estus saĝa kaj prudenta fari lastan provon de paciĝo inter la du kontraŭuloj ? - Ni kredas tion kiel vi, respondas Belacento kaj la du aliaj". Ili tuj iras al la reĝo : "Siro, ni interkonsentis, malgraŭ via honoro aŭ viaj apartaj kaŭzoj de plendo, kaj estas dezirinda ke la du baronoj, monsinjoro Isengrino kaj grandsinjoro Renardo, estu aldirektitaj al reamikiĝo".

La reĝo havis nenion pli al la koro; tial, tute ne kontraŭdirante ilin : "Iru do unue paroli pri tio al Isengrino; estas de li ke ĉio dependas. Por mi, mi nur povas gardi sian rajton kaj lasi al vi la zorgon de la cetero.

Briŝmaro iras kun etendita kolo ĉe Isengrino kaj apatigante lin : "La reĝo, li diras, estas malkontenta scii vin kontraŭ ajna provo de interkonsento. Kiel vera amiko, mi instigas vin preni pli bonajn sentojn; ricevu Renardoⁿ por kompromiso. La reĝo kaj ĉiuj baronoj petas tion de vi. - Via klereco nun finiĝas, respondis Isengrino, kaj ke mi ŝanĝiĝu al karbo, se mi iam akordiĝos kun la perfidulo, se mi ne malhelpas lin pli malglori kaj malhonoru siajn gekunulojn. Mi vidos ĉu oni kontestos mian rajton. - Ricevi la ofendinton por kompromisi, diras Briŝmaro, ne estas kontesti la rajton de la ofendita. Mi volis malhelpi vin ĝisekstreme troigi la aferojn kaj mi volis forigi inter vi ajnan motivon de rankoro; vi ne volas tion, mi bedaŭras tion. - Bone ! grandsinjoro Briŝmaro, respondas Isengrino, iru diri al la reĝo ke li

povas konsideri min kiel ebria, se mi lasos la aĉan rufulon eliri el la duelejo sana kaj savita; la paco povas nur okazi en la duelejo, la batalo estas necesa, kaj neniu, ankoraŭfoje, povas rifuzi al mi mian rajton".

Briŝmaro reveninta al la reĝo : "Siro, ni nenion akiris; la batalo estas neevitebla. Tial, por gardi la rajton, necesas malfermi la dueladon kaj lasi ataki kaj defendi kiel plej bone ili povos. - Ĉar tiel estas, respondas Nobla, mi atestigas sanktan Riĉeroⁿ ke ili havos la batalon kaj ke mi ne sendevigos ilin por la tuta oro kiun la plej riĉa el la du povus proponi al mi. Seneskalo, komencigu la batalon !"

La ordono de la reĝo estis tuj realigita. Isengrino kaj Renardo estas kondukataj ĉe la malfermon de la bariloj, tenante sin reciproke per la manoj. Iu kapelpastro aperas, li estas la saĝa kaj diskreta Belino : li tenas antaŭ si la relikvon, sur kiu la du kunuloj prononcos la ĵuron. Kaj dum grandsinjoro Briŝmaro fiksas ĝian formulon, oni proklamas la deklaron de la reĝo, ke neniu estu tiel aŭdaca kaŭzi skandalon per paroloj, per sinteno aŭ per gestoj.

"Sinjoroj, diras Briŝmaro, aŭskultu min, kaj ke oni korektu min se mi malbone parolas. Renardo baldaŭ ĵuros unue ke li tute ne malutilis al Isengrino; ke li ne estis mallojala al Tibeto; ke li ne faris malbonajn lertaĵojn kontraŭ Tiselino, kontraŭ Paruo, kontraŭ Ronjauso, kontraŭ Bruno aŭ kontraŭ Ŝanteklero. Alproksimiĝu, Renardo !"

Renardo antaŭeniras du paŝojn, genuiĝas, formetas sian mantelon sur siajn ŝultrojn, restas preĝe kelkan tempon, etendas la manon sur la relikvojn kaj ĵuras, per sankta Ĝermeno kaj la aliaj sanktaj pecojn, tie estantaj ke li ne havas la plej malmulta kulpo en la kverelo. Tion dirita, li kisas la relikvon kaj restariĝas.

Isengrino, surprizita kaj indignigita vidi lin tiel mensogi en la ĉeesto de Dio kaj de la homoj, alproksimiĝas siavice : "Bela milda amiko, diras Briŝmaro, vi baldaŭ ĵuros ke Renardo prononcis falsan ĵuron kaj ke la via estas la sola vera. - Mi ĵuras tion !" Tio farita, li kisas la sanktulojn, restariĝas, antaŭeniras iom sur la duelejo, kaj diras ardan preĝon por ke Dio lasu lin venĝi sian honton kaj rekonkeri sian honoron. Poste, post esti kisanta la teron, li prenas kaj

manipulas sian bastonon, svingas ĝin en ĉiuj direktoj, turnas ĝian rimenon en sia dekstra mano. Li malsekigas siajn kubutojn, siajn genuojn kaj siajn polmojn; li prenas sian ŝildon, faras al la homamaso graciosan saluton, kaj avertas Renardoⁿ zorge sin gardi.

59^a Aventuro.

Pri la granda kaj memorinda batalo de grandsinjoro Renardo kaj de monsinjoro Isengrino; kaj kiel la juĝo de Dio donis praviĝon al tiu kiu havis la plej bonan rajton.

Renardo ne sin prezentis antaŭ Isengrino sen maltrankvilo. Li lernis la klasikajn literaturojn, li eĉ sciis sufiĉe da nekromancio; sed eĉ la momento diri la vortojn kiuj servas por la dueloj, li forgesis ilin. Tamen, persvadita, ke la skermado havis sufiĉan efikon, li ekkaptas sian bastonon, svingas ĝin du aŭ tri fojojn, turnas ĝian rimenon sur sia antaŭbrako, ĉirkaŭprenas sian kolon, kaj ŝajnas tiel firma kiel kastelo protektita de altaj muregoj. Ni nun vidu tion kion li kapablos fari.

Isengrino unue atakas : tio estis la rajto de la ofendita. Renardo klinas sin kaj ricevas ĝin, kun la ŝildo sur la kapo. Isengrino frapis kaj samtempe insultis : "Malica nano ! Ke mi estu pendigita se mi ne venĝas ĉi tie mian edzinigitan edzinon !" - Faru pli bone, siro Isengrino; prenu la garantiaĵon kiun mi proponas al vi. La kavaliroj de mia parenceco omaĝos vin, mi forlasos la landon, mi iros transmaren. - Temas vere pri tio kion vi faros elirante el miaj manoj ! Nu ! Vi tiam ne kapablos vojaĝi. - Nenio estas malpli pruvita. Ni vidos kiu morgaŭ estos la pli bonfarta. - Mi estos vivanta pli ol unu tagon, se vi vidas la finon de tiu ĉi. - Dio mia, malpli da minacoj kaj pli da efikoj !

Isengrino sin ĵetegas, la alia atendas lin kun la ŝildo sur la frunto, la piedo antaŭmetita, la kapo bone ŝirmita. Isengrino puŝas, Renardo rezistas kaj per iu bastonbato lerte ĵetita apud la orelon, li svenigas sian kontraŭulon kaj ŝancelas lin. La sango ekfuas el la kapo, Isengrino sin krucosignas preĝante la Dion kiu ne mensogas, protekti lin. Ĉu hazarde lia edzinigita edzino estus komplico de Renardo ? Li tamen vidis malklare : al tiu kiu demandintus al li, ĉu estis tercio aŭ nono, kaj kia estis la vetero, li tre malfacile respondintus. Renardo sekvis lin per la okuloj, kaj se li hezitis ekataki, almenaŭ li pretiĝis bone elteni duan atakon. "Hej ! Kial vi malrapidas Isengrino ? Ĉu vi pensas la batalon finitan ?" Ĉi tiuj vortoj revigligas la edzon de

Hersento; li denove antaŭeniras; kun la piedo streĉita, li svingas sian bastonon kaj ĵetas ĝin per firma mano. Renardo ĝustatempe evitas ĝin kaj la bato trafas nur la aeron. "Vi vidas tion, siro Isengrino, Dio estas favora al mia rajto, vi ĝuste ĵetis kaj tamen vi ne trafis la celon. KREDU min, ni repaciĝu, se tamen vi alte taksas vian honoron. - Mi volegas elŝiri al vi la koron, kaj mi volas esti monaĥo se mi ne sukcesas".

Isengrino denove sturmas kun la bastono kaŝita sub la ŝildo, poste subite li levas ĝin kaj iras frapi Renardoⁿ ĉe la kapon. La alia moderigis la baton klinante sin; kaj profitante de la momento kiam la malamiko malŝirmas sin, li trafas lin per sia bastono sufiĉe forte por rompi al li la maldekstran brakon. Oni tiam vidas ilin kunkune ĵeti ilian ŝildon, batali korp'al korpe, konkure disŝiri unu la alian, fluigi la sangon el ilia brusto, el ilia gorĝo, el ilia flanko. La lukto fariĝis egala post la perdo kiun Isengrino spertis de sia brako. Kiom da evitoj kaj da turnoj unu sur la alia, antaŭ ol oni povu diveni kiu venkos !

Isengrino tamen havas la plej akrajn dentojn; la aperturoj kiujn li faras en la felo de sia kontraŭulo, estas pli larĝaj kaj pli profundaj. Renardo tiam uzas la anglan lertaĵon : li alpremas Isengrinoⁿ okazigante al li la stumbligon kiu faligas lin teren. Tiam saltante sur lin, li frakasas al li la dentojn, kraĉas inter siajn lipojn, forŝiras al li la vangharojn per siaj ungoj kaj kontuzas al li la okulojn per sia bastono. Ĉio estis elfinita por Isengrino : "Bo-onklo, diras Renardo, ni baldaŭ vidos kiu el ni rajtas. Vi ekscitis min al kverelo pri damo Hersento. Kia malsaĝaĵo por zorgi vin pri tiom malmulte da afero, kaj kiel oni povas meti sian fidon sur virinon ! Ne ekzistas unu kiu meritas tion; el ili eliras ĉiuj kvereloj, kaŭze de ili malamo inter parencoj kaj malnovaj amikoj; kaŭze de ili kunuloj ekinterbatalas; estas la venena fonto de ĉiuj perturboj. Oni dirus al mi pri Hermelina, ĉion kion oni volus, mi ne kredus unu vorton pri tio, kaj mi certe ne endanĝerigus mian vivon por ŝi".

Tiel mokis la falsa Renardo samtempe pluvigante batojn sur la okulojn, la vizaĝon de Isengrino, elŝirante la haŭton kun la haroj. Sed pro mismovo, la bastono kun kiu li tiel bone ludas sur la korpon de sia malamiko, eskapas lin; Isengrino utiligas la momenton, li estis

restariĝonta, lia rompita brako malhelpas lin. Renardo sekve gardis la avantaĝon, kiam malfeliĉe por li, li antaŭenmetas la fingrojn en la makzelo de Isengrino kiu premas ilin per siaj dentaj restaĵoj, kaj dum la doloro eligigas krion de Renardo, la alia liberigas sian dekstran brakon, pasigas ĝin ĉe la dorson de sia kontraŭulo, faligas lin, kaj grimpas siavice sur lian ventron. Jen la roloj ŝanĝitaj : Renardo inter la genuoj de Isengrino, plorpetas tute ne sian malamikon, sed ĉiujn sanktulojn de Romo, por eviti la ŝuldiĝon de la falsa ĵuro kiun li faris. Kaj ĉar Isengrino ne ŝpari al li la batojn, li svenas, iĝis malvarma kiel glacio, deklarante deziri morti antaŭ ol sin kontraŭdiri kaj sin konfesi venkita. Post esti batinta lin, frapinta lin, forlasinta lin mortonta, Isengrino denove restariĝas; li estas proklamata venkinto. La baronoj alkuras de ĉiuj flankoj por gratuli lin kaj fari al li procesion. Iam la Trojanoj ne havis tiom da ĝojo kiam ili vidis Helenaⁿ eniri en ilian urbon, kiom montras Bruno la urso, Tiselino la korvo, Tiberto la kato, Ŝanteklero la virkoko kaj Ronjauso la laniario kiam ili vidis la malvenkon de Renardo. Vane la parencoj de la venkito sin intermetas antaŭ la reĝo; Nobla volas nenion aŭdi, li ordonas ke la perfidulo estu tuj pendigata. Tiberto sin montras kapablan vindi al li la okulojn; Ronjauso ligis al li la pugnojn, kiam la malfeliĉa Renardo ellasis spiron sciiganta ke li ankoraŭ vivis, kaj liaj unuaj rigardoj direktiĝis al la preparoj de lia ekzekuto.

60^a kaj lasta Aventuro.

Kiel Renardo, konfesinta al Belino, sin savis de la vimeno, kaj kiel frato Bernarto, sankta viro, volis fari de li bonan monaĥon.

Renardo, por pli bone sin konfesi antaŭ ol morti, petas ke almenaŭ oni donu al li iun konfesprenanton. Grimberto tuj informigas Belinoⁿ; la bona monaĥejestro alveninta ricevas la konfesadon kaj fiksas la kondiĉojn de la pentopuno, proporcie al la graveco de la pekoj. Dum li konfesis lin, proksimiĝis pasante frato Bernarto kiu alvenis de Grandmonto. Li renkontas sur sia vojo Grimbertoⁿ kaj demandas al li tion pri kio li estis ploranta. "Ha ! Bela siro, mi ploras la malfeliĉon de grandsinjoro Renardo kiun oni baldaŭ pendumos; neniu maltimas paroli al la reĝo por li. Li tamen estis kavaliro kun alta lojaleco, plena de afableco kaj de ĝentileco. Pro la profunda funebro kiun skuas Grimberto kaj Dornarto la erinaco, Bernarto sentas sin kortuŝita pro kompatato; tiel bone ke li iras trovi la reĝon kun la intenco peti ke oni donu al li Renardoⁿ, por fari lin monaĥon de sia domo.

Frato Bernarto estis la plej amata religiulo de monsinjoro Nobla. Vidante lin eniri, la reĝo stariĝas kaj sidigas lin apud si. Bernarto tuj petas al li la vivon de la kulpulo; sed Nobla, anstataŭ respondi, rigardas lin kun malkontenta mieno : "Ha ! siro, reparolas Bernarto, bonvolu konsenti pri mia peto; tiu kiu algluiĝas al siajn venĝemojn, ne devas esperi iam vidi Dion, la patron. Se Jesuo Kristo pardonis sian morton, ĉu vi ne malfermos vian koron al indulgo ? Kompaton ! Kompaton por la pekulo, se li reale estas tuŝita de la Diamo, kiel lia konfeso atestas tion. Ligu lian vivon al la amo kiun vi havas por mi; mi venis trovis vin nur por malhelpi lian mortpunon. Mi volas ordinigi lin monaĥon, mi volas forviŝi liajn antaŭajn malbonagojn, fari lin subjekton de ĝenerala edificado. Dio ne volas la morton de la pekulo, kaj tuj kiam li vidas lin pentantan, li donas al li la eternan saviĝon".

Nobla aŭskultas kaj sentas iom post iom sian rezolutecon mildiĝi. Li ne volus rifuzi ion al Bernarto; li finfine transdonas al li la kulpulon, lasante al li liberecon disponi pri lin kiel li volos tion. Estas tiel kiel Renardo estis elŝovita el malliberejo. Oni instruis al li la regulon de

la ordeno, oni vestis lin per la tolaĵoj de la abatejo, li fariĝis monaĥo. Dek kvin tagoj ne pasis, ke li vidis ĉiujn siajn vundojn cikatriĝintajn, kaj ke li fartis tiel bone kiel neniam. Oni estis edificita pro vidi lin tiel bone memori ĉiujn artikolojn de la kristana doktrino, kaj plenumi tiel pie la devojn de bonega religiulo; ĉiu frato amis kaj respektis lin. La ĉefa zorgado de frato Renardo estis tamen ĉarmi kaj moki ilin ĉiujn, per multe da hipokriteco.

Neniu homo diras ke li restis en la abatejo ĝis la fino de siaj tagoj kaj ke oni sanktigintus lin se lia falsa devoteco ne estis malkaŝita, post lia morto, al iu sankta kaj pia ermito kies Renardo pli ol unu fojon manĝis la porcion da manĝo. Aliaj diras ke, sekvante la diservon, la frato Renardo ne ĉesis ofte pensi pri la belaj kokinoj kies la delikata graso emociis lin tiel bone. La ofte renovigita tento fine estis la plej forta; sed, danke al la sankta vesto kiun li surhavis, li sukcesis longtempe trompi la konfidon de la monaĥoj. Tedadis lin fasti, vigli por nenion kapti, sekvi la kantojn de la diservoj anstataŭ kantigi grandsinjoron Tiselinoⁿ aŭ Ŝantekleroⁿ. Iam post la diservo kiun li tre devotege aŭdis, oni ne miris vidi lin resti malantaŭ la aliaj, kun la nazo en lia breviero. Ĉe la eliro de la monaĥejo, li vidis eniri en la flegejon kvar belajn kaponojn kiujn Tiboto, riĉa burĝo de la apuda urbo, venis oferti al la abato. Frato Renardo promesis al si longue karesi per ili siajn lipharojn. "Vere, li diras al si, ĉiuj tiuj homoj kiuj ĵure promesas abstinencan, ne iras kune kun mi". Dum la okazinta nokto, frato Renardo eliris el sia ĉelo, ekvojis al la flegejo, trovis la lokon kie kaponoj gardis la esperon vivi ankoraŭ kelkajn tagojn, strangolis ilin ĉiujn kvar kaj komencis meti al si bonan guston en la buŝo per unu el ili. Poste, sen adiaŭi grandsinjoron abaton, li kunportis la tri aliajn kaponojn sur sia kolo, transpasis la ĉirkaŭbaritejon, ĵetis sian frokon al arbustoj de la heĝo, kaj baldaŭ sin trovis meze de kamparo.

Tiel estas ke li estus revojanta al Mopertui kaj ke post longa neesto, li estus reveninta en siaj antaŭaj bienoj. Lia reveno, oni aldonas, iom surprizis la bonan Hermelinaⁿ kiu jam konsideris sin vidvino; tiel bone ke ŝi bezonintus sian tutan kapablon por kompreni la realecon de tiu neesperebla feliĉo. Kelkaj kalumniantoj eĉ asertis ke

Ĝi estis kontraktanta duan geedzecon kun la juna Ponceto, sia rekta kuzo, kiam Renardo forlasis la abatejon; kaj por reveni al Mopertui, la falsa religiulo surmetintus travestion de angla ĵonglisto. Estas, inter ni, malbona klaĉo kiu, bedaŭrinde, ne estis kontraŭdirita; sed ne plaĉu al Dio ke ni volus nigrigi la reputacion de iu bona sinjorino kies neni, ĝis tiam, ekpensis suspekti la patrina tenereco kaj la edzina fideleco !

Noto de la eldonisto : La bedaŭrinda legendo de la dua geedzeco de la pruda virino Hermelina kaj de la travestiado de grandsinjoro Renardo kiel ĵonglisto devis aparteni al la tria kaj lasta libro de ĉi tiu rakonto, kies ni trovis nur senkoherajn fragmentojn. Mi tuj diros ĉi tie al vi kelkajn vortojn.

Ekde sia foriro el la abatejo de la Bernardanoj, Renardo havis grandan kialon por timi la juĝpovon de la reĝo, kaj ne plu aŭdacis sin montri krom en trompa kostumo. Laŭvice li alivestis sin per la ĉapo de la kuracistoj, la kapvesto de la juĝistoj, la bereto de la komercistoj, la mitro de la episkopoj, la ĉapelo de la kardinaloj; li surmetis la talaron de la kuracistoj, la sutanon de la prepostoj kaj la livreon de la korteganoj; li adoptis la brustotolaĵon de la monaĥinoj, la kufon de la burĝino, la oran zonon de la landsinjorinoj. Fine, la maljuna poeto ĉesigas la serion de siaj transformoj rakontante "kiel li fariĝis imperiestro".

Sub ĉiu el ĉi tiuj novaj travestioj, la antaŭa malamiko de Isengrino ankoraŭ plenigas la mondon per la bruo de siaj grandfaroj. Li aspekte estis sagaca politikisto, saĝa moralisto, admirinda filozofo, homo de la bona Dio; reale li ankoraŭ estis la granda tentanto, la granda hipokritulo, la granda malamiko de la paco, la granda ĵurrompanto : tiel bone ke ĉiam oni fine rekonis la pinton de lia longa vosto kaj kriis "Vulpo !" malantaŭ kaj antaŭ li.

Jen kial li hodiaŭ ne plu aŭdacas reaperi, kaj kiel en nia Francio oni neniam plu aŭdas paroli pri Renardo; aŭ li transpasis la montojn, aŭ li serioze promesis forlasi la mondon. Se tamen iu fine malkovrus lian rifuĝejon, ni insistege petegas lin averti nin por doni al ni la rimedojn por aldoni novajn aventurojn al tiuj kiujn ni ĵus rakontis.